

(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

::

::

::

::

::

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 148 (13th Year)

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

18 JANUARO, 1933.

RAKONTO DE VOJAĜANTO.

Tri vojaĝantoj sidis antaŭ fajro en la fumejo de provinca hotelo. Ekstere la pluvo falis ade; sed nur malklare aŭdiĝis en tiu komforta ĉambro la bruoj de la muĝo. Kiel ofte okazas kiam viroj kune renkontiĝas la konversacio iam tuŝis la virinojn.

“Strange estas,” diris unu, “ke en la vivo de viro elstaras speciale nur tiuj aferoj en kiuj partoprenis virino. Mi bone scias, ke la virinoj estas malinteligentaj, kaj taŭgas al viro nur kiel distraĵo; sed mi ankaŭ bone scias, ke la plej gravaj aferoj en mia vivo emas forgesiĝi, dum mi vive memoras ĉiun virinon mi iam amis.”

“Kiu provas,” diris alia, “ke la virino ne estas tiel malgrava, kiel vi sugestias.”

“Tute ne;—ĝi provas nur, ke la viro ne estas racia besto.”

La tria vojaĝanto sin intermetis. “Ĉu unu pravas, ĉu la alia, mi ne scias; sed certe tiu afero, pri kiu mi plej ofte pensas, koncernas virinon—la plej belan virinon mi iam renkontis. Estis antaŭ multaj jaroj, kaj okazis en mia propra lando . . .

Mi devis viziti viron, kiu loĝis apud urbeto en le provinco. En tiu tempo, vi komprenu, mi estis agento de mia registaro. Mi finis mian negocon, kaj

komencis rapidi al la urbeto, ĉar necesis, ke mi telegrafe informu miajn estrojn pri la rezulto. Jam krepuskiĝis. Noktaj ombroj miksiĝis inter la lastaj taglumoj, kaj ekpluvis malgaje. Antaŭ miaj piedoj glitis lacerto, kaj malaperis silente ĉe la vojflanko. Ĉirkaŭe la arboj kaj arboj ombre ondovis pro fortaj ventoblovoj, kaj mi ekkuris laŭlonge de la nigriĝanta vojo al domo, kiu videbliĝas malproksime. Mi atingis ĝis la pordego kaj laŭte sonorigis. Dum mi atendis respondon mi rigardis interese la domegon, sur kiu la pluvo nun forte batis. Ĉiu fenestro hele blanke brilis kvazaŭ oni ĉi tie festas ian specialan okazon, kaj inter la muĝbruoj povis mi aŭdi malklare kaj tordite la tonojn de orkestro. Senpacience mi sonorigis eĉ pli laŭte, kaj rigardis anticipe la varmajn domlumojn. La pordego malfermiĝis kaj aperis servisto kun ombrelo. Ni rapidis al la dompordo,—la servisto zorge tenanta la ombrelon super mi, kvankam mi jam estis tute malseka,—kaj eniris grandan vestiblon, brilantan per marmoro. Larĝa ŝtuparo supreniris de la malantaŭo de ĉi tiu vestiblo, kaj tien la servisto kondukis min.

Ĉe la dua etaĝo renkontis nin alia servisto kun mantelo, per kiu li ĉirkaŭis min. Li malfermis pordon kaj

mi eniris bele meblitan ĉambron. Sur la lito kuŝis vira kompleto. Mirante, mi formetis miajn malsekajn vestojn, kaj ekvestis min per la sekaj. Ili estis iomete malnovmodaj, sed ili ja estis tre riĉaj, subŝtoftaj per silko, kaj laŭmezure taŭgis al mi preskaŭ perfekte. Mi rigardis en la spegulon, kaj preskaŭ mi povis kredi, ke mi estas ulo de antaŭa tempo. Mi sentis min ankoraŭ multe pli komforta, kaj scivolis al kiu mi devis danki pri tiu ĉi nekutima gastameco.

Kion fari nun? Ĉu estos pli bone ĉi tie atendi ĝis iu venos, aŭ malsupreniri kaj serĉi mian nekonatan bonfaranton? Mi malfermis la pordon kaj eliris en la koridoron. Mi povis nenion vidi. De malsupre mi aŭdis la mallaŭtan muzikon de l' orkestro. Subite ĝi ĉesis, kaj iu komencis ludi la pianon—eksonis la fajra kaj malĝoja “Dèsir ardent” de Fournier-le-jeune, kiu esprimas la senesperan amon de forlasita fraŭlino. Mi aŭskultis ĝis la fino, la sopirplena fino—kaj tiam denove ekludis la orkestro.

Mi rapidis al la sube proksima etaĝo, kaj tra malfermita pordo mi vidis kaptiolan fajron, la brilon de kristalo, la lumeton de polurita meblo. Hezite, mi eniris—kaj trans la ĉambro, kun etendita mano, aliris al mi bela juna virino. Kiel mi povas vortpentri ŝin? Brunulino, ŝiaj okuloj nigraj, nigraj,

misteraj, ŝia hararo amasigita malalte ĉe la nuko, ŝiaj brakoj nude blankaj. Gracie ŝi alpasis, ridetante. Mi klinis la kapon super ŝia mano. Mi serĉis ĝentilajn vortojn—stultege mi povis trovi nenion por diri.

"Do, fine vi venas, prokrastemulo," ŝi diris.

Kia muziko ŝia voĉo! Mallaŭta, vibranta—ŝi kantus kontralte.

"Ĉampano?"

"Dankon!" mi iel respondis, kaj akceptis la glaseton.

Kion ŝi tiam diris, mi ne scias. Nur mi memoras, ke ni trinkis multe da ĉampano, ke ni ridis multe, ke pli kaj pli ŝi sorĉis min.

"Ĉu vi ŝatus danci?" si post iam demandis.

Ŝi kondukis min al dancejo. La orkestro estis kaŝita evidente post rozkovrita kradego, kiun mi povis vidi ĉe unu ekstremaĵo de la ĉambro. La planko brilis glite, flavete. Tiam ne ŝajnis strange, ke ni estas la nuraj dancantoj—tiam mi nur povis pensi pri ŝiaj skarlataj tremantaj lipoj tre apude al miaj. Ŝia fleksiĝema varma korpo klinis al mi, kaj ni dancis. Ni dancis sur lago de mielo. Ni dancis en mola maro de muziko. Mi sciis nenion krom la dolĉa odoro de ŝi, la dolĉa spiro de ŝi. Kune premiĝis niaj lipoj—ni dancis, dancis . . .

La proksiman matenon mi vekigis por vidi la varman sunon brilantan tra la fenestro. Miaj propraj vestoj kuŝis sur la tablo. Per la taglumo ĉio ŝajnis kvazaŭ iom sangita, iom pli malnova ol dum la antaŭa nokto. Ĉe pluraj lokoj la tapiŝo estis tute eluzita. Tamen mi ne longe pripensis ĉi tiujn aferojn, ĉar subite mi memoris mian gravan devon. Nepre mi devis esti ĉe la urbeto tiun matenon por telegrafi miajn estrojn. Rapide mi vestis min.

Ĉu vekis mian amatinon? Mi ekmemoris, ke ŝi ankoraŭ ne diris al mi sian nomon. Piedpinte mi iris al la pordo de ŝia propra ĉambro kaj tie aŭskultis. Movis nenio kaj neniu. (Hove! ke mi ne eniris.) Mi decidis rapidi al la urbeto kaj reveni tuj post la plenumo de mia devo.

La ĝardeno, kiam mi alvenis la antaŭan nokton, ŝajnis al mi esti bela; sed vere estis tiam tre mallume;—kaj mi nun povis vidi ĝin plenan je malbonaj herboj kaj tute nezorgitan. En la ĝardeno mi ekvidis maljunan grizan virinon.

"Bonan matenon, patrino," mi diris.

"Ĉu vi povas diri al mi kiom laŭ distanco estas la urbeto?"

La maljunulino nenion diris;—nur rigardis min malĝoje momente, kaj malrapide turniĝis for.

Mi supozis ŝin esti eble surda aŭ stulta, kaj vokinte al ŝi, "Donu mian saluton al via mastrino," mi ekkuris al la pordego, kaj en la vojon.

Ĉe la urbeto atendis min letero;—miaj estroj ordonis min, ke mi rapidu al la urbego. Mi ne kuragis prokrasti ori tiu; sed mi tuj rapide skribis letereton por peti mian amatinon, ke ŝi atendu ĝis mia reveno. Mi serĉis iun por porti ĝin—sed ĉiam, kiam mi pri-skribis la domegon oni ridis, diranta, ke tie nur loĝas, kun siaj maljunaj servistoj, tre maljuna virino, kiu permesis eniri nenium kun escepto de la komercistoj; kaj eĉ ili tre malofte vidis la maljunulinon mem. "Estas dirite," oni diris al mi, "ke antaŭ longe ŝi estis forlasita de ŝia amato; sed neniu certe scias. Estis antaŭ tre longa tempo. Estas dirite, ke ŝi estis neordinare bela."

Tamen mi laŝis la letereton al la hotelmaŝtro, kiu promesis sendi ĝin al la domego.

Kiam mi atingis la oficejon de mi-registaro oni informis min, ke mi devas tuj forlasi la landon por entrepreni gravan kaj sekretan aferon. Tiam okazis la milito, vi scias. Dum kvin jaroj mi ne vidis mian propran landon. Sed mi neniam forgesis la belulinon de la granda domo. Kiam mi revenis, la domego estas malplena, silenta. Mi ne scias hodiaŭ, kiu ŝi estis, mia amatino, de kie ŝi venis, kien ŝi iris—eĉ mi ne scias ŝian nomon. Nur memoro, nur mistero, neforgesebla . . .

—"KINO"

TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following:—Melbourne Esperanto Club (Subs.), £1/14/-; Mr. C. Cowling, 4/6, Oct., '33; Brisbane Esperanto Society (Sales), 6/-; Mr. F. Taylor, 5/-, Sept., '33; Miss I. Sievwright, 4/6, Dec., '33; Mr. L. Thomson (adv.), 2/6; Adelaide Esperanto Group (Sales), 4/-; Westralian Esperanto Society (Sales), 8/-, (Adv.) 5/6; Miss P. Berthold, 4/6, Nov., '33; Mr. F. Luhnig, 6/-, Feb., '34; Mr. V. Sowry, 10/-, Apl., '34; Miss A. Jeffrey, 4/6, Nov., '33; Miss J. Gray, 4/6, Dec., '33; Miss E. Hynd, 4/6, Dec., '33; Coburg Esperanto Group (Sales), 8/8; Mr. M. Barnett, 5/-, March, '33;

Mr. N. Thomas, 5/-, July, '33; Sydney Esperanto Society (Sales), £1/4/-, (Adv.) 5/6; Mrs. M. Humphries, 4/6, Nov., '33; Mr. Archer, 10/-, Jan., '35.

PYKE MEMORIAL EXAMINATION.

The second Pyke Memorial Examination was conducted simultaneously in Victoria, New South Wales and Queensland, on November 5th, 1932. Thirty-four candidates were examined; twenty-three from Victoria, seven from New South Wales and four from Queensland. There were twenty-one contestants for the special prize of five guineas awarded to the student who secures the highest pass after studying not more than one year, and thirteen for certificates only.

The contest for the prize was a very keen one and two of the papers had to be re-examined three times to make sure that a right decision had been arrived at. The winner proved to be Mr. S. Cullel, of Richmond, Victoria, who passed with honor after only eight months' study. The examiners, in their report offered a word of commendation to the following:—Mr. K. Linton, the "runner-up," who after eleven months' study was so nearly successful in winning the prize and who gained the greatest number of points

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

in the oral examination; Mr. L. C. Cooke, who deserved special mention for the knowledge displayed after only four months' study; Mr. E. A. Turner, who though not eligible for the prize gained the highest number of marks.

Certificates were also awarded to the following:—Victoria—Misses E. Williams, D. Thorne, M. Davis; Messrs. G. Peers (with honor), A. Aldretch, E. E. Curtis, E. Hearne. New South Wales—Misses D. Davies, C. Bridge; Messrs. L. Hillen, A. W. Peacock. Queensland—Messrs. E. G. Littleton (with honor), S. Leon Parry.

The Pyke Memorial Committee cordially thanks all those who helped to make the examination a success and will be grateful if group secretaries will urge new students to be competitors for the examination in 1933.

RADIO COLUMN

The Esperanto lecturer at 3LO regrets that he has been unable to follow in every detail the program published in "La Suda Krucio." On most occasions ten minutes was found to be insufficient to deal with points advertised. This difficulty has now been overcome as, from now on, fifteen minutes instead of ten will be allotted to the Esperanto session. Listeners will kindly note that the lessons are now given from 7.45 p.m. to 8 p.m. on every second Saturday evening. The dates, in the near future, on which the lessons will be given are Jan. 21st, Feb. 4th, Feb. 18th.

KRONIKO.

Wellington, Nov-Zelando.—La ĉiujara kunveno ĝenerala de la Wellingtona Esperanto-Klubo okazis je la 6a de Decembro. S-ro Bertram Potts, F.B.E.A., prezidis. Li rakontis la klublaboron dum la finonta jaro kaj substreki la gravecon de laboro en N.Z. por Esperanto, dirante ke samideanoj alimondpartaj kuraĝiĝas per tio ke samcelantoj en tia malproksima lando, kia Nov-Zelando, antaŭenpuŝas la lingvon. Li laŭdis la vic-prezidanton, s-ron Jack, pro lia gvidado de la klubo dum sesmonata vizito de li al Usono, kaj menciis speciale la ĉiusemajnajn ĵurnalraportojn, kiujn s-ro Jack preparis, kaj kiuj altiris multan intereson de la publiko kaj samtempe preparas la edukajn aŭtoritatulojn por doni jesan respondon, se ni eventuale repetos por la enkonduko de Esp-o en N.Z. lernejojn. Tiujn, kiuj fidele subtenis la klubon, kaj iliajn kunoficistojn s-ro Potts varme dankis.

La 5-a ĉiujara raporto kaj la bilanco, prezentitaj de la sekretario, f-ino G. Carty (33 Tanera Cres., Brooklyn), kaj de la kasisto, s-ro L. E. Dust, respektive, montris ke la klubo, kvankam iom pli malforta en la membraro (pro la ekonomia krizo) estas ankoraŭ en forta situacio finance, malgraŭ ke okazis en la jaro malgranda deficiito—la unua de post starigo de la klubo antaŭ kvin jaroj! Ambaŭ dokumentoj estis akceptitaj. La N.Z.E.A. sekretario, s-ro W. H. King, gratulis la klubon pro ĝia seninterrompa, sukcesa funkciado dum la jaro.

La voĉdonado por oficistoj por la nova financa jaro, (kiu, la ĉeestantaro decidis, komenciĝos je la 1-a de novembro kaj finiĝos je la 31-a de oktobro,

ĉiujare) rezultis jene: Prezidanto, s-ro Bertram Potts, F.B.E.A.; Vic-prez., s-ro V. Leck; Sekretario, f-ino G. Carty; Kasisto, s-ro L. E. Dust; Komitatanoj, f-ino C. Smythson, D.B.E.A., kaj s-ro E. C. Jack; Delegito kaj Vicdel. al la 4a N.Z. Kongreso (Master-tono), s-ro Potts kaj f-ino Smythson, respektive.

Oni dankis la ekzigantajn kluboficistojn, la honoran revizoron (f-ino L. Leck), kaj la lokajn redakciojn pro servoj faritaj kaj helpo etendita.

La klubo decidis inviti la 5an N.Z. Kongreson al Wellingtono en la venonta jaro; kaj klubdelegitoj ĉe la 4a tion faros ĝustatempe.

Antaŭ fermiĝo, la honora vivprezidanto de la klubo, s-ro W. L. Edman-son, F.B.E.A., mallonge parolis. Lia alvoko al ĉiuj tenu la Zamenhofajn idealojn firme en la koro por povigi la movadon sukcese trapasi la malfacilajn tempojn rikoltis laŭtan aplaŭdon.

ZAMENHOFA FESTO.

Multaj homoj kunvenis en la klubejo la 13an de decembro por festi la datrevenon de la naskatago de la mortinta Majstro, kaj samtempe fini la jaran klubagadon per festa vespero. Lia prezidanta moŝto, s-ro Potts mallonge sed trafe skizis la vivon de d-ro Zamenhof kaj la naskiĝon de Esperanto; kaj s-ro Leck pridiris pri sia vizito al Eŭropo kaj la helpego ricevita per Esperanto survoje. Post tre ĝuinda programo, en kiu la "Golden Hula Muzikistaro" provizis muzikon kaj fraŭlineto Joyce Leck dancis, la tuta kunvenanaro ĉeestis la restoracion "Ritz" por tetrinki kaj babiladi. Antaŭ fino, oni aranĝis renkonti unu la alian ĉe la 4-a Kongreso; kaj la prezidanto anoncis ke la klubo rekomencos je la 7a de februaro.

Adelaide:—The Adelaide Esperanto Club, which was started in September, 1932, finished the year with a celebration on Saturday evening, 17/12/32, at the home of Col. Fulton. All the members were present, and during the evening some interesting items were rendered.

As the secretary, Mr. L. C. Thornton, was leaving Adelaide for Melbourne at the end of the year, the Club gave him a "send-off." The president, Mr. Waterman, complimented Mr. Thornton on his enthusiastic efforts in getting the Club going successfully and on behalf of the Club members made him a fitting presentation.

In replying, Mr. Thornton thanked the members for their appreciation, at the same time pointing out that nothing would give him more pleasure than to see the Club go ahead in 1933 and be an overwhelming success.

The Club meets every Thursday evening from 12th January, at 7.30 p.m., at the 5th Floor, Paringa Buildings, Hindley Street. Here the members will study Esperanto as well as arrange picnics and social gatherings.

As Col. Fulton will be in charge of the Adelaide Esperanto Club, we take this opportunity of wishing him the very best of success in 1933.

ESPERANTO IN THE W.I.R.

The local section of the Workers' International Relief, the world-wide working class relief and cultural organisation, has taken up the study of Esperanto with enthusiasm. Last winter classes were formed in Port Melb., Northcote, Brunswick and Richmond. Since then a group has commenced study at Caulfield, and it is hoped shortly to form Esp. groups in the branches of the organisation at Prahran and Oakleigh. Of the earlier pupils, several have reached the teaching stage, while one student not only quickly assumed the responsibility of teaching, but carried off the Pyke Memorial prize. We refer to Mr. Culell of Richmond.

Only very nominal charges towards the cost of the lighting in the various halls are made, whilst those who are unemployed are welcomed free of charge. Intending pupils should inquire re study nights and addresses of halls, at Mrs. Butler, room 8, National Chambers, 122 Bourke St., City.

ON CLARITY IN WORD FORMATION.

A language enriches itself (from its own elements) in two ways, (1) by proper derivation, that is, by the aid of affixes, and (2) by improper derivation, that is, modifying the sense of a word without modifying its form. To form "jardinet" from "jardin" is an example of proper derivation. To pass from the verb "diner" to the noun "le diner" is an example of the second. Preference given to one of these procedures over the other must of necessity influence the character of a language. It is clear that the first way, the indicating by prefix or suffix of the change in the sense of a word, is much clearer than the other. A language, then, is the clearer and more precise to the degree that it prefers the proper derivation to the improper. Take English, which has systematically

followed the latter road. The journalistic "French supply trouble in Syria" can at once mean "The French foment trouble in Syria" and "Commissariat difficulty experienced by the French in Syria"; while the title of an article "Red designs on China" could mean "Red motifs painted on porcelain" as well as "Sinister intentions of the Bolsheviks relative to China." Such examples show clearly the confusion and misunderstanding that may be engendered by the tendency of a language to employ one word in different grammatical roles and senses, without linking to it an affix indicating the change. (Then follows an illuminating study of the flexibility of Esperanto as demonstrated by the affixes "-ig" and "-pri-").

(Trans. from "L'Esperanto et la Stylistique," by Professor G. Waringhien, Lycee de Lille.)

LA PLUVADO ĈEESTAS KONGRESON.

La pluvado! Kiajn diversajn impresojn tiu vorto faras sur la homojn! —Gojo, malkontento, teruro, espero, mizero k.t.p. — kaj kiel rapide ĝi povas ŝanĝi scenon de gajeco en absolutan malesperon.

Nun, imagu gloran matenon en Aŭgusto, ĉe Budapeŝto, sur la bordo de rivero Danube. La suno brilas serene kaj ne estas nubo en la ĉielo. Naĝanta sur la rivero estas padelradŝipo, ornamita per flagoj kaj centoj da gaje babilantaj, malpeze vestitaj homoj, suprengrimantaj la moveblan ponteton. Sur la supra ferdeko, kiu estas tute nekovrita, moviĝas tabloj aranĝitaj prete por la tagmeza manĝo, kaj orkestro ludas vigle. Subite fajfilaro funkcias, kaj formoviĝas la plezura ŝipo, por glora ekskurso sur Danube, ĝis Viŝegrad.

Sed, ho ve! En tiu momento ĉie aŭdiĝas la vortoj "Jen pluvo!" Somera fulmotondro subite venas el nenio, kaj post duonhoron la tuta sceno ŝanĝiĝas sursipe.

La ferdekoj havas multegon de personoj — estas nenia ŝirmilo — kaj tial la antaŭe ridanta homamaso sin trovas sub la tiraneco de la toranta pluvo. La muzikfoliaro sur la starigiloj estas baldaŭ vera molaĵo; la malpezaj vestoj de la virinoj alkroĉiĝas kiel naĝvestoj; la grizaj vestoj de la sinjoroj ŝajne nigriĝas dum la akvo penetras, kaj la formoj de la ĉapeloj rapide ŝanĝiĝas antaŭ la okuloj. Sub la tabloj kelkaj pasaĝeroj kaŭras, sed vane. Preskaŭ tuj la ferdeko similas al rapide fluanta rivero.

Sed subite, en la mezo de ĉi-tiu malgajega sceno, oni aŭdas iun kanti la vortojn de "L'Espero" — "Tra la mondo." Tuj ĉiuj kune kantas la himnon, ridetoj ekaperas kaj la kantado iĝas laŭta kaj pli laŭta, spite la pluvon, la kunvojaĝantoj regajiĝas, kaj atendas ĝis la varma suno brilas por sekigi ilin. — Ili estas samideanoj, kaj eĉ la pluvo ne povas tute venki ilin! — (C. G.)

SERIOZE KAJ ŜERCE.

Tiu kiu luktas kontraŭ ni plifortigas niajn nervojn kaj akriĝas nian lertecon. Nia kontraŭulo estas nia helpanto. Edmund Burke.

Ĉiufoje kiam homo ridetas, eĉ pli ol kiam li ridas, li aldonas iom al la daŭro de sia vivo. Laurence Sterne.

La lasta vorto—Unua kato:—Ne ĝenu vin! Ĉio, kion vi ĵus diris al mi, eniris en unu orelon kaj eliris el la alia.

Dua kato:—Kaj kial? Ĉar estas nenio inter ili por haltigi ĝin!

Manjo estis petolema, kaj la patrino estis ferminta ŝin en la litĉambro. Pro tio ke nenio sono venis el la ĉambro, la patrino vokis—"Ĉu vi nun estas bona knabino?" Manjo respondis malafable—"Mi kraĉis sur vian ĉapelon, kaj mi kraĉis sur vian robon, kaj mi kraĉis sur viajn ŝuojn!"

Patrino—"Vi malbona infano! Kion vi nun faras?"

Manjo—"Mi atendas pli da salivo."

A. (al amiko kun ĉapelskatolo sub la brako). Kien vi kuras?

B. Hejmen. Mi portas tiun ĉi novan ĉapelon al mia edzino.

A. Ĉu pro tio vi devas kuri tiel rapide?

B. Certe. Alie la modo estos jam ŝanĝita antaŭ ol mia edzino vidos la ĉapelon!

POR LA VIRINOJ. Raviolio de Italujo.

Faru paston per plentaso da faruno kaj varmeta akvo; aldonu salkuleron da salo kaj tekuleron da olivoleo; miksu kaj flankenmetu por dek minutoj. Tiam egale dividu ĝin en du pecojn kaj platingu ĉiun porcion en tre maldikan kvadraton. Metu pecetojn (pilketojn) de farĉaĵo en paralelajn liniojn de unu colo sur unu el la pastkvadratoj; malsekigu la paston ĉie inter la linioj per lakto, kaj surmetu sur ĝin la duan pastkvadraton. Kunpremu la paston inter la farĉepilketoj, tranĉu en disajn kvadratojn aŭ cirklojn, kaj kuiru en bolanta salakvo dum dudek minutoj, drenu kaj servu tre varmaj kun tomata saŭco kaj raspita fromaĝo.

La farĉaĵo por la pilkoj—Bolu malgrandan peceton de bovaĵo ĝis mola; pecetigu ĝin kun la sama kvanto da bolita hakita spinaco, iomete da miksitaj herboj, pipro kaj salo. Miksu, kaj malsekigu per iom de la bovaĵakvo.

Aldonu kirlitan ovon kaj raspitan fromaĝon. Oni povas uzi la restaĵojn de jam kuirita viando.

Niaj abonantoj estos rimarkintaj la novan titolon ĉe la supra de nia gazeto. Ni ŝuldas tion ĉi al f-ino Ridley Ezard, al kiu ni proponas niajn sincerajn dankojn por ŝia artistita desegnaĵo.

"DR. ESPERANTO."

The Man and His Masterpiece.

In view of the remarkable progress throughout the world of Esperanto, the auxiliary language, it may be interesting to recall the story of its genesis and early years. In what circumstances did the idea of creating an international language take shape in the brain of young Zamenhof, and what was the history of Esperanto during the years preceding its publication?

The idea to which he devoted his life came to him, strange to say, in early infancy, and from that time never left him. He lived with it; he could not imagine himself without it. This will help to explain the persistence with which he labored for it, and why, in spite of the difficulty and bitter disappointment, he never laid aside for long the slow travail of calling it into being, as so many other workers on the same field had done before him.

Lazarus Ludovic Zamenhof was born in Bialystok, province of Grodno, Poland, in 1859. The place of his birth and infant years may be said to have given the direction to his entire future life. Its population consisted for the most part of four diverse elements—Russians, Poles, Germans, and Jews. Each of these elements spoke a different language and was held in suspicious enmity by the other elements. In such a town, more than anywhere else, a person of impressionable nature feels the weighty calamity of lingual diversity, and is convinced at every step that such diversity is at least a chief factor in disuniting the human family and dividing it into warring factions. He was educated as an idealist: that all men are one and brethren was axiomatic in the teaching he received. Yet at every street corner sights met his eye which made him feel that not men, but Russians, Poles, Germans, and Jews have existence. This bitter thought was a constant torment to his infant soul, though many possibly would smile at this "anguish for the world" on the part of a child. Because it seemed to him then that the person of mature years possessed something in the nature of almighty power to affect his will, he would repeat to an apostrophied humanity the promise that when he too was full-grown the evil of tongue-diversity would be forever done away.

Little by little he was convinced, of course, that the solution to such great

problems is not arrived at so easily as it presents itself to the child mind. One after another of his infant utopias was discarded, and only the dream of a second language for all persisted, never to leave him. He gave himself to it, but confusedly, nebulously, and without any definite plan. Later, he knows not when, but early in life, there formed in him the belief that the only international language possible must be some neutral idiom belonging to none of the present-day nations. When from the Bialystok technical school he was transferred to the Warsaw gymnasium, or classical school, he experienced for some time a fascination for ancient languages, and pictured himself travelling through the world, and with burning words inducing mankind to revive one of those tongues for modern use. With the passing of time, however, he came to the firm conviction that such a course would be impossible, and there began to form dimly in his mind the outline of a new, artificial language. Often he made attempts to give it substance by drawing up wonderfully flexible declensions, conjugations and suchlike. But a vehicle of human speech, with its seemingly inevitable complexity of grammatical forms and its voluminous vocabularies, seemed to him such an unwieldy and colossal machine that more than once he sighed to himself: "Away with such nonsense; this task is not proportionate to merely human powers." Nevertheless, he always returned to his dream.

French and German he had learned in his infancy, at an age when one cannot rightly compare and make conclusions; but, when, being in the fifth class at the gymnasium, he began to learn English, its simplicity of grammatical structure markedly impressed him, and this all the more because of his sharp transition to it from Latin and Greek. He then noticed that multiplicity of grammatical forms is only a blind historical accident, wholly unnecessary to any idiom. With this thought uppermost he began probing deeper, eliminating from his projected language all useless forms, and noticing the while that his grammar became simpler and simpler in his hands until finally, without hurt to the language, it was contained within the compass of a few pages. The realisation of his life plan seemed at hand. But alas, ever the idea of the inevitability of massive dictionaries gave him no rest.

It so happened that when he was in the sixth or seventh class at the gymnasium he noticed the inscription "Shvejcarskaja" (public-house), which he had many times seen, and shortly afterwards, the sign "Konditorskaja" (sweet-shop). This suffix "skaja" held his interest and revealed to him that it and other such endings might well make it possible to establish categories of words representing ideas, which one would not have to learn separately. As this thought possessed

him more fully he felt the ground firmer under his feet, and there fell a ray of light on the troubling question of the colossal dictionaries, which now began rapidly to shrink before his mental eyes.

"The problem is solved!" he told himself, and straightway began compiling night and day lists of carefully selected suffixes. He well knew what vast importance to a consciously created language would be a full use of such a power — a power which in natural languages has effect only blindly, irregularly and incompletely. Diligently comparing words and searching out from among them constant, defined relations he every day cast out of the dictionary a huge series and displaced them by suffixes having a limited meaning. The mechanism of the language was now, as it were, on the palm of his hand, and fresh hope came to reinforce the love and persistency that characterised his work.

(to be concluded.)

RECENZ(ET)OJ.

POL-POMERANIO.

de Kazimierz Smogorzewski, tradukita el la franca de S. Grenkamp-Kornfeld; eldonita de Esperantista Voĉo, Jaslo, Pollando. Prezo 2.50 sv.f., paĝoj 125, kun 26 landkartoj, el kiuj 4 plurloraj.

La Versajla Packontrakto dishakis Aŭstri-Hungarion kaj starigis la Polan Koridoron. Nun tre konstateble estas, ke per tio ĝi estigis sur la Eŭropan landkarton du precipajn dangepunktojn. Studentoj de la modpolitiko akre malkonsentas pri la justo aŭ maljusto de la Parizaj decidoj, kies eĥoj mugminace penetras hodiaŭ la kancelariojn de preskaŭ ĉiu Eŭropa ŝtato.

S-ro Smogorzewski, eminenta pola publicisto, aperigis tre frapan libron en franca lingvo, La Pomeranie polonaise, pri la supra demando, kaj pro la intensa kaj vasta intereso generita de la problemo ŝajnis inde, ke tia grava verko aperu ankaŭ en Esp-o. Tiel aperis neta sed tamen ampleksa mallongigo de ĝi fare de lerta samideano Grenkamp-Kornfeld. Per tio la libro fariĝas disponebla por tiu hommulto, kiu ne povas legi la francan lingvon.

En ĝi la aŭtoro resumas klare la historiajn, moralajn kaj ekonomiajn konsiderojn per kiuj Pollando dialektike batalas por reteni la disputatan regionon kontraŭ la germanaj pretendoj. La sobra lingvaĵo per kiu li prezentas sian argumenton, kaj lia riĉa dokumentado el germanaj fontoj, ne povas ne impresi legantojn eĉ la nesimpatiajn.

En kurioza ĉapitro estas montrate, ke en la mondo ekzistas pli ol dekkvar "Orientaj Prusioj" kaj pli ol dudek "koridoroj," kaj ankaŭ estas demonstrata la gravo de maren-eliro por Pollando el ekonomia vidpunkto.

Lastatempaj eventoj, precipe la ĵusa pakto inter Francujo kaj Sovetio (des pli se tiu ĉi estis farita sen plena kon-

sento de Pollando) tre povas influi sur la estontan politikagadon de la pola ŝtato, kaj meritis aldonan ĉapitron en eventuala dua eldono.

Fermas sian libron Smogorzewski per la jena fera deklaro: "Neniu pola politikulo akceptos iam rediskuton (pri la germanaj-polaj limoj). Se tiu mallarĝa fenestreto, tra kiu estas malfermita al Polujo la mondo, estus minacita, tiam ĉiuj polaj civitanoj defendus ĝin per ĉiuj rimedoj, kiel oni defendas tion, kio estas la plej kara en la mondo: la rajton al vivo."

La tradukinto, malgraŭ konstanta averto de Lingva Akademio, libere uzas neologismojn, sen akompana listo pledanta rajtecon de tiuj. Ofte la novaj radikoj ŝajnas al mi ne necesaj: ratifi, notifi, stipuli. Kion signifas "markio," "moreno," "veneda," "sbiro"? Kial uzi "suvereneco" kaj "suzereneco"? 35, Missence uzita "aktuala"; 44, 47 "ignor"; "vojevodio" (Fund. Krest. 323, vojevodo); aliel (aliel); legioj (legioj); terorigi (terori); revidita (reviziita); Stranga frazo: "en kies germanan senton oni ne povas dubi."

Valora dissemilo de porpola simpatio.

"5,000,000," originalo de S. Grenkamp-Kornfeld, 114-paga, prezo frsv. 2., dua eldono. Eldonejo Esperantista Voĉo, Jaslo, Polujo.

Diras la aŭtoro sur p.95: "La kulturecon de iu popolo oni ne mezuras laŭ venditaj lernolibroj, sed simple — laŭ libroj." Kompreneble aludo al la Esp-a "popolo." Nu, vastskala kaj ĝenerala aĉetado de libroj kia "5,000,000" ne stampus ilin kiel kulturamantan popolon. Sed s-ro G. K. estas kulturita homo. Tion li pruvis per siaj antaŭaj servoj al nia literaturo. Des pli mirige do, ke li lasis presiĝi tian senvaloraĵon, kiu devis tempon rabi al la utilaj verkoj, pri kiuj li jam reklamas.

Frapaj nur estas la krianta kovrilo kaj la misfido de la aŭtoro, ke la skribaĵo spegulas lian talenton.

Intersteno, la tutmonda stenokribo, elpensita de F. de Kunovski, havas ankoraŭ pli ambician celon ol Esp-o, nome ĝi celas forigi entute la malfacilan, temporaban longskribon, kaj fariĝi la unusola formo de kaligrafio por ĉiuj popoloj. Esp-o, kiel konate, celas nur servi kiel la helpa, dua lingvo, neniel forigante la naciajn.

Intersteno estas laŭ sia konstruo jen nacia jen internacia stenokribo, per kiu oni povas skribi en la patra lingvo, kaj en Esp-o, kaj en du dudekoj da aliaj lingvoj. Esp-o kaj ĝi havas ian similecon inter si, en tio ke la unua alportis fundamentan reformon en la lingva sfero kaj la dua en la skriba. La Interstena movado praktike uzas Esp-on. Ĝiaj lernolibroj estas plejparte eldonataj en Esp-o, kaj la nacilingvaj atentigas pri nia lingvo.

Ĉiujn informojn oni ricevas volonte de la Intersteno-Instituto, Friedenstrasse 79, Duisburg, Germany. (Robo).

LINGVA DISKUTEJO.

(Instigaj rimarkoj celantaj kulturi pli akran lingvosenton ĉe niaj progresintoj.)

A. F. Milward, en "La Dormanto Vekiĝas," skribis "ponto, kiu transiris la straton per nekruta **suprena kliniĝo**." Ĉu legantoj povas citi el unuarangaj aŭtoroj ekzemplojn de ĉi tiu adjektivo de la "adverbo de direkto"?

"Vi ne devas fari": "Vi devas ne fari." Logike la unua signifas: ne estas necese, ke vi faru, kaj la dua: estas necese, ke vi ne faru. Tamen Zam. kaj la granda plimulto de verkistoj uzas la unuan anstataŭ la duan, kaj pro tio oni devas akcepti ĝin kiel esperantan idiotismon. Persone plaĉas al mi vidi la formon uzata korekte.

Cox eraras (p. 176, 4a eld., ĉe pleje). "Pleje" signifas "mostly, for the most part," kaj "malpleje," "leastly," "la plej malmulte." Komparu: Fund. Krest. 219/5. . . . estas **pleje** subskribitaj de homoj, kiuj ne bone posedas la pulmon."

Ĉiam skribu "ĉi tiu" ne "ĉituu." Oficiala Gazeto 4, 1911, p. 2, Zam. diras, ke eĉ meti streketon inter la du vortoj estas erare.

"Antaŭ fariĝi" estas malbona. Ĝin uzis Privat paĝon 73 de vol. 1, Historio de Esp-o. Li estas lertega esperantisto, tamen en lia verkaro oni ofte vidas ateston de malzorgo. "Ol" ne estas forlasebla antaŭ infinitivo.

"Multa knabino," p. 395, Fund. Krest. signifas "many a girl." Mi memoras similan formon en vol. 3 de La Revuo (1908-9), p. 407, "multa ridetanta valo." Sampaĝe sidas "Multa nigra monta gorĝo." Neniam poste mi vidis tiun formon.

"Know thyself." "Konu vin mem." "tre konu vin mem," aŭ "Elkonu vin mem." Kabe diras en sia vortaro: "Laŭ Sokrato la memkono estas la plej

malfacila afero."

Esperanto neniam havis la principon "unu vorto, unu signifo," kvankam iuj verkistoj pretendis, ke ĝi havas ĝin. Kaŭzo de la foja dusenceco de vortoj (homonomioj) estas ke Esp-o, ĝis certa grado, estas natura lingvo. La afero tamen ne estas grava, ĉar preskaŭ ĉiam la kunteksto forigas ĉian dubon. Kompreneble restas ĉe vi, ĉu uzi aŭ ne uzi iun dubesencan formon.

Bone estas ne uzi -ul kiam partcipa substantivo estas sufiĉa. Ekz. kaptito (ne, kaptitulo), ŝanĝito (ne, ŝanĝitulo). Tre ofte tamen eĉ ĉe bonaj verkistoj oni vidas la trosufiksitan formon "konatulo."

"Orienta Indio" kaj "Okcidenta Indio" estas laŭ la nomoj en la lingvoj Angla, Franca, Germana, Hispana kaj eble en aliaj, por East and West Indies.

"I respect you too much to do anything like that." Malfacila esprimo angloj trovas ĝin tradukante. Jen Zam., "Mi tro multe vin respektas, por ke mi faru ion similan" (Georgo Dandin 41); "Ŝi estas tro artistino, por ke mia ideo al ŝi ne plaĉu." "Mi ŝatas vin tro, por povi iam enamiĝi en vin" (Ŝi la Tria 54/12, 51/30, Grabowski). (R.B.)

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF.

(N-ro 5)

Mi ne rakontos nun pri la signifo, kiun la mortinto (W. H. Trompeter) havis por nia afero; mi ne raportos pri ĉiuj liaj meritoj por nia afero. Ĉiuj esperantistoj scias tion ĉi tre bone, kaj sendube ili ĉiuj kune kun mi sentas la tutan perdon, kiu nin atingis. Al la novaj esperantistoj mi diras nur mal-longe, ke sen W. H. Trompeter nia afero nun eble jam de longe ne ekzistis. Antaŭ 10 jaroj la stato de nia tiam ankoraŭ tre juna afero estis tre malbona; ekzistis neniam rimedoj, por ion fari, kaj nia sola tiama gazeto

devis ĉesi eliradi. Tiam aperis Trompeter kaj, kvankam mem homo ne tre riĉa, prenis sur sin la tutan finanĉan ŝarĝon de nia gazeto, ne sole prenis sur sin ĉiujn elspezojn, sed difinis ankaŭ el sia poŝo salajron por la redaktoro, kaj sen bruado, sen sinlaŭdado, li per siaj propraj rimedoj en la daŭro de tri jaroj kondukis la gazeton ĝis tiu momento, kiam ĝi ekpovis jam stari sur propraj piedoj. Li ne rifuzis sian helpo ankaŭ poste, kiam s-ro Gernet komencis eldonadi novan esperantan gazeton. Per lia mono ankaŭ aperis siatempe kelkaj tre gravaj libroj, al kiuj li, pro celo de propagando, difinis tiel malgrandan koston, ke la enspezoj ne povis kovri eĉ duonon de la elspezoj. Ĉion li faradis sen bruo, modeste kaj silente, tiel ke la plimulto da esperantistoj eĉ nenion sciis pri liaj grandaj oferoj. ("Lingvo Internacia," 1901. "Originala Verkaro," 222.)

LA INDIĜENOJ DE AŬSTRALIO.

Gravajn rezultojn oni atendas de ekspedicio, kiu lastatempe ekiris al la Koro de Aŭstralio por progresigi la laboron, doni al la scienco kompletan konon de tiu raso, konsiderata esti la sola prahistoria raso restanta sur la tero—la aŭstralia indiĝeno. Opiniante, ke la indiĝena raso baldaŭ ĉesos ekzisti, sciencistoj rapidigas la laboron akiri konon pri ĝiaj moroj kaj historio. La ekspedicio konsistas el 12 homoj inkluzive de kinematografisto. Kvin aliaj ekspedicioj jam vizitis aliajn regionojn en la mezo de Aŭstralio.

Unu el la plej utilaj lecionoj lerneblaj el la indiĝenoj estas tio, kiel vivi pli ekonomie kaj ankoraŭ ŝane, kiam nutraĵo estas malabunda. Diskutante



Save 75 per cent. on your Esperanto Literature for 1933!

Write for FREE Prospectus, obtainable from the Manager.

"The SUDA KRUCO"

P.O. Box 731. Melbourne

la manieron de la esplorado, la estro, profesoro J. B. Cleland, diris: "Informante sin pri la fizikaj karakteroj de kiu ajn raso de homoj, oni povas fari gravajn deduktojn nur post kiam kolektigis granda kvanto da materialo. En antaŭaj ekspedicioj oni akiris grandan amason da mezuroj de diversaj partoj de la korpo de indiĝenoj, ankaŭ informon pri kolornuancoj de la haŭto, koloro de la okuloj, kaj aliaj tiaj trajtoj. Oni esperas, ke, helpate per la plua informo kolektota de la nuna ekspedicio, oni povos fari definitivajn konkludojn pri tio, kiel la aŭstralia indiĝeno diferencas de aliaj rasoj, kaj kiel doni pri li pli precizan sciigon kiel aldonon al la ĝisnuna multemanka impresado havata de la granda plimulto de la publiko.

"La ekspedicio ĝisfunde studas ĉion en la ĉirkaŭaĵoj de la indiĝenoj, kio povas influi sur ilin. Oni esploras tion, kiel ili sin ŝirmas kontraŭ ekstremoj de la temperaturo, sub la glaciiga punkto kaj super la 100° Fah. La naturo de la indiĝenoj ebligas al ili ekzisti sub kondiĉoj, sub kiuj vivado por blankuloj estus neebla, tial la ekspedicio studos la treege ekonomian manieron, laŭ kiu ili uzas siajn manĝaĵojn."

S-ro H. M. Hale, direktoro de la Adelaide'a Muzeo kaj ano de la ekspedicio, diras: "Post unu-du jardekoj estos tre malfacile trovi indiĝenojn vivantaj en sia natura stato kaj sekvantaj la morojn, kiuj ekzistis antaŭ ol ili faris rilatojn kun blankuloj. La Antropologia Fakultato en la universitato ĉiam forte urĝis, ke la registaroj proklamu specialan rezerv-regionon, en kiun neniu blankulo eniru. La nunaj rezerv-regionoj ne estas efektivaj pro tio, ke estas permesate el blankuloj iri tien." La koston de la ekspedicio grandparte portas kaso fondita de la Rockefeller Foundation.

—Tradukis Gego.

PSEŬDOAFIKSOJ.

Jen interesa artikoleto kiu aperis en la "Proleta Studento":

En diversaj lingvoj ni trovas pli malpli regule afiksojn. En la aplikado de tiuj afiksoj ne estas reguleco. Esperanto estas laŭdire artefarita logika lingvo, tial ni progresemaj esperantistoj devas bone atentati la formojn de pseŭdoafiksoj. Ankaŭ en la internacia lingvo troviĝas tuta serio da neregule aŭ almenaŭ nekonscie aplikataj pre-kaj sufiksoj. Ĉe atenta pririgardo de

Esperanto ni observas mirinde kvantan nombron de tiaj, kiuj enviciĝis kaj mokete ĉirkaŭpetolas eĉ en tiu "artefarita" lingvo. Ili simple transportigis Esperanton el la vivaj kaj malvivaj lingvoj, kaj estas nenia kaŭzo embarasigi pro la nelogikeco—male—ni celu profiti el tio, krei novajn vortojn el tiuj pseŭdoafiksoj. La progreso sur ekonomia, politika kultura kampoj produktigas ankaŭ novajn komprenaĵojn, kiujn esprimi facilas en Esperanto. Same sin ankoraŭ kaŝas bonaj radikoj inter afiksoj. Ni do iom sondu.

Pseŭdoprefiksoj.

Politikano, poligloto, polifono—poli t.e. plur- aŭ mult-

monologo, monopolo, monotona—mono- t.e. unu

telegrafo, teleskopio, telepatio—tele- t.e. malproksimen

biografio, biologio, biomalto—bio- t.e. vivo

preludo, prelego, prefikso—pre- t.e. antaŭ

aŭtodidakto, aŭtokrato, aŭtonoma t.e. aŭto- t.e. mem

teismo, teokratio, teologo t.e. te- t.e. dio

Pseŭdosufiksoj.

Bankokratio, burokratio, demokratio—t.e. regado

monarĥio, hierarĥio, oligarĥio—arĥio, arkio t.e. regado

poligamio, monogamio, endogamio—gamio t.e. edzeco

sociologo, astrologo, ginekologo—-ologo t.e. isto

redakto, tajloro, aktoro — -oro t.e. isto

horoskopio, kalejdoskopio, teleskopio — -skopo t.e. vido

Jen kelkaj el abundegaj afiksoj aperantaj en Esperanto. Ĉe konsekvenca uzado de tiuj afiksoj la lingvo multe riĉiĝos. Tute ne domaĝus uzi la vorton **telen** anstataŭ "malproksimen" aŭ **krat**io anstataŭ regado.

LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO.

(daŭrigata)

Ŝi donas al ili iom manĝi, kaj tiam, antaŭ ol mallumiĝas, ŝi eniras la domon kaj ekprenas kelkajn kapkusenojn kaj litkovrilojn—atendante ĉiun momente vidi aŭ eĉ meti la manon sur la serpenton. Ŝi faras liton sur la kuireja tablo por la infanoj, kaj sidas apude, por gardi ilin dum la tuta nokto.

Ŝi duonokule rigardas la angulon, kaj havas verdan bastonon pretan sur

la ŝranko ĉe sia flanko; ankaŭ korbon plenan da kudraĵo, kaj ekzemplero de la "Jurnalo por Junaj Fraŭlinoj." Ŝi jam venigis la hundon en la ĉambron.

Tommy enlitigis, protestante, sed diras ke li restos la tutan nokton sendorme, kaj frakasos tiun — serpenton.

Lia patrino demandas al li, kiom da fojoj ŝi jam ordonis lin, ke li ne blasfemu.

Li havas sian bastonegon kun li, sub la litkovriloj, kaj Jacky protestas: "Panjo! Tommy gratadas min per sia bastonego. Diru al li, ke li forĵetu ĝin!"

Tommy:—"Fermu la buŝon, vi malgranda —! Ĉu vi volas ke la serpento mordu vin?"

Jacky silentas.

"Se ĝi mordos vin," diras Tommy, post paŭzo, "vi ŝveliĝos, kaj odoraĉos, kaj iĝos tute ruĝa, kaj blua, kaj verda, ĝis vi eksplodas. Ĉu ne, patrino?"

"Nu, do—ne timigu la infaneton. Dormu nun," ŝi diras.

La du pli junaj infanoj dormas, kaj foje Jacky plendas ke li estas preme-gata. Pli da spaco estas aranĝita por li. Baldaŭ Tommy diras:—

"Patrino, auskultu al tiuj — didelfoj. Mi ŝatus premtordi — kolojn."

Kaj Jacky protestas dormeme:—

"Sed ili ne dolorigas nin, la malgrandaj —!"

Patrino:—"Nu—mi diris al vi, ke vi instruos Jacky kiel blasfemi." Sed la rimarko igas ŝin rideti. Jacky ekdormas.

Baldaŭ Tommy demandas:—

"Patrino! Ĉu vi pensas ke oni iam ekstermos la — kanguruon?"

"Ĉielo! Kiel mi povus diri, infano? Dormu, nun."

"Ĉu vi vekos min se la serpento elvenos?"

"Jes—ekdormu!"

La meznokto alproksimiĝas. La infanoj ĉiuj dormas, kaj ŝi ankoraŭ sidas tie, kudrante kaj legante laŭvice. De tempo al tempo ŝi rigardas al la planko kaj murtrabo, kaj, kiam ajn ŝi aŭdas bruon, ŝi etendas la manon ĝis la bastono. La tondro komenciĝas kaj la vento, bluvegante tra la fendetoj en la muro, preskaŭ estingas la kandelon. Ŝi metas ĝin sur ŝirmatan parton de la ŝranko, kaj fiksas gazeton por protekti ĝin. Ĉe ĉiu ekfulmo la fendetoj inter la plataj ŝtupoj de la muro brilas kiel polurita arĝento. Muĝas la tondro, kaj la pluvo torento falas.

(daŭrigota)

POR LA KOMENCULOJ.

KVINMINUTA RAKONTO.

La eta flavvizaĝa hino kiu sidis sub blua ombrelo en la vendejo, kaj, po unu penco por ĉiu, rakontis historiojn al la infanoj, kunmetis siajn longajn fingrojn, kaj komencis.

Miaj infanoj (li diris), iĝi lerta estas virto, sed havigi erudicion, kaj malgraŭe ne havigi prudenton, estas senutila, kiel vi komprenos per tiu ĉi rakonto.

Foje, riĉulo havis kvar stultajn filojn, kiu fakto tiel kolerigis lin, ke li elsendis ilin el la domo, kaj ordonis, ke ili ne revenu ĝis ili akiros iom da saĝeco. Trovinte, ke tiuj kiuj ne povas labori ne povas manĝi, la kvar mallaboremaj fratoj vojaĝis al urbo kiu famiĝis kiel loko de klereco, kaj tie ili disigis kaj konsentis rerenkonti ĉe la krucvojoj post tri jaroj.

La plej aĝa sin aligis al hirurgo por lerni la anatomion; la dua sin lernkontraktis al kemiisto kiu havis miregindan scion de sanigaj medikamentoj; la tria, pli modesta, iĝis helpanto al tanisto; kaj la kvara eniris la laborejon de astrologo kaj sorĉisto, kiu instruis al li la metion de magiisto.

Post tri jaroj, la fratoj renkontiĝis ĉe la krucvojoj, kaj ekvojaĝis hejmen, kaj en sia vojaĝo ili hazarde eltrovis aron de ciganoj kiuj ĵus estis finintaj senhaŭtigi kaj pecigi grandegan tigron, kiun ili enkaptiligis en la ĵangalo.

(Daŭrigota)

FIVE-MINUTE STORY.

The little yellow-faced Chinaman who sat under a blue umbrella in the market-place, and for a penny told stories to the children, put his long fingers together and began.

My children (he said), to become clever is a virtue; but to have learning and yet have no common sense is useless, as you will see by this little story.

Once a rich man had stupid sons, which annoyed him so much that he turned them out of the house and commanded them not to return until they had acquired some wisdom. Finding that those who cannot work cannot eat, the four idle brothers set out for a city which was noted as a seat of learning, and there they separated and agreed to meet again at the crossroads in three years.

The eldest placed himself under a surgeon to learn anatomy; the second apprenticed himself to a chemist with a marvellous knowledge of healing medicines; the third, more modest, became assistant to a tanner; and the fourth entered a laboratory of an astrologer and sorcerer, who taught him the craft of a wizard.

At the end of three years the brothers met at the crossroads and began to travel homewards, and on their journey they came across a band of gypsies, who had just finished skinning and cutting up an immense tiger which they had trapped in the jungle.

(To be continued)

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

Masterton Esperanto Club — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President, Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Worksoy-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18a horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

OBITUARY.

With sincere regret we announce the death of Mrs. Purnell, at a private hospital in Malvern, on 28th December. For many years an active member of the Melbourne Esperanto Society, this fervent spirit was compelled some twelve months ago to resign, on which occasion she was elected a life member. We respectfully tender our condolence to all concerned.

LA KOBURGA KLUBO.

Je l'15a de dec. okazis la jarfina kunveno de la Koburga E. Klubo. Malgraŭ veteraĉo la prez-o, s-ro E. Williams, bonvenigis sepdekkelkon da ĉeestintoj. Li mallonge parolis pri la kontentiga progreso de la klubo dum 1932 kaj pri la oftaj festvesperoj, kiujn ni provizis al ĉeestintoj. Per dancado plezurigis sam-oj kaj iliaj amikoj, kaj inter ĉiu ero estis kanto, deklamo, E. humoraĵo. Vespermanĝetinte, oni dancis ĝis noktomezo. La klubo kunvenos je la 12a de jan. en la Laborista Kunvenejo.

A. C. HINTZE (gazetkorespondanto), 7 Dean-st., N13.

The next number is scheduled for 23rd Feb.

This number delayed on account of holiday.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Box 731F, P.O. Melb., by the Triumph Press, Surrey Hills, Vic.



(Nova Serio)

Redakcio-Ad ministracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj. :: :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 149 (13th Year)

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

23 FEBRUARO, 1933.

"Dr. ESPERANTO."

The Man and His Work.

(concluded)

Here a word about the material used for the vocabulary. Earlier, when he was searching for and casting out from the grammar all unnecessary speech-forms, he was guided by the principle of economy for the vocabulary also, and, in the belief that it is immaterial what form a word shall have, if it is agreed that it expresses a given idea, he simply "invented" words, striving to make them as short as possible. For instance, he believed that instead of the 12-letter word for "conversation" the 2-letter "pa" could be used to express the same idea. He therefore simply wrote a mathematical series of short but easily pronouncable combinations of letters, giving to each of them the signification of a defined word, such as:—a, ab, ac, ad, ba, ca, da, aba, aca, ada, and so on. This scheme, however, he soon abandoned, for in practice it was found that the words were learned only with great difficulty. It was then that he became convinced that the material for the vocabulary would have to be founded on a Romanic-Teutonic base, from already existing words changed only as much as regularity and other considerations of language made necessary. Having reached this point he made use of the fact that modern languages possess a huge provision of words already "international," that is, words known to

most European peoples, and which formed a ready treasury for a future world-tongue.

In 1878 the artificial language seemed to him almost ready, although between the "Lingwe Uniwersala" of that day and the Esperanto published nine years later there exists a great difference. He confided to his fellow-students, and the majority of them, attracted by the idea in general and the extraordinary simplicity of Zamenhof's language in particular, began to learn it. On 5th December, 1878, they gathered to celebrate the birth of the new tongue, making speeches in it and enthusiastically singing a hymn composed for the occasion.

With the passing of half a year from the day of that celebration Zamenhof and his colleagues finished their gymnasium course and parted. Zamenhof's young apostles at first tried hesitatingly to propagate the new language, but on the lads meeting the laughter of full-grown men their advocacy turned to denial, and the author alone remained faithful to his idea. Seeing before him, however, only mockery and actual hindrance, he decided to hide the scheme away from all; and so, for five years and a half of his university life, he never spoke of his life's aim. It was for him a very difficult period. The secrecy tormented him: forced continually to conceal his thoughts and plans, he attended scarcely any function, and took part in none of the university's social activities, and so the most happy time of the average youth's life, that of his student days, passed for him in sadness. On a rare occasion, having ventured to seek mental repose

in society, he would feel himself to be a stranger and would go to his quarters, there to ease his heart in composing verses in the tongue he so carefully fashioned. One of these poems, *Mia Penso*, was inserted in the first brochure published by him; but to its readers, who were unaware of the circumstances in which it was written, it must have seemed strange and incomprehensible.

For six years he worked privately, perfecting and testing the language,—and he had much to do, although in 1878 it had seemed ripe for publication. He translated much, wrote original pieces, and lengthy trials convinced him that to what had seemed quite sound in theory there was in practice still something lacking. Much he had to trim, displace, correct, and even radically transform. Words and forms, principles and requirements, jostled and hindered one another, although in theory and taken separately, and in short trials, they had seemed quite effective. Such elements as the indefinite preposition "je," the "elastic" verb "meti," the neutral but clearly defined ending "au" and so on would never have entered the head of a mere theorist. Some forms that had seemed to him riches were revealed in practice as useless ballast, and so several unwanted suffixes were cast out. In 1878 it had seemed to him that it was sufficient for a language that it have a grammar and a vocabulary—the crudity, the ungracefulness of his language as it was then constituted he ascribed to his not knowing it sufficiently well himself: but practice ever tended to convince him that the tongue still

needed an elusive "something," a binding element which would give to it life and a definite, fully formed spirit.

He then began to avoid literal translations from this or that language, and to strive to think and write directly in the neutral tongue. Then came the day when he became aware that the language in his hands had ceased to be a mere unsubstantial shadow of the language from which he was translating at the time: it had acquired a spirit and being of its own, and, as it were, a well-marked physiognomy. Speech in it from henceforth flowed of its own accord, gracefully, quite freely, even as the living mother tongues of men.

Still one circumstance caused him to postpone the presentation of his language to the public. There had remained unsolved one problem, which had tremendous significance for the neutral tongue. Zamenhof knew that people would say to him:—"Your language will be useful to us only when the whole world shall see fit to adopt it; therefore we will adopt it when the whole world does the same." But as the world of men consists of its separate units, he saw that the neutral tongue could not have a satisfactory future until any person could, without consideration of the world's attitude, utilize it for his own purposes.

This problem was considered by Zamenhof at great length, and finally the so-called secret alphabets, long in use, which had not needed to wait for the world's acceptance of them before they were of use, and which when enclosed in a letter gave to the wholly unformed addressee the possibility of understanding all written to him, led Zamenhof to the same thought—that of arranging his language in the same way. So he drew up "keys," which contained the sixteen-rule grammar and the whole vocabulary in the form of separate, wholly independent and alphabetically ordered elements. This made it possible for the unformed addressee of any nationality to read a communication so written.

Having finished his university course and begun a medical career, Zamenhof now considered the practicability of publishing his work. Having prepared the manuscript under the title of "Dr. Esperanto, an International Language: Foreword and Complete Textbook," he looked for a publisher. But here he met the bitter reality of that financial stress from which he was henceforth to suffer so severely. For two years he vainly searched for someone willing to risk publication, and when at last he received such a promise he was called on to experience the bitter disappointment of seeing, after six months' procrastination, his brochure finally rejected. At last, however, with the financial aid of his father-in-law, the booklet was given to the world by the author himself in 1887. On the eve of the event Zamenhof was inwardly burning with excitement. He knew that from the day that was to see the emer-

gence of the loved work there could be no going back. He knew the fate that awaited the doctor dependent on his practice if the public should see in him a dreamer, or one occupied with "fads." He knew that he was about to risk the future happiness of mind, and even means of livelihood, not only of himself, but of his family; but he could not abandon that which he looked on as the chief end of his life—that which had entered into his very blood—and so he crossed the Rubicon.

LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO. (daurigata)

"Aligato" sin sternas sur la planko; liaj okuloj estas direktataj al la intermureto. Per ĉio-tio, ŝi scias ke la serpento estas tie. Estas larĝaj fendoj en tiu muro, malfermiĝantaj sub la planko de la domo.

Ŝi ne estas timulino, sed antaŭnelongaj okazintaĵoj estas iom ĝenintaj ŝiajn nervojn. Malgranda filo de ŝia bofrato ĵus estis mordita de serpento, kaj mortis. Krom tio, ŝi ne aŭdis de sia edzo depon ses monatoj, kaj estas iom maltrankvila pri li.

Li estis brutarpepisto, kaj komencis la ŝafbredadon ĉi-tie, kiam ili edziĝis. La pluvmanko de 18—ruinigis lin. Li devis vendi marĉande la restaĵon de sia ŝafaro, kaj ree iĝi pelisto. Li intencas movi ŝian familion en la plej apudan urbon, kiam li revenos, kaj interdume, lia frato, kiu mastrumadas kampanan drinkejon sur la ĉefvojo, vizitas ŝin ĉiumonate, kun provizaĵoj. La edzino ankoraŭ havas du bovinojn, unu ĉevalon, kaj kelkajn ŝafojn. La bofrato kelkafoje mortigas unu el tiuj, donas al ŝi tiom kiom ŝi bezonas, kaj prenas la restaĵon page por aliaj provizaĵoj.

Ŝi estas kutimiĝinta al la soleco. Ĝiam ŝi vivis laŭ ĉi-tiu maniero dum dekok monatoj. Kiel knabino, ŝi konstruis la kutimajn kastelojn en la aero; sed ĉiuj ŝiaj knabinaj esperoj kaj aspiroj jam de longe mortis. Ŝi trovas ĉiun eksciton kaj distradon kiun ŝi bezonas en la paĝoj de la "Jurnalo por Junaj Fraŭlinoj" kaj—Dio ŝin helpu!—trovas plezuron, trarigardante la bildojn de la novaj vestmodoj.

Sia edzo estas Aŭstraliano, kiel ankaŭ ŝi. Li estas neŝparema, sed sufiĉe bona edzo. Se li havas la monrimedojn, li kondukus ŝin al la ĉefurbo, kaj loĝigus ŝin tie, kiel princino. Ili jam kutimiĝis al la disiĝo, aŭ pliĝuste, ŝi kutimiĝis. "Ne utilas plendadi," ŝi

diras. Eble li foje forgesas ke li estas edzo; sed se li havas bonan ĉekon kiam li revenos, li donos al ŝi la plejmulton. Kiam li havis monon, li prenis ŝin al la ĉefurbo kelkafoje—luprenis dormvagonon por la vojaĝo, kaj gastis ĉe la plej bonaj hoteloj. Li ankaŭ aĉetis por ŝi veturilon, sed ili devis oferi ĝin, kune kun la aliaj posedaĵoj.

La lastaj du infanoj naskiĝis en la sovaĝejo—unu, dum ŝia edzo estis alportinta ebrian kuraciston, perforte, por akuŝigi ŝin. Ŝi estis sola ĉi-tiu ĵojon, kaj tre malforta.—Ŝi estis malŝaniĝinta pro febro.—Ŝi preĝis al Dio, ke Li sendu helpon al ŝi. Dio sendis Nigran Marion—la plej nobla nigru-lino en la tuta lando. Aŭ pliĝuste, Dio unue sendis Jimmy, kaj li sendis Nigran Marion. Lia nigra vizaĝo aperis en la pordejo, li komprenis la situacion je unu ekrigardo, kaj diris kuraĝige "Bone, sinjorino—mi alportos mian maljunulinon (edzinon)—ŝi estas ĉe la rivereto."

Unu el ŝiaj infanoj mortis dum ŝi estis ĉi-tie sola. Ŝi rajdis deknau mejlojn por helpo, portante la mortintan infanon.

Certe nun estas la unua aŭ dua horo. La fajro preskaŭ forbrulas. "Aligato" kuŝas kun la kapo restanta sur la piedegojn kaj observas la muron. Li ne estas tre belaspekta hundo, kaj la lumo elmontras multajn malnovajn cikatrojn, kie la haroj ne povas kreski. Li timas nenion sur aŭ sub la tero. Li atakos virbovon tiel volonte kiel li atakos pulon. Li malamas ĉiujn aliajn hundojn—krom kanguru-hundojn—kaj montras evidentan malŝaton al amikoj aŭ parencoj de la familio. Ili malofte venas, tamen. Foje li amikiĝas kun fremduloj. Li malamegas serpentojn, kaj jam mortigis multajn, sed iun tagon li estos mordita kaj mortos; la plejmulto da serpent-hundoj finiĝas tia maniere.

FIANĈIGO.

S-ro A. W. Peacock, Loka oficisto de la Savada Armeo, Prezidanto de la Sidneja Esperanto-Societo, kaj Ĉefinstruisto de la Petersham-a Filio de tiu Societo, fianĉiĝis kun f-ino Emmo Ashman, ankaŭ de la Savada Armeo, kaj studentino de la lingvo Esperanto, loĝanta en Lambton (Novkastelo, Nova Sud-Kimrujo).

La geedziĝo okazos en la Preĝejo de la Savada Armeo en la suburbo Lambton, la 29an de Aprilo 1933a, je la 3a

akurate.

Luj gesamideanoj, kiuj eble estos en Novkastelo je tiu dato, estos kore bonvenaj al la ceremonio, eĉ se mankus al ili invitletero. (Nur estos necese, ke oni menciu la vorton "Esperanto" al la pordisto.)

Recenz (et) oj.

LA OKULOJ DE LA ETERNA FRATO: de Stefan Zweig, tradukita de Helene Wolffe, eldonita de Heroldo de Esperanto. Pĝ. 65, prezo 18p.

Leginte en la lasta tempo certajn el niaj siatempaj laŭdataj originaloj, mi sidigis por absorbi kion Stefan Zweig, la fame konata germana aŭtoro, ĵus verkis por la pensumula mondo. Post la streĉado de pacienco necesa por trastumbli la kompatindan banalecon kiu ankoraŭ tro markas nian netradukan literaturon, mi sentis ravan altiĝon de la spirito sekvante en unu vespero ĝis finpaĝo ĉi tiun frapantan historion pri la baraktado de la konsciencia raĝputo, Virata, ĝis plej pura etiko.

La verko radias moralan inspiron. Ĝi taŭgas kiel tempo por tiuj kristanaj pastroj kiuj en siaj predikoj speciale ŝatas pritrakti literaturajn verkojn el certa speco. Virata, fama svinganto de l'glavo, servante sian reĝon en milito, nescie mortigas sian fraton, kies mortecaj okuloj de tiam konstante reaperas en la vizaĝoj de aliaj homoj, liaj fratoj en Dio. Li strebas akiri al si sintenon al Dio kaj la homoj, kio estu en harmonio kun lia ĉiam vastiganta koncepto de la Dia volo kaj la homa devo. Li rezignas la glavon, prenas la mantelon de l'juĝado. Sed post plua revelacio li formetas tiun kiel nekongruan kaj fariĝas paca konsilanto; sed ankaŭ tion kaj eĉ vivadon inter homoj li devas forlasi, por ermitiĝi en arbara denso. "Nur tiu, kiu vivas sola, vivas por sia Dio." Li kredas ke nur en plena neago kaj ekster ĉia homa rilato li povas vivi senkulpa. Sed venas stranga klimakso, ke Virata, per la eternaj okuloj lumantaj el virina vizaĝo, lernas ankoraŭ ke ankaŭ la neagulo, malgraŭ neintenco, povas dolcerigi la homfratojn, kaj ke eĉ la "neagado estas agado" por bono aŭ malbono. Lia vivfino estas tragedio.

Bona traduko. Nur ĝenas ia tipe germana penspezeco ĉe frazoj kiaj "sendezire ŝvelanta super la saĝnon de la ŝajno": "ripozanta en feliĉega senkonscio de la esenco." 11, "jaspaj" (jaspisaj); 31, "Tion (Tio), kion li travivis." "Ĝis kiam" (anstataŭ simple "ĝis") estas senutila pleonasmo. La zamenhofa uzado de "ĝis kiam" havas specialan signifon.

Systematisk kurs i Esp-o, de Seppik kaj Malmgren. 88 pagoj, prezo 1 ŝ. Por svedoj sendube utila gramatiketo de nia lingvo. La anekdotoj kaj konformaj demandoj interesele elektitaj tre taŭgigas ĝin por la ekzamenisto ĉe narolaj testoj. Tiu, kiu kutimas diri ke Esp-o estas strangaspekta lingvo, sciu ke "otvivelaktigt" signifas "evi-

dente."

Dialogoj en Esp-o, de Einar Dahl, por progresintoj kurse kaj grupkunvene. Nia sveda aktivulo substrekas antaŭparole la neceson paroli, paroli kaj paroli Esp-on, kaj per ĉi-dialogaro tre instigas onin tion fari. Jen ekzemplo de lia originalstila frazaro: "la elparolado estis tiel kripligita ke mi sidis kiel demanda signo." Paĝo 6, "ĉiuj geniuloj trovis ke mondolingvo devas havi . . . malgrandan vortaron." Se Esp-o ja venkos, la estontaj socihistoriistoj devos iom modifi tiun aserton. Prezo, du resp. Kuponoj, per "La S.K."

"Esperanto Lehrbuch" (laŭ gramatika metodo), eld. de Arbeiter Esperanto-Bund, Dircksenstr. 42, Berlin C25. Prezo 1 rm. 96 pp.

Bone presita, plejparte fidinda lernilo, destinita speciale por konscie proletaj germanlingvanoj. La kompilinto do tiras siajn lernekmplezojn ĉefe el la frazeologio de l'revolucio.

Unu du kritikindaĵoj: p. 50; ne skribu terurajn kia estas "milokcent-sepdekunu" (mil okcent sepdek unu). (Cetero en la presita vorto estas litereraro). 54. Uzu akuzativon post "kontraŭ" nur kiam temas pri direkto. Ekz. "Ĉi mi iru kontraŭ la Filiŝtojn" (1 Kron. 14/10), sed: "rimedo kontraŭ malsano," "kiu estas kontraŭ mi, tiu estas mia kontraŭulo." Sur p. 65 ni legas ke "-uj" por landnomoj estas jam arĥaika, do ni uzu "-io," eventuale "-lando." Tio iom mirigas, sed ankoraŭ pli la fakto ke la kompilinto uzas senkomente la efektive arĥaikajn formojn: pirujo, pomujo k.c. anstataŭ pirarbo, pomarbo k.c. Kial uzi la du nomojn "fabriko" (ĉu ne pli ĝuste "fabrikejo"?) kaj "uzino" por tio, kio estas ŝajne la samsama afero? Ne kuŝas en la libreto ia klarigo pri diferenco inter la du formoj. La sufiksoj -end, -oz, -iv, kaj -iz estas instruataj; precipe la du lastaj estas ankoraŭ tre disputeblaj. Ni memoru la konsilon de Zamenhof: "La libroj instruaj devas esti pedante konservativaj." Devas teksti: bogepatroj — Schwiegereltern. "Legionoj" (legioj).

La verketo finiĝas per interesaj legaĵoj en Esp-o. Ĉiu sci(et)anta la germanan ĝin mendu. (Robo.)

MILITREZISTADO KIEL POLITIKA FORTO.

1905. Milito inter Norvegujo kaj Svedujo estis neobligata per decidemo de junaj socialistoj rifuzantaj militservi.
1909. La hispana kolonia milito en Maroko estis finigata per ĝenerala striko.
1918. Germanaj maristoj rifuzis obei ordonojn de admiraloj kiuj, malgraŭ la armistico, volis fari finan batalon.
1919. Francaj maristoj de la militŝiparo en la Nigra Maro, rifuzis militservi en proponata atako kontraŭ la sovjetoj, tiel nuliganta la aferon.
1920. La britaj "Konsilantaroj de Agado," reprezentantaj la britan

laboristan movadon, rifuzis transporti armilojn kaj municion kaj minacis ĝeneralan strikon, tiel foriganta intencatan militon kontraŭ Rusujo.

1920. La laborista movado de Supra-Silezio malebligis transporton de municio por la Poluja-Rusuja milito.
1920. La germana Kapp-revolucio, kiu celis restarigon de la monarĥeco, estis venkata de la ĝenerala striko de laboristoj kaj dungitoj.
- 1917-22. Danujo, Svedujo kaj Norvegujo starigis alternativan servon civilan por kreskanta nombro da junuloj kiuj rifuzis fari armitan servon aŭ ian servon apartenantan al la armeo.
1923. Holando starigis alternativan civilan servon.
1928. Belgujo starigis alternativan servon.

("La Militrezistanto," 11 Abbey-rd., Enfield, Middlesex, Eng.)

PLUMA ERARO.

S-ro J. Major, de "Oomoto," Japanujo, afable rimarkigis al ni ke estas eraro en linio 5, kol. 1, sur p. 372 de La S.K. La vorto "kurso" devas esti "klaso." Bonvolu ĝustigi!

PRACTICAL WORK FOR THE ESPERANTISTS.

Esperantists are for the most part internationalists, whose interest in the language springs from the desire for those international friendships and understandings which the use of Esperanto fosters. But many non-esperantists also, while not at the moment interested in the language, are wishful of exchanging views with individuals or groups in other countries. Esperantists might well enter this new field of activity by offering their knowledge of the language to promote correspondence between such individuals or groups. The esperantist's part in this work is to act as a translator for the correspondents. Such work would undoubtedly cause increased interest in Esperanto and add many active esperantists to the ranks.

To be of practical value, such efforts, of course, must be organised and not merely sporadic. Activities based on these lines have already achieved notable success in Europe, and particularly in Great Britain. Esperantists are organised for this work in the Labor Esperanto Associations (L.E.A.) of the different countries. Details of the organisational work of the British L.E.A. (B.L.E.A.) have been forwarded to many esperantists in Melbourne, and it is felt that an Australian L.E.A., on similar lines, should be formed.

All interested in this aspect of the

work of Esperantists are invited to attend a meeting in the Temperance Hall, Russell street, on Tuesday, 28th Feb., when the formation of the A.L.E.A. will be discussed, and the group provisionally constituted.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Miss C. Hannaford, 5/-, Aug., '33; Mr. L. Illingsworth, 4/6, Dec., '33; Mrs. Chapman-Taylor, 5/-, Jan., '34; Mr. N. Midthus, 5/-, Jan., '34; Mr. D. Haccou, 5/2, Oct., '33; Melbourne Esperanto Club (Sales), 6/2; Mr. A. Saar, 5/-, July, '35; Melbourne Esperanto Society (Advt.), 5/6; Melbourne Esperanto Club (Subs.), £1/18/-; Mr. C. Whittenbach, 4/6, Dec., '33; Mr. J. Eliot, 4/6, Dec., '33; Mr. C. W. Ballard, 4/6, Dec., '33; Coburg Esperanto Group (Sales), 8/8; Mr. A. H. Slade, 10/-, Sept., '34.

Radio Column

Esperanto lessons will be broadcast from 3LO at 7.45 p.m. on the dates mentioned below. An anecdote will be read at the end of each lesson to enable students to check their pronunciation.

March 4th.—Anecdote:—Kial vi petas almozon?—Ĉar mi volas manĝi, mia bona sinjoro.—Kial do vi ne laboras?—Ha, kiam mi laboras, mi ankoraŭ pli volas manĝi.

March 18th.—Anecdote:—Sinjoro! kriis unu maljuna fraŭlino el la vagono al unu sinjoro, kiu volas tien eniri; tie ĉi estas la vagono por sinjorinoj.—Ho, respondas la sinjoro, enirante kaj dismetante siajn pakojn, mi ne estas timemulo.

April 1st.—Anecdote:—Avarulo, elirante el la preĝejo, kie la pastro parolis pri bonfarado, diris: "La prediko tiel min tuŝis, ke mi mem estas preta peti almozojn."

AL LA SUDA KRUCO.

1/12/32.

Estimata redaktoro,

Sub la titolo "Grumbloj" ni trovis en la oktobra numero de via organo kritikan noton pri la Melburna gazetarilo rilate novaĵojn pri la pariza kongreso.

Ni ne scias, al kiu estas direktita la plendo. Sed ĉar ni estas respondecaj pri la organizo de la universalaj kongresoj, la noto trovis nian atenton.

Ni do deziras diri al vi, ke aparte bone organizita gazetara servo funkciis en Parizo. Ĉiutage la grandaj agentejoj estis informitaj per aparta telegramo speciala. Se la aŭstralia gazetarilo ne havas interligon de korespondado kun la koncernaj agentejoj aŭ se ĝi ne interesiĝas pri nia kongreso

(kies indiferentan karakteron por Aŭstralio laŭ nesufiĉa informiteco de ĵurnalistoj, ni povas iomete kompreni), ni ne povas fari pli. Nur vi kaj viaj kunlaborantoj povas ŝanĝi tiun ĉi mankhavan staton per vigla interveno ĉe la redakcioj aŭ la ĉefagentejoj gazetaraj en via lando.

Ni esperas, ke estos eble por la 25a Universala Kongreso en Kolonjo atingi kiel eble plej efikan diskonigon de novaĵoj en via lando.

Ni dankus vin, se vi sciigus en via proksima numero la faktojn pri nia aranĝo en Parizo.

Kun plej samideanaj salutoj, Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, Robt. Kreuz, Direktoro.

PRI MANĈURIO.

Elĉerpo el artikolo de Lord Lytton en The Spectator, London.

La gravega demando ne estas, ĉu Japanujo ĉu Hinujo gvidregu la estontan vivon de Manĉurio, sed—ĉu estas konservota aŭ detruota la principo de kolektiva respondeco pri la konservado de paco kaj justo inter la nacioj.

Oni ripetade informis nian komisionon ke Manĉurio estas la 'savŝnuro' de Japanujo; ke Japanujo jam devis batali du militojn sur manĉuria tero; ke ĝi oferis 200,000 vivojn kaj bilion jenojn por akiri la rajtojn kaj interesojn kiujn ĝi nun tie pretendas; ke tiuj historiaj asociacioj estas neforviŝeble stampitaj en la koron de ĉiu japano, kaj ke Japanujo estas tre sentema kontraŭ kiu ajn ekstera interveno en aferoj pri kiuj ĝi rigardas sin la sola koncernato.

Nia komisiono akceptis ĉi ĉion kaj laŭorde enverkis ĝin en sian raporton, sed ni sentis ke estas nia devo atentigi al la japana fremdafera ministro la fakton ke ekzistas ankoraŭ afero por kio aliaj nacioj faris eĉ pli grandajn oferojn ol Japanujo, afero kiun tiuj nacioj rigardas kiel samgrade valorega, kaj kiun ili defendos egale firme, nome la organizo de kolektiva respondeco pri la konservado de la mondopaco. Por la popoloj kiuj plej suferis en la Granda Milito la Ligo de Nacioj estas la 'savŝnuro' de la moderna civilizacio.

"La Dia Regno": Mi havas specimenojn de ĉi tiu evangeliĉkristana gazeto por disdoni, kontraŭ unupenca p. marko. Red.

AUSTRALIAN LABOR ESPERANTO ASSOCIATION.

All esperantists and others interested are invited to attend a meeting at Temperance Hall, Russell street, on Tuesday, 28th February, at 8 p.m., to assist in formation of A.L.E.A. Further particulars may be obtained from Mr. E. P. Owen, 14 Anzac street, S.E.9.

Atentu Sinjorinoj!

A. Kio precize estas la ĉarmo, Manjo?

M. Ho, estas speco de florado en la virino. Se oni ĝin havas, ne necesas havi ion ajn alian, kaj se oni ne ĝin havas ne multe signifas kion ajn alian oni havas. Kelkaj virinoj, la malmultaj, havas ĉarmion al ĉiu; kaj la plejparte havas ĉarmion al unu; sed kelkaj havas ĉarmion al neniu.

El "Kion scias ĉiu virino" de J. M. Barrie.

La sentado de unu virino povas havi tre subtilan influon al la humoro de alia. La plejmulto de virinoj komprenas unu la alian instinkte, eble per ia antikva sekslingvo kiu ekzistis longe antaŭ ol sonoj fariĝis vortoj.

El la libro, "La Fiero de Eve" de Warwick Deeping.

Rulaĵoj por la festeto. El Argentino.

Buteri kelkajn maldikajn tranĉaĵojn de bruna pano, kaj ŝmiru ilin per pasto farita el kokida pureo al kiu estis aldonitaj kaporoj kaj anĉova pasto en taŭga proporciio. Premplätigu la preparitajn tranĉaĵojn, netigu la randojn, kaj buteri la supraĵon. Aspergu duonon de ili per ete pecigita petroselo, kaj la alian duonon per omara koralo, kaj metu ilin alterne sur plado kaj servu.

Esperanta edziĝo soleniĝis en Budapeŝt antaŭ nelonge, kiam la pastro alparolis al la gefianĉoj en la internacia lingvo. Hungara fraŭlino konatiĝis kun belga fabrikisto per korespondado en Esperanto, kaj, pli poste, ili renkontis unu la alian ĉe Esperanta Kongreso en Parizo. Tuj la Belgo proponis edzecon al la Hungarino, sed pro tio, ke nek li nek ŝi komprenis la lingvon de la alia, eĉ la edziĝa soleno devis esti efektivigita en la komuna lingvo.

(El la "Woman's Budget.")

La perfekte honesta virino: virino kiu neniam flatas, kiu neniam estras, neniam allogas, kaŝas nenion, neniam uzas la okulojn, kiu neniam konjektas pri la efekto kiun ŝi kaŭzas, kiu neniam konscias pri neparolita admiro, kia monstro, mi diras, estus tia virino! (El la "Woman's Mirror" por Novembro.)

N.Z.E.A. Section. 11th Official Bulletin

Fourth N.Z. Esperanto Congress. Masterton, 27-29 December, 1932.

Mr. G. R. Sykes, M.P., Honorary President of the Masterton Esperanto Club, welcomed congress delegates and visitors to Masterton at the civic reception and official opening of the fourth N.Z. Esperanto congress, held under the auspices of the New Zealand Esperanto Association at the Y.M.C.A., Masterton, 27-29 December. Visitors found at beautiful Masterton an active Esperanto club with a large band of enthusiastic members.

Members and Supporters.

Attending:—Madame Carle, Mr. and Mrs. A. Dewar, Mr. A. M. H. Dewar, Misses E. and N. Elliot, *Mr. H. F. Franks, Mrs. Hubbal, Miss A. Ibbetson, Mr. B. and Miss L. Johns, Mr. and *Mrs. J. McNab, Mr. L. Rutherford, Mr. A. D. Sheppard, Mrs. and *Miss Stidolph, Misses A. and D. Winhall (Masterton), *Mr. M. F. Pavlinovich (Tinui), *Mr. H. E. Facer (Palmerston North), Miss G. Carty, Miss Duguid, Mr. and Mrs. L. E. Dust, Mr. W. L. Edmanson, Mr. E. C. Jack, *Mr. Wm. H. King, Mrs. R. McGuigan, Miss C. Smythson (Wellington), Miss L. Corkill (Christchurch). Non-attending:—Mr. N. D. Franks (Napier), Mr. C. J. Adcock (Drury), Mr. S. Andrew (Feilding), *Mrs. A. Chapman-Taylor (New Plymouth), Mr. L. A. Efford (Christchurch), *Mr. J. A. Hodges (Okoroire), *Mr. G. Gordon (Ch'ch.), Mr. J. Mader (Helena Bay), *Mr. T. E. McMillan (Mata-mata), *Mr. F. W. Luhnning, *Mrs. E. M. Watkin, *Mr. C. W. Brandon, Mrs. E. Philpott (Auckland), *Mrs. F. Lusher (Hastings), Mr. S. M. Ujdur (Henderson), *Mr. A. C. Ward (Wimbledon), Mrs. E. H. Wall (Albany), *Mr. M. J. Ravelich (Khandallah). (The 'star' denotes member-donor, to whom thanks are given.—W.H.K.).

Civic Reception—Formal Opening.

Congress assembled at 2 p.m. on 27 December for the civic reception and formal opening. There was a good attendance. Mr. A. Dewar, president of Masterton Club, introduced the NZEA officials to Mr. Sykes, who said he felt convinced the time would come when authorities, including those in N.Z., would heed the claims of Esperantists that Esperanto be officially recognised.

Mr. Dust, President of the N.Z.E.A., then declared congress officially open; and asked that a vote of thanks be tendered Mr. Sykes by acclamation. The session was thereafter conducted in Esperanto and English. Mrs. Fieldhouse splendidly rendered "La Espero," after which the assemblage paid respect to the memory of the late Rev. J. H. Hawkes, a Dominion pioneer Esperantist whose death occurred during the year.

A large number of letters and telegrams from absentees were read and congress then adjourned for the taking of the official photograph.

Resuming, club delegates (Miss L.

Corkill, Christchurch, Miss C. Smythson, Wellington, and Mr. H. F. Franks, Masterton) delivered reports regarding the activities of their respective clubs.

Public Pronouncement.

The following pronouncement was then placed before congress by the NZEA, and unanimously adopted:—

"Because so many people have an incorrect idea of what the Esperanto language means, and what its possibilities are for humanity at large, we, New Zealand Esperantists assembled in congress at Masterton, desire to make the following public pronouncement:—

"(1) The idea of the founder and of succeeding Esperantists is to spread throughout the world the use of a neutral, living language, which (without intruding upon the national life of a people and without any attempt to supersede the existing national languages) would give to men of different nations the power of mutual understanding and at the same time serve as a peace-making influence in those countries where racial differences are so acute and where national language jealousies are so marked. With such a language as Esperanto works of international interest could be written and published, and would have equal interest for all peoples.

"(2) It is universally agreed that an auxiliary language to become international can only be an artificial one. Racial jealousies would preclude the acceptance of a purely national language, therefore Esperanto being actually completed, tested and proved to be capable of expressing meanings and ideas, free from idiomatic verbal labyrinths, is the one and only language that has any hope of general acceptance.

"(3) The author and founder of Esperanto (Dr. L. L. Zamenhof) refused once and for all time to claim pre-emptive right to ownership, and has given to the world a gift of incalculable value, Esperanto is now at the free disposal of anyone who desires to use it for any purpose whatsoever.

"(4) Esperanto favours no special cult, religious, social or political. Its sole aim is mutual understanding between diverse races or nationalities. Human brotherhood, international amity, and peace are concomitant results.

"(5) No restrictions are placed upon the use of Esperanto, but users of the language are advised not to deviate from the model of the founder in his work "The Fundament of Esperanto." There is nothing so likely to destroy the effectiveness of Esperanto as attempts to modify or change the basic principle of the language.

"(6) Every person who has acquired a knowledge of Esperanto and who uses it for any purpose is entitled to be called an Esperantist, but active membership of an organised group or society is strongly recommended."

Mr. W. L. Edmanson (Wellington) presented the salutations of samideanoj in Melbourne.

NZEA Annual General Meeting.

Well attended, the meeting opened at 3.40 p.m.

Mr. L. E. Dust, who presided, outlined the achievements of the NZEA, and detailed recent progress made by Esperanto abroad. He appealed to all to accord the Association their liberal support.

4th Annual Report; Finance.

The annual report presented by the honorary secretary (Mr. W. H. King), revealed that membership of the NZEA had been well maintained. There were clubs at Auckland, Wellington, Christchurch, and Masterton; and the NZEA had collaborated internationally whenever opportunity arose. Propaganda work included supplying 113 overseas visitors from 18 countries with Esperanto literature, newspaper activities, and the interviewing of influential people regarding Esperanto. Members had been kept in touch with the NZEA by means of the Official Bulletins issued each four months in "La Suda Krucio"; and general information provided. "It is to be hoped," the report concluded, "as far as the strength of the membership is concerned, that bedrock has been reached and that during the year there will be discernible a general movement which will continue uninterruptedly for a long time. With the co-operation, unison, and help of Dominion Esperantists, the association will be enabled to undertake the work which confronts it."

The honorary treasurer, Mr. E. C. Jack, presented his report and balance-sheet; which disclosed the finances to be in a sound position, due mainly to the fact that the last NZEA financial year comprised only 8 months. Donations received had increased over 100 per cent. The report and treasurer's balance-sheet were adopted.

Election of Officers.

On the motion of Mr. H. F. Franks, seconded by Mr. A. Dewar, the following officers were re-elected:—President, Mr. L. E. Dust (Wellington); Vice-pres., Mrs. J. Allan (Dunedin), Mr. J. A. Hodges (Okoroire), Mr. C. J. Adcock (Drury), and Mr. N. M. Bell (Christchurch); Hon. Treas., Mr. E. C. Jack (Wellington); Hon. Sec., Mr. W. H. King (Room 106, G.P.O. Building, Wellington, C.I.); Hon. Auditor, Mr. D. L. Irwin, A.P.A.N.Z. (Wellington).

5th N.Z. Congress.

On behalf of the Wellington Club, Miss Smythson issued an invitation for the 5th congress to be held at Wellington, preferably at Christmas-time. In support, Mr. Dust said it was the policy of the NZEA to arrange the annual congress in a different town each year, preferably in a town where the local Esperantists were strong

enough to form the nucleus of the gathering. A motion framed in accordance with the invitation was accepted without a dissenting voice.

NZEA Correspondence Course.

The president said it was desired that congress should approve the inauguration of the above course by authorising that the scheme be proceeded with. This included the appropriating of at least £10 from the NZEA general fund, a refund of which would be provided for by allocating 5s. from each tee of two guineas (fixed for the course) received. Twenty lessons will comprise the course, the basis of which will be the textbook, "The Concise Course in Esperanto" by L. N. Newell; lessons will be released at the rate of one each week, irrespective of whether the student has submitted work for an earlier lesson; sufficient instruction in grammar will be included to enable a student to advance to a stage where reading, writing and speaking should be practised in order to become an accomplished Esperantist; the responsibility of the NZEA will cease on delivery of the 20th lesson and of the tutor's comment and corrections thereon. The course fee includes the student's subscription (2/6) to the NZEA for one year. (Complete details in "S.K." later.—W.H.K.)

Mr. Jack moved, seconded by Miss Corkill. "That the scheme as explained to congress be proceeded with by the Executive." The motion was carried unanimously.

General Discussion.

Mr. H. E. Facer (Palmerston North) suggested that Esperanto work might be undertaken among boy scouts, especially Rovers; and Miss Corkill presented four remits from her society covering the broadcasting of Esperanto lessons, the forming of classes in the two teachers' training colleges; the commencing of after-school classes in public schools; and the urging upon the Prime Minister to instruct the N.Z. representative at the League of Nations to introduce the question of Esperanto into the Assembly at Geneva. Congress decided to refer suggestions to the NZEA Executive.

Social Function, etc.

A concert and social was held in the evening. Mr. Sykes presided over an attendance of 150. A humorous sketch was given in Esperanto by six local club members, who demonstrated their ability in the language. The NZEA secretary then outlined the position of the international language movement in N.Z. to-day, and explained the advantages accruing from a knowledge of Esperanto, even to the isolated New Zealander.

Second Day's Activities.

Instead of the scheduled picnic to Mt. Holdsworth, postponed owing to unsuitable weather, a tour through the Wairarapa Plains to Tauherenikaŭ was undertaken on 29 December.

In the evening a public meeting drew a moderate attendance. Mr. Dust presided, and Mr. W. L. Edmanson gave

an address. The meeting passed a resolution urging the N.Z. Government to approve the official teaching of the language in the schools of the Dominion, as has been done advantageously for many years past in a number of countries. Both local papers published the full text of the resolution.

Third Day: UEA Meeting.

The N.Z. section of the UEA met on the morning of 29 December. Mr. M. F. Pavlinovich was elected chairman and presided over an attendance of 15. Esperanto was used throughout.

On behalf of the Oomoto movement, Miss Smythson presented salutations. Mr. Dust, as Chief Delegate, detailed the present state of the UEA in New Zealand: owing to the crisis the membership of the UEA had decreased, and one delegate had retired from office. Every effort would be made to improve the position.

Replying to a question on the annulling of the Helsinki contract, Mr. Dust explained that the new proposed organisation (Universala Federacio Esperantista) would eventually replace the present Internacia Centra Komitato and the Konstanta Reprezentantaro, funds being provided by national societies on the basis of 6d. per member, with cost of the year book extra. The UEA has not yet announced its view of the new scheme, but official relations between the UEA and national societies would cease on 31 December. The new scheme provides for the appointment of local delegates who will represent both the national society and the international body; and for a member of the former organisation to be a member of the U.F.E. National societies of France, Italy, Sweden, Norway, Roumania, Japan, Germany and Britain have assented to the new arrangement. If the NZEA were to do likewise it would be necessary either to allocate 6d. of the present annual subscription or to increase the subscription to 3s. per annum in order to meet its obligations to the U.F.E. UEA members in N.Z. would, of course, pay their subscriptions to the chief delegate, as at present. (The NZEA Executive has not yet given consideration to the matter of participating in the new enterprise.—W.H.K.)

Luncheon; Formal Closing.

Some thirty congress members sat at the luncheon. Mr. Dewar gave the benediction in Esperanto, and toasts were honored. Mr. Franks thanked all who had worked so hard to make the congress the success it was, mentioning in particular Mr. and Mrs. Dewar. Mr. Sykes encouraged those present in their efforts, stating he felt sure that members of the New Zealand Parliament were not well informed regarding the language, and to give them a true conception of the aims of Esperanto he promised to co-operate with the NZEA and, if possible, to arrange for two or three speakers to address members at some convenient time during the parliamentary session.

The valedictory remarks were made by Mr. L. E. Dust, who, as president of the NZEA thanked all who had so harmoniously collaborated to ensure the holding of one of the most successful N.Z. Esperanto congresses.

Results.

The following abridged letter (written after congress) by the L.C.C. secretary (Mr. Franks) to the NZEA Executive, is of interest in this connection:—

"On behalf of my committee, I have much pleasure in presenting to you a statement of accounts of the 4th Congress, which now increases the NZEA Congress Fund from £1/8/5d. (Church surplus) to £6/1/11d.

"The accompanying Press reports measure in all 100 column inches from both local papers. Since congress a leading article relating to and favoring Esperanto has appeared in 'The Wairarapa Age.'

"The congress has greatly strengthened the movement in Masterton, and we have already received new members, as a witness to the effectiveness of the propaganda work carried out."

Miscellany of Congress Facts.

The Masterton Club's street sign-board was deemed to be unequalled in N.Z. and perhaps in many oversea countries. Mr. Dewar had the Esperanto flag flying from the Y.M.C.A. masthead throughout congress. The literary staff of the "Age" evinced much interest in the NZEA secretary's typewriter with an English-Esperanto keyboard. A two-hour search in the Wellington Public Library disclosed that every newspaper published in the Dominion on 28 December contained a brief congress report—as telegraphed from Masterton by the Press Association agent. These reports would probably be read by at least half a million persons in N.Z. Unaudited Congress A/c: Income, £13/19s.; Expenditure, £9/5/6d.; Surplus, £4/13/6d. (carried to 5th Congress A/c.). Enquiries were made for that well-known congress figure, Mr. Bertram Potts—unfortunately an absentee. The artistically printed congress programs and badges met with approval and praise. Mr. Franks was a methodical and accurate L.C.C. secretary, and collaborated excellently with the NZEA secretary.

And now, Gis la Kvina!

(W.H.K.)

Letero el Germanujo.

"Antaŭ nelonge mi ricevis de germana sam-o leteron, kiu enhavas pri-kribon de ŝia penado ĉeesti laboristan kongreson en Berlino kaj ŝia sukceso spite de egaj kontraŭaĵoj. Ĝi jetas lumon sur la malfeliĉajn kondiĉojn, kiujn pro la krizo nia lingvo devas tra batali." (A. L. Brentwood)

P—

Germanujo.

1/10/32.

... Mi ne scias, ĉu mi skribis al vi pri mia intenco viziti la unuan

Laborist-Esperantista Kongreso en Berlino. Jam longe antaŭ la tempo mi komencis sparkolekti, kio estis duoble malfacila, ĉar mi nur laboris tri aŭ kvar tagojn ĉiusemajne, kaj plue la salajro estis tre malgranda. Per tute preciza kalkulo mi grade ekstigis sumeton, kiu tamen tute ne sufiĉis por iri-reveni Berlinon.

... Mi decidis vojaĝi bicikle, sed, ĉar mi ne posedis biciklon, kaj ne sciis, ĉu mia antaŭ nelonge kuracita piedo tro suferus pro tia laboro, mi diskutis la projekton kun mia pli aĝa fratino, feliĉa posedanto de bela biciklo. . . . Si pruntedonis al mi la biciklon por du monatoj. Mi devis venki preskaŭ 300 kilometrojn. Mi konfesis, ke la biciklorajdo ne iris je la komenco komplete tiel, kiel mi volis. Mia piedo estis ankoraŭ iom malfleksebla, kaj pli ol unufoje okazis ne tute sendanĝera kontraŭkuro. Do, kiel antaŭe dirita, mi jam pretigis ĉion, kiam mi tri semajnojn antaŭ la celo—senlaboriĝis! Kio nun? Ĉu ĉiaj feliĉaj antaŭgvoj devas fiaskaĉi? Esti senlabora sen unu sola fenigo estas terure, ĉar la aĉa ŝtatsubvencio (A. dole) sufiĉas apenaŭ por necesaj mangajoj. Se mi restis sur mia projekto vojaĝi al Berlino, mi estus sen iu ajn mono. Mi devis treege pripensi la aferon. . . . Kaj mi estis en Berlino! Ĝi estis ĉiela rajdo. Ni estis nur du—mia amiko G., kiu fakte elpensis la bicikloprojekton, kaj mi. Li estis sperta rajdisto, sed havis eĉ malpli da mono ol mi. Survoje ni faris flankvojaĝon al D—, kie ni vizitis liajn parencojn. Tie ni restis nur unu tagon, ĉar ni havis nur ok tagojn por la tuta afero. (Ni devas anonci nin ĉe la loka senlaborul-kontrolo ĉiun oktagon).

Mi revenis kun 4 fenigoj kiel mia tuta monposedaĵo, kune kun ok markoj (nome egala kun ok anglaj ŝilingoj) kiel ĉiusemajna envenaĵo. . . . mi ne povis sendi al miaj plej bonaj amikoj eĉ unufoje leteron, ĉar mi ne havis la necesan sendmonon. . . .

Fine mi havas feliĉegon! Amikino ĵus alvenis por anonci, ke mi devas prezenti min ĉe la fabrikejo je l'sesa morgaŭ matene. Nun mi ne povas ekdormi, kaj skribas al vi ĉi tiun leteron, kiun mi enpoŝtigos morgaŭ. . . . Mi havas feliĉegon en mi! Mi ŝatus ĉirkaŭbraki la tutan mondon. . . .

Via amikino

M.

(La red. petas pardonon de amiko B., pro tio ke li devis pro spacomanko tiel pritranci lian cetere interesan leteron.)

Serloze Kaj Serce

HOW TO BECOME A BETTER ESPERANTIST.

You are an Esperantist! Why yes, you have been through the course, and can now say „Bonan Vesperon,” and „Ĝis la revido” with confidence, and can join in a general conversation at least as a listener. You need an en-

larged vocabulary! Quite true.—One of the best ways in which to acquire a command of a larger number of root words is to read a long book by a good author, either original or translated into Esperanto. Each author, you will find, rings the exchanges on a number of “pet” words over and over again, with the result that with each book you master, you at the same time master a new supply of root words until you acquire a complete working knowledge of the International Language. Also it is worth while to note that incidentally you will widen your acquaintance with the best of that large body of the world's literature which lies beyonds the bounds of one's own language. Therefore cultivate an International Mind by reading the best up-to-date Esperanto literature. In that way you will soon become a Better Esperantist

Se iel utilus, ĉiutage la ĝardenisto falus surgenue kaj preĝus tiele:—“Ho Dio, permesu ke, iamaniere, la pluvo falu ĉiutage, prefere de ĉirkaŭ la meznokto ĝis la tria matene; sed, vi komprenu, la pluvo devas esti malpeza kaj varma, por ke ĝi povu trasorbiĝi; permesu ke, samtempe, ĝi ne falu sur kampionon, helianthemum, lavendon, kaj la aliajn kiujn vi, en via senfina saĝeco, scias esti plantoj amantaj la sekecon—mi skribos iliajn nomojn sur peco de papero, se vi volas—kaj permesu ke la suno brilu la tutan tagon, sed ne ĉie (ne, ekzemple, sur spiraea, aŭ sur gencianon, plantag-lilion kaj rododendron), kaj ne tro multe; ke estu pleneco da roso kaj malmulte da vento, sufiĉaj vermoj, neniuj plantpedikoj kaj limakoj, neniuj ŝimo, kaj ke unufoje ĉiusemajne, fluida sterkakvo kaj guano falu de la ĉielo. Amen.”

(El La Jaro de l'Ĝardenisto, de Karel Čapek.)

Stelisto unufoje senkulpigis sin al Demosthenes, dirante: “Mi ne sciis, ke ĝi estis la via.” “Sed vi ja sciis,” diris Demosthenes,” ke ĝi ne estis la via!”

La kampara instruistino penis interesi siajn lernantojn pri la leciono. “Nun, infanoj, vi estas nomintaj ĉiujn malsovaĝajn bestojn krom unu. Ĉu neniuj scias? Kiu besto havas rigidajn harojn, estas ĉiam malpura, kaj ŝatas esti en la koto?”

Malgranda knabo levis la manon heziteme.

“Nu, Alano, diru al mi kiu ĝi estas?”

“Estas mi,” diris la knabeto penseme.

“Kaj kio vi nomas vin?”, kun males-timo diris indigna edzino, “viru aŭ muso?”. “Viru,” akre respondis la edzo. “Se mi estus muso, vi estus sur tiu tablo nun, alvokante helpon!”

Knabineto, vizitante la kamparon, ekvidis pavon. Kurante en la domon, ŝi ekkriis —“Ho, avino, venu kaj vidu! Jen estas maljuna kokino plenfloranta!”

Kritiko skribita en libro de predikoj:—

Eĉ se inundo ree venus

Al nia mondo peka,

Kvankam la tero subakviĝus,

Ĉi libro restus seka.

Diogenes serĉis honestulon. “Kia bonŝanco?” demandis la preterpasanto. “Ho, sufiĉe bona,” respondis Diogenes, “Mi ankoraŭ havas mian lanternon.”

El Rumana Plumo

(Ĉi monate ni donas okazajon el la vivo de d-ro H. Fisher, rumano. Ĝi estas represita el “Sistema kurso de Esp-o,” Seppik kaj Malmgren.)

—Mi estis vojaĝanta en la ekstrema oriento kaj mi prenis sidlokon en la restoracia vagono de Bukareŝto al Istanbul. Apenaŭ mi estis sidiginta, kiam mi vidas, ke iu eksterlandano vane penas kompreni al kelnero, kion li deziras. La kelnero uzas sian tutan lingvoscion: li parolas rumane, serbe, turke, bulgare kaj ruse. Sed ĉiam sen sukceso! La fremdulo komprenas neniun vorton. Mi alproksimiĝas en la deziro helpi al li—krom la rumana mi parolas sep lingvojn—kaj mi demandas al li germane, france, itale, angle, hungare, hispane kaj greke, ĉu mi povas servi al li. Ĉio vane! La fremdulo ne komprenas iun el la dek du lingvoj. Tiam mi ekmemoris artikolon pri Esperanto, kiun antaŭ kelkaj tempo mi estis leginta en gazeto, sed al kiu mi ne turnis atenton, kaj mi finis per la demando:—Ĉu vi parolas Esperante?

—Jes, mi parolas, li respondis kun ĝojokrio. Kaj li daŭrigis per la sama lingvo, kiun mi miaparte tute ne komprenis ĉar tiu estis la sola frazo de Esperanto, kiun mi konis. Sed kiam la fremdulo rimarkis, ke mi nenion

POR LA KOMENCULOJ.

KVINMINUTA RAKONTO.

(Finata)

La ungoj, kaj ostoj, kaj vizagharoj estis flanke metitaj por vendi, ĉar ni ĉiuj scias (aŭ tiel oni diras) ke manĝi la pecigitajn vizagharojn de tigro donas kuragon al la homoj, kaj ke la ungoj havigas bonŝancon kaj filojn al seninfana domo.

Apude boligis poto, preta por fari vespermanĝon de tigra viando por la ciganoj.

Kiam la kvar fratoj vidis ĉion ĉi ili diris: "Jen estas oportuno provi nian sciadon."

Kaj ili aĉetis la tigron de la ciganoj, kaj alportis ĉiujn ĝiajn partojn persake al la arbareto, kaj tie praktikis siajn artojn.

La plejaĝa prenis ĉiun tigran oston, kaj aranĝis ilin en perfekta ordo: la lernanto de la kemiisto elverŝis sur ilin boteleton da fluido, la ostoj kuniĝis; la helpanto de tanisto metis la karnon sur la ostojn, kaj alfiksis la haŭton, ungojn, kaj vizagharojn; kaj la plej juna frato, kiu lernis la magion de sia estro, elvokis sorĉon, kaj revivigis la beston.

Tuj kiam li tion faris la tigro eksaltis sur la kvar fratojn, kaj formanĝis ilin ĉiujn.

Tiu ĉi montras al vi, miaj karaj infanoj, ke estas eble esti tro lerta.

FIVE-MINUTE STORY.

(Concluded)

The claws and bones and whiskers were put aside to sell, for we all know (or so they say) that to eat the chopped whiskers of a tiger gives man courage, and that the claws bring luck and sons to a childless house.

A pot boiled near, ready to make supper of tiger meat for the gipsy band.

When the four brothers saw all this they said: "Here is an opportunity to put our knowledge to the test."

And they bought the tiger from the gypsies and carried all its parts in a bag to a wood, and there began to practise their arts.

The eldest boy took all the tiger's bones and arranged them in perfect order; the pupil of the chemist poured over them a phial of fluid, and the bones became knit together; the tanner's assistant placed the flesh over the bones and fitted the skin, claws, and whiskers; and the youngest brother, who had learned magic from his master, uttered a spell and restored the animal to life.

No sooner had he done so than the tiger sprang upon the four brothers and devoured every one of them!

This shows you, my dear children, that it is possible to be too clever.

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masterton Esperanto Club — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Worksop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram

Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A.. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18a horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

komprenas, li seĝis bonan rimedon. Li donis al mi "Slosilon de Esperanto," kiaj ekzistas en multaj lingvoj. Kvan-kam ĝi estas nur malgranda kajeto, ĝi enhavas la gramatikon kaj sufiĉan vortaron de la internacia lingvo.

Mi tuj komencis studi la libreton, kaj post dek horoj, kiam ni estis sur la ferdeko de ŝipo, mi jam povis paroli en Esperanto. Tiam mi ricevis la informon, ke mia kunvojaĝanto estas svedo kaj scias kvar lingvojn — la svedan, danan, norvegan kaj finnan.

Ni tri, la svedo, la kelnero kaj mi, parolis kune dek ses lingvojn, kaj tio tamen ne sufiĉis por ke ni komprenu unu la alian. De tiu tempo mi estas fervora esperantisto.


To Contributors.

Kindly type all matter. Make any emendations with typewriter also. Space lines well, leaving margins on both sides. If possible, send originals of translated work.

NEXT NUMBER
SCHEDULED FOR
31st MARCH.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi volonte disdonas senpagajn ekzemplerojn de literaturo, Esperanta kaj angla, pri Kvakerismo kaj Paco. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA. (represo petata).



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 150 (13th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

31 MARTO, 1933.

NACIISMO KAJ ESPERANTO.

En la nuna diskutado pri reorganizo de la Esperanto-movado, restas preskaŭ netuŝita sufiĉe grava faktoro—la influo de la naciismo, perturba forto ankoraŭ inter ni. Utile estus studi ĉiutirilate la enhavon de la oficiala organo de la U.E.A. kaj tiujn de la diversaj naciaj Esp-aj organoj, kiaj ili estis dum la militjaroj.

Tiu de "Esperanto" (U.E.A.), sub redaktoreco de H. Hodler, estis karakterizata de alte supernacia, konstrueme neŭtrala spirito. Tio estas precipe vera pri la pensriĉaj fruntartikoloj verkitaj de tiu vastanima Eŭropano. Komparu la jenan "ŝercon," kiu aperis 15.9.18 en "The Esperanto Monthly," Londono: "Antaŭ kelkaj jaroj Germano montris al Dana vizitanto la domon de Schiller en Weimar.

Jen la domo de nia nacia poeto, diris la Germano.

Internacia poeto, ĉu ne? diris la Dano, ĉu li ne verkis La Virineto de Orleans por la Francoj, Vilhelmo Tell por la Svisoj, Mario Stuart por la Skotoj, kaj La Novedzino de Messina por la Italoj?

Ĝed ĉu li ne verkis ion por ni Germanoj?

Certe, respondis la Dano, li verkis La Rabistoj."

La ofendo estas malkaŝa. Tia mala-

mikeca konduto de "samideanoj" tre povas semi dubojn pri la efikeco de la "interna ideo," kies rebrilaĵo samnumere troviĝas en la jena bela aserto:—"It is to the work of Zamenhof that the world must look for the common tongue of the League of Nations. It is a tongue, that was invented not only to prevent war, but to make war impossible, because its author intended it to be used to show men that they are brothers" (!) k.t.p. En la sama gazeto 15.4.18 ankaŭ estas reverko de la Ekzercaro de Zamenhof, destinita por soldatoj. Rekruto ne estas matura soldato (Infano ne estas matura homo); La kanono jam ne pafas (La infano jam ne ploras). Kion Zamenhof opinius pri tia? Kiel konate certaj germanaj kaj francaj Esp-istoj febre laboris tiutempe ĉe siaj registaroj, celante akceptigi Esp-on en landaj militpropagandaj rondoj, kun parteta sukceso.

En la nuna momento regas akra naciismo en la Eŭropaj nacioj. Italando, Hungarujo, Germanlando sidas sub diktaturoj. U.E.A. ne plu havas membrojn en Italando. La itala organo "L'Esperanto" (n-ro 16) krias sub foto de Mussolini la vortojn de tiu regulo: "La ordona vorto estas jena—marŝi, konstrui kaj, se necese, batali kaj venki." Ĉu ankaŭ la germana landorgano perdos sian sendependecon pro

lastatempaj politikaj eventoj?

Male, dum la milito kaj ankoraŭ nun la U.E.A. fidele funkcias ekster naciaj kadroj, senpartie, altruiste, akurate. Ĝi eltenis sukcese la terurajn batojn de l'Militodio. Ĉu nova organizformo, konstruita sur la marĉo de landaj organizoj tro facile flamigataj de la partikularismo, povus transvivi similan?

(R.B., 4.3.33)

OFFICE-HOLDING IN A.E.A.

We have received a letter from Mr. Henry Byatt, of Perth, who informs us that the recent voting for positions of President and Secretary of the Australian Esperanto Association was in favor of Mr. F. J. Simon and Miss E. B. Carrick respectively. He points out that the work of the Association is seriously interfered with owing to the short term for which officers are elected, viz: one year. Nominations were called in September, 1932, and results of the ballot came to hand in February, 1933; about five months of the year were thus occupied in getting officers elected, leaving only seven months for actual work. Owing to Australia's immense distances, the time occupied in mailing and remailing correspondence is so great that little can be done. He firmly holds that all officers should be elected for not less than three years, and points out that

the result of a vote taken last year showed only one group not in favor of a three-year term.

RADIO COLUMN.

Speakers are requested to send in particulars of any broadcasts arranged in ample time for publication in this column.

Esperanto lessons will be broadcast from 3LO at 7.45 p.m. on the dates mentioned below. An anecdote will be read at the end of each lesson to enable students to check their pronunciation.

April 15th.—Mi kaj mia edzo dum edziĝa vojaĝo cirkaŭis la mondon. —Cu vi vizitis Romon?—Mi ne scias. Mia edzo aĉetis la biletojn por la vojaĝo.

April 29th.—Cu vi ne laciĝas respondante al sensencaj demandoj?— Jes,—respondis la policano,—mi jam respondis al tiu demando dudek fojojn hodiaŭ.

KRONIKO.

Masterton, N.Z.—La klubo funkciis la tutan jaron, dum kiu la prez-o, s-ro A. Dewar, D.B.E.A., kaj f-ino Ibbetson instruis la lingvon. La membraro estis dudek ses (ok pli ol en la antaŭa jaro); la meza nombro de ĉeestantoj ĉe kunvenoj estis dek ses. En 1932 la Masterton'a klubo havis pli altan anciferon ol kiu ajn alia klubo en Nov-Zelando.

La 4a kongreso de la NZEA (Decembro) en Masterton kaŭzis forton impreson. Ni ricevis kvin novajn membrojn pro tio.

Du anoj forlasis la urbon kaj klopodas starigi Esp-an klubo en alia urbo. Unu membro gajnis la BEA—diplomon. Permeso de la YMCA (kristanasocio de junviroj) la klubanoj starigis bele grandan duflankan devizon ekster la kunvenejo. Ĝi vekis multan admiron ĉe la kongresanoj. Sur la kongreseja muro estis alia deviztuko longa dek kvin futojn, kies unu vorto, Bonvenon, ĉiame salutas ĉiujn.

La Coburg E. Grupo kunvenis je la 12a de januaro por daŭrigi sian studadon post la kristnaska kaj novjara libertempo. Ĝi bone progresas; 8 novaj lernantoj aliĝis en la du monatoj pasintaj.

Ni estis favoritaj per vizitoj de s-ro Trouarod, el la grupo ĉe Bendigo, f-ino McKay, el Melburno, kaj s-ro Thomson. Bedaŭrinde nia eksprezidanto, s-ino Hintze, dum tri semajnoj mal-

sanas. Ĉiuj grupanoj esperas, ke ŝi rapide resaniĝos.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Mr. W. T. Middlebrough, 9/-, Feb., '34; Miss Bostock, 2/6, Dec., '33; Miss A. Winhall, 5/-, Jan., '34; Mr. F. M. Pavlinovich, 5/-, March, '34; Mrs. H. Aspin, 5/-, Feb., '34; Dr. F. J. Williams (Sub. and Adv.), £1/7/6; Auckland Esperanto Society (sub.), 10/-, May, '33, (adv.) 11/-, May, '33; Coburg Esperanto Group (adv.), 5/6; Mr. W. F. Holloway, 4/6, Feb., '34; Melbourne Esperanto Club (subs.), £1/14/-, (adv.) 5/5, (sales) 16/5.

INAUGURAL MEETING OF A.L.E.A.

An enthusiastic gathering representative of various Esperanto groups in and around Melbourne on 28th February last formally established the Australasia Labora Esperanto-Asocio.

It was regretted that late publication of "La Suda Krucio" (Feb. issue) prevented the notice of that meeting reaching many who possibly would otherwise have been present.

A letter explaining the aims and organisation of the Association is being forwarded to all Clubs, Societies, and individuals interested in Esperanto, in the hope that they will link up with this new venture in the interests of the International language and of the Australian workers generally.

The next meeting in Melbourne is to be held on April 10th at 8 p.m., in the Temperance Hall, Russell St. At this meeting a provisional constitution prepared by the Committee will be submitted. All interested are invited to attend.

The Secretary is communicating with groups in the other states, also New Zealand, inviting them to form sections of the A.L.E.A. Affiliation with the A.L.E.A. will in no way encroach upon the activities of existing Esperanto societies. A distinctive aim entitles the A.L.E.A. to a separate existence, but it earnestly desires the cooperation of all kindred organisations.

B.E.S. ADRESARO!

By last mail I received a further small supply of this finely produced "aid to correspondents." This, the Jubilee (10th year) number, contains over 1100 addresses from over 40 lands. It can be had from La S.K. on receipt

of four reply coupons. This means of payment is the only practicable one, owing to exchange difficulty. (Agent.)

THE CLAIMS OF ESPERANTO. (Reprint of leading article in "The Wairarapa Age," 6/1/33.)

At the fourth New Zealand Esperanto Congress, held at Masterton last week, interesting proof was afforded that the claims of the international auxiliary language invented by the late Dr. Zamenhof are gaining steadily wider recognition in this country. At a public meeting held in connection with the conference, a resolution was passed calling upon the Government to approve the official teaching of Esperanto in the schools of the Dominion, "as had been done advantageously for many years in a number of other countries." This resolution, and others like it, are likely at the moment to be of little avail. The overshadowing aim in educational administration is to cut costs and no new expenditure of any kind is likely even to be considered by the Minister of Education and his Department. It seems to be well established, however, that in making no provision for the teaching of Esperanto, our State educational authorities are lagging behind the times and are withholding instruction of undoubted value even from the most severely practical standpoint.

The claims of Esperanto are based upon the fact that it has definitely outpaced and outclassed its competitors for adoption as an international auxiliary language, and in doing so has undergone, in many countries and in varied conditions, an extended working test which has proved it to be well fitted to serve its intended purpose—that of a neutral language capable of spreading throughout the world and providing an efficient and convenient means of communication between nations, without intruding upon the national life of peoples and without any attempt to supersede the existing national languages. It already seems certain that the universal adoption of Esperanto as a medium of business communication between the trading communities of different nations will be only a matter of time. Already the international language is used very extensively in this way. At a broader view, even more important possibilities are raised by the increasing use of Esperanto in international communication, both official and unofficial. The use in common of an efficient language obviously will do much to facilitate that understanding between peoples alien to one another on which the peace of the world largely depends. It is self-evident that in a country like New Zealand, the complete neglect of Esperanto in schools maintained by the State can only be temporary and must be attributed, even in these days of enforced economy, to a failure to perceive the significance—economically as well as at a larger view—of develop-

ments in the use of the international language that are proceeding inevitably and in all human probability will be expedited greatly in the near future.

NIA POŝTO.

J. E. en W.—Bedaŭrinde ni ne povas presigi viajn strofetojn. Vidu klarigon sur p. 2 de Oktobra n-ro.

B. T. en L.—Jes, Zinoviev, la fama bolŝeviko kaj laŭaserta aŭtoro de la monde konata "letero" al la brita lab. partio, estas la sama homo, kies nomo aperis en la dediĉparolo en la franca-Esperanta vortaro de 1907, laŭ informo de "Helvetia," Occident a l - o r g a n o. "Kuraĝa laboranto por Esp-o de la unua horo, li fariĝis ĉefo de la rusa revolucio, kaj unu ne plu okupiĝas pri Esp-o."

Julie S. en Pr.—Via artikolo aperos kiel eble plej frue. Dankon.

A. C. -T. en N.Z.—Dankon. (1) Timinde estas ke lastatempaj eventoj en Germanl. grave influos sur la Kollan kongreson. (2) Ankaŭ multaj el la nune proponataj novvortoj estas el germanaj fontoj. (3) Jes, la cifero donita de BEA pri la nombrado de Esp-istoj ŝajnas tre malalta. Ĝi estas kompreneble nekompleta. (4) Viajn plendojn mi atentis.

Al Do. en W.:—

En la korekta frazo "tiom kaj tiom da milionoj da kilogramoj da sukero" "Heroldo de E." proponas ŝanĝi "milionoj da kilogramoj" al "kilogram-milionoj" (eventuale: milionkilogramoj), do, "tiom kaj tiom da kilogram-milionoj da sukero."

Al B. en M.:—

La spiritoj jam informis vin, ke "la projekto—estas preskaŭ perfekta. Esperanto ne estas tia." Ni opinias ke en aferoj lingvosciencaj oni devas turni sin al la lingvistiko aŭ almenaŭ al sana rezono. Sin turni al la spiritoj estas riske, ĉar oni tre povas per tio ekkomunikiĝi kun iu fantasta spirito, kiu havas plezuron mistifikadi.

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF.

(N-ro 6)

[Respondo de d-ro Z. 1913, post kiam li en Bern estis akceptinta oran medalon kaj bukedon.]

"Esperanto jam ne plu dependas de iu sola homo, nek de iu sola aro da homoj, por sia sukceso. Homoj povas veni, kaj homoj povas iri, sed Esperanto daŭrigos ĝis la idealo pri internacia lingvo, kuniganta ĉiujn popolojn per ligo de komuna komprenado, estos atinginta sian venkan realiĝon por la bono de la tuta homaro."

RECENZ(ET)OJ.

HOMOJ SUR LA TERO, originalo de Stellan Engholm. Eldonita de "Literatura Mondo," Budapest. Pĝ. 201, prezo 1 dol. bindita, o.70 broŝurita.

Leginte ĉi tiun romanon, kiu cetere gajnis le 1931 literaturan konkurson de "Literatura Mondo," mi supozas ke la aŭtoro intencis montri per ĝi, kiel sencelle, monotone kaj ĉiutagece stagnas la grizaj vivoj de la terhomula plimulto. Se jes, li perfekte trafis. La finaj jaroj de l'maljuna Kristoforo forĝatas tra kvar ĉapitroj dum li aĝstulte planas, pribabilas kaj gapas la konstruadon de nova stalaro; en la dua parto lia filo Kristoforo idiotas, drinkas kaj fordiboĉas la havon, gravedigas la servistinojn kaj ignoras sian vir-idon; en la tria parto multe temas pri la fantazia influo de la mortinta avo sur ĉi tiun junan Eskil, lia nefeliĉa enamigo, forvojaĝo al iurbojn kiel metilernanto, kaj lia reveno kun akompana familia ĉirpado. Ĉu vere pli? Jes, la figuro de la efektiva "heroino," Kajsa la ĉiamokupata, klarvidanta la esencan rilaton de la Homo al la Tero, kaj flegme batalanta konservi al si kaj siaj rajtan intimecon kun tiu ĉi fonto de l'nutro. Bele malhela bildo de nordlanda kamparano.

Sed dirdeve, mankas en la verko tiuj literaturaj elementoj kiuj katenas la legantan spiriton, ĉu filozofiaj, ĉu psikologiaj, ĉu simple aventur-rakontecaj. Liaj observoj ŝajnas suprajaj, ne pensertaj. Ekzemple, sur p. 125: "Se ni nur vivus en ĝusta maniero, eĉ la laboro fariĝus kvazaŭ ludo, kvazaŭ gaja festo al ni ĉiuj." Neniu disputos tion, sed multaj disputos pri tio, kio estas "la ĝusta maniero." Sur 128 "Pri iliaj (la knaboj de Grandtorento) propraj vivinstinktoj ili ne estas kulpaj." Tiu aserto, akceptita de la homoj ĝenerale, renversus la socion.

Lingvaj punktoj: 10, "K. ne kaŝis sian lumon." Tiu cito el la Nova Testamento ne estos komprenata de nekristanaj popoloj. 50, "li molkrure venis" (?); 55/6 lia (ŝia): 128/6 okuloj (oreloj); 128 timida (?); 135, alie (aliie, aŭ aliloke); 136, ŝeroj (skandinaviaj rifinsuletoj); 155, "li ne povis helpi, ke li sentas sin fremda antaŭ ili." Stranga anglismo: Legu (li ne povis ne senti sin . . .); 172, "mortigi la lastan banklibron" (?); 173/1, kontrolon (sinregon); 183, "oni ĝuste tagmangis" (oni ĝuste tiam t . . .); 188, "metis la vizagon dense al la lia" (. . . tre apude . . .); tralibra uzo de "korto" en senco de "terposedo," "bieno"; "senteniĝan figuron" (?).

Malgraŭ tiuj kaj aliaj diskutindaj formoj kaj parolturnoj la lingvaĵo de Engholm estas larĝgrigarde bona. Sed ĉu verkon de eĉ tre lerta Esp-isto oni presu nur tial ĉar li estas tia?

Esperanto-Deutsch Vortaro de la L.E.A. (Laborista Esperanta Asocio). Dirksenstr. 42, Berlin C25. Pĝ. 143, prezo unu ŝil. Ĉi tiu prilaboraĵo, destinita ĉefe por "malburĝuloj," estas

kelkpunkte rimarkinda. Unue en tio ke ĝi aprobas principon de apokopado (t.e., elizio de parto de la radiko), "responde al la lingvoritmo de Esp-o." Ekz. but(e)ro, vet(e)ro, reg(u)lo, komit(at)o, sekretar(i)o, karik(atur)o, Sed estus nur konsekvence uzi plue kap(e)lo, kanib(a)lo, kand(e)lo. De mi dirende estas, ke ĉi tiu procedo rekte minacas la unuecon de la lingvo, kaj precipe ĉe la oficialaj radikoj, ekz. gra(j)no, ĝi estas nepre malkonsilinda.

La kompilintoj staras sur iomete pli firma grundo sankcianta la adverbajn formojn ĉirk(e), ant(e), presk(e), k.c. Ili atentigas, ke Zam. en 1894 proponis la e-formojn en sia reformprojekto, kaj ke la Esp-a Akademio voĉdone permesis uzon de tiu formo ĉe la adverboj. Sed ĉi vortaristoj ne mencias ankaŭ la fakton, ke en la sama jaro (Orig. Verkaro p. 512) Zam. skribis "Vi scias, kiel longe mi batalis kontraŭ reformado . . . Sed bedaŭrinde la afero ne dependas de mi." Agnoskente estas, ke la Esp-a popolo ne uzas la suprajn formojn, aŭ se jes, nur etskale kaj interne de klare markitaj limoj.

Kial strangaĵoj kiaj antikvio, redaktio, anstataŭ antikveco, redakcio? La derivaĵoj "deflorigi," "distaŭzi," "disaŭdigi" devas sidi respektive sub "flor," "taŭz," "aŭd".

En vortaro celante proletajn rondojn mirige estas trovi multajn balastajn formojn kiaj mediano, micelo, minio, miriapodo, dum malestas vortoj oftege uzataj sur la paĝoj de eldonaĵoj de Ekrelo (la proletliteratura eldonejo)—rajono, minori(ta)to, defi, klerikala k.m.a.

Neologismoj svarmas. Spaco mankas por pritrakti tiun senfinan demandon. Interesaj tamen estas nubila, pubera (seksmatura); holi (irpreni); kavalo (rajdcevalo); fleĉri (zorge maĉadi); vringi (kuntordi).

Studinte ĉi cetere valoran volumeton, mi ankoraŭ fidus, ke inter la Esp-istaro ekzistas instinkta prudento sufiĉe komuna por malakcepti la kapriolaĵojn de nesana troevoluismo.

(Robo.)

Kalendaro de Internacio de Proleta Esperantistaro: 1933.—Meritas vendon ĉe ĉiu deziranta pluan disvaston de nia lingvo precipe inter la proleteculoj. Poŝformata, belpresa, por-nota spaco eĉ ĉiu tago, memorindaj datoj tuŝantaj la klasbatalon, listo de proletorganizaĵoj kaj -organoj, kaj pikaj artikoletoj—jen riĉa kompilo en eta formo. Prezo du resp. kuponoj ĉe I.P.E., Postfach 2, Berlin C25.

"La Esperanta Libroĉetanto" estas 16-paĝa faldfolio pri la nova mistera organizaĵo, kiu dum kelk monatoj lastatempe instigas la interesecon de ĉiulandaj E-tistoj. Kio estas AELA? Skribu al The Manager, La Suda Kruc, Box 731 F., P.O., Elizabeth-st., Melb., kaj per tio ricevu senpage ĉi tiun presaĵon, kiu plene klarigas pri la Asocio de Esperantaj Libroamantoj. (L.T.)

EL RUSA PLUMO.

(Ĉi monate ni donas skriberon de la fama veterano Esp-a, V.N. Devjatnin. Ĝi estas mallongigita el tre interesa artikolo en la tria kajero de "La Nova Etapo," Moskvo. Havanta aĝon pli ol 70-jara Devjatnin ankoraŭ fervore laboras por Esp-o. Li nun loĝas en Kiev, partoprenante tradukadon de la verkoj de Lenin en nian lingvon.)

... Kiel strangaj estas la homoj! Dum miloj da jaroj ili parolas per mil diversaj lingvoj, toleras diversajn malfacilaĵojn, eĉ malfeliĉaĵojn, ne komprenante unu la alian, kaj tamen neniam maniere povas elekti ian lingvon, kiu estus lingvo komuna, egale komprenbla por ĉiuj homoj de la tuta mondo. Kunvenas nur tri personoj de diversaj nacioj, ekzemple, franco, germano kaj ruso, kaj volas envortigi la ideon pri domo,—kaj kiel ili esprimas ĝin? Unu diras "maison," la dua "Das Haus," la tria "dom." La ideo ja estas komuna, la sama por ĉiuj nacioj, por ĉiuj gentoj,—kial do oni ne povas esprimi ĝin per sama vorto? Ne nur oni povas, sed eĉ oni devas. Sekve devas esti akceptita aŭ elpensita komuna "tutmonda lingvo," por ke ĉiuj homoj loĝantaj sur la terglobo, komprenu unu la alian...

"Tiel pensis mi, gimnaziano de la VI klaso, preparante min al la ekzameno kaj studante la latinan laŭ la sintakso de fama Kuhner..."

"Pasis ses longaj jaroj, de kiam mi lernis la lingvojn latinan, grekan, francan, germanan... Kaj kiajn sciojn ricevis mi de tiuj ĉi fervoraj studoj? 'Quo usque tandem, Catilina...' Ni ja parkere lernis tiun ĉi ciceronaĵon... parkere!

"Ĉu vi komprenas, miaj karaj geleĝantoj, kion ĝi signifas? Kiom da streĉo de niaj junaj spiritaĵoj fortoj ni uzis, por kompreni la sagacajn parolturnojn de tiu ĉi eminenta roma oratoro! 'Accusativus cum infinitivo,' 'Nominativus cum infinitivo,' 'Ablativus absolutus,' 'Ablativus tempore ut finale,' 'Oratio recta,' 'Oratio obliqua'... 'absque, a, ab, abs, de, coram, clam, cum, ex, e...' k.t.p. senfine.

"Tiujn ĉi idiotaĵojn mi ankaŭ devis lerni parkere. Mi ankoraŭ ĝis nun, post pli ol 50 jaroj, memoras ilin. Kion da tempo, da laboro, da energio; da fortoj estis eluzitaj—kaj pro kio?... Kaj la greka, la franca, la germana, la antikva slava lingvoj kun iliaj multnombraj komplikitaj reguloj, kun es-

ceptoj, esceptoj el esceptoj, kun iliaj etimologiaj kaj sintaksaj labirintoj, ilustritaj per diversaj prozaj kaj versaj ekzemploj, otte tute sensecaj, malspritaĵoj...

(Nun sekvas lia konatiĝo kun Volapuk, lia senluziĝo pri tiu fiaskinta provo.)

... Venis la epokfaranta por mi 1891 jaro. En majo de tiu ĉi neforgesbla jaro, pasante unu fojon tra la stratoj de Vilno, kie mi tiam loĝis, mi ekvidis en la librovendejo de Sirkin malgrandan libreton en la rusa lingvo kun la titolo (ruslingve) 'D-ro Esperanto. Internacia Lingvo. Plena lernolibro, kun antaŭparolo kaj du vortaroj. Prezo 10 kopekoj. Varsovio. Presejo de Kelter. 1887'... Mi aĉetis la libreton kaj ekkuris hejmen, rapidante por kiel eble plej baldaŭ tralegi ĝin. Komencinte la legadon, mi kvazau frenezigiĝis; la tutan nokton mi pasigis apud la skribotablo, atentege legante kaj relegante paĝon post paĝo la admirindan libreton.

... Mi estis preta salti kaj danci, kvazaŭ frenezulo, kaj mia singardema kaj suspektema edzino serioze pensis, ke mi efektive frenezigiĝis: post kelkaj tagoj ŝi, nenion dirinte al mi, sekrete invitis mian konaton, d-ro Rozenson, por ke li esploru min. Tiu vizitis min, kvazaŭ hazarde, jam vespere, sed post interparolo kun mi, kiam mi montris al li la broŝuron de d-ro Esperanto pri lingvo internacia kaj entuziasme klarigis la signifon de tiu ĉi broŝuro, li ankaŭ frenezigiĝis, ĉar post la vizito al mi li ekiris en la magazenon de Sirkin, aĉetis la saman broŝuron kaj komencis studi la lingvon internacian. Poste li fariĝis bonega esperantisto...

(Nun sekvas la rakonto pri la kunlaboro de D. kun Zamenhof kaj aliaj frutempaj pioniroj. Lia unuaj provoj en la verkista kampo, kaj lia batalado kun la cenzuro pro tio).

How would you render these in Esp-o?

The argument will not hold water.
He resolved to turn over a new leaf.
You will think better of it afterwards.
It was indeed a storm in a tea cup.
He was greatly taken aback by the question.
I don't care a straw about what happens.
Leave no stone unturned to complete the work.
I make shift to have good clothes.
He showed great presence of mind.
I suppose he then popped the question to her.

SERIOZE KAJ SERCE.

"Gentilulo," diris la Duc de Morny, "estas tiu kiu aŭskultas kun intereso al aferoj pri kiuj li scias ĉion, kiam ili estas rakontataj de iu, kiu scias nenion pri ili."

"Ho, patrino," ekdiris la malgranda knabo ĉetoble, kiam oni malkovris la gorgonzolan fromaĝon, "mi volas, ke mi estus surda kaj muta en mia nazo!"

Gasto: "Aŭskultu, kelnerino, tiu ĉi fiŝo tre malbonodoras."

Kelnerino: "Mi tion scias, sed, sinjoro, mi nenion al vi diris, por ke ne rompiĝu via apetito."

Bonkora preterpasanto (ĉe la marbordo): "Nu, mia vireto, ĉu vi konstruas kastelon?"

La "vireto": "Ne. Tiu ĉi estas hotelo; estas neniom da mono en kasteloj."

Libroamanto (konsternite): "Pardonu min, sinjorino, sed tiu libro, kun kiu via filineto ludas, estas antikva kaj treege malofta unua-eldono."

Vizitanto: "Ho, ne gravas. Ne ĝenu vin. Ĝi amuzos ŝin tute egale kvazaŭ ĝi estus tute nova."

Iu demandas—Ĉu estas danĝere manĝi antaŭ ol dormi? Ni pensas, ke ne. Ni ofte aŭdas pri homoj kiuj faras tion. Sed se vi timas riski ĝin, eble estus pli bone, se vi manĝus post kiam vi estas ekdorminta.

Junulo nomita Roberto

Amumis fraŭlinojn kun sperto

Al knabin' li edziĝis

Dek idoj naskiĝis

Nun bedaŭras li pri sia lerto.

Ĉu Smit kaj lia nova edzino interagrablas?

Ho jes! Ŝi rigardas lin kiel grekan dion.

Ĉu veré? Sed Smit ne estas homo tre di-simila.

Eble ne. Sed ŝi metas antaŭ lin brul-oferaĵon ĉe ĉiu manĝohoro.

Knabino: "Ho, patrino, tiu estas belega libro; sed ĝi finiĝas tiel malĝoje.

Patrino: "Ĉu mia kara? kiel?"

Knabino: "Ĉar ŝi mortas, kaj li devas reveni al sia edzino."

POR LA VIRINOJ.

Du aspektoj de la virinoj.

1870 — "Junulinoj," diras Ruskin, "devus simili lekantetojn, lekantetojn blankajn kaj ĉarmajn, kun rando de ruĝkoloro, se vi serĉe rigardas: lumigante la teron kie ajn ili estas: sciante simple kaj kviete ke ili tion faras, kaj ke ili devas tion fari, kaj ke estus tre malbone se ili ne tion farus. Kelkaj lekantetoj perdas siajn ruĝajn randojn kiam ili floras. Ĉi tiuj tute ne estas tiel beletaj kiel la aliaj. Sed, malgraŭ ĉio, ili estas lekantetoj, kaj neniu povas diri unu vorton kontraŭ ili. Kelkaj junulinoj ne estas tiel beletaj kiel aliaj. Sed malgraŭ ĉio, ili ja estas knabinoj, kaj ili devas esti agrablaj. Ĉiam ili estas tiaj, kvankam okaze oni ne rimarkas ĝin."

1932—Estas interese rimarki la manieron en kiu la Rusa komunista registaro aranĝas pri la virinoj. En ĉiu vivrilato, la virino ricevas la saman egalan traktadon kiel la viro. Sociale, ekonomie, politike, ŝi estas lia egalulo. Se ŝi edziĝas, tiu fakto tute ne tudas ŝian oficon. Se ŝi patrinigiĝas, ŝi havas monatan libertempon antaŭ kaj post la nasko. Ŝi estas kuraĝigata lasi la infanon en publikaj infanejoj por ke ŝi povu labori ekstere la hejmo, kaj sin liberigi de la ĉenoj de familia devo. Ŝi povas estri ĉian movadon aŭ firmon, same kiel la viro, ĉu estas inĝeniera aparato, registara fako, edukada departemento, aŭ eĉ la armeo mem. Kaj se ŝi perfidas la registaron aŭ penas renversi ĝiajn projektojn, ĝi ŝin mortpafos kun ne pli da kompato ol ĝi montrus al viro. (El la "Homaro Elradikigita" de Maurice Hindus.)

La Recepto

Fiŝa Pudingo El Svedujo

Prenu unu funton da kuirita blanka fiŝo, senigu ĝin de haŭto kaj ostoj; pecigu tri aŭ kvar uncojn de bovaĵa sebo, kaj pistu ĝin en pelvo. Al ĉi tiu aldonu la fiŝon kaj ankaŭ pistu. Tiam enmetu du uncojn da mola pano, antaŭe trempita en lakto. Pistadu ĝis la miksaĵo estas tute glata, aldonante du kirlitajn ovojn. Enmetu en pelvon kaj malsekigu per ne tute kvaronpajnto de lakto. Spicu per salo, pipro, kaj pecigita petroselo, kaj vaporumu dum unu kaj duonhoro. Servu kun ordinara blanka saŭco, kaj aspergu per iom da omara koralo laŭvole.

The more people you get to know about Esperanto, the more valuable the language will be to you.

RUGA POLVO.

(La sekvanta artikolo, el la melburna "Argus," pritraktas la aventuron de maljuna orserĉisto, Patrick Whelan, kiu asertis, ke li retrovis la Rifon de Lasseter (vidu "Suda Kruco" 1/10/32). Sindikato sendis Whelan per aeroplano, kun piloto kaj termezuristo, por trovi la rifon, sed la aeroplano devis alteriĝi sur unu el la salaj lagoj priskribitaj en la sekvanta artikolo. Trovante, ke la aeroplano, pro difektoj, ne povis leviĝi de la koto supraĵo, kun la tri viroj, eĉ post kiam ili forprenis la provizaĵojn, k.t.p., Whelan elektis resti tie, dum la du aliaj revenos al Forrest por alvenigi helpon. Du militaj aeroplanoj vizitis lin kaj faligis nutraĵon al li, sed ili estis tro pezaj por riski la alteriĝon. Post ok tagoj sola sur la sala lago, kun escepto ke kelkaj indiĝenoj, kiuj montris al li kie trovi akvon, Whelan estis fine savita per la unua aeroplano, kiun oni riparis kaj ekipis per pli larĝaj radoj, por ebligi pli facilan leviĝon.

"Malmola semo," liaj amikoj lin nomis. Li elpaŝis el la Adelaide-a ekspresvagonaro ĉe Spencer-strato, kaj tuj marŝis al akvofonto. "Estas tiu ruĝa polvo," li klarigis, post longa trinkado. Li libertempe vizitas Melburnon post tridek jaroj kiel kontrolisto de brutbienego en la Musgrave-Montaroj en Mez-Aŭstralio. "Mi plivole estus ĉi tie, ol kie tiuj orserĉistoj troviĝas, for en la centro," li diris. "La nuna tempo estas precize la malĝusta jartempo iri tien. La kamparo konsistas tute el ondanta sablo, kun iom da histrikherbo, kiu estas eĉ tro malmola por sidejo, kaj kelkaj argilkavoj, kiuj estas nudaj kaj malmolaj, sed tro perfidaj por aeroplano. Ankaŭ estas la salaj lagoj, Macdonald kaj ceteraj, sekaj kaj brilege blankaj. Kiam la riveroj fluas, eble unufoje ĉiujn sep jarojn, ili fluadas super la dezerton, kaj demetas siajn akvojn en malprofundajn kavojn, kie la suno sekigas ilin. Dum pluvriĉa sezono eble estas futo da akvo sur la koto, sed alifoje, la koto estas kovrita per dika salkrusto, kiun la riveroj estas ellavintaj el la dezertsablo. Tiuj estas la lagoj.

"La argilkavoj? Nu, ili nur estas tiaj; neniu ŝajnas scii multon pri ili. Se oni fosas apud lago, la serĉota akvo estas saturita de salo. Kaj varmega!..." Li englutis alian akvotrinkon. "Estas tiu ruĝa polvo," li reklaris kvazaŭ pardonpete.

"Viro sendube estas freneza iri serĉi oron tie, aeroplano," li diris. "Oni bezonas kamelojn, kaj eĉ tiokaze oni povas veturi nur nokte, je tiu ĉi tempo de la jaro. La indiĝenoj ne ĝenos vin. La plej malbonaj el ili estas en mia regiono, kaj ĉiufoje kiam ili estas atakintaj blankulon, estas la kulpo de la blankulo. Sed la varmego! Dekdu horojn sen akvo, kaj homo pereas! La haŭto kaj ungoj fendigiĝas, kaj oni ne kuraĝas tuŝi metalon en la suno, ĉar ĝi bruletigas la manon. Akvosakoj ne utilas—tro da forvaporigo. Dum ĉi tiuj monatoj la rapideco de la forvaporigo estas po tridek futoj jare; tio signifas, ke tia suno sekigus puton profundan je tridek futoj en la daŭro de unu jaro. La akvo forvaporigiĝas eĉ tra lignaj bareloj. Kameloj ne povas kontraŭstari la varmegon de la tago; ili nur kuŝiĝas en la ombro de bastono kaj bakigiĝas, ĝis plimalvarmiĝas. Mi kompatas tiun kompatindulon, Patrick Whelan—kampeloĝantan tie sola sur la sala lago. Estas bona regiono en la vintro, eble en ĉiu sepa jaro sed nun..."

Pro tio, ke la akvo ne satigis lin, li direktis siajn paŝojn al la drinkejo. "Estas tiu ruĝa polvo," li diris denove.

PRI "REGMORTIGINTO."

Petas ulo, kiel traduki la anglajn "regicide" kaj "royal murderer"?

La unuan per "regmortiginto" (komparu: bestmortigist—slaughterman) aŭ "reĝon-mortiginto" (kp.: ĉionsciado, Sentencoj 3/20) aŭ "mortiginto (murdinto) de reĝo; la duan per "mortiginta reĝo," "mortigulo reĝo." Ankaŭ oni povus skribi laŭ zamenhofa ekzemplo "reĝo-mortiginto," "reĝo-mortigulo." Se la reĝa persono ne estas reĝo, oni povus uzi "reĝfamilia mortiginto" aŭ "reĝrasa m." aŭ "reĝido-m." La formo "reĝa mortiginto" estas unuavide iom dubesenca, sed laŭgramatike ĝi devas signifi "regal" aŭ "royal" mortiginto, tio estas, "reĝo, kiu iun mortigis." Tio ĉi estas averto kontraŭ senpripensa kunmetado de adjektivoj kaj substantivoj, ĉar "regmortiginto" ne egalas "reĝa mortiginto." (Vidu tezon pri la substantiva ĉefelemanto verkitan de Kalocsay, "Lingvo Stilo Formo," p. 12/15).

JOAB ELIOT, avo, Konstancia civitano, naskiĝis anglohinde, sukcesis fine alveni Konstancion antaŭmorte, ĝojos de ĉe tiu "Preternacio" korespondi kun aliregnanoj. Poŝtadresu laŭ 2 Cambridge St., WILLOUGHBY, N.S.W. (Aŭstralio).

MIAJ IMPRESOJ PRI AŬSTRALIO.

(De L. Hiob, Millicent, Suda Aŭstralio)

Kelkajn jarojn antaŭ ol mi alveturis ĉi-tien mi aŭdis multon pri Aŭstralio. Samlandanoj, kiuj alveturis ĉi-tien, skribis hejmen pri siaj impresoj kaj spertoj. Ili pentris preskaŭ ĉion rozkoloro ĉar kondiĉoj tiam estis bonaj. Ne estas mirinde, ke mi eksopiris vojaĝi al la bona lando. Kaj fine mia deziro efektiviĝis.

La unuaj ĝeneralaj impresoj estis tre bonaj. Grandaj urboj, kie la ŝipo haltis, ŝajnis belaj kaj puraj kaj la popolo prospera. Aŭtomobiloj ĉie en granda nombro. Mia vojaĝfino estis Melburno, kie mi pasis du semajnojn. La urbego tre plaĉis al mi. Sed pli multe plaĉis al mi Melburnaj samideanoj. Mi estis kortuŝita pri amikeco kaj bonveno inter ili.

Trovinte laboron en kamparo mi povis observi la naturon en Aŭstralio. Al ĝenerala aspekto de la lando kaj naturo mi alkitimiĝis nur post du jaroj. Unue ĉio ŝajnis fremda kaj iom prema. Okulo vane serĉis ĝis nun kutimajn abundajn riveretojn kaj lagojn, pinojn, kverkojn, betulojn, kaj aliajn arbojn kaj kreskaĵojn. Okulo nur trafas eŭkaliptojn kaj aliajn indiĝenajn arbojn kaj kreskaĵojn. Lagoj kaj riveroj estas ĉi-tie maloftaj kompare kun mia hejmlando. Plantaĵoj de pinoj nur memorigis min pri pinarboj de hejmlando. Bientero ankaŭ estas malsimila al Estonio. Unue: bienoj

ĉi-tie estas pli grandaj, kaj due: ili estas specialigitaj. Unu kreskigas tritikon ĉefe; alia avenon kaj hordeon ktp. Malofte oni vidas pli ol tri malsimilajn rikoltaĵojn. Iuj havas nur herbejojn por ŝafoj kaj brutaro. En mia hejmlando bienulo havas proksimume 100 akreojn da lando meze, sed kreskigas almenaŭ ses rikoltaĵojn, — herbejoj aparte. Estonia farmlando ŝajnas konsisti el multaj diverskoloraj flikaĵoj; dum ĉi-tie en tritiklando vi povas vidi milojn da akreoj de tritiko. La plej granda kampo kiun mi vidis estis de 5000 akreoj.

Dum malbonaj tempoj aŭ sezonoj Estonia bienulo havas sufiĉon por siaj bezonoj, ĉar se unu aŭ du specoj de rikoltaĵo malsukcesas, li ankoraŭ havas kelkajn aliajn kiuj ne malsukcesis. Ĉi-tie farmistoj vendas sian tritikon aŭ lanon kaj devas ĉion alian aĉeti. Mi vidis multe bienojn ĉi-tie, kiuj ne posedis aŭ legom-ĝardenon aŭ bovinon por lakto kaj butero aŭ fruktoarbojn. Ĉion oni devis aĉeti. En Estonio mi ne aŭdis, ke bienulo aĉetis panon, viandon aŭ legomojn kaj fruktojn por uzo sur bieno. Ili aĉetas nur sian maŝinaron kaj lastatempe ankaŭ vestojn, sed antaŭ dudek jaroj ili ŝpinis lanon kaj fiŝon kaj faris ŝtofon por sia vestaro. Komprenoble aĵojn kiel sukero, tabako ktp, kion oni ne povas produkti sur bieno, oni devas aĉeti ankaŭ. Pro tio ke oni uzas maŝinaron ĉi-tie pli multe, oni povas plenumi laboron sur farm-bieno uzante malmultajn laboristojn ol en mia hejmlando, kie oni uzas ankoraŭ falĉilon kaj alian manlaboron. Oni

ne povas uzi maŝinaron tie tiom kion ĉi-tie pro malsimilaj klimataj kondiĉoj kaj ĉar landpecoj estas malgrandaj. Sed ili havas draŝilon komune.

Manĝo ĉi-tie estas pli bone preparata ol en mia lando, sed mi opinias, ke ĝi ne estas pli nutra. Ŝafviando kaj teo por mateno, tago, kaj vespermanĝo ĉi-tie estas ordinara afero. Oni diras, ke Aŭstralianoj estas la plej grandaj tetrinkuloj en la mondo, sed mi opinias, ke rusoj superas en tiu ĉi fako. Mirigas min kia Aŭstralianoj ne trinkas pli da lakto. En Estonia bieno speciale, ĝi estas ĉefa trinkaĵo. Ĝi ja estas bonega kaj tre nutra trinko! Konfitaĵojn kaj marmeladojn oni manĝas ĉi-tie grandkvante kaj eble tio estas la kaŭzo de granda nombro da falsaj dentoj.

Rimarkindaj ĉi-tie estas senfinaj ferfadenbariloj kaj pensigas novalveninton pri la grandega kvanto de laboro, materialo, kaj mono elspezita. En mia lando vi ne vidas ferfadenbarilojn. Ne estas tre multe barilojn tie—ĉefe ĉirkaŭ legomĝardenoj kaj fruktarbejoj. Terpeco de unu bienulo estas apartigita de tiu de najbaro per fosaĵo aŭ markoj de termezuristo. Oni tie ne bezonas barilojn tiel multe ĉar knabo aŭ knabino gardas ŝafojn kaj bovinojn; kaj tie ne estas kunikloj—tiu malbeno por aŭstralia bienulo kaj beno por kaptisto (kiam unu funto da peltoj valoras kvar ŝilingojn). Mi ankaŭ benis ilin kiam mi ricevis unu ŝilingon por unu pelto kaj malbenis post kiam ili invadis mian legomĝardenon kaj tial igis min starigi retbarilon (fundo da peltoj kostis tiam nur 6p.).



VIA LASTA ŜANCO!!!

BECOME A MEMBER OF THE ASOCIO DE
ESPERANTISTAJ LIBRO-AMIKOJ (AELA).

Six recently published or to be published books in
master-style Esperanto at a fourth of the published prices.

Write for FREE prospectus, obtainable from—

THE MANAGER, "SUDA KRUCO,"

P.O., BOX 731F, MELBOURNE.

Interesa kaj iom amuza estis unue vidi kian laboron viroj faras ĉi-tie. Ekzemple: melkado. Tio estas ĉefe virina laboro en Estonio. Mi ne antaŭe vidis viron melkanta. Ree, helpado kun lavado de pladoj kaj potoj, eĉ lavado de tolaĵoj kaj. Mi estis ekstreme surprizita kiam mi vidis edzon-bienulon, kie mi laboris, lavanta, kaj kiam li vidis miajn grandajn okulojn, diris—"Ĝi estas tro malfacila laboro por edzino." Mia miro estis komprenebla, ĉar mi vidis nenion similan antaŭe. Hejmlande en kamparo virino laboras tiel forte kiel viro, kaj ne pensas tion eksterordinara. Ŝi uzas falĉilon, rastilon same kiel viro, konstruas fojnostakon ktp. kaj ne plendas, ke viro ne helpas lavi kaj sekigi la telerojn kaj potojn.

Pro pli bonaj ekonomiaj kaj klimataj kondiĉoj oni ne laboras tiel forte, kiel en Estonio, kaj tial al mi ŝajnis unue ke Aŭstralianoj ne estas bonaj laboristoj. Poste mi trovis, ke ili estas bonaj je peclaboro, sed je taglaboro—speciale Ĉtata laboro—ili pensas pli longigi laboron "prenante aferojn facile." Mi vidis tion laborante du vintrojn en ŝtata pinarbaro. Mi konsideras tion kiel ĉefa kaŭzo, ke oni ne povas ekspluati la arbarojn profite. Peclaboro, mi opinias, estas la plej justa kie ajn tio estas ebla, ĉar tiam ĉiu estas pagita laŭ siaj meritoj. Estas malfacile imagi kiom da ŝafoj oni tondus dum labortago se la laboro estus pagata potage. Mi pensas, ke neniu penus tondi pli ol 100, kvankam tondisto povus fari pli ol 200 ŝafojn dum labortago. Parolante pri ŝaftondado mi devas noti, ke tio ankaŭ estas virina laboro en mia hejmlando. Feliĉe por virinoj tie ne estas multe da lanuloj kaj ĉiu tondas nur proprajn siajn.

Generale mi trovas Aŭstralianajn bonkoraj kaj helpemaj. Kaj ĉi tio pruviĝas, ĉar miloj survoje marŝantaj senlaboruloj ne malsatas. Kiam ofendita, Aŭstraliano estas facile preta por pugnobatalo, kiun mi konsideras ne tro bona frajto, ĉar ofte ofendito estas tiu kiu ricevas punbatadon. Sed estas bone, ke post batalado ili manpremas kaj ĉajne forgesas la aferon. En mia lando oni ne batalas tiel facile, sed kiam oni komencas ĝin la afero estas pli serioza,—oni ne estas kontenta kun pugnoj nur, sed io, botelo aŭ ia alia objekto taŭgas por la batalantoj kaj oni ne forgesas tion tiel facile. Aŭstralianoj ŝajnas forgesi pli facile mala-

grablajn aferojn kaj estas pli optimistaj ol miaj samlandanoj. Ŝajnas ke ili estas iom tro senĝenaj kaj la estonteco ne zorgigas ilin tiom kiom miajn samlandanojn. Mi konas multajn bienulojn ĉi-tie kiuj estas en ŝuldoj ĝis kolo, sed notante ilian vivon laŭ ekstero, oni povas opinii, ke ili estas tre prosperaj.

Grava makulo ĉi-tie estas troa uzado de slango, sed al tio oni baldaŭ alkitimigigas. Ankaŭ vetadon je ĉevaloj oni ne povas nomi virto, kaj mi opinias, ke oni elspezas tiom je vetado kiom je drinkado.

Fine mi povas diri, ke Aŭstralio havas pli bonajn kondiĉojn kaj ŝancojn por bona vivo kaj prosperiĝo ol mia hejmlando, kaj mi ne bedaŭras, ke mi alveturis ĉi-tien—kvankam mi trafis malbonajn kondiĉojn.

Bedaŭras mi nur, ke mi komencas forgesi Esperanton pro manko de praktiko, kaj tio estas malbona.

EDZIGMOROJ IDEALAJ.

La sopiro de civilizitino.

Antaŭ ne longe venis en mian manon libro kiu traktis pri la edzigmoroj de iu indigena raso, mi ne scias kiu aŭ kie, ĉar mi tiel interesigis pri la moroj, ke mi tute forgesis rimarki la landon kie oni praktikis ilin. Ŝajne en ĉi tiu lando la virinoj elektas la edzon, faras la amindumadon, ĉasas la kompatindulon en la arbaron, kaj, rifuzante aŭdi nean respondon, fine kaptas lin kaj triumfe lin forportas. Mi povas aŭdi cinikan viran voĉon dirantan ke ĉitio ne multe malsimilas la metodon de la civilizitaj fraŭlinoj: sed la diferenco vere estas granda. En tiu ideala lando, kiam junulino ekvidas sian sorton, ŝi sendas al lia fratino donacon (rimarku, mi petas, la subtilon de tiu movo: ĉu ne estis franca filozofo kiu diris, ke se vi volas ion el la societo, amikigu la virinojn?). Tiam, kiam la donaco estas akceptita, ŝi eksendas al la junulo nutraĵon kuiritan de sia propra mano. Sed la junulo, kun laŭdinda zorgo, ne manĝas ĝin: ŝajne, kiam li vidas la unuan pladon, li forkuras en la arbaron kaj rifuzas esti estirita: kaj la familio formanĝas la nutraĵon. La junulino ree sendas: ree la familio ĝin manĝas. Mi ne scias, ĉar la libro ne diras, kio okazas se la fraŭlino estas malbona kuiristino: ĉu la familio ofertas sin sur la altaro de devo ĝis sia tuta digesto estas ruinigita preter ripareblo? aŭ ĉu ili donas la manĝaĵon publike kaj ceremonie al la urb-almozuloj kiel suges-

teton ke la amantino transdonu sian amon al iu havanta pli fortan stomakon? Mi ne povas diri: sed se la kuirado estas bona, ŝajne la familio manĝadas dum tiom da tempo kiom la amfrenza fraŭlino konsentas ilin nutri; pasedirante, oni povas vidi ke familio kiu enhavas kelkajn filojn povas vivi preskaŭ senkoste, dum fakte multaj filinoj malriĉigis eĉ la plej gravan kokosmagnaton; sed ĉio trovas sian finon: baldaŭ la pacienco de la junulino maldikiĝas, kaj la familio malgaje komprenas ke la senpagaj manĝaĵoj certe ĉesos se ŝi ne ricevos respondon.

Do ili iras al la arbaro, kaptas la junulon vole-nevole, kaj la edziĝo soleniĝas, ĉu laŭ lia konsento aŭ ne, la libro ne klarigas. Sed ia legado donis al mi kelkajn ideojn: Mi estas sufiĉe bona kuiristino: ĉu elekti unu el miaj konatoj kaj sendi al li ekzemplerojn de mia lerteco? Certe ne estas arbaro en kiu li povas sin kaŝi: sed aliflanke, kian garantion mi havas ke li, formanĝinte ĉion, konsentus edziĝi kun mi? Ne! Post pripensado mi preferas ŝpari mian monon kaj laboron, kaj fidi al mia natura ĉarmo.

—E.G.

(Ĉu ne vere, ke ankaŭ la blankulaj amdelirantaj inoj foje donacas al la celata sinjoreto frandaĵojn, eĉ vestojn, por ke li pli dezireme direktu al ŝi la rigardojn? Red.)

LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO (daŭrigata).

De tempo al tempo la virino formetas sian laboron kaj rigardas, kaj aŭskultas, kaj pensadas. Ŝi pensas pri aferoj en sia propra vivo, ĉar estas tre malmulto por pripensi.

La pluvo kreskigas la herbon, kaj ĉi-tio memorigas ŝin pri la tempo kiam ŝi batalis kontraŭ arbarfajrego, kiam ŝia edzo estis for. La herbo estis longa, tre seka, kaj la fajro minacis la domon. Ŝi surmetis malnovan pantalonon de sia edzo, kaj elbatis la flamojn per verda branĉo, ĝis grandaj gutoj de fulga ŝvito elstaris sur ŝia frunto, kaj malsuprenkuris en strioj sur ŝiaj nigriĝintaj brakoj. Vidi lian patrinon en pantalone trege amuzis Tommy, kiu laboris kiel malgranda heroo ĉe ŝia flanko, sed la terurita infaneto kriegis forte por ŝia "panjo." La fajro estus venkinta ŝin, se kvar ekscititaj kamparanoj ne alvenus surĉevalo ĝustatempe. Estis granda miksaĵo: kiam ŝi iris por levi la infaneton, li kriegis

POR LA KOMENCULOJ.

LA TRI MALLABOREMULOJ.

Iu reĝo havis tri filojn, kiujn li amis egale bone; tiel ke li ne povis decidi, kiu el ili sekvos lin kiel reĝo, kiam li estos mortinta. Kiam alvenis la tempo ke li mortu, li alvokis ilin al sia lito, kaj diris, "Miaj karaj infanoj, fine mi estas elpensinta projekton, kiun mi efektigos. Jen ĝi estas. Kiu ajn el vi povos pruvi al mi, ke li estas la plej mallaborema el la tri, estos la reĝo post mi."

Tiam diris la plej aĝa filo: "Patro, la regno jam estas la mia. Mia estas tiel mallaborema, ke kiam mi kuŝiĝas por ripozi, eĉ se io falus en miajn okulojn, mi ne fermus ilin, kvankam farante tion mi ekdormus."

La dua diris: "Patro, la regno apartenas al mi, ĉar mi estas tiel mallaborema, ke kiam mi sidas apud la fajro por varmigi min, pli vole mi lasus brulvundi al mi la kalkanojn ol ĝenus min retirante ilin de la fajro."

Sed la tria diris, "Patro, la regno jam estas la mia, ĉar eĉ se mi estus pendigota, kaj havus la ŝnuron ĉirkaŭ la kolo, kaj iu donus al mi akran tranĉilon kaj dirus al mi ke mi tratranĉu ĝin, mi plivolus esti pendigita ol levi la manon ĝis la kolo!"

Kiam la patro aŭdis tion ĉi, li diris, "Vi estas la plej mallaborema, mia filo, kaj tial la regno apartenas al vi!"

THE THREE LAZYBONES.

A certain king had three sons whom he loved equally well, so that he could not make up his mind which of them should succeed him as king when he was dead. When the time came for him to die, he called them to his bedside and said, "My dear children, I have at last thought of a plan which I will carry out. It is this. Whichever of you can prove to me that he is the laziest of the three, shall be king after me."

Then said the eldest son: "Father, the kingdom is mine. I am so lazy that when I lie down to rest, even if something were to fall into my eyes, I would not shut them, though in doing so I might go to sleep."

The second said: "Father, the kingdom belongs to me, for I am so lazy that when I sit beside the fire to warm myself, I would rather burn my heels than take the trouble to draw back my legs."

But the third said, "Father, the kingdom is mine, for even if I were about to be hanged, and someone gave me a sharp knife and told me that I might cut it through, I would sooner be hanged than raise my hand to my neck."

When the father heard this, he said, "You have gone the farthest, my son, and therefore the kingdom belongs to you!"

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masterton Esperanto Club — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President, Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Workop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer,

Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunveno: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Mardo vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18a horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Coburg Esperanto-Grupo—Kunvenas ĉiujauĉe je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

kaj baraktis konvulsie, pensante ke ŝi estas "nigrulino," kaj Aligatoro, fidante pli al la prudento de la infano ol al sia propra instinkto, atakis ŝin furioze, kaj (estante maljuna kaj iom surda) en sia ekscito, ne en la komenco rekonis la voĉon de sia mastrino, sed tenegadis la fustenan pantalonon ĝis Tommy forpelis ĝin per selrimeno. La sinriproĉo de la hundo pro sia eraro, kaj ĝia zorgo sciigi al ĉiuj ke estas granda eraro, estis tiel evidenta kiel ĝia ĉifona vosto kaj dekdu-cola rideto povis montri. Estis glora tempo por la knaboj; tago rememorinda, pripensinda, kaj priridinda dum multaj jaroj.


Ŝi pensas pri la maniero laŭ kiu ŝi batalis kontraŭ superakvego, dum forestis ŝia edzo. Ŝi staris dum horoj en la torenta pluvego, kaj fosis deturnigan defluilon por savi la digon trans la rivereto. Sed ŝi ne povis savi ĝin. Estas aferoj kiujn kamparvirino ne povas fari. La proksiman matenon la digo estis rompita, kaj ŝia koro preskaŭ rompiĝis ankaŭ, ĉar ŝi pensis pri la sentadoj de sia edzo, kiam li revenos hejmen kaj vidos la rezultaton de laboraj jaroj forbalaita. Ŝi ploris tiam. (Daŭrigota.)

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

Next number scheduled for May 5.

Wholly set up and printed in Australia by the Triumph Press, Surrey Hills, Victoria.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralia: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralia: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 151 (13th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

5 MAJO, 1933.

ON BEING MOVED TO TEARS.

It was at one time the fashion among learned men, even when Esperanto had been working successfully for many years, to say that an "artificial" language was impossible. In the course of time, however, it filtered through to our readers of knowledge and information, that there was an "artificial" language in which, it appeared, people could understand one another. So the cry of impossibility was dropped; which shows how enlightened and broadminded our pundits are. They will not fly in the facts of facts; only, they will not take the trouble of ascertaining the facts before pontificating upon them.

The latest cry is that although Esperanto may be very useful for travel, commerce and similar pursuits, it can never express fine shades of meaning or have any pretensions to literary power. This point of view was expressed by Mr. Wickham Steed in his presidential address to the Modern Language Association (we quote from "The Times"):

Some generous souls looked forward to the happy times when the nuisance of learning foreign languages would be overcome by the adoption of a universal tongue, such as Esperanto. . . . The aspirations of these idealists moved him to tears. For ordinary purposes of travel, or the exchange of elementary ideas, an artificial language might have its uses, and these uses were doubtless not to be despised. Yet for the subtler purposes of the interchange of thought, the representation of the finer shades of meaning, the whole art of linguistic and literary inter-

course, he doubted whether any artificial language could ever take the place of living media of expression.

There are two errors in this, one of which is excusable and one of which is not. The excusable error is the supposition that the advocates of the international language are so naive as to think that any language, good, bad or indifferent, could ever replace the existing national languages. Had they been such simpletons, Esperanto would not now hold its present strong position.

But it is excusable in a non-Esperantist to doubt whether the language can express shades of thought sufficiently well for literary purposes. Obviously one cannot tell without making some study of the language. What, on this head, is inexcusable is that a public man, such as Mr. Steed, an editor of "The Times" and the "Review of Reviews," should so lightly make a pronouncement on the subject, without trying to discover whether the facts fit his theory. If only he had spent two or three hours examining the grammar and structure of Esperanto, or even questioned an Esperantist for half an hour, he would have come to a very different conclusion. But apparently an ounce of theory is worth a ton of practice, and it does not matter whether one's premises are sound.

We regret that the ideals of the "generous souls" should induce such painful emotion in Mr. Steed; for our part, when we consider the curiously unscholarly attitude of some learned men, we have thoughts that "lie too deep for tears."

("International Language," London, Feb., 1930.)

ADVERTISING DRIVE BY BRITISH ESPERANTO ASSOC.

Probably most of our members know that Cadbury Bros. Ltd. make wrapped bars of milk and plain chocolate which retail at one penny each. These packets contain attractive picture stamps, which are inserted by collectors in albums, provided free by the firm, in exchange for 12 wrappers from these penny bars. Early in February a new series of stamps will be issued, and the albums for this new series contain the following announcement at the head of the first page.

Of Special Interest.

Esperanto is the International Language. There has been such a rapid growth in its popularity as a study, that we decided to increase the interest and value of this album by giving the names of the subjects illustrated in both English and Esperanto. You will find these names printed beneath the spaces reserved for the stamps.

More and more people in all countries are coming to recognise the important contribution Esperanto would make to a general understanding between the peoples of the world.

We understand from Cadbury's that about 200,000 of these albums will be issued; and they will, of course, go all over the country. Further, we understand that in their advertisements announcing these new albums, Cadbury Bros. intend to make a feature of the addition of Esperanto. Our readers should themselves obtain these albums, and afterwards congratulate Cadbury Bros. on their initiative.

W. H. Smith & Son, Ltd., have

agreed to stock and display Esperanto textbooks in their shops (but not necessarily the bookstalls, at present).

Negotiations are still in progress in other directions, and we hope to announce further successes shortly.

The advertising campaign will start at the end of January, with large-space advertisements in Truth, John o' London's Weekly, World Radio, The Teacher's World, Pitman's Journal, The Church of England Newspaper, Wide World Magazine, Blackwood's Magazine, Red Tape, Headway, The Travel Log, and The Countryman. This list will be extended, and other insertions appear, as funds permit. ("British Esp-ist," Feb., 1933.)

TURKMENISTAN.

Lekcio de S-ino E. L. Osmond,
London, antaŭ la Dimanĉa Rondo.

Mi intencis paroli nur pri Turkmenistan, sed mi trovis, ke la informo tiel ofte prituŝas la du aliajn respublikojn de la antaŭa Turkeŝtan, ke mi devas ankaŭ paroli pri Uzbekistan kaj Tadjikistan. Kune ili ampleksas Germanujon, Grandan Britujon, Francujon kaj Hispanujon, kaj estas ĉefe terkultura lando.

En 1863, pro la civila milito en Usono, Rusujo ne povis ricevi sian kutiman provizon de koton, do, ĝi interesis pri Turkeŝtan, kie koton kreskis, sed ĉar la popolo rifuzis submetiĝi al Rusujo, dum 22 jaroj okazis daŭra militado kaj buĉado. Fine la indiĝenoj estis venkitaj, kaj iliaj lingvoj malpermesataj. Koloniistoj venis el Rusujo, kaj nur iliaj infanoj ricevis edukadon.

Post la Japan-Rusa milito en 1905-6 multaj Rusaj soldatoj estis senditaj al Turkeŝtan, sed ili ribelis pro malbonaj vivkondiĉoj, kaj komenciĝis malpaco, kiu daŭris kaj kreskis ĝis 1916, kiam la kamplaboristoj rifuzis soldatigi en la granda milito kaj ribelis. Oni subpremis ilin, sed post la Februara Revolucio en 1917. urbanoj, fervojistoj, kaj Rusaj koloniistoj ankaŭ ribelis kaj batalis kontraŭ la Basmaci (banditoj) subtenataj de Blankrusuloj* kaj Anglujo. La kamplaboristoj ne multe interesiĝis; ili laboris longajn horojn por malmulte da mono, ne povis legi aŭ skribi kaj vivis mizere, tamen la ribeluloj komencis doni al ili landon, sed ne sufiĉe por vivi sen pagata laboro. La superaj pastroj kontraŭis la disdonadon de lando, sed la malsuperaj pastroj subtenis la dividon. Aŭdante la disputojn inter la pastroj la kamparanoj rifuzis kredi ambaŭ, kaj malfidis tiun religion, kies pastroj trompis ilin. En Oktobro 1924 Turkmenistan kaj Uzbekistan iĝis sendependaj respublikoj, kaj aliĝis al U.S.S.R. Tadjikistan respublikigis en 1925, sed, pro malbona interna stato, ĝi aliĝis al Uzbekistan por helpo kaj instruado. Tamen, en Decembro, 1929, ĝi tiel progresis, ke ĝi ankaŭ aliĝis al U.S.S.R., estante la sepa respubliko en tiu unuigo. Kiam la sovjetoj dividis kampojn, brutaron, kaj terkulturojn

inter la kamparanoj ilia ĝojo estis grandega.

En 1928 nur 4½ el cent de la Turkmenoj povis legi kaj skribi; en Uzbekistan iom plu. Nuntempe 33 el cent sub la aĝo de 40 povas legi kaj skribi—post nur tri jaroj de edukado.

Ne nur estas lernejoj por infanoj sed ankaŭ por plenaĝuloj, vesperkursoj por laboristoj kaj somerlernejoj, ĉiuj senpage; oni eĉ ricevas stipendion, librojn kaj ilojn por studo se necese. La enkonduko de latina anstataŭ araba alfabeto multe faciligis la lernadon. Ĝi estas uzata en ĉiu lernejo, por libroj, por ĵurnaloj, reklamoj, kaj registaro. Aliaj gentoj, ekz. la Karakalpakoj kaj Kirgizoj, kiuj ĝis tiam ne havis alfabeton, ankaŭ entuziasme akceptis ĝin. Oni povas legi librojn en institutoj, kooperativaj bibliotekoj, kluboj kaj tetrinkejoj, kie junuloj aŭ virinoj ofte laŭvoĉe legas al tiuj, kiuj ĝis nun ne kapablas. En urboj troviĝas bone ekipitaj "Domoj por kamparanoj," kie tiuj, kiuj vizitas la urbon por libertempo aŭ negoco povas ripozi.

Grava turkmena literaturo jam estas eldonita en la nacia lingvo. Oni starigis Instituton por turkmena kulturo, muziksciencon kun orkestroj kaj ĥoroj. Ili verkas dramojn por la nacia teatro. La unua dramo temis pri la kaptado de Kizil Armat per la ruĝa armeo, kaj ĝia aŭtoro estis turkmena laboristo. Oni starigis lernejojn por teatra studo, kie oni jam produktis dramojn. Ili ankaŭ studas pentro- kaj skulptarton.

Antaŭ la Revolucio la kino estis tute nekonata, nun en ĉiu urbo estas tia, kaj vojaĝantaj kinoj iras al la diversaj vilaĝoj. Kutime la filmoj temas pri la vivo kaj historio de la popolo, sed ili ankaŭ havas sciencajn kaj propagandajn filmojn. La ĉefa renkontloko en urbo kaj vilaĝo estas la tetrinkejoj, kiuj, senescepte, havas radiaparaton.

Estas amuze al ni, kiel ili uzas la publikan radiaparaton. Antaŭ la revolucio virinoj devis ĉiam porti dikan vualon el ĉevalharo eĉ en la domo. Unue edzoj kaj fratoj batis kaj eĉ mortigis siajn virinojn, kiuj kuraĝis eliri senuale. La registaro ne deziris batali kontraŭ tiu ĉi kutimo, sed ĝi decidis starigi silkfabrikejojn kaj ne permesi, ke vualitaj virinoj laboru en ili, pro la danĝero de vualo inter la maŝinaro. Pro tio laboristinoj formetis vualojn en la fabrikejoj, sed ili estis preskaŭ heroinoj se ili kuraĝis formeti ĝin surstrate aŭ hejme. Unu virino, kiu tion faris, estis kruele batita de sia edzo. Do, ŝi skribis al la urba sendestacio, plendante pri sia edzo kaj petante, ke oni dissendu tiun informon kun lia nomo kaj la nomo de la vilaĝo, por ke la najbaroj en la klubo aŭdu, kaj li hontos pro sia malprogresemo. Tion oni faris kun plena sukceso.

La ĉefa industrio de Turkmenistan estas kotonoplantado, sed ĝi estas malfacila pro manko de akvo; la registaro intencas akvumi ĝin per rivero Amu Darya. Sub la cara regimo, oni malpermesis fabrikadon, sed jam post nur 8 jaroj ili posedas kotonmuelejon.

silkfabrikejojn, elektrejon kaj maŝinaron por produkto de oleo kaj salo. Per scienca esploro ili trovis subtere sulfatojn, kiuj provizos materialon por grava kemia industrio, karbon, feron kaj kupron.

Antaŭ 1929 multaj kamparanoj neniam vidis vagonaron. Kiam la unua alvenis, la mirigitaj homoj opiniis, ke ĝi estas dia kaj ili alportis girlandojn, fruktojn kaj viandon; ili simile faris, kiam ili vidis la unuan aeroplanon, kaj aŭtobuson. Tiuj kreis grandegan entuziasmon. Subite ili transiris de kamelo al aŭtobuso, vagonaro kaj aeroplano. En kelkaj vilaĝoj en la montoj ili eĉ ne konis radveturilon. Kiam oni komencis konstrui fervojon al Stalinabad, la trajtoj estis trenataj sur kameloj kaj ili perdis de ½ ĝis metro de sia longo pro la dektaga frotado sur la malglata vojo inter Termes kaj Stalinabad (250 kilometroj).

Aeroplanoj en Eŭropo eble duonigas la vojaĝdaŭron, sed en Mezzazio ili ofte dekonigas ĝin. Ekzemple, de Tashkent ĝis Kabul oni bezonas 3 semajnojn por iri sur ĉevalo inter montoj, kie banditoj vagadas, nun oni povas flugi sendanĝere en 2 tagoj.

Per radio oni ricevas novaĵojn, kiuj antaŭe bezonis semajnojn por alveni per ĵurnaloj. Ankaŭ ili nun scias la precizan horon per ĝi, ĉar antaŭe horloĝoj, kiuj bone funkciis, estis maloftaj en vilaĝoj. Kiam vilaĝanoj deziras informon pri iu temo, ili sendas petojn al la ĉefstacio, Ashabad en Turkmenistan. Samarkand en Uzbekistan aŭ Stalinabad en Tadjikistan.

Lenin diris, ke ŝtato ne povas progresi se ĝiaj virinoj estas subigitaj. En la cara regimo, virino estis samranga kiel bovo. Ŝi devis labori por sia mastro kaj naski infanojn. Oni vendis kaj aĉetis ŝin kiel marĉandaĵon. Antaŭ edziniĝo ŝi apartenis al la patro, poste al la edzo, kaj ŝi havis absolute neniajn rajtojn. Post starigo de sovjeta respubliko, viroj kaj virinoj egaliĝis ĉiurilate, kun samaj rajtoj kaj devoj. Ŝi povas partopreni la politikan kaj ekonomian vivon de la stato, sed tiu ŝanĝo, sufiĉe facila en Rusujo, estis treege malfacila en Mezzazio. Nur per eduko povas la afero alĝustigi.

Sendube la popoloj aprobas la novan regimon.

Turkmenoj, Uzbekoj, kaj Tadjikoj kune batalis flankon ĉe flanko kun rusaj laboristoj kaj kamparanoj. Eble ili ne tute komprenas la signifon de komunismo, sed la nova regimo signifas por ili liberecon de virinoj, rajtojn de organizo por kamparaj kaj vilaĝaj laboristoj, forigon de la pastra tiraneco. Efektive, kiam oni legas kiel mirinde ili progresis dum la 8 jaroj de sendependa vivo, oni pensas pri la biblia frazo: "Popolo, kiu iris en mallumo, ekvidis grandan lumon; super homoj sidantaj en lando de morta ombro ekbrilis lumo."

(De informo provizita de Turkmena korespondanto.)

*Blankrusuloj, t.e., Kontraŭbolŝevikaj fuĝintoj ed Rusujo (Red.).

RECENZ(ET)OJ.

PARNASA GVIDLIBRO, Kiel fariĝi poeto: de K. Kalocsay kaj G. Waringhien; eld. de "Literatura Mondo," Budapeŝto; pĝ. 175, bindita unu dolaro, nebind. 0.70., plus 10 p.c. afranko.

La verko enhavas:—

1. Rimarkinda antaŭparolo de Waringhien plendanta pliigi le Esp. radik-provizon.
2. Fundamentaj konoj pri la versarto, de Waringhien. La plej pozitiva parto de la libro.
3. La Arto Poetika. Versoj brilante spritaj, en kiujn Kalocsay enspiras sian kredon pri la Esp. poezio.
4. Esperanta Rimaro; ĉiuj radikoj de la Plena Vortaro rime aranĝitaj kaj ankoraŭ 500 novaj.
5. Poezia Fakvortaro. En kiu tiu 500 ricevas difinojn.

En la historio de Esperanto Waringhien kaj Kalocsay reliefigas kiel interpretantoj de skolo akcentanta dezirindecon pliriĝi kaj plielastigi la lingvon cele ke ĝi estu ĉiam pli kaj pli taŭga por servi al la beleco kaj subtileco de la poeta penso. Kalocsay, se ne ankaŭ Waringhien, estas influata de tiu antaŭmilita giganto Anton Grabowski, kies nomo, flankdire, elstaras en la reformdiskutoj de la frua tempo. Lia ĉefverko, "Sinjoro Tadeo," laŭ la vortoj de Kalocsay "ĝerme enhavas eble ĉion, kion oni povas elserĉi el la lingvo." Per plikreskigado de tiuj "ĝermoj" ĉi tiu skolo volas pli intense akceli la evoluon de Esp-o laŭ linioj opiniataj de ĝi nepre necesaj por poezia esprimado.

K. kaj W. kaj iliaj kulpensantoj, ekzemple, asertas ke al la "mal"-vortoj mankas "elvokiveco," tio estas, la povo tuj ekestigi en la menso la konforman imagobildon. Laŭ W. la linio de Grabowski: "La tago malvarma, malgaja, sensuna," donas impreson pli de sunplena somertago ol la mala. Kaj K. rimfaras:

Eĉ, estas mia sento malgraŭvola

Ke la "malmola" molas pli ol "mola." Nu, laŭ la teorio tio devus esti vera, sed pro konstanta uzado kaj do pensociado milmiloj da adeptoj ne povas samopinii. Sur ĉi tiu demando Privat, en sia "Esprimo de la Sentoj en Esperanto," okupas kontraŭan pozicion. Permesinde estas kredi ke lia prezo de la argumentaĵo estas vaste favorata. Ĉu vere ekzistas absoluta malmoleco de vortsono? Ĉu ne povas vorto tiel-nomate malmola por anglo aŭ hispano ofte soni mola por ruso aŭ turko? Por itala orelo la germana lingvo estas tre gorĝsona, hake guturala. Ĉu ni ne rajtas penseti ke troveblas popoloj por kies oreloj ĝi relative sonus dolĉa kiel ĉirpado de birdoj? Ni sugestas ke K. kaj W. estas supermezure obsedataj de eŭropaj lingvoj; ne unu linio en ilia verkaĵo pritraktas aŭ agnoskas la pretendojn de azilingvanoj, ĉe kiuj Esp-o laŭraporte konstante pligraviĝas.

La demando, almenaŭ por laiko, estas ĉi tiu komprenebla, kaj tre komplika, eĉ se oni sin limigas nur je la ĉefaj

eŭropaj idiomoj. Sed ankaŭ orientlingvaj esperantologoj devus paroli en ĉi tiu diskuto; ilia partopreno kredeble kaŭzus modifojn de certaj teorioj de niaj du Mentoroj, aŭ elpenson de novaj.

Ne estas eble al ni iomlonge kritiki pli ol unu flankon de ĉi tiu ekstreme interesa libro, kiu, laŭ la opinio de kelkaj studentaj la evoluon de nia lingvo, povas grave influi sur la direktiĝadon de Esp-o. Per ĝi du sinceraj kaj kleraj laborantoj donas al ni verkon en kiu kvazaŭ kristaliĝis tendenco jam longe ekzercanta la pensadon de multaj kapoj en la movado. Ĝia formala prezento inter la kovriloj de la recenzato sendube helpas almenaŭ al pli klara kompreno de la demando, se ne al plena konsento al la donitaj gvidlinioj.

Pri la Poezia Fakvortaro nur direble estas ke multaj el la proponitaj vortoj estas strange elektitaj kaj malkontentige difinitaj. (Morbidita, kun signifo de la itala "morbidezza"); baĉeloro, en senco de "junulo"). Mi ne scias kia mensa aberacio atakis tiun, kiu pensis dece enmeti en "poezian" vortliston terminojn pli kompreneblajn sur la lipoj de bordelano. (Robo.)

Pangca, la sole ebla eliro el la mondkrizo.—23-paga tezeto de Rudolf Herceg, eld. Heroldo de Esp-o. Prezo 0.30 ormarko. Trakto de unu el la plej gravaj demandoj de la moderna mondo—la malharmonio inter la produktado kaj la konsumado. Ĉiu sentanta intereson pri la ekonomia diskutado nepre havigu al si ĉi tiun pensinstigan kontribuon al la solvo de enigmo, kiu toridas la cerbojn eĉ de la plej kompetentaj en ilia fako.

KRONIKO.

Wellington, Nov-Zelando.—Post propagando per reklamoj tagjurnalaj la ĉambro de la loka klubo estis preskaŭ homplena je la 7a de Februaro por la komenca vespero de 1933. Prezidis s-ro Bertram Potts, F.B.E.A., antaŭ almenaŭ 40 personoj. S-ro Potts bonvenigis novulojn kaj klarigis la laborplanon de la klubo. La klubdelegitino al la 4a N.Z. Kongreso, f-ino C. Smythson, raportis pri kongresagado, kaj post informoj kaj elmonro de transmara korespondaĵo la spertuloj gvidis klasojn organizitajn el la komenculoj, kelkaj el kiuj poste klubaniĝis. Same kiel en la pasinta jaro, la klubo kunvenos ĉiumarde, kaj provizos honon da instruoj kaj honon da Esperanto-programo (paroloj, deklamoj, komedioj, k.s.). La dua kunveno de la jaro, je la 14a sammonate, estis ankaŭ sukcesplena; kelkaj membriĝis. Kredeble forta bazo fondiĝas por la 5a N.Z. kongreso je la jarfino! Je la tria kunveno, s-ro H. F. Franks, Masterton Klubsekretario, kaj s-ino Stidolph, nin favoris per vizito.

Masterton, N.Z.—Ĉiujara kunveno kluba okazis la 15an de Februaro. S-ro A. Dewar, D.B.E.A., prezidis antaŭ bela nombro de membroj. Oni enoficiĝis la jenajn: Honora Prezidanto, s-ro

G. R. Sykes, M.P.; Prez., s-ro A. Dewar, D.B.E.A.; Vic-prez., s-ro A. D. Sheppard kaj J. B. Johns; Hon. Sekr., Kasisto, kaj Del. al NZEA, s-ro H. F. Franks, D.B.E.A.; Ĉefinstruisto, s-ro A. Dewar; Klasestroj, s-ino McNab, f-ino Ibbetson, s-roj A. H. M. Dewar kaj H. F. Franks; Ĝenerala Agkomitato, s-roj A. Dewar, L. Rutherford, kaj H. F. Franks. La ĉiujara raporto kaj bilanco estis akceptitaj. Kvin novaj membroj estis proponitaj. La duan kunvenon de la jaro ĉeestis 24 personoj. Freŝdate eldonita broŝuro-informilo de lokaj stratoj, civitaj organizoj, institucioj kaj societoj, k.s., provizas detalojn ankaŭ pri la Esperanto-Klubo.

At the annual general meeting of the Y.M.C.A., Masterton, the board of directors accepted with pleasure the honor of being patrons to the Masterton Esperanto Club. Since the club's inception the directorate has granted to it use of the social room and accessories gratis.

Coburg Esperanto Club, Melburno.

En perfekta vetero la klubanoj ekskursis ĉe The Lake. Invitiloj senditaj al ĉiuj aliaj kluboj alvenigis bone reprezentecan anonon de iliaj membroj. Vespere la piknikanoj ĝuis plezuratan tempon ĉe la domo de s-ino E. S. Hanks. S-roj C. Saaren kaj Belmont per koncerta ĉirto kaj violono ludis la dancmuzikon. Ankaŭ estis kuna kantado kaj porĉambraj ludoj. Helpe al komencantoj, kartetoj estis fiksitaj al ĉiu objekto en la ĉambro, inkluzive la manĝilojn kaj manĝaĵojn. La 13 aprilo la sek-uo prezentis la duonjarian raporton, kiu atestis kontentigan daŭrigadon de klublaboro. Ĉeestis 33 anoj. Estis decidite okazigi festvesperon en la domo de s-ro E. Williams, en Anketell-str. la 10 majo, kun celo pliigi la klubkazon por propagando plua. Unuanime membroj decidis formi branĉon de la Aŭstralia Labora Esperanto-Asocio el individuaj membroj, interne de la klubo, prefere ol kolektive filiigi al ĝi.

PUBLIC MEETING ON ESPERANTO.

On Wednesday, April 5, a public meeting and concert was held at the Australian Church Hall. The speakers were Mr. Gilbert Wallace, of the Victorian Education Dept., and the editor of Educational Publications, who explained the structure of Esperanto. Mr. Rawson dealt with Esperanto and Practical Use, and Mr. Drummond sketched the life of the founder of Esperanto and the origin of the language. A short address in Esperanto by Mdme. Ninedek, a Polish lady unable to speak English, was rendered into this language by Mr. L. Thomson, then a play, given both in Esperanto and in English, brought to a conclusion a well-attended gathering.

EL HINDA PLUMO.

KIO ESTAS SAĜO?

Rakonto el la hinda folkloro, de Lakshmiswar Sinha. Vidu La S.K., Junio, 1930.

Li estis fama profesoro en filozofio. Li loĝis en antaŭurbo de la granda kaj antikva urbo Pataliputra, kies moderna nomo estas Patna. Li vivis trankvile en sia domo kaj estis tre okupata per verkado de filozofia libro kaj sia laboro. Ĉiuj rigardis lin kiel tre saĝan homon. Ofte li veturis en la urbon por fari paroladon pri sia filozofio.

Dum tiu tempo ne ekzistis fer- aŭ tramvojoj. La homoj uzis plej multe siajn piedojn, ankaŭ oni tre ofte veturis per boato, se estis rivero proksime. La fama rivero Gango pasas tra la urbo Patna. La hejmo de la profesoro estis sur la alia flanko de Gango sufiĉe malproksime de la urbo. Li havis unu malgrandan boaton kaj ankaŭ boatiston.

Unutage li foriris per sia boato en la urbo por fari prelegon. Kiam li finis sian prelegon, li iris rekte en sian boaton por vojaĝi hejmen. Estis posttagmeze. La boatisto ekpuŝis la boaton kaj remis hejmen. Subite la profesoro demandis al li: "Ho boatisto, ĉu vi konas ion pri filozofio?"

"Jes, sinjoro, mi aŭdis la vorton sed mi ne scias, kia objekto estas filozofio."

"Ah, tiaokaze unu kvarono de via vivo estas vana. Ĉu vi konas ion pri logiko?"

"Ne, sinjoro, sed mi scias, ke logiko estas nur por logikistoj."

"Ah, do unu duono de via vivo estas vana."

Nun li ree demandis al la boatisto: "Ĉu vi konas ion pri la astronomio?"

"Ne, sinjoro, tute ne."

"Oh, kiel malriĉa vi estas en la mondo. Tri kvaronoj de via vivo estas por nenio. Estas granda domaĝo."

La profesoro mediteme rigardis la ĉielon pensante pri la malriĉeco de tiu homo pri la manko de scio. "Vere tiuj homoj vivas en granda mallumo de la mondo," murmuris la profesoro por si mem.

La boatisto nur ĝemegis, sed ne parolis plu.

Por kelkaj minutoj la profesoro kaj la boatisto ambaŭ silentis. La boatisto remis la boaton kiel ordinare.

Subite la ĉielo mallumiĝis per dikaj nuboj. Ankaŭ forta ventego venis. Tondro ludis grandege en la ĉielo. La akvo de la rivero forte moviĝis. La ondoj jetiĝis sur la boaton. La profesoro timiĝis. La boatisto demandis al li: "Ĉu vi povas naĝi, sinjoro?"

La profesoro respondis timeme: "Ne, ne, boatisto—tute ne. Kion mi faru?"

La boatisto diris: "Tiam via tuta vivo eble estas tute vana. Kiel mi povus savi vin de tiu tre danĝera torento?"

"Ho, boatisto, kion mi faru nun?" kriis la profesoro pro timo.

Subite unu tre forta ondo surpasis la boaton kaj subprenis ĝin kun la profesoro en nekonatan lokon sub la granda rivero. La boatisto saltis el la boato kaj sukcesis savi sin.

Kiu scias? Kio estas saĝo?

RADIO COLUMN.

Speakers are requested to send in, by 1st June at latest, particulars of any broadcasts arranged.

Esperanto lessons will be broadcast from 3LO at 7.45 p.m. on the dates mentioned below. An anecdote will be read at the end of each lesson to enable students to check their pronunciation.

May 13th.—Juĝisto: Ĉu vi opinias ke la akuzato estas mallaborema?

Atestanto: Mallaborema? Nu, mi ne dirus pri li, ke li estas mallaborema; sed, se estus necese, ke li laboru por digesti sian nutraĵon, li mortus pro malsato.

May 27th.—Knabeto; Panjo! ĉu la oreloj apartenas al la kolo aŭ al la vizaĝo?

Patrino: Kial vi demandas?

Knabeto: Ĉar vi ordonis al Mario, ke ŝi lavu mian vizaĝon, kaj ŝi lavis ankaŭ la orelojn.

June 10th.—Dormema kuracisto vizitis pacienton.

Li metis la kapon ĉe la brusto de sia paciento kaj diris, "Elparolu la numeralojn."

La paciento komencis: unu, du, tri, k.t.p.—

Kiam la kuracisto vekigis, li aŭdis: tricent dudek unu—tricent dudek du.

POLISH STATIONS FAVOR ESPERANTO.

The Feb. nr. of "Pola E-tisto" reports very satisfactory progress of Esperanto with the Polish radio stations. The February lecture of Prof. Bujwid was broadcast in Esperanto by all Polish stations except that in Katowice, which is now to be the subject of intense petition from those wishful of bringing Esperanto and Radio into reciprocal service. Prof. Bujwid at the recent Esperanto congress at Lublin cited the utterance of one station manager: "No lecture, in any other language, brought forth so strong an echo from all lands as those in Esperanto did." A letter of thanks to the station was received even from Australia!

JACK LONDON AND ESPERANTO.

"You can study French, or you can study German, or you can cut them both out and study Esperanto; you will get the culture tone just the same. You can study Greek or Latin, too, for the same purpose, although it will never be of any use to you. It will be culture though."

("Martin Eden.")

ATENTU SINJORINOJ!

Estas nenio pli komika ol la insistado de la moderna virino pri egaleco kaj amikeco kun la viroj, kaj ŝia indigno pri ĝi, kiam oni proponas ĝin, anstataŭ la kavalireco.

(Wm. McFee en "La Havenestro.")

Estas beleco en kuranta ĉevalo, kaj beleco en fluanto rivereto; sed neniam beleco similas al la beleco de juna virino, kaj ŝi liberigante la hararon.

(Donn Byrne en "Messer Marco Polo.")

Ĉu Ni Devas Forigi la Amon?

La tria internacia eŭgenika kongreso antaŭnelonge kunvenis en Novjorko.

La eŭgenikistoj kredas je scienca pariĝo. Sekve multaj homoj demandis ilin: Kion vi faros kun la amo? Ĉu vi celas forigi ĝin?

La respondanto estis, ke homo edukita eŭgenike emas enamiĝi nur en eŭgenike bona persono, ĉar tia estus lia idealo. Do ne ŝajnas necese, de eŭgenika vidpunkto, forigi la amon.

Ĉu Determino de Infansekso Estas Ebla?

D-ro Jacob Sanders el Rotterdam havas novan teorion pri determino de la sekso de naskotoj. Li studis tiun problemon ĉe homoj kaj faris eksperimentojn kun bestoj, kaj li trovis, ke la acideco de la sango de la patrino determinas la sekson de naskota infano. Se la acida procento en la sango estas alta, oni devas atendi knabinon; kaj inverse, se la sango estas pli alkala, verŝajne la naskoto estos knabo.

D-ro Sanders diras, ke la acideco postulata por naski inojn povas esti arte produktata per enkonduko en la korpon de lakta acido. En la sama maniero oni povas produkti alkalecon de la sango kaj naskigi knabon per enkonduko de malgranda kvanto da natria karbonato.

(El "Scienca Gazeto," Usono.)

[Prof-o W. Agar, melburna sciencisto, ĵus diris, ke, post multjara eksperimento - studo, biologoj povas definitive aserti, ke la sekso de la homo estas fiksita jam en la momento de koncevo (radiko en la Medicina Vortaro de d-ro Briquet), kaj ke nenio post tiu momento povas influi sur ĝian sekson. Ekzistas multaj teorioj pri seksdetermino, sed ili estas ĉiuj eraraj kun la escepto de la supre donita, kies vereco estas plenplene pruvita.]

Malamikoj de la Cimoj.

Blatoj, skolopendroj, kaj ruĝaj formikoj estas nepacigeblaj malamikoj de cimoj, diras al ni Majoro E. E. Austen de la Brita Muzeo en Londono. Bedaŭre neniu el la tri insektoj estas ŝatata de homoj.

Prezeraro: P. 46, kol. 3, linio 25. "barilojn" (legu: bariloj). P. 47, kol. 1, linio 27, "Ĉtata" (legu: Ŝtata).

SERIOZE KAJ SERCE.

Muzika festo okazis en kampara urbo. Junulino konkursis, kaj ŝia patrino demandis al ŝi, kiel si progresis. "Tre bone," diris la knabino, "sed la juĝanto ŝajnis tre pia viro." "Kial vi tiel pensas?" "Ĉar dum la tuta tempo, ke mi ludis, li tenis la manojn sur la okuloj, kaj diris "Ho, mia Dio, mia Dio!"

FORTO DE KUTIMO.

Viadisto alkondukis sian fileton al kuracisto. Post zorga esploro ĉi tiu konsilas al li: "Volu uzi jen tiun kuracilon, kaj pesu lin ĉiusemajne du fojojn."

"Sed kiel pesi? Ĉu kun ostoj aŭ sen ostoj?"

DISKUTETO.

Inter-renkontis en alia mondo estinta usona prezidinto Vilson kaj Moseo. Ekkonversaciis ili:

"Oni transdonis al mi," sarkasme diris Moseo, "sciigon, ke de ciam 14 paragrafoj pri memstareco de la popoloj restas jam nur "kornetoj kaj piedetoj."

"Sed se ci atentus, kion homoj faris el ciam dek Di-ordonoj!", respondis Vilson.

MIRINDA TRINKAJO.

Kio estas en cia botelo?

Tio estas tia trinkaĵo, ke post kies trinko homoj devas diri veron!

Ekglutinte iomete, la demandinto kun ekhaltinta spiro apenaŭ povis eldiri: Ja tio estas vinagro.

Ja ci tion vere diris,—seke respondis la kamarado.

LAŬVOLA ELEKTO.

Ĉu cia paĉjo permesis al vi mem elekti edzon?

Jes.

Do, kiel vi sukcesis elekti tian flegan viron?

Paĉjo diris:—Aŭ tiu, aŭ neni—kaj jen mi tiun elektis.

Ho Panjo, diru, ĉu fruktaj?

Sur vojo kuŝas jam?

Silentu, kara, estas paĉj';

Mortigis li per tram!

Longdistanca Fotografado.

Per longfokusa lenso kaj infraruĝradia filtrilo britaj fotografistoj ĉe Dover sukcesis fotografi scenojn sur la franca marbordo nevideblajn al la fotografistoj. Elimino de infraruĝaj radioj

kaŭzas, ke objekto je distanco de diversaj kilometroj ŝajnas esti tre proksima, kaj ebligas fotografadon de objektoj kiuj estas preter la videbleca distanco por homa okulo.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Mrs. Tondut, 4/6, June, '33; Mrs. Laws, 4/6, Jan., '34; Mr. P. Holmes, 2/6, Jan., '33; Mrs. Mumford, 6/-, Aug., '33; Miss Pope, 4/6, Feb., '34; Mr. Byatt (sales), 8/-; Brisbane Esperanto Society (sales) 12/-; Mr. C. Kidd, 10/-, Sept., '33; Mr. Hutton, 5/-, July, '34; Mr. N. G. Mills, 4/6, Aug., '33; Melbourne Esperanto Club (subs.), £1/5/-; Dr. F. J. Williams (adv.), 10/-; Coburg Esperanto Group (sales), 8/8; Mr. W. Gray (overseas sub.), Oct., '33; Mr. H. Franks, 5/-, Jan., '34; Mr. A. Dewar, 5/-, March, '34; Masterton Esperanto Club (adv.), 5/-, April, '33; Miss Pollock, 5/-, July, '33; Mr. Roberts, 5/-, Nov., '33; Mr. W. McPherson, 10/-, June, '35; Mr. Facer, 5/-, May, '34; Miss V. de Novak, 5/-; April, '34; Mr. F. A. W. Thomas, 4/6, Jan., '34.

DU VOĈOJ.

"Por havi bonan stilon, nepre estas necese koni minimume tri diversajn lingvojn, al si malparencajn. Kial ekzemple ni havis inter la slavoj tiom da bonaj stilistoj? Ĉar ili ĉiuj scias minimume tri lingvojn." (Kabe, en Literatura Mondo, Julio-Augusto, 1931, intervjuita de Jean Forge.)

"Mi, unulingvulo, ekamis Esperanton, uzis ĝin skribe kaj buŝe. Ĝi fariĝis mia dua lingvo, kiun mi parolas preskaŭ tiel bone kiel mian patran. Dum la lastaj 15 jaroj mi uzas ĝin ĉiutage parolante pri diversaj temoj en plej diversaj medioj aŭ legante verkojn eldonitajn en tiu ĉi lingvo." (Lingva Kritiko, Marto, 1933.) Tiel atestas Julio Baghy, hungaro, unu el la ĉefaj Esperantaj proz- kaj poezimajstroj, aŭtoro de "Viktimoj," eble la plej populara romano en nia lingvo, kaj kelkaj aliaj.

Multaj ne konsentas kun Kabe. Vere, scio de kelkaj lingvoj povas helpi leganton de nia literaturo kompreni fremdajn idiotismojn, kiujn enlasas en siajn skribojn niaj verkistoj—eĉ la poliglota. Sed Esperanto estas (almenaŭ principe) pura je naciaj idiotismoj, do rekta, logika pensprimilo. Pro tio, ne estas necese, ke homo, celante fariĝi bona verkisto en nia lingvo, sciu naci-lingvon krom la sia; sed li devas esti

pacienca kulturanto de internacia stilo, kaj zorga evitanto de tiuj formoj karakterizaj nur por tiu aŭ tiu lingvo.

Atentinda estas ankaŭ tio, ke scio de kelkaj lingvoj povas eĉ plintensigi la danĝeron uzadi idiotismojn, per tio ke ĝi larĝigas la kampon de eblaj eraroj; monogloto bezonas gardi nur kontraŭ tiuj de sia propra lingvo. Interese estus scii, kiuj el niaj bone konataj verkistoj estas homoj sciantaj nur la patran.

LINGVA DISKUTEJO.

Pri p. 30, kol. 1 (S.K. 148) s-ro M. C. Butler skribas: "Ie en mia traduko de 'La Fundamentoj de la Kvakerismo' mi uzis la frazeron, 'la vojo suprena.' Sed mi ne pretendas esti—mi ne estas—unuaranga aŭtoro." Ĝerente la verkon mi ne trovis la cititan formon, sed trafis sur p. 11 "malproksimena"; kaj sur paĝoj 61 kaj 73 "la hejmena vojo." Ni tre dankas al nia helpema kaj modesta kolego. Rimarku "la ĉieleniĝa mirindaĵo de la Katedralo" sur p. 1 de Heroldo de Esp-o, 12 marto, 1933.

A Pot. Se "ŝafbiĉ(eg)o" ne kontentigas por traduki la aŭstralian "sheep station," eble prove uzinda estus "estancio." Evitenda estas "ŝafstacio," provincialismo.

La vorto "filo" por "phial" tute ne necesas. Uzu "boteleto." Jam tro da senutila balasto forme de neologismoj portas en si nia presita lingvo.

"Apologio" signifas ne "apology" en senco de simpla pardonpeto, sed "parola aŭ skriba defendo kaj pravigo de io aŭ, iu, solene farita."

"Farm'" estas verba radiko, kaj havas specialan signifon, lupreni laŭ kontrakto por difinita tempo. "Farmo"—farma prenado. Ne konfuzu kun "bien(ter)o."

SIDNEO, SIDNEJO.

La ĵus eldonita "Taschenwörterbuch" (poŝvortaro) de "Heroldo de Esp-o" donas "Sidneo" por "Sydney." Rhodes donas "Melburno" sed ne la ĉefurbon de Nov-Sud-Kimrujo. Fulcher and Long donas "Sidnejo." Laŭ nia nuna kono Zamenhof ne uzis la nomon en siaj skriboj. Kion Aŭstralianoj opinias pri la demandeto?

KORGRATULON

al s-ro A. C. Ward, Wimbledon, H.B., Nov-Zelando, pro lia sukceso kun honoro je la B.E.A. supera ekzameno—post mallonga konateco kun la movado, sed ŝajne post diligenta kaj konscienca studo.

JAPANESE NATIONAL PARTY CHIEF FOR ESPERANTO.

On 4 Jan. the Tokio Central Radio Station JOAK broadcast a speech by Mr. Hidejro Nagata, Mayor of Tokio, on the subject, "The Situation occupied by the Japanese People in the Field of International Relations." Japanese Esperantists were agreeably surprised to hear the Mayor energetically recommend Esperanto as the sole international language.

This action on the part of Mr. Nagata is specially striking owing to the facts that (1) He is not an Esperantist; (2) He is a leader of the Kenkokukai, a patriotic party having great influence with the Right wing in Japanese politics; (3) JOAK, the station that broadcast the speech, is unfavorable to Esperanto.

Further, Mr. Jukio Ozaki, an ex-minister and a statesman of note in Japan, now living in London, has written for the Jan. nr. of "Kaizo" (Reform), one of the most weighty socio-political gazettes, an article in which he deals with certain present-day problems affecting the Japanese, and strongly stresses the desirability of Japanese doing their best to forward the adoption of Esperanto.

SPANISH MINISTRY OF EDUCATION AGAIN SUPPORTS ESPERANTO.

The Spanish Ministry of Public Education has again granted the Spanish Esperanto Assoc. a subvention of 5,000 pesetas for the teaching of Esperanto. The association has decided to open courses for teachers in Madrid and three other towns and to give eleven prizes. Each prize will consist of 400 pesetas and a free ticket to the Universal Esperanto Congress at Koln, in order that eleven teachers may visit this international gathering and there draw up a report on their experiences for official presentation to the Ministry on their return.

Senor J. Rosenorn is conducting a course of 30 teachers at the Athena de Madrid, an institution exercising much influence on the cultural life of Spain.

ESPERANTO IN ITALY.

On 13 Sept., 1932, the Italian Ministry of Public Instruction informed the Italian Esperantist Federation that non-compulsory courses of Esperanto are always permitted in the schools of Italy.

(The three pars. translated from "Heroldo de Esperanto," Koln.)

OOMOTO INTERNACIA

aperas nun sur 32 grandformataj paĝoj. Konstantaj kolonoj pri Japanujo, Vojaĝoj, Literaturo, Filozofio. Senpartiaj, detalaj recenzoj, belaj ilustraĵoj!

Ne prokrastu sed petu tuj senpagan specimemon al la Eldonejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

LI REVENAS TEREN.

"Mi," diris Hugo, "ne estas kontenta pri la fraŭlinoj ĉi tie troveblaj."

Tra arbaro de Cirrhòs promenis Hugo kaj Paŭlo, kaj iomete malantaŭ ili ankaŭ Henjo, la fratino de Paŭlo. Hugo ekrigardis la lentugan vizaĝon de Henjo.

"Ne," li diris al Paŭlo, "mi ne estas kontenta pri la fraŭlinoj ĉi tie troveblaj. Janette, mi bone scias, estas inteligenta, kaj tiu trajto ja estas malofta en iu ina; tamen ŝiaj kruroj tro similas la bastonojn per kiuj sorĉistinoj vizitas la strangajn spacojn de la aero."

Sovaĝete li svingis sian glavon, kaj, ĉar la arbobrandon estis malaltaj, frapetis lin multaj dolĉodoraj folioj, kiuj falas teren.

"Chlorinde," daŭrigis Hugo, "estas tre bela." Lia voĉo mallaŭtiĝis kaj li ridetis iomete. "Ŝiaj okuloj estas mistere profundaj, kiel la ombroj sub tiuj arboj; ŝia spiro svenige dolĉa, kiel somernoktaj ventetoj; kaj, kiel nigra nokto super odora ĝardeno, ŝia hararo vuale kaŝas la blankan brilon de ŝiaj ŝultroj. Tusi ŝian manon..."

"Mi vidis ŝin," diris Paŭlo, kaj ek-sopirĝemis

"Tamen," diris Hugo, "ŝi estas stulta, kaj mi ne povas toleri stultan virinon—almenaŭ frumatene. Vespere, kiam ronda luno lumetigas, stulteco ne gravas. Sed loĝado kun virino kiu ne povas dece estimi mian evidentan klerecon,—tiu ne logas min."

"Sendube vi pravas," murmuris Paŭlo.

Kiel oraj ŝnuretoj, la multaj sunradioj kuŝe kuplis la herboriĉan grundon kaj la verdan foliaron de la dense kreskantaj arboj. Hugo kaj Paŭlo estis tre junaj—ili ankoraŭ ne lernis trinki el la amara pokalo de kompromiso. Ne estis eble al ili kredi, ke io povas esti neatingebla por junulo kun sufiĉe fervora deziro. Ili ankoraŭ ne sciis, kiel sence forbrulas eĉ la plej altkora ardeco. En la mensoj de la junaj, ŝajnas ĉio esti ebla; en la koroj iliaj mensogkantas belvoĉa espero. Kia morto, la malrapida morto de l' eterna espero! Kia revo dolĉa dum ankoraŭ ĝi flame vivas!

"Do," diris Hugo, "mi vojaĝos tra la landoj de la mondo por trovi tiun virinon belan kiel la vintraj steloj, saĝan kiel la maljunaj saĝaj viroj de la montoj, kaj kies koro estas kompleza kaj homama."

Ĉar Hugo estis aventura kaj multe sopiris tiun romanon perfektulinon pri kiu li multvorte multfoje parolis, li ja post iam forrajdis el Cirrhòs kaj grandioze vojaĝis en la landojn de la mondo. Tra Nenedek li vojaĝis, tra Renmar kaj Osirim al tiu lando kie loĝis Evane Iljane, kiu tiel dolĉe kantis, ke eĉ ŝi igis la najtingalojn flugi malsupren el la ĉieloj kaj sidi silente en la apudaj arboj. Evane Iljane, tamen, povis priparoli nenion escepte de la kantado.

Ankaŭ en tiu ĉi lando loĝis sorĉisto famkonata tra la tuta mondo. Al li iris Hugo kun taŭgaj donacoj.

"Maljunulo," diris Hugo, "mi serĉas virinon belan kiel la vivo, kaj saĝan kiel tiuj fratinoj, kiuj teksas niajn destinojn."

La sorĉisto rigardis Hugon strange, mokete. Li diris: "Mj konas tian virinon."

"Do," diris Hugo, "konduku min al ŝi."

"Tio ne estas tute facila," diris la sorĉisto, "Unue vi devas iĝi senmorta, ĉar tiu virino ankaŭ posedas senmortecon; due vi devas porti la rozkolorajn okulvitrojn de Jupitero, kiu nun estas morta kaj ne plu bezonas ilin; trie vi devas trapasi en la spegulon, kiun vi tie vidas," kaj li manmontris polkovoritan spegulon duonkaŝitan per araneaĵoj.

"Mi deziras tuj fari ĉi tiujn aferojn," diris Hugo.

"Do," diris la sorĉisto, kaj klarigis al Hugo tion, kion necesas fari por iĝi senmorta.

Ĉu tiu ja estas necesa?" hezite demandis Hugo.

Ĝi ja estas," respondis la sorĉisto.

Kaj Hugo faris tion, kio necesas.

Poste li iris al la spegulo, kiun ŝajne la sorĉisto rapide poluris dum Hugo surmetis la okulvitrojn.

"Antaŭ vi venos," diris la sorĉisto, "prenu ĉi tiun. Se vi iam dezirus iĝi denove mortala kaj reveni al via propra mondo, trinku tion, kion vi trovas en tiu boteto."

En la spegulo povis Hugo vidi fabele belan junulon, kiu pli kaj pli alproksimiĝis ĝis ŝajnis al Hugo kvazaŭ ili kolizius, kaj li tial haltis. Haltis ankaŭ la belulo.

"Bonan tagon," diris Hugo.

Sed la junulo nenion diris;—kvankam ŝajnis al Hugo, ke liaj lipoj movis. Denove Hugo paŝis al li elingigante sian glavon. Ankaŭ la alia svingis

glavon eĉ pli riĉe ornamitan ol la glavon de Hugo.

"Zorgu!" kriis Hugo, kaj svingis al la fremdulo la glavon. Li kuregis ale; sed tuj la bela junulo malaperis kaj Hugo staris sole en nekonata ĝardeno. En tiu ĉi ĝardeno staris ankaŭ virino pli bela ol iu, kiun Hugo iam imagis.

"Ĉu vi estas tiu Hugo," ŝi diris, "kiu serĉas virinon perfektan?"

Hugo respondis: "Jes."

"Mi do estas tia virino," ŝi diris, ridetante. "Venu kun mi."

Kaj Hugo iris kun ŝi.

La virino ja estis bela kaj inteligenta kaj afabla; kaj dum iam estis Hugo tre feliĉa. Ĉiam, kiam Hugo revenis hejmen de la rajdado, atendis lin Ojneh, kaj ĉiam ŝi estis bela kaj inteligenta kaj afabla.

Tamen post iam Hugo rimarkis en najbara ĝardeno belan blondan junulinon, kiu ŝajnis amikema.

"Bonan tagon," li diris ĝentile.

"Bonan tagon," ŝi respondis kun rideto.

Pli malfrue li diris al Ojneh: "Necesas, mia kara, ke mi vizitu la apudan urbon por intervjui homon pri hundo."

"O jes," respondis ŝi.

Sed tiun momenton la rozkoloraj okulvitroj falis de la nazo de Hugo kaj tute rompiĝis. Antaŭ li staris ulino, kiu strange similas al Henjo.

"Kiu vi estas?" demandis Hugo.

"Mi estas Ojneh," ŝi respondis, "sed ankaŭ mi estas Henjo."

"Tiu estas stranga afero," diris Hugo, kaj estis momente silenta.

"Nu," li diris, "se vi vere estas Henjo, estos pli bone, ke mi denove iĝos mortala."

Kaj li glutis la trinkaĵon, kiun donis al li la sorĉisto.

Estis krespuko en Cirrhòs. Antaŭ fajro sidis Hugo kaj lia bofrato, Paŭlo. Henjo kaj la infanoj enlitiĝis.

"Mi," diris Hugo, "ne estas kontenta pri la fraŭlinoj ĉi tie troveblaj."

"Nj havu trinkon," diris Paŭlo.

— "KINO."

MALNOVAJ JARKOLEKTOJ DE "LA SUDA KRUCO"!

Haveblaj estas tiuj de 1920 ĝis 1932, je kosto de du ŝilingoj por ĉiu. Turnu vin al nia adreso!

LA OAZO.

Malrapide kaj penegre vojaĝis areto da viroj kaj kameloj inter la sablomontetoj de la dezerto. Jam du tagojn ili ne trinkis, kion atestis iliaj nigraj lipoj kaj ŝvelintaj langoj. Eĉ la kameloj, kutimaj je la dezerto, ŝajnis falontaj pro ellaceco kaj soifo. Renkontis la okulojn la sama senŝanĝa vidaĵo, sur kiun ili nun jam rigardis multajn tagojn—ĉie ŝtonoj kaj sablo, en amasoj kaj en ebenaj etendaĵoj: tie, ĉi tie malde likataj arbustoj, pro senakveco malgrandaj kaj malfortaj: super la kapo kuprokolora ĉielo, el kiu senkompate brilis varmega aŭstralia suno, kaj sur kiu ne estis eĉ unu nuboj por ĝojigi la dolorantajn okulojn de viroj kaj bestoj.

La estro, penegre marŝante flanke de kamelo, fermis al si la okulojn, kaj aperis en la menso la loko, kie lastfoje li pasigis sian libertempon—blua maro, lazura ĉielo, verda herbo, densfoliaj arboj, belaj floroj, kaj ĉie dolĉa malvarmeto. Li pensis al la naĝado, al la mevoj rondflugantaj en la aero super maro kaj rokoj—ĉio nun neatingebla, kiel sonĝo. Sopirante li ree levis la kapon kaj rigardis per senbrilaj okuloj antaŭen.

Subite la sablomontetoj ŝajnis maldensiĝi, la dezerto pliebeniĝis. Malantaŭ li raŭke kriis viro, kaj postenrigardante li vidis du siajn kamaradojn helpantaj kompatindan mizerulon grimpi sur dorson de kamelo preskaŭ samtiel malforta. Ombrante per la mano sian vizaĝon li ekvidis en malproksima ion verdan—kaj inter la verdaĵo ion, kio ekbrilis. Espero plenigis la koron de la estro, kaj tiam dubo. Ĉu estas plua vidiluzio? Kun pulsanta brusto li levis sian lornon kaj klare vidis—la oazon! Ili estis savitaj!

—A. TOWSEY.

LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO.

(daŭrigata)

Ŝi ankaŭ baraktis kontraŭ la pleŭropneŭmonio, donis al la malmultaj restantaj brutoj medikamentojn, kaj ploris denove, kiam ŝiaj du plej valoraj bovinoj mortis.

Alifoje, ŝi batalis kontraŭ freneza bovo, kiu sieĝis la domon dum unu tago. Ŝi fabrikis kuglojn kaj pafis ilin tra fendetoj en la murplatoj per malnova pafilo. En la mateno ĝi estis morta. Ŝi senfeligis ĝin kaj ricevis sep ŝilingojn kaj ses pencojn por la felo.*

Ŝi ankaŭ batalas kontraŭ la korvoj kaj agloj, kiuj volas kapti ŝiajn kokiadojn. Ŝia metodo estas tre originala. La infanoj krias "Korvoj, panjo!" kaj ŝi kuregas el la domo kaj direktas al la birdoj tenilon de balailo, kaj diras "Bang!" La korvoj rapidas for; ili estas ruzaj, sed la ruzeco de virino estas pli granda.

Foje, alkohole ekdrogita kamparulo, aŭ friponaspekta vagisto venas, kaj preskaŭ timigas ŝin ĝis morto. Ŝi kutime diras al la suspektinda nekonato, ke ŝia edzo kaj du filoj laboras apud la digo, aŭ ĉe la bovinkorto, ĉar li senescepte ruze demandas pri la estro. En la pasinta semajno vagisto, aspektante pendiginda, certiginte sin, ke ne estas viro sur la bieno, ĵetis sian pakadon sur la verandon kaj postulegis manĝaĵon. Ŝi donis ion al li; tiam li esprimis sian intencon resti dum la nokto. Estis tiam la sunsubira horo. Ŝi havigis al si bastonon, liberigis la hundon, kaj kontraŭstaris la fremdulon, tenante la bastonon per unu mano kaj la kolumon de la hundo per la alia. "Foriru vi!", ŝi ordonis. Li rigardis ŝin, tiam la hundon, kaj diris—"Certe, sinjorino," en servema voĉo, kaj foriris. Ŝi aspektis esti decidema virino, kaj ankaŭ la flavaj okuloj de Aligato fikse kaj malafable rigardis ŝin, kaj la dentoj de Aligato tre similis al tiuj de sia samnomulo.

Ŝi havas malmultajn plezurojn por pripensi dum ŝi sidas tie ĉi, sola, por gardi kontraŭ serpento. Ĉiuj tagoj estas similaj por ŝi: sed dimanĉe posttagmeze ŝi kvazaŭ feste vestas sin, ordigas la infanojn, beligetis la infaneton, kaj faras promenadon tra la sovaĝejo. Ŝi faras la samon ĉiudimance. Ŝi prizorgas ĉi tiujn preparojn al si kaj la infanoj, ĝuste kvazaŭ ŝi farus promenadon sur pavimon de granda urbego. Tamen, estas nenio vidinda kaj neniu renkontebla. Oni povas promeni dudek mejlojn laŭ ĉi tiu vojo, kaj ne vidi iun ajn punkton rememoreblan por iu alia ol sperta kamparulo, pro tio, ke la scenejo prezentas senfinan, frenezigan samecon el duonkreskaj etarboj—tiun monotonon kiu igas homon volegi trafi la proksiman vagonaron kaj veturi for, ĝuste tiel foren kiel eble, kaj tiam forveli tiel malproksimen kiel ŝipoj povus naĝi—kaj eĉ pluen

Sed tiu ĉi kampar-virino kutimiĝis al la soleco de la loko. Kiel juna edzino, ŝi malamegis ĝin, sed nun ŝi sentus sin strange for de ĝi. Ŝi ĝojas kiam la edzo revenas, sed ŝi ne ekscitiĝas pri tio. Ŝi pretigas por li bonajn manĝaĵojn, kaj ordigas la infanojn. Ŝi ŝajnas esti kontenta pri sia sorto. Ŝi amas siajn infanojn, sed ne havas la tempon ĝin elmontri. Ŝi ŝaj-

POR LA KOMENCULOJ

La Plej Grava Estajo en la Mondo.

En hinduja vilaĝo loĝis tre bela knabino, kaj ŝiaj gepatroj, kiuj apartenis al la Musahar kasto, estis tiel fieraj, ke ili decidis, ke ŝi devos ne edziniĝi kun viro de sia propra kasto, sed ke edzo devos esti elektita el la plej altenaskitaj.

Post iom da diskutado ili konkludis, ke neniu pli alta ekzistis ol Ĉando la Sundio, do ili iris al li kaj diris: "O Ĉando, vi estas la plej alta kreaĵo en la mondo, kaj ni intencas doni al vi nian filinon kiel edzinon."

Ĉando respondis: "Mi estas certa, ke ekzistas iu pli alta ol mi."

"Kiu estas?" demandis la gepatroj.

"Nu, la Nubo estas pli alta ol mi, ĉar li povas kaŝi mian vizaĝon kaj min nuligi."

La gepatroj tuj forrapidis al la Nubo, kaj, kiam ili lin trovis, diris al li, ke ili venas por edziniĝi sian filinon al li, ĉar li estas pli alta ol ĉiu ajn en la mondo.

"Ho ne," respondis la Nubo, "la Vento estas pli alta ol mi, ĉar li povas forblovi min post kelkaj minutoj."

La gepatroj tiam forrapidis al la Vento.

"Mi estas forta," diris la Vento, "sed la Monto estas pli alta ol mi, ĉar mi ne povas forblovi la Monton."

Tiam ili foriris al la Monto diris, "La Rato estas pli alta ol mi, ĉar li tuneligas en min, kaj mi ne povas rezisti lin."

Ili iris al la Rato respondis, "Estas vere, ke mi estas alta, sed ne tiel alta kiel la Musahar, ĉar la Musahar povas elkapti min el la rokoj kaj min mortigi."

Tiam la gepatroj hejmeniris kun sia filino, pripensante, ke ili finis kie ili komencis kaj ke, malgraŭ ĉio, estus pli bone ne fieriĝi, sed edziniĝi sian filinon al unu el sia propra kasto.

The Greatest Being in the World.

In a Hindu village there was a very beautiful girl, and her parents, who belonged to the Musahar caste, were so proud that they decided she must not marry a man of her own caste, but that a husband must be chosen from among the very greatest.

After some discussion they came to the conclusion that no one greater than Chando the Sungod existed, and so they went off to him and said: "O Chando, you are the greatest being in the world, and we are going to give our daughter to you for a wife."

Chando replied: "I am sure there is someone greater than I."

"Who is it?" asked the parents.

"Why, the Cloud is greater than I, for he can hide my face and blot me out."

The father and mother thereupon hurried off to the Cloud, and when they found him told him that they had come to marry their daughter to him, for he was greater than anyone else in the world.

"Oh no," said the Cloud, "the Wind is greater than I, for he can blow me away in a few minutes."

The parents then hurried off to the Wind.

"I am strong," said the Wind, "but the Mountain is greater than I, for I cannot blow the Mountain away."

Then they hurried off to the Mountain, but the Mountain said, "The Rat is greater than I, for he burrows into me and I cannot resist him."

They went to the Rat, and the Rat replied, "It is true that I am great, but not so great as the Musahar, for the Musahar can take me out of the rocks and kill me."

Then the parents went home with their daughter, reflecting that they had ended up where they began, and that after all it would be best not to be proud, but to marry their daughter to one of their own caste.

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

Masterton (N.Z.) Esperanto Club.—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Workson-rd., Masterton. Visitors welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty,

33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenoj: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18^h.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Coburg Esperanto-Grupo—Kunvenas ĉiujaŭde je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

nas severa al ili. Siaj ĉirkaŭaĵoj ne favoras la evoluon de la "virina" aŭ sentimenta aspekto de ŝia karaktero.


(Daŭrigota)

NEXT NUMBER—JUNE 12.

Latest Date for "Copy"—June 1.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Pönvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 152 (13th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

12 Junio, 1933.

EL HISPANA PLUMO.

(La sekvanta peco estas el "Hispana Esperanto-Gazeto" de septembro, 1932)

La Konsilaĉetanto

—Sinjoro grafo—diris Patronio—: en ia urbo loĝis granda majstro, kiu ne posedis alian metion ol vendi konsilojn. La tutan tagon, li sidadis en sia butikoj, kaj donis konsilojn, pli aŭ malpli bonkvalitajn, laŭ la mono, per kiu oni pagis al li.

Vojaĝanta komercisto, kiu transpasis la urbon, iris vidi tiun majstron, kaj petis, ke li vendu unu konsilon.

—Tre plezure mi tion faros—diris la majstro; sed vi devas al mi diri po kia prezo vi ĝin deziras.

—Donu al mi unu po **maravedi** (1)—diris la komercisto, donante al li la moneron.

La majstro prenis la moneron, gardis ĝin en la tirkesto, kaj al li diris:

—Mia amiko, kiam iu ajn invitos vin por manĝi, kaj vi ne konos la alportotajn manĝaĵojn, satiĝu per la unua alportata.

—Vi ne donis al mi grandan konsilon, diris la komercisto.

—Nek vi grandan prezon, respondis la majstro.

Tiam la komercisto al li diris, ke li donu konsilon po unu **dobla** (2), kaj la majstro, gardinte la moneron, al li parolis tiel:

—Amiko, kiam vi sidiĝos, okupu tian sidlokon, ke neniu rajtos al vi diri ke vi stariĝu el ĝi.

La komercisto denove diris al li, ke ne estas granda aĵo tiu konsilo, kaj la majstro rediris, ke ĝi rilatas al la de li pagata kvanto.

—Donu al mi do, unu po dek **maravedis**—diris la komercisto, al li donante la prezon.

La majstro, enpoŝiginte la monon, diris grave:

—Ne kuraĝu konsili tie, kie oni ne demandas vian opinion.

Ankaŭ tiu konsilo ne plene kontentigis la komerciston kaj li demandis unu po cent dek **marvedis**.

La majstro, post kiam li havis emane la monerojn, parolis tiel:

—Mia amiko, kiam vi estos tre kolera, nenion diru aŭ faru ĝis vi konos la tutan veron.

Ankaŭ ne kontentigis la komercisto por tia konsilo, sed ĉar li pensis ke se li volas koni pli da sentencoj, li fariĝos senmona, li eliris el la butikoj, konservante en sia memoro tiujn.

Kaj la komercisto iradis je siaj komercaĵoj jarojn kaj jarojn, mare kaj tere, nek revenante al la urbo, kie li estis lasinta sian edzinon, nek sendante al ŝi siajn novaĵojn.

La edzino, tre malgaja pro la nescio de la sorto de sia edzo, pasigis sian vivon vartante kaj edukante filon, kiu el ŝi naskiĝis kelkajn monatojn post kiam la komercisto ekvojaĝis. Kaj tiom multe da jaroj estis pasintaj sen novaĵoj pri la patro, ke la filo fariĝis knabo kaj nigra, silkeca barbo ĉirkaŭis lian vizaĝon.

Ian tagon, la komercisto, ĉiam loĝinte en malproksimaj landoj, troviĝis sufiĉe riĉa por lasi la doloran vivon de vojaĝanto, ĝis tiam de li farita, kaj sin dediĉi al la ĝuo de la gajnita prospero, en sia naskiĝurbo, apud sia edzino. Li vendis siajn komercaĵojn kaj kun ĉiu sia have li eniris en ŝipo ekvelveturanta

poŝt la havenurbo, kie lia edzino loĝadis.

Alveninte en sian urbon, li sola elŝipiĝis, kaj de neniuj vidita li iris al sia hejmo, kie li eniris senbrue, sin kaŝante en malluma kaj ne loĝata ĉambro, kun la celo vidi kiel lia edzino vivas dum lia foresto.

Rigardante tra la ŝlosiltruo, li vidis ke ŝi pene kudras apud la fenestro. Sed li ne estis longan tempon en la dolĉa rigardado, kiam nekontenteco lin premis, vidante ke tio, kion lia edzino tiel pene kudris, estis vira ĉemizo.

Li jam ekeliris el sia kaŝejo, kronte kun granda kolero:

—Ni vidu, sinjorino, por kiu vi kudras tiel plezure?

Sed venis al lia memoro la konsilo aĉetita al la majstro, kaj diris al si mem:

—“Kiam vi estos kolera, nenion faru aŭ diru, ĝis vi konos la tutan veron.” Ni atendu, do.

Atendanta li estis, kiam eniris tra la pordo belkreska knabo, kiu proksimiĝis al lia edzino per la brakoj etendataj, kaj estis de ŝi ricevata per multe da amo.

La komercisto pensis jam, ke lia edzino, kredante lin morta, edziniĝis al tiu viro, kaj tiel pensante, lin alpremis tiel freneza ĵaluzo, ke li sentis sian impulsata alkuri for de sia kaŝejo kaj mortigi la de li opiniatajn geedzojn.

—“Nenion faru aŭ diru ĝis vi konos la tutan veron”—al li diris tamen, en lia interno la aĉetita konsilo.

Li atendis, do, dank' al tiu sentenco, kaj kun pligrandiganta kolero li vidis kiel la virino aranĝis du lokojn sur la tablo, por manĝi, kiel poste ŝi alportis el la fajrujo kaserolon kun fumigantaj

mangaĵoj kaj ŝi sidigis antaŭ ĝi, kune kun la bela junulo.

Apenaŭ povis jam sin estri la komercisto, premante inter siaj vestoj, la mantenilon de la ponardo, kiam li aŭdis kiel lia edzino diris:

—Ve, mia kara filo! Oni diris al mi, ke ŝipo venis el tiuj landoj, kie estas cia patro. Post kiam ni mangos, kuru al la haveno kaj vidu ĉu surŝipe estas iu, kiu povas cin sciigi pri li, ĉar mi mortas pro ĉagreno nescii kia sorto estas veninta al li.

Rememoris tiam la komercisto, ke kiam li estis foriranta, estis atendata naskiĝo de infano, kiu, pro la forkurintaj jaroj, tre eble povas esti tiu junulo, kaj antaŭen puŝate de tiel plaĉa ideo, li eliris kurante el la kaŝejo kaj ĉirkaŭprenis la patrino kaj la filon per granda karesemo.

Rememorante, ke la konsilo aĉetita al la saĝulo, kvankam ĝi ŝajnis al li, komence, malmulte valora, al li evitigis fari teruran krimon, kutimis diri la komercisto:

—Neniam mi elspezis monon pli bone uzata.

(1) Maravedi:—Monero, plej ofte kupra.

(2) Dobra:—Ora monero. La valoro de tiuj antikvaj moneroj ŝanĝiĝis laŭ la epoko.

MARKUS ZAMENHOF KAJ ESPERANTO.

Preskaŭ ĉiu legema Esp-isto scias ("Vivo de Zamenhof": Privat, p. 65) ke Markus F. Zamenhof, la patro de la aŭtoro de Esperanto, devigis la junan entuziasmulon bruli la kajerojn de lia lingvoprojekto, sed ne estas ĝenerale konate, ke en siaj lastaj jaroj li lasis malstreĉiĝi sian antaŭan malfavoran sintenon kontraŭ la elpensajo de sia genia filo. Jen eltiraĵo el "Originala Verkaro" p.53, date 1910:

"En la jaro 1905 mia karmemora patro komencis la publikigadon de kvarlingva frazeologio - proverbaro, super kiu li laboris kun amo en la daŭro de longa tempo. Ĉar li esprimis la deziron, ke lia verko, krom la partoj rusa, pola, franca kaj germana, enhavu ankaŭ parton esperantan, tial mi prenis sur min pretigi tiun ĉi parton, kiu estis eldonota poste kune kun la partoj en la aliaj kvar lingvoj kaj provizore komencis eliradi per apartaj kajeroj (paralele al la kajeroj kvarlingvaj) sub la titolo 'Proverbaro Esperanta.'

Bedaŭrinde mia patro mortis, kiam nur duono de lia verko estis eldonita (la elirintaj kajeroj estas riceveblaj ĉe la firmo Moller kaj Borel en Berlino). La manuskripto de lia tuta verko estas finita, sed eldoni ĉiujn kvin partojn de la verko en la nuna tempo estas malfacile; tial mi decidis, antaŭ ol la tuta verko povas esti eldonita, eldoni almenaŭ aparte la parton esperantan. La ĝis nun ankoraŭ nepublikigitan lastan parton de la 'Proverbaro Esperanta' mi publikigas nun en 'La Revuo,' kaj poste la tuta verko eliros en formo de

aparta libro . . . L. L. Zamenhof."

(Vidu "La Revuo" iv, 1909/10 p. 241.)

LITERATURO PRI LA ELEFANTOJ.

En iu literatura klubo Londona kelke da membroj, ĉiuj apartenantaj al diversaj nacioj, decidis studi kaj poste pri-skribi la vivon de la elefantoj. Ili dis-ponigis al si jaron por tio, post kiu tempo ĉiu prezentu sian verkaĵon.

La dek du monatoj pasis, kaj ili denove kunvenis en la klubo. La anglo prezentis malgrandan volumon binditan per porkaŭto kun la titolo: Elefantoj de mi mortpaŝitaj.

La ruso venis kun libro bele bindita en rusledo kun la skēptika nomo: Ĉu vere ekzistas elefantoj?

La franco estis verkinta libreton kun rozkolora bindo titolitan. La ama vivo de la elefantoj.

Kiam venis la vico de la germano, tiu ĉi telefonis al la teretaĝo kaj baldaŭ du servistoj enortis dek ses egajn volumojn, kiuj havis kiel titolon: Mal-longa enkonduko en la studo pri l'elefantoj.

La polo montris fiere sian broŝuron: La elefantoj kaj la demando pri la pola koridoro.

Fine venis la vico de la usonano. Lia libro estis riĉe ilustrita, kaj la kovrilo anoncis per grandaj orlitteroj: Pli grandaj kaj pli bonaj elefantoj!

(Variantoj de ĉi tiu anekdoto aperis en "Occidental" 5/6, 1932, kaj en "Sistema Kurso de Esp-o," de Seppik-Malmgren.)

ESPERANTO JA VIGLAS EN AŬSTRALIO!

Ĉu estas kredeble, ke tion raportas fremdaj vizitintoj al Aŭstralio, reveninte en siajn landojn? Ni ne sentas en ni fortan certecon, ke jes.

La taggazetoj jus informis, ke komunistoj disdonis al la anoj de la krosŝipo "Koln" ruĝan legmaterialon en germana lingvo; evangeliistoj ankaŭ foje vizitas la eksterlandajn ŝipojn por dissemi Biblipartojn en la konformaj lingvoj. Tiuj homoj tiel ardas kaj kredas je sia afero, ke ili volonte oferas sin en tian laboron. Ĉu Esperantistoj agas simile? Ĉu la "Koln"-anoj ricevis impreson, ke Esperanto flore vivas en Aŭstralio? Se ne, tio rezultas el grava preterlaso de tiuj zamenhofuloj dis-ponantaj la tempon kaj bonokazon. Ekzistas Esp. rondoj, kiuj antaŭ ĉio akcentas la gravecon disporti la lingvon inter tiuj ĝin nekonantaj, kaj sisteme difinas por tiu celo devojn plenumotajn de siaj membroj. Ĉu ne farinde, ke estu elektitaj el tiuj rondoj fideluloj, kiuj iru, armite per taŭglingva materialo, por kontaktigi alinacianojn kun Esperanto, aŭ almenaŭ disaŭdigi

inter tiuj la nomon? En ĉi tiu konekso menciinda estas la ekzemplo de niaj samcelanoj en Wellington, Nov-Zelando, kiuj sendas pri-Esperantan legaĵon al ĉiuj fremdaj vizitantoj al tiu urbo.

DEMANDOJ.

Kiom da infanoj havis d-ro Zamenhof? Iliaj nomoj?

Kiu estis la unua proza originalaĵo en Esperanto? La unua tradukaĵo?

Kiu estas la plej granda biblioteko en Australio?

Kiu lingvo estas la plej multhome parolata—la pola aŭ la portugala?

Kiom da lingvoj estas en la mondo?

PRI PSEŬDOAFIKSOJ.

(vidu p. 31)

Laŭ mia opinio la propono estas tute ne taŭga. Ni pripensu la vorton "poligloto." La aŭtoro proponas la parton "poli" taksu prefikson. Sed se ni agus tiel ni estus sub devigo akcepti la radikon "gloto," ĉar ĉiu prefikso povas esti almetata al la radiko.

Same ni devus akcepti la vorton "fono" (polifono). Sed ĉi vorto jam ekzistas en esp-o k havas tute alian sencnon. Sekve per tia enkonduko ni nur pli malfaciligus la lingvon.

Plue "monologo, monopolo, monotona" . . . Se ni disŝiros la du unuajn vortojn, ni havos nur kuriozaĵojn (mono-logo, mono-polo). Ankoraŭ mi demandu: ĉu estas necesaj ĉi tiuj afiksoj?—Ho ne! Ni jam havas la prefiksojn "mult, antaŭ, mem" la vortojn "dio, vivo" k. a. Estus utile akcepti la novajn afiksojn, se ili havas novan aŭ almenaŭ pli ĝustan signifon. El ĉiuj ĉi afiksoj povus esti utila nur "tele," tamen ne en la vortoj "telegrafo, telefono" (kie ĝi kreus nur miskomprenon) sed en la vortoj: teleskribilo aŭ teleparolilo. Tamen mi dubas pri la bezono de ĉi enkonduko. Nikolao Usov. Turksib, Sovet-Kazakio.

(Krome, "or", "te", eĉ jam "aŭt" havas aliajn signifojn (A. gold, tea, motor-car). Rimarku ankaŭ ke laŭ la originala artikolo "tele" ne "telen" signifus "malproksimen." Red. S.K.)

NEKROLOGO.

Payne.—Je la 13 Aprilo, ĉe Master-ton, N.Z., mortis s-ro Herbert Payne, 93-jara. S-ro Payne estis la edzo de la mortinta s-ino L. Payne, dum multaj jaroj pioniro-sekretariino de la Master-ton Esp-o Klubo. Kvankam ne-Esperantisto, li multe kuraĝigis kaj subtenis sian edzinon en ŝiaj laboroj por Esperanto. Je la entombigo, paskan sabaton, la N.Z.E.A. estis reprezentata de la prezidanto, s-ro L. E. Dust, kaj la loka klubo de s-ro H. Franks, sekretario.

Our Address:—Please note that the Elizabeth-street Post Office is not the General Post Office, which is at Spencer-street. Use the form "Elizabeth-st. P.O."

POR LA VIRINOJ.

La laborema dommastrino de ĉirkaŭ 1870 vere estis dommastrino. La komplikajoj de la vivo lasis al ĉi neniom tempon por la briĝfesto, politikaj kaj socialaj interesoj. Ŝi devis fari ĉion per siaj du manoj—eĉ nigri la fornon, balai la tapiŝon, kaj purigi la lampojn. Ne por ŝi la vakua purigilo, la telefono, elektro, gaso, ktp. Ŝi okupis sin la tutan tagon pri detaloj, kiuj nun eĉ ne ekzistas. Ŝi portis vestojn je la nura ekvido al kiuj ni svenus. Jes, mi ne miras, ke ŝi estis virtulino. Kiel fali en tenton se mankas al vi la tempo, kaj, post granda laboro, la energio?

—E.G.

LA EDZIĜO KAJ LA MONO.

Rimarku la esprimon sur la vizaĝo de iu viro paganta al sia edzino la semajnan domelspezon. En la momento, li ne estas tute certa ĉu aŭ ne li pentas sian edzkontrakton. La funtbiletaj, kiujn li donas al sia edzino aĉetiĝis siavice de lia libertempo, eble lia sano, kaj multaj el liaj personaj inklinoj. Ili reprezentas longajn horojn de laborado, terurajn momentojn, kiam lia estro portas en sia okulo aspekton de eksigo, kiam la bankisto malafable rigardas lian ĉekon kaj lin turnas al la tratinto. Interŝanĝe li havigis tion, kion li celis havigi: hejmon, edzinon, infanojn, radion, kaj kanarion en la fenestro.

La virinoj, plejparte, pagas por siaj penoj per mono de iom malsimila speco. Ili tratas grandajn bilojn de sia sano, nervoj, menspaco. La tipa dommastrino aĉetas sian dimanĉan viandon kun sopiro, sian novan ĉapelon kun granda dubo. La kontoj de la kuracisto estas pagataj kun sendormaj noktoj kaj du-tri sulketoj. Sed, nekutimite al la kalkulado de tiaj nepalpeblaj kontoj, ni ankoraŭ inklinas al tiu prantikva ĉarmega fantazio, la fantazio ricevi ion kontraŭ nenia pago. Estas bonekonate, ke la ina temperamento ne povas rezisti tiun allogadon. La plej maliluziigitaj inter ni virinoj ankoraŭ paŭzas ĉe la tabloj de malkaraj restaĵoj magazenaĵ, kaj ekzistas multaj virinaj spiritoj, kiuj ĉiam pripensas, ke estas ridinde elspezi tempon kaj veturprezojn por atingi pli malkaran aĉetcentron. Sed en nenia parto de la Vendejo de la Sorto la virinoj tiel persiste kaj gajkore atentigas havigi al si la plej bonan parton de la traktado, kiel en la marĉando por akiri ed-

zon.

(Olive Mary Salter, en "Good Housekeeping.")

GERMANA SUPO.

Metu unu pajnton kaj duonan da senŝeligitaj pizoj en kaserolon kun unu kvarto (1.136 litroj) da akvo, te-kulero da salo, du-tri branĉetoj de petroselo kaj mento, kaj du malgrandaj bulboj. Boligu ĝis molaj kaj trafrotu tra kribrilo. Remetu en la kaserolon kun kvarto da akvo, unu unco da butero, kaj boletigu kvinminute plilonge, kaj aldonu unu kuleregon da kremo. Miksu kvaronkvarton da lakto kun unu tuta ovo kaj tri flavaĵoj de ovoj kirlu, gustigi laŭ deziro, enmetu en pelvon, kaj baku ĝis firma. Kiam malvarma, tranĉu en kvadratojn, enmetu en la supon kun peceto da butero kaj iomete da sukero, kaj servu.

KIE ONI NE KISAS.

Ĉu ni vere povas imagi, ke ekzistas ankaŭ homoj, kiuj ne scias, kio estas kiso? Sed efektive ekzistas popoloj, kiuj—vidante nian kisadon—devus opinii ĝin io tre nedeca. Ili havas salutmanierojn, kiujn ni preskaŭ ne povas kompreni niaflanke. La indiĝenoj de Ŝitagongo salutas, metante buŝon kaj nazon sur la vangon de la alia, kvazaŭ por flari ĝin longtempe kaj forte. Se iu dirus al ili "Kisu min," ĉi tio estus ne komprenebla al ili; oni devus traduki per "Flaru min." Mongola patro ne kisas siajn infanojn, sed priflaras ilian hararon. Se sudmara insulano deziras speciale honori iun alian, li ekverŝas akvujojn sur lian kapon. Kontraste al ni, ĉino—dezirante esti ĝentila—metas la ĉapelon sur la kapon; kaj kiu en Japanujo respektas la moron, tiu senŝuigas siajn piedojn ĉe salutado. Se en Persujo oni deziras esprimi al iu sian specialan altestimon, oni proksimiĝu al li nur nudpiede. La araboj kisas al si reciproke la piedojn aŭ genuojn, kaj al altranga persono oni kisas la borderon de la vestaĵo. La loĝantoj de la Orbordo klinas sin profunden salutante, prenas la survestaĵon de la ŝultro kaj faldas ĝin sub la brakon. Ĉe vizito inter la indiĝenoj de Brazilo la vizitato prezentas al la gasto seĝon, kaj poste ambaŭ restas proksimume dum unu minuto en plena silento; nur poste la vizitato mirege ĉirkaŭrigardas kaj demandas laŭtvoĉe: "Ĉu vi ĉeestas?" Se Basuto alparolas sian gentestron, li

salutas lin per la titolo "sovaĝa besto," kio al ni certe ŝajnas esti malmulte flata, sed al la oreloj de la gentestro sonas kiel muziko, ĉar jen honoro, prezentata al liaj kuraĝo kaj forto.

(El "Germana Esperantisto.")

PRINTEMPO.

J.G. de Mosman demandemas:—

Onidire, "en la printempo la penso de juna viro direktiĝas al la amo." Ŝajnas al mi ke en la printempo junaj viroj pensas pli pri l'poezio. Journale, gazete oni legas odojn al la printempo, kiuj devas esti pliĝuste nomitaj odoj al la amo. Tial la maksimumo eble estas prava.

Pro kio estas la printempo tiel elektata? Ĉu vi diras "pro ĝia belo"? Mi diras, ke la printempo ne estas la plej bela sezono el la kvar. Kun ĝi venas la gripo, ŝanĝiĝema vetero kaj muŝoj.

Kiu plaĉas al la homoj, tiu estas la tielnomata "juneco" de la printempo. Juneco! La plej bela vorto el ĉiuj. Verkas la poetoj nek "odon al la printempo" nek "odon al la amo" sed odon al la juneco. Kaj estante poetoj ili ne scias, ke la printempo estas samtiel maljuna kiel la aliaj sezonoj.

(Antaŭ ĉi tiu profunda enigmo, ni klinas la kapon, venkite. "S.K.")

LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO.

(daurigata.)

Certe la mateno nun alproksimiĝas; sed la horloĝo estas en la domo. Sia kandelo preskaŭ forbruliĝas; ŝi forgesis, ke ŝi nur havas la unu. Ŝi devas alporti pli da brulligno por la fajro, kaj tial ŝi fermas la hundon en la kuirejo kaj rapidas al la ŝtiparo. La pluvo estas forblovita. Ŝi ekprenas ŝtipon, eltiras ĝin kaj—krak! la tuta amaso disfalas! Jen la kialo:

Hieraŭ ŝi kontraktis kun vaganta indiĝeno, ke li kolektu por ŝi brullignon, kaj dum li laboradis, ŝi foriris por serĉi perditan bovinon. Ŝi estis for dum unu aŭ du horoj, kaj la nigrulo bone uzis sian tempon. Je ŝia reveno ŝi tiom miregis vidi sufiĉan grandan ŝtiparon apud la kamentubo, ke ŝi donis al li ekstran pecon da tabako, kaj laŭdis lin pro tio, ke li ne estis mallaborema. Li dankis ŝin, kaj foriris kun fiera mieno kaj la kapo rekta. Li estis la lasta de sia gento, kaj Reĝo: sed li konstruis tiun ŝtiparon kun kaverno en la centro!

Ŝi ofendiĝas nun, kaj larmoj ekvenas al la okuloj, kiam ŝi eksidas denove ĉe la tablo. Ŝi prenas naztukon por forviŝi la larmojn, sed, anstataŭ, puŝetas la okulojn per siaj nudaj fing-

roj. La naztuko estas plena da truoj, kaj ŝi trovas, ke si metis la dikfingron tra unu, kaj la montrofingron tra alia. Tio ĉi ridigas ŝin, je la miro de la hundo. Ŝi havas viglan, tre viglan percepton pri la ridindeco, kaj iun tagon ŝi amuzos kamparulojn per la rakonto. Ŝi tiamaniere amuziĝis antaŭe. Unu tagon, ŝi sidiĝis por "havi bonan ploradon," kiel ŝi diris—kaj la maljuna kato sin frotis kontraŭ ŝia robo kaj "ploris" ankaŭ. Tiam ŝi ne povis ne ridi.

(finota.)

TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following:— Mr. Ramm, 4/6, May, '34; Mr. Huebner, 25/-, Oct., '36; Miss Hopton, 4/6, June, '34; Mrs. Wilson, 4/6, June, '34; Miss Conwell, 4/6, May, '34; Mr. Adcock, 5/-, March, '34; Mr. Cleary, 4/6, April, '34; Mr. D. Miller, 4/6, Jan., '34; Coburg Esperanto Group (Sales), 17/4; Miss Remington, 4/6, June, '34; Mr. Eliot (adv.), 1/6; Melbourne Esperanto Club, Subs. £1/14/-, Sales 6/-.

NIA POŬTO.

S-ino C-T. en N.Z.—Via noto pri "plur". La radiko estis oficialigita en la kvara aldono (1929) al la Univerŝala Vortaro, kun difinoj "plusiers; several; mehrere; pli ol unu." Ĉu vere tio estas kontentiga? Jam "du" estas "pli ol unu," sed "du" ne estas "several." La angla niaopinie devas teksti "more than one." Studu ankaŭ la difinon en Plena Vortaro. "More than one person bore witness to that" (Pluraj personoj atestis tion). Traktante ĉi tiun punkton rimarku, ke la similsenca "kelk" havas la francan difinon "quelque, plusieurs" kaj la anglan "some, a few." Vi diras, ke Zamenhof ne aprobis la radikon "plur". Eble tio estas vera, sed ĉu Zamenhof, se ankoraŭ vivanta, aprobis ĉiujn radikojn oficialajn de la Lingva Akademio? Jen la demando, car laŭ liaj diroj li alte respektis la aŭtoritaton de tiu institucio.

"Plural" estas radiko nepre nur gramatikafaka kaj paralela formo kun "singular".

"B.E.S. ADRESARO."

There are for disposal eight of these splendid little address-books, at 1/- each, plus 1d. postage. Names and addresses of some 1500 individuals and Esperanto enterprises are compiled in handy form for the use of the correspondent.

Apply at once to agent, "La Suda Krucio," Box 731F., P.O., Elizabeth-st., Melb.

Mr. L. Thomson is agent in Australia for all publications of "Literatura Mondo" and "Oomoto." This address finds him.

RADIO COLUMN.

Speakers are requested to send in by 10th July at latest, particulars of any broadcasts arranged.

Esperanto lessons will be broadcast from JAR at 7.45 p.m. on the dates mentioned below. An anecdote will be read at the end of each lesson to enable students to check their pronunciation.

June 24th.—Ĉe la pordo de teatro junulo puŝiĝis kontraŭ sinjorinon. "Besto!" ŝi ekkriis. "Pardonu min," li petis ĝentile. "Kaj mi vin," respondis la sinjorino. "Mi kredis, ke estas mia edzo."

July 8th.—En balo: "Fraŭlino, mi kuraĝas peti al vi, ke . . ." "Mi bedaŭras, sinjoro, sed mi jam forpromesis ĉiun dancon." "Pardonu, fraŭlino; mi petas ne dancon, sed nur, ke vi starigu; vi sidas sur mia ĉapelo."

RADIO-WARSAW!

Short-wave users! Listen in to Warsaw on 12 and 26 July at 22h. 35m. to 22h. 55m., Polish time. The respective subjects will be "Protection of the Blind in Poland," by Z. Sobota, and "Esperanto and the role of the Poles in its dissemination," by T. Hoda-kowski. These speeches will be given in Esperanto. Any Esperantist picking them up is asked to get in touch with "Polskie Radjo," in Warsaw and Kracow.

In 1932 there were 2090 Esperanto broadcasts from 94 stations in 17 European countries. These consisted of 445 lessons and 1645 talks in or about the language.

THE SIMPLE BERBER.

Radio go-getters will trudge the streets of Moorish towns, and urge their cars through the sands of Sudanese deserts, to peddle old-style wireless sets to those who still sit in darkness.

A certain Berber high-light ordered from one of these merchant adventurers a set to go with his sewing machine, vacuum cleaner, gold teeth and the rest. It came, was installed and declared in order. The Berber turned the dials by direction and listened . . .

"This is station London. You have just heard . . ."

"Station Rabat, vous venez entendre les derniers cours de Bourse . . ."

"Stazione Roma-Napoli . . ."

"Hier ist der Norddeutsche Rundfunk . . ."

And he listened on, amazed. A wonderful thing wireless, certainly. But

soon the simple countenance became o'erclouded. He beckoned the man of commerce over to him, and asked, maybe having vaguely in mind certain expansive promises auxiliary to the sale: "The set is indeed good, but where is the little machine that enables me to understand all that is broadcast?"— You see, he was thinking of some sort of "translating machine," which piece of mechanism, with all our progress in radio technics, has not yet arrived.

We leave the disappointed Berber, knowing that even in those countries priding themselves most on their advancement, there are thousands and thousands of listeners like him who receive day after day with puzzled brow "information" from foreign stations. Why on earth isn't Esperanto, a "translating machine" ready to hand, in general use for such purposes?

(Translated from "La Germana Esperantisto.")

FROM "HAMLET."

Fraser Tytler, in his "Principles of Translation" deems the following an extremely difficult passage to translate, owing to the presence in it of antiquated terms. He says "It would require no ordinary skill to transfuse into another language the thoughts of the following passage, in a similar species of phraseology":—

"For Nature crescent doth not grow alone

In thews and bulk; but as this temple waxes,

The inward service of the mind and soul

Grows wide withal. Perhaps he loves thee now,

And now no soil nor cautel doth besmirch

The virtue of his will."

Act 1, scene 3.

This is Zamenhof's rendering. According to "Parnasa Gvidlibro" he translated "Hamlet" from the German text of Schlegel-Tieck.

"La natur', kreskante,
Grandiĝas pli ne sole per la korpo
Kaj per la forto de la sama sento;
Kun la kreskado de la tempo ofte
Sangiĝas la spirito kaj la servo
Interne. Nun li eble amas vin;
Nek trompo nek malico nun makulas
La virton de l'animo lia."

MALNOVAJ JARKOLEKTOJ DE "LA SUDA KRUCO"!

Havablaj estas tiuj de 1920 ĝis 1932,
je kosto de du ŝilingoj por ĉiu.
Turnu vin al nia adreso!

RECENZOJ.

FACILA LEGOLIBRO:— Kompilata de K.R.C. Sturmer; eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd.; pĝ. 63; prezo unu ŝilingo, plus afranko.

La verketo konsistas el resumoj de naŭ elstaraj romanoj Esp-aj kaj du artikoletoj, unu pri la praktika utilo de Esperanto kaj la dua pri ĝia literaturo. La kompilaĵo estus pli interesa kaj valora se la farintoj de la resumoj estus eĉ pli rigide ignorintaj ĉian akcesoran incidenton ne necesan al la rakontskeleto, kaj tiam aldonintaj ian takson pri la ĝenerala tendenco kaj ŝatindeco de la koncerna verko kaj pri la karakterizaj trajtoj de la aŭtoro stilo kaj lingvaĵo. Ekzemple Alec Venture tute superflue enpakis en la skizon de "Viktimoj" la tute flankferajn liniojn pri Dogler kaj pri la pantalonvendado de Izor. Li pli efike estus aginta se li ellasus tiujn kaj anstataŭe uzus la spacon por doni impresojn pri la verko kiel tutaĵo. Plue, la tute diversaj esprimecoj de "Saltego trans la Jarmiloj" kaj "Mirinda Amo" estas preskaŭ forviŝitaj de la relative similaj inter si stiloj de la du resumantoj. Kelkapaĝe en la rakontoj certan konfuzon sentas la leganto, penante sekvi la trorapidajn movojn de la dense arigitaj roluloj. Li konscie-nekonscie palpas per ŝercanta spirito la vortremuraĵon de la romanoj, kiaj ilin verkis la aŭtoroj mem.

Ĉefe valora estas la bona kompaktio pri la Literaturo de Esperanto, de W. B. Johnson, sed malgraŭ ĝia necesa mallongeco, multaj opinioj bedaŭra la foreston de ia mencio pri ekzemple la gravaj tradukoj de Bulthuis—"Imperiestro kaj Galileano," "La Leono de Flandrujo," kaj "Jane Eyre," pri tiuj el la rusa, "Princo Serebrjaniĵ" kaj "La Kapitanfilino" trad. de Ŝidlovskaja, kaj pri "Eugene Onegin" de Puskin, trad. de Nekrasov.

Finvorte, la verketo, malgraŭ ĝiaj korekteco kaj bona stilo, ne impresas kiel tre taŭga por lernantoj, ĝuste pro ĝia formriĉeco kaj ia senĝena flueco, kiujn povas absorbi kun plezuro nur la progresinto.

Politika Sociala Revuo, trimonata. Prezo 40 francaj fr. por kvar kajeroj, sume 320 paĝoj inoktavaj. Gvidkomitato: Bernard Lavergne, profesoro, ĉe la Universitato de Lille; Fritz Kern, respektive ĉe Bonn; W. E. Collinson, respektive ĉe Liverpool; Gaston Waringhien, respektive ĉe Liceo de Lille, kaj Louis Bastien, Generalo Intendantato.

Salutinde estas la apero de tiu kvaronjara revuo, kies sobra unukolora kovrilo similas tiujn de certaj influaj anglaj periodaĵoj. Ĝi celas liveri al la klera publiko dokumentitajn studojn pri ĉiaj problemoj de la socia vivo. Ĝi enhavas principe nur tradukojn de plej taŭgaj artikoloj aperintaj en la naciolingvaj revuoj. La redaktoroj estas homoj nepre kompetentaj en siaj internaciaj medioj; la tradukistoj esper-

antistoj prezentantaj ĉiajn garantiojn pri lingvokono.

La unua nro enhavas (1) Ŝattakson pri Charles Gide, ekonomikisto. (2) Valoran studon pri la Respublikoj de la Jezuitoj en Paragvaĵo. (3) Analizon de la Spirito de la Germana Popolo en la nuna tempo. (4) Profundevidan studon pri la Franca Karaktero vidalvide al la Moderna Mondo. Ankaŭ estas leginda recenzo de G. Waringhien pri "Pol-Pomeranio," kiu libro lastatempe aperis en Esp-o.

Makulas ĉi tiun cetero brilan eldonaĵon tro da preseraroj, foja ellaso de la akuzativo, kaj ambaŭa uzado de "k" kaj "kaj" en sama artikolo. Observo: "Ili estis tro obeemaj, ol ke venus al ili la penso ekribeli"; "Tiu instruo estis tro valora, ol ke ni lasus ĝin stari." Zamenhof preferis fari tiajn parolturnojn jene:—"Ĝi estis tro kaduka, por ke oni povu lasi ĝin stari" (Fabeloj de Andersen iii, p. 23 kaj 88; aŭ "Ĝi okupis tro altan situacion, ke oni povu supozi, ke ĝi akceptos inviton buŝan" (p. 85).

Verse subteninda entrepreno de homoj kun alten-direktataj koroj.

Turnu al:—Prof. G. Waringhien, 13 Place Simon-Vollant, Lille, Francujo.

"Systematisk Kurs i Esp-o," de Sepik kaj Malmgren, eld. de Forlagsforeningen Esperanto, Stockholm u.p.a. Prezo 0.75 oeroj. Jen post nur monatetoj alvenis la dua eldono de tiu bona kursilo. Svedoj en Australio volantaj lerni Esp-on per sialingva instruilo estas petataj turni sin al nia adreso.

Ankaŭ el sama eldono venas **"Esperantisk-Svensk Ordbok,"** kompilita de Paul Nylén, sveda veterano. Sur bona papero, 231 pp. de dense komposita teksto, bazita sur la plej konataj, eĉ tre modernaj, ekzistantaj vortaroj. Prezo 3.75 kr. Ampleksa pritrakto de la derivoj de radikoj; sub "ven" oni havas 27 devenaĵojn kun svedaj difinoj kaj Esp-aj frazezkemploj. Valora unuecigilo por nia lingvo inter la svedoj.

De s-ro Nekrasov, Spiridonovka 15, Moskvo, venas du libretoj:—(1) **"Ĉinaj Noveloj,"** eld. de Ekrelo, Leipzig, aŭtoro O. Erdberg, P. 72, prezo naŭ pencoj.

Kolorriĉaj, brile verkitaj skizoj pri la vekiganta ĉina laborularo. En ĉapitro Taj-ana Simfonio terura bildo de la sklavsistemo reganta en japane-posedata kotonfabrikejo. En Fenikso la besta mortigo de pionira organizanto de kamparana unio kontraŭ feŭda ekspluatisto. Ĉi tiu pensiga verketo ĵetas valoran lumon sur la komunist-igantajn regionojn de Ĉinujo. Jam kvinono de tiu landego (do 60,000,000 homoj) estas "areno de triumfanta soveta movado," kiu "kiel stepla incendio ĉirkaŭkaptas unu provincon post alia."

(2) **"La Rezultoj de la Unua Kvinjarplano."** Raporto de I. Stalin, 7 Jan.

'33. 48 p., prezo 5p.

La soveta ĉefo komencas per citoj el eksterrusaj gazetoj, montrante iliajn haose diversajn opiniojn rilate al la plano. Kelkaj krias pri ĝia fiasko; aliaj alarme avertas pri ĝia sukceso kaj konsekvenco minaco al la individuisma ekonomio. Tiam Stalin klarigas pri la baztaskojn de la plano kaj la plenumrezultojn en agrikulturo kaj industrio, kaj pretendas, ke la stato de ties labor- kaj kampuloj konstante pliboniĝas dum ke daŭre pliakriĝas la mizero de la ceteralandaĵoj. Li finas asertante, ke la soveta sistemo "atingis tian venkon, kiu havas vere mondhistorian signifon, dank'al I. La entuziasmo de la multmilionaj amasoj; 2. La firma gvidado de la partio kaj registaro, kaj 3. La specifaj kvalitoj kaj avantaĝoj de soveta ekonomia sistemo." Tralibre la trad-voj bojkotas "ebi" uzante nur "posibli". Kion precize signifas "rajono," kaj kiasence estas uzata "patos"?

Mirinde malkara legaĵo, valora ankaŭ pro nefacilo aĉeti apartajn paroladojn de Stalin tradukitajn angle.

"Step by Step in Esperanto," by M. C. Butler, 4th edition, revised. Price 1/6 paper, 2/6 cloth, plus postg. from The British Esperanto Assoc., 142 High Holborn, London, WC1.

Mr. Butler is a bright pedagogue; by which we mean witty as well as brilliant. His book is filled from margin to margin with sound instruction lit up throughout by flashes of well-directed humor. Reading it with the aim of picking out doubtful points in grammar or syntax the most scrupulous Zamenhofan will turn the last page with his note paper still unmarked by any observation of diversion from the classic standard. Only in the matter of arrangement of the material does the present reviewer fail to follow the mind of the author. The contents of the book must surely strike the user as being, as it were, dispersed; there lacks that sequence or grouping of elements most naturally looked for. We have, for instance, "-as" on p. 46, "-is" on p. 76, and "-os" on p. 137; "-u" on p. 48 is continued on p. 177. A further point is that Mr. Butler has omitted treatment of the two distinct significations of "el-" as used, say, in "ellerni" and "elfosi," a matter regarded by Paul Fruictier as calling for somewhat lengthy consideration ("La Esperanta Vortfarado," 1914, p. 91-2).

It will seem to some rather amusing to read that after having mastered some 240 pages of often densely printed text the learner "should now pass the Elementary Examination of the B.E.A. with distinction."

Much of the interesting and valuable addenda to the early editions has been omitted in this to give place to reading exercises. We hope to see it reappear one day in a book designed by Mr. Butler for advanced classes.

A soundly based compilation from a conservative hand, and real value for the money. (ROBO).

RESPONDOJ.

Tri. Adam, Sofja, Lidja.

"Marko Kraljevic," rakonto de M. Abesgus, 1897. "La Gefratoj," de Goethe, tradukita de Grabowski, 1889.

La Melburna Publika, kun 500,000 volumoj.

Lau la 1927 j-a UEA jarlibro la portugala kun 28,000,000. Parolas pole 25 milionoj.

A. Meillet, en sia "Les Langues du Monde" (1924) donas la nomojn de 3600 lingvoj, dialektoj, idiomoj, mortintaj kaj vivaj. Antaŭ la milito aperis sistema libreto de F. Finck, "Die Sprachstamme des Erdkreises," kies dua eldono 1915 entenas 2172 lingvojn kaj dialektojn.

FACTS AND WORDS.

What is Esperanto, Dad?

The universal language, my boy.

Where is it spoken, then?

Why, nowhere.

There's something twisted in a sense of humor that can keep this decrepit old tarradiddle on its legs. Still it dodders from journal to journal. We would like to direct the eyes of its author to a few of the facts bearing on the recent progress of Esperanto:—

Cook's London office now publishes also in Esperanto its "Useful Information for Travellers."

The Red Sport Internationale in Russia has approved the use of Esperanto for the Spartakiad in Moscow this year. In various towns of Russia and elsewhere courses for athletes are being held.

The town of Mulhouse, France, and the Spanish town of Vio, have now a Zamenhof-street; Bergen - op - zoom, Holland, inaugurated a Zamenhof-square on 27 May, and a monument to the inventor of Esperanto is to be erected by the council of that town.

The president of the Milan (Italy) Fair, and of the Union of International Fairs, recently declared that Esperanto is suitable as a means of correspondence for international commerce.

Although spoken by comparatively very few of the world's population, Esperanto is, in point of space, the most widely spread language on the globe, adepts of it being found in almost every country. One can hear it spoken in scores of villages and small towns in Central Europe, the Balkans, and in regions of Russia where there is nobody capable of using any other rational tongue than their own. A visitor to Bulgaria attests that through Esperanto he was privileged to enter the intimate life of the peasantry of that land, among whom English was unknown.

Clubs are found in every capital city of Australia and in many towns of New Zealand. The Melbourne Esperanto Club is a school through which are constantly passing some 80 students. There must be in Melbourne alone more than a thousand people who at some time or other have learned the language.

Por klarigo pri la Pretrenacio Konstancio, jam starigita de la Krist'fratino, bv. al Elliot, 2 Cambridge-st., Willoughby, N.S.W.

SIDNE(J)O.

Mr. W. Gray of Whelan's-rd., Leon-gatha, writes to bring to our attention that Zamenhof (page 481 "Originala Verkaro," date 21/6/1889) uses "Melbourne" and "Sydney" in their unchanged national forms. This letter was quoted in full on p. 163 (April, 1930, issue) of "La S.K."

COBURG ESPERANTO CLUB.

Majo 10 la klubo havis festvesperon en la domo de l'prez-o, s-ro E. Williams, kies poŝo respondis la tutan elspezon. Tion li faris, motivate de la deziro direkti monerojn en la kason de la klubo. Membroj senlaboraj ricevis senpagan inviton, sed tiuj salaj-rohavaj enirpagis ŝilingon. Tre ĝuata vesperon spertis 35 anoj kaj amikoj dancante, ludante. S-roj Saaren (citro) kaj Belmont (violono) donis dancmuzikon kaj amuzajojn. La kaso ricevis 28 ŝilingojn.

Sub gvido de s-ro Burns klaso de 15 lernantoj studas prepare por la "Ekzameno Memora je J. G. Pyke." Komitato de 5 personoj planarangaŝ fondi Esp. librejon uzotan de membroj.

SPLITOJ.

Diras la 1928 Jarlibro de la UEA: ". . . la demokrata sistemo emas nun tute universaliĝi." Ni dubas.

"La unua rusa lernolibro de Esperanto aperis en Pollando, la unua portugala en Germanio, la unua nederlanda en Svedlando, la kataluna en Madrid, la slovaka en Chicago, la turka en Parizo, la ukraina en Krakovo" (samcita).

"Kiam vi naskiĝis, vi ploris, kaj ĉirkaŭ vi ĉiuj ĝojis. Vivu tiel, ke kiam vi mortos, ĉiuj ĉirkaŭ vi ploru kaj vi ĝoju." (Lao-Tze.)

Al tiuj intencantaj ektraduki "Don Kihoto" n:—

"Probable vera estas tio, ke ekzistas neniu verko pli malfacila traduki, sekvante fidele laŭ la teksto de la originalo, ol "Don Kihoto." Tiu malfacilo devenas de la treega ofteco de ĝiaj idiotismaj frazturnoj. Ĉar la hispana lingvo per si mem estas tre idiotismeca, eĉ la rakonta parto de la libro estas malfacila; sed ĝia popollingvaĵe interparola

parto estas intence plenplenigita per idiŝoj, ĉar unu el la ĉefaj personoj senĉese sin esprimas per proverboj. De ĉi tiu verko estas multaj anglalingvaj tradukoj, faritaj, mi supozas, laŭ diversaj gradoj de boneco. La du plej bonaj miaopinie estas tiuj de Mot-teaux kaj Smollett, kiuj ambaŭ estis verkistoj tre kompetentaj por la tasko." (Fraser Tytler, 1747-1814.)

FOR YOUR BOOKSHELF.

"Luno de Izrael," Rider Haggard, 5/6.
"Alegorioj el la Naturo," Gatty, 9d.

Postage extra.

A large selection of literature, stationery, text books, dictionaries, badges, etc., obtainable from—

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY

Box 731F, G.P.O., Melbourne.

OKULOJ KAJ VIDPOVO EN LA INSEKTA MONDO.

(El "The Refractionist" London, 1/1/33.)

At a meeting of the Interligo Tutmonda de Optikistoj kaj Okulistoj which took place at the London Refraction Hospital on 30th November, 1932, the secretary drew attention to the publication of an Esperanto dictionary of medical terms containing terms relating to ophthalmic optics. The Chairman called upon Miss I. L. Pickett to read a paper on "Eyes and Vision in the Insect World." A discussion followed. We give a summary of the paper in Esperanto.

(Resumo de prelego prezentata de F-ino I. L. Pickett, ĉe kunveno de la Brita Sekcio de la Interligo Tutmonda de Optikistoj kaj Okulistoj, ĉe la London Refraction Hospital, 30 novembro, 1932.)

Estas du ĉefaj specoj de okuloj en la insekta mondo. La plej grava estas la malsimpla okulo, pli precize nomata la okuletaro. La plej multaj insektoj havas paron da ĉi tiuj, unu ĉe ĉiu flanko de la kapo. Ĉiu okulo estas kovrita per travidebla haŭto, la korneo, kiu havas facetan aspekton. Tiaj insektoj, kiuj loĝas precipe en mallumo (ekz. kelkaj laborformikoj) havas nur 7-8 facetojn, sed libeloj kaj ŝinksoj havas ĝis 20,000-27,000 en ĉiu okulo. Ĉiu faceto estas okuleto aŭ ocelo (latine ommatidium), kiu konsistas el du tavoloj de korneaj ĉeloj, unu duoblekonvekca, la alia konkav-konvekca, sub

kiuj estas kristala konuso, ĉirkaŭita de pigmento. La pinto de la konuso estas kunligita kun nervstangeto nomita la rabdomo. Ĉiu rabdomo konsistas el kvar rabdomeroj, ĉiuj ligitaj al longa nervĉelo (retinulo). Ĉi tiuj ĉeloj ĉirkaŭas la nervstangeton, kaj komunikas al nervfibroj. Ĉiu faceto ricevas malgrandan lumfaskon el iu direkto, kaj ĉi tiu fasko formas bildon nur de sia origina punkto. La bildoj estas ricevataj de la cerbo unu apud alia kaj formas kune mozaikan bildon de eksteraj objektoj. Ĉi tiu bildo estas iomete malklara, sed taŭgas al la bezono de la insekto, al kiu precipe utilas la kapableco rapide konstati eksteran movigon. Cetere, ĉirkaŭa vidpovo estas pli grava ol speciala centra vidpovo. Tial oni trovas, ke akrevidantaj fluginsektoj havas la plej grandajn kaj la malpli simplajn okulojn. Pli bona vidpovo troviĝas kun tre multe da malgrandaj facetoj, ĉar tiuokaze nur malgranda nombro de radioj estas ricevataj de ĉiu retinulo, tamen la lumo estas malpli intensa. La okuloj de noktaj insektoj bezonas pli grandajn facetojn ol tiuj de tagaj specoj, ĉar la retinulo bezonas pli grandan aron da lumradioj.

Krom la okuloj, kiuj formas apozician bildon, laŭ maniero supreklarigita, kelkaj okuletoj, precipe ĉe noktaj insektoj, formas supermetitan bildon per unuigo de radioj el apudaj facetoj. En taglumo la pigmento ĉirkaŭ la retinaj ĉeloj moviĝas antaŭen kaj limigas la radiajn faskojn tiel ke pli klara bildo rezultas. Kvankam ĝenerale insektoj ne havas fokuspovon, Vigier trovis ĉi tiun povon ĉe libeloj, kiuj povas kunpremi la kristalajn konusojn per muskolfibroj inter la okuletoj.

Krom ĉi tiaj okuletoj la plej multaj insektoj havas 2-3 simplajn okuletojn (ocelojn). Ĉi tiuj konsistas el duoble-konvekso lenso, kaj travidebla stangeto sub kiu estas tasforma pigmentĉela retino. Ĉi tio ebligas nur lumpercepton, kaj tial insektoj kiuj posedas nur ocelojn vidas tre malklare.

La antenoj partoprenas tiom kiom la okuloj en la gvidado kaj direktado de kelkaj insektoj, kaj la sentoj de gusto kaj flaro estas evoluintaj al neordinara grado, tial estas malfacila tasko provi la vidpovon, kaj ne mirinde se la eksperimentoj kelkfoje alportas kontraŭajn rezultojn. Kvankam insektoj ne posedas la **duokulan** vidpovon, ili kredible povas bone juĝi pri distanco, sendube ĉar ju pli malproksima la ob-

jekto, des pli granda la nombro da lokoj kiuj stimulas unu faceton. Lubbock pruvis ke insektoj reagis al ultraviola lumo, sed ĉu per vido, ĉu per fotohaŭta sento restas necerta. Abeloj kapablas bone diferencigi kolorojn, kaj nur foje eraras pri blua aŭ verda koloroj. Vespoj ŝajne ne rekonas kolorojn, sed havas bonan formpercepton.

RIDU NI!

Ĉe la Balo.

Li: Kie ajn estas la beletaj fraŭlinoj hodiaŭ vespere?

Ŝi (acide): Mi supozas, ke ili eliris kun la agrablaj viroj.

La elpensinto de "Sherlock Holmes" rakontas amuzan anekdoton pri si mem. Dum paroladovojaĝo tra Usono li alvenis al Boston kaj miregis kiam fiakristo haltigis lin kaj alparolis lin uzante lian nomon.

"Kiel vi sciis, kiu mi estas?" demandis Conan Doyle, kiu tre interesiĝis kaj iom flatiĝis pro la rekono.

"Nu—pardonu, ke mi tion diras," respondis la fiakristo, "la refaldaĵoj de via vesto aspektas kvazaŭ ili estas pretenitaj de New York-aj raportistoj; viaj hararo aspektas kvazaŭ ĝi estas tranĉita en Philadelphia; via ĉapelo ŝajne estas aĉetita en Chicago, kaj via dekstra ŝuo portas la koton de Buffalo—kaj—kaj—"

"Kaj kio?" demandis Conan Doyle.

"Nu," respondis la fiakristo, "mi vidis 'Conan Doyle' en grandaj blankaj literoj sur via kesto."

"Kaj kial," oni demandis al eta Mario, "vi volas edziniĝi kun aŭtoro?"

"Ĉar tiam, kompreneble, mi estus aŭtorino."

Barbisto: Kiel mi tranĉos vian hararon, mia knabeto?

Knabeto: Kun truo en la centro same kiel ĉe la patro.

Vi diras, ke vi akiras la vivrimedojn per la plumo?

Jes, iufoje mi skribas al mia onklo.

Li sidis en la dentistseĝo.

Kiom kostas la forigo de unu dento? li demandis.

Por via, ses ŝilingojn, respondis la dentisto.

Kion vi diras? la suferanto kriis. Ses ŝilingojn por nur tri minutoj da laboro?

Nu, rebatis la dentisto, mi povas ankaŭ plilongigi la laboron, se tio plaĉas al vi.

Jean, ĉu vi jam brosis mian palton hodiaŭ?

Jes, sinjoro, kompreneble.

Strange! Mi havis du kronojn en la poŝo, kaj la mono ankoraŭ estas en ĝi.

Du malliberuloj renkontiĝis sur la promenkorto de Sing-Sing.

Kiom vi ricevis? demandis unu.

Ses jarojn, respondis la alia.

Pro kio?

Rabo de la Unua Banko de Ŝtato Montana. Kaj vi?

Dek jarojn.

Pro kio?

Mi fondis tiun bankon.

(la tri el Novial-organo, "Mondo.")

COMENIUS KAJ ESPERANTO.

Jan Amos Komensky (1592-1670).

Malgranda ĉeĥoslovaka nacio, kiu vivas en meza Eŭropo, prave fieriĝas pro sia eminenta pedagogo, la fame konata **Jan Amos Komensky** (latine: Comenius), kiu jam en la 17-a jarcento parolis en siaj multaj verkoj pri la neceso de unu internacia helpa lingvo. Dum pli ol 30 jaroj okupis sin Komensky, la eminenta reforminto de lernejoj, per nia idealo: per la helpo de universala lingvo krei la fratecon kaj pacon inter la homaj gentoj.

Komensky estis la lasta episkopo de la Ĉeĥa Nacia Eklezio, nomata "Ĉeĥaj Fratoj," kiu estis multe persekutata de la tiama registaro de Habsburgoj. Li ne povis trankvile labori en sia amata patrujo; al li estis destinita—pro la amo al sia religio—vagadi kaj morti en la fremdlando. Lia ĉefverko estas la "**Didaktiko**," en kiu li montris ne nur al siaj samlandanoj, sed helpe de la latina traduko al aliaj nacioj, kiamaniere eduki kaj instrui la junularon. Estante ekzilanto en Londono, li detale preparis sian verkon "**Via lucis**" (Vojo de lumo), en kiu li plej multe skribas pri nova lingvo universala, kiun oni devus kaj povus krei, ĉar la internacia lingvo latina jam tiam ne sufiĉis por novaj bezonoj kaj esprimoj—

Estu tie ĉi cititaj kelke da esprimoj de la nobla Komensky, kiu per la universala lingvo volas helpi al la tuta homaro.

En "Via lucis (1641) li skribas:

"Do neeviteble ankaŭ nun, kiam ni serĉas kaj esperas reformon de la tuta mondo, estos bezona al tiuj, kiuj disdonos lumon de Saĝo, donaco de la lingvoj, aŭ estos bezona al diversaj nacioj ia unu lingvo komuna. Kaj tio,

LA KORNIKO KAJ LA KRUCĜEGO.

Korniko, preskaŭ mortanta pro soĝo, trovis krucĝegon, kiu enhavis iomete da akvo ĉe la fundo. Sed la korniko ne povis atingi la akvon. Denove kaj denove li penis, sed sensukcese. Tiam li provis faligi la krucĝegon, por ke li povu havigi al si la akvon; sed li ne estis sufiĉe forta ĉi tion fari.

Fine li rimarkis multon da ŝtonetoj ĉirkaŭkuŝantaj. Post multe da klopodo li kunigis ĉi tiujn, kaj faligante ilin en la krucĝegon unu post la alia, li fine levigis la akvon ĝis la rando, kaj tiel povis trinki.

THE CROW AND THE PITCHER.

A crow, almost dying with thirst, found a pitcher which had a little water in the bottom. But the crow was not able to reach the water. Again and again he tried, but without success. Then he tried to knock the pitcher over, so that he might get at the water; but he was not strong enough to do this.

At last he noticed a number of little pebbles lying about. After much trouble he gathered these together and, dropping them into the pitcher one by one, he at last raised the water up to the brim, and so was able to drink.

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth. W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masterton (N.Z.) Esperanto Club.—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Workshop-rd., Masterton. Visitors welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunveno: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18^h.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo

"State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Coburg Esperanto-Grupo—Kunvenas ĉiŝaŭde je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. repreŝu.)

MANGO KAJ LABORO.

Estas konata al ĉiuj unu el punktoj de la fundamenta leĝo de Sovetio, de ĝia konstitucio:

"Nelaboranto ne mangas."

Ĝia signifo kaj enhavo estas tiu, ke la nutraĵoj estas distribuataj en Sovetio proporcie al la kvanto da soci-utila laboro. Kiu ne deziras partopreni en tiu ĉi soci-utila laboro, tiu ne ricevas nutraĵojn. Nuntempe tiu principo estas tre rigore plenumata en Sovetio: se iu laboristo pro maldiligento, sen konsiderinda kaŭzo forestis ĉe laboro eĉ unu tagon—li estas maldungata kaj samtempe ĉe li estas forprenata la rajto aĉeti la nutraĵojn laŭ la ŝtataj prezoj kaj li havas nur la solan eblon—aĉeti la nutraĵojn ĉe bazaro laŭ la prezoj de libera merkato, multe pli altaj ol la ŝtataj. Kiu ne deziras labori, tiu ne ricevas la rajton aĉetadi nutraĵojn laŭ la malaltaj ŝtataj prezoj, li ne ricevas karton, kontraŭ kiu la nutraĵoj estas vendataj en magazenoj. Ju pli grandan soci-utilon prezentas la laboro farata, des pli grandan kvanton da nutraĵoj ricevas la laboranto. Tial, ĝenerale, laboristoj ricevas pli multe, da nutraĵoj, ol oficistoj.

(El "Soveta Esp-a Unia Bulteno.")

kvankam ŝajnas esti neebla, tamen ne estas tia; la lasta estas ankaŭ pli facila ol la unua, ĉar pli facile povas ĉiuj el-lerni ion novan kaj unu lingvon, ol unu homo ĉion. Do estos absolute necese elekti tiun vojon, ke oni formu ian lingvon por la tuta mondo komunan, kiun ĉiuj nacioj (eĉ tre nekleraj) povus facile ellerni."

Komensky deziris, ke tiu nova helpa lingvo estu ne nur por kleraj homoj, sed por ĉiuj, por ke oni povu per ĝi disvastigadi inter ĉiuj nacioj la lumon kaj civilizon, por ke la nacioj ĉesu malami sin kaj komprenu unu la alian.

La nova lingvo—laŭ Komensky—devas esti pli facila ol ĉiuj aliaj, por ke oni povu ĝin lerni sen perdo de tempo, pli ĉarma ol ĉiuj ceteraj, por ke estu ĝojego ĝin instrui kaj lerni, kaj harmonia. Se tia lingvo estos iam akceptita, "ĝi estos la plej konforma ilo por unuigo de homoj..."

Pri la ebleco de tia artefarita lingvo Komensky neniam dubis. Li diras en "Via lucis":

"Oni eble ne dubas pri ebleco konstrui lingvon novan. Se tamen iu dubas pri tio, mi diras, ke tic estas ebla."

"Kiel Zeuxis, kiu Helenon pentri volante, al si venigis belkreskajn virgulinon, kiom da ili estis eble trovi, kaj ĉion zorge ĉe ĉiuj ekzameninte, li aplikis tion al sia Heleno, tiel io simila ankaŭ ĉi tie povus fariĝi, se, kion ajn iu lingvo havas speciale solidan, ornaman, se do ĉio tio de ĉie estus kolektita kaj en tiun unu lingvon harmonie kunportita, por ke el multaj ĉarmoj fariĝu unu..."

Prave diras ĉeĥoslovaka esperantista poeto dr. Schulhof:

"Por la samaj celoj idealaj,

kiujn ni nun sekvas, plej kristalaj, batis ankaŭ lia bona koro."

JULIE ŠUPICHOVA (Praha).

Alter.—P. 49, col. 1, line 15, "facts" (face); p. 53, col. 3, line 32, "filo" (fialo).

NEXT NUMBER—July 18.

Latest Date for "Copy"—July 10.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencej. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 153 (14th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

18 JULIO, 1933.

— N. Z. E. A. SECTION —

(12th OFFICIAL BULLETIN)

Activities during February—May Period.

With the aftermath of the 4th New Zealand Congress attended to, the NZEA Executive has been concentrating mainly on finalizing the task of inaugurating a correspondence course of Esperanto tuition; and it is with great satisfaction that the Executive is now able to place the scheme before the public for general participation. Before this stage was reached, however, much work of an exacting and varied nature had to be accomplished; but thanks to the diligence of the NZEA Tuition Committee, which collaborated enthusiastically throughout, obstacle after obstacle has been overcome, with the result that the Committee is now awaiting the proofs of the lessons and of a prospectus to be issued simultaneously. Quotations from two newspapers (morning and evening) in Auckland, Wellington, Christchurch, and Dunedin have been obtained as a preliminary to an advertising campaign; and it is hoped that in the near future—perhaps before these notes appear—the scheme will have been launched and that as

a result the NZEA tutors will be engaged disseminating the language.

For general information, the following particulars of the course are announced. Members are urged to make the details as widely known as possible:—

The Course has been designed for the purpose of coaching persons who desire to possess a sound working knowledge of Esperanto by means of private study in their own homes.

The fee for the Course is £2/2/- (payable in advance) of which in no circumstances will a refund be made.

The fee includes the cost of the student's textbook ("The Concise Course in Esperanto," by L. N. Newell), and the student's membership to the NZEA for the current year.

Comprising 20 lessons, the Course covers the complete Esperanto grammar and contains sufficient instruction to enable a student to advance to a stage where reading, writing, and speaking should be practised in order to become an accomplished Esper-

antist. On completing the Course, however, the student may obtain additional tuition, if so desired, from the Tutor for a moderate fee.

The lessons will be released by the Association's Tutor at the rate of one lesson each week, irrespective of whether or not a student has submitted written work for an earlier lesson.

The responsibility of the NZEA in connection with the Course will cease on the delivery of the 20th lesson and of the Tutor's comment and corrections (if any) thereon.

All communications regarding the Course should be addressed to the Honorary Secretary, N.Z.E.A., Room 106, G.P.O. Bldg., Wellington, C.1.

The NZEA Standing Committee

met on May 5, and besides arranging for the Correspondence Course to be proceeded with, it considered (1) the new international federation; (2) the issue of a special leaflet advocating membership of the NZEA; and (3) the proposal emanating from the Masterton Club that one club accept a financial member of another New Zealand club as a financial member for the remainder of the year in the event of a member's removal to a town where a club operates. Regarding these matters it was decided in the case of (1) that the question be

held in abeyance meanwhile; (2) that a draft be prepared; and (3) that the views of the clubs be ascertained, as the arrangement had much to commend it. (N.B.—All four clubs now operating in New Zealand accepted the proposal.)

Membership Matters.

Compared with last year's figures, the strength of the membership this year is exceedingly well maintained. At June 1 the position was as follows: Number on NZEA roll, 262; financial, 77 (including 4 new members) of whom 45 have accorded their support continuously since the NZEA was founded (Jan., 1929). Two members have paid next year's subscription in advance. It is gratifying to note that 13 who were nonfinancial last year have re-joined this year.

The remainder on the roll (185) are accounted for in various ways: during recent years 9 submitted written resignations; 6 left New Zealand; and the correspondence of 8 others has been returned as undeliverable, leaving 162 members who have not responded to the call this year. Twenty-four of these were financial members last year, and it may be assumed that at least 13 of them will yet re-join the NZEA before the close of the year (Nov. 30), thus raising the number of financial members to last year's total—90, which fact would indicate that bedrock has been reached.

(Members and intending members are reminded that the annual subscription to the NZEA is 2/6, and that any number of years' fees may be paid in advance, this arrangement enabling a yearly task to be avoided. Payment may be made either by postal-notes or by Id. postage-stamps; and correspondence should be addressed to Wm. H. King, Room 106, G.P.O., Bldg., Wellington, C.I.)

Donations.

Although no special appeal for funds has been made this year, the Donations Account (1933) shows a total of £1/10/6, comprised of the following amounts, for which we sincerely thank the donors: Mrs. Jean Allan, 10/-; Mrs. Lovell-Smith, 7/6; Mrs. A. Chapman-Taylor, 5/-; Miss L. Corkill, Mrs. F. E. Facer, and Mr. F. W. Luhnig, 2/6 each; E.P.C., 6d. Besides these sums, the NZEA has in hand three years' donations of 7/6 each

from Mrs. L. Lovell-Smith, Christchurch, a very generous friend of the NZEA since its foundation.

Propaganda, etc.

The NZEA continues to serve usefully in this field, although enquiries of a general nature have not been so numerous since the full force of the economic depression has been felt. Oversea visitors to New Zealand, some of them prominent in the public eye, have been brought into contact with Esperanto by leaflets mailed them by the NZEA; and a number of persons domiciled within the Dominion have also been supplied with suitable information. During the past quarter several members utilised the services of the NZEA to obtain information, books, etc.

In New Zealand one seldom meets adverse editorial criticism of Esperanto. The long peace was, however, broken by "The New Zealand Truth" during May, when a sub-leader was published which amply demonstrated that the editor required enlightenment regarding Esperanto. This was duly passed on to him by the NZEA. Other recent activities included: (1) Details regarding the NZEA's late patron, Sir Robert Stout, were given to Prof. Waldo H. Dunn, of America, who visited New Zealand for the purpose of writing the late Sir Robert's biography; (2) in accordance with a request published in the UEA official organ, "Esperanto," a letter explaining the state of the Esperanto movement in New Zealand was forwarded to the Societas Latina, Munich, Germany, which is so behind the times as to propagand the dead language Latin as a universal auxiliary tongue; (3) information concerning the NZEA was forwarded to UEA for inclusion in the forthcoming Year Book; and (4) a long and forceful letter advocating the use of Esperanto by the League of Nations was written to "The Evening Post," Wellington. It was duly published and met with no opposition.

5th N.Z. Congress.

As decided by the 4th congress, Wellington will be the venue of this year's annual gathering. The dates are yet to be fixed, but no doubt the Executive will favor Christmas or New Year—either being convenient time for Esperantists not resident in the congress town, who, when in the

past contemplating a vacation, have made arrangements to attend congress during their holidays. Congress details will, however, be announced by circular later in the year. Meanwhile the Wellington Club is diligently at work preparing for the occasion as many Esperanto-speaking students as possible, and it is confidently anticipated that a good number of recently-joined club members will be sufficiently advanced to take a keen interest in congress affairs, thus assisting the longer service members and pioneers to make the gathering a success.

At this juncture New Zealand "samideanoj" are requested to bear the congress in mind with a view to being present. Apart from attending a function of a entertaining and educational nature, every Esperantist present will also be directly aiding the diffusion of what has proved to be a sure key to international understanding and goodwill—Esperanto. For this reason alone the annual congress is invaluable.

It is scarcely necessary to add that also any visiting Esperantists from across the Tasman will be cordially welcomed.

—W.H.K.

NIA POSTO.

A.T. en C.V. "To get into trouble": Fari al si malbone (malbonon, malfeliĉon, embarason, zorgojn, malagrablaĵojn, suferon, ĉagrenon, maltrankvilon, turmenton; implikiĝi).

"His troubles were not yet over": Liaj embarasoj (mizeroj, zorgoj) ankoraŭ ne finiĝis.

"He brought trouble on himself": Li kaŭzis (venigis) al si embarasojn, zorgojn k.t.p.

"A shipwrecked man"; "They were shipwrecked": Ili fariĝis ŝiprompiĝuloj (Marta 57/17). Ili suferis ŝiprompiĝon. Ili ŝipo rompiĝis. Iuj jam uzis "vrak" (A. wreck, G. Wrack).

"She heaved a sigh of relief": "Ŝajnas, ke nek "sopir" nek "ĝem" estus bone uzebla ĉi tie. En "Pinokjo" troviĝas "suspiro" kun noto "suspiro: senvoĉa spireto de kontento aŭ sopiro." Oni povus diri: "tre faciligite (pro facilego) ŝi ellasis spiron de kontento" (Batalo de l'Vivo 34/10, 56/13).

Skoltoficiro hungara volas korespondi kun aŭstralianoj pri ĉiaj temoj. Johano Battanos, Szeged, Kisfaludi-utca 2, Hungarujo.

La Kristflineto jam starigas la Preternacion Konstancion surtere. Klariĝos Eliot, 2 Cambridge St., Willoughby, N.S.W.

RECENZOJ

Hungara Antologio.—Redaktis K. Kalocsay. Kunlaboris J. Baghy, K. Bodo, L. Halka, F. Szilagyi, L. Totsche. 472 paĝoj kaj 24 klišopagoj. Prezo sv. fr. 12, broŝurita; sv. fr. 14 bindita. Eldonis Literatura Mondo, Budapest, Agento, L. Thomson, ĉe ni.

En la antaŭparolo de ĉi tiu grandioza verko diras ĝia kompilinto Kalocsay: "Mi rezignis pri la kompleteco por doni prefere interesan legaĵon." Malnovaj prozaj literaturistoj ne trovas lokon por si; la unua en la vico de l'proza estas Mors Jokai (1825-1904). Ĉiu verkisto reprezentata komencis skribi antaŭ la milito, do ilia valoro jam "eltenis la kritikon de certa tempo." La volumo tial ne estas tiome dokumento de l'hungara literaturo, kiom interesa, plezure legebla elektitaĵaro.

Sekvas la antaŭparolon longa, iom fundpensa studo pri la hungara literaturo plume de Mihaly Babits, originale verkita en la franca, kaj trad. Totsche. Iom mire, ke en ĝi Babits ne tuŝas la prozan sed limigas sin je la poezia flanko.

Frapas tuj la ega amplekso de la Kalocsay'a laboro; la poezia parto estas preskaŭ tute de li tradukita (131 poemoj el 141), kaj ŝajne neniu el ili aperis ekster ĉi tiu volumo.

Sandor Petofi (1825-1849), la eksterlande plej konata hungara poeto, ricevas pro graveco la plej grandan spacon, sekvata de Endre Ady (1877-1919), orgenvoĉa lirikisto, Janos Arany (1817-1882), giganto de l'epiko, kaj la ankoraŭ vivanta Mihaly Babits, unu el la ĉefaj fekunduloj de l'nun-Eŭropa penso. Entute 28 poetoj, 30 prozistoj kontribuas.

La tento laŭtere kritiki la poemojn estas forta, sed subpremenda. Ni iom haltu ĉe "La Kimraj Bardoj" de Arany, kiu certgrade pensigas anglon pri la similtéma "The Bard" de Thomas Gray. En la Esp-a reverkaĵo ĉe certaj strofoj ŝajnas esti troa elipso. Ekzemple strofo 3:—

Kaj ĉu la pleb', la pia pleb',
Prosperas laŭ la trud'
De mia vol'; pli juĝe ol
La ŝarĝotrena brut'?

Parafraze ebla: Kaj ĉu la pia plebo prosperas laŭ mia jam esprimita volo? Aŭ ĉu ĝi vivas sub pli ĝena juĝo ol tiu sub kiu laboras la ŝarĝotrena bruto?

Ĉe strofo 5:—

Kaj ho la pleb', la pia pleb',
Prosperas tie, Sire,
Kabanoj, jen, en tomba sven'
Silentas, sen ĝemspir'.

"Sire" (angla titolo de respekto) estas prononcata "sajr," kaj do "ne rimigiĝas kun "spir".

La kortuŝe naivan "Infanludiloj" simpatiantaj animoj legos kun larmoj, kun ridoj.

Pri la prozo. Aparte impresas aŭ pro bona traduko aŭ pro intensa intereso: La Andersen-stila, Kiun el la sep. La verda muŝo kaj la flava sciuro, Pentristo en vilaĝo. La monaĥo predikas akvon—inda la plumo de Bokaĉjo; La leteroj de la poŝtestro, Rakonto pri

la fratinoj Tunderlaki, Kontraŭ la aŭron, Mitologio—mirinda lingvaĵo; El la aventuroj de Milos Lukits.

Per velura lingvo Totsche skizis la ĉeftraĵojn de la temperamentoj kaj verkmanieroj de la 58 aŭtoroj. Komprenible, al nehungarlingvano ne estas eble kontroli pri la gradoj de respeguleco laŭ kiuj la tradukintoj reverkis la diversstilajn originalojn en Esp-on. Tiu nur povas atesti pri ilia mirakla form-kreemo, ilia facila povo belkonfide modli frazojn ĝis tio, ke la paĝoj kvazaŭ aromas la freŝon de nove plugita tero.

Notoj: 179, "Ŝuisto malriĉa vivis iam en ĉi tiu granda urbo Budapest, kiu neniel povis ricigi per sia metio." (Vivis iam en ĉi tiu granda urbo B. Ŝuisto malriĉa, kiu . . .); 186, "traŝultre" (transsultre); 189, "figmontrado" (montrado de malestimo?); "gakado" (grakado); 207, "civitana filio" (?); 208, "pumikipon" (argilo pipo?); 214, "sal-idolo" (aludo al Genezo 19/26; bezonas noton por nebilianoj); 257 "Scool" (School); 267, "puberteco" (ne en Plena Vortaro, vira seksmaturo); 292, "horor". Se "horori" signifas "esti terurita," kial uzi la novan radikon? Cetere "horor" ne egalas "terur". La angla "horror" kaj "terror" havas markitajn diferencojn. 298, "Ankaŭ li volus vidi nimfon . . . li ĉirkaŭprenus ilin" (gin); "lapithoj" (ankaŭ sennota! Lapithae); 319, "rimeneca tero" (?); 419, "(La malsatanto) premis sian glatan (platan!) ventron." Kelkaj preseraroj makulas.

Ĉi libro staros kiel monumento al la fido, amo kaj kuraĝo de hom-areto, kiu scipovis teni la koron kaj manojn je diligenta laboro, dum ĉirkaŭ ili steroris Eŭropo konvulsianta.

MERKADO LA AZENPELISTO.

Oni bele faris elektante ĉi tiun verkon kiel la unuan novelon tradukotan el la modernhebrea lingvo. En simplaj, ĉarmaj frazoj Naum Jeruŝalmi rakontas la vivbatalon de juna judo, Merkado. La patrino, Sarina, fariĝinte vidvino, estas devigita memakiri la porvivo: ŝi iras do en anglan misiospitalon kiel kalandristo, per tio evitante humiligon pripeti monhelpon ĉe la ĉefoj de la komunumo. Ŝia ĉeestado ĉe nejudoj ofendas ŝiajn konantojn, sed ŝi, ignorante ilian koleron, per propraj fortoj subtenas sin kaj edukas sian filon laŭ la kultaj ritoj. Fine iu Ŝabtaj, neĵuna scienculo, akceptas Merkadon en servon, parte pro inklino al la knabo, parte pro premo de liaj najbaroj, kiuj opinias, ke Merkado, ĉirkaŭata de kristanaj influoj, tre povas perdi fidon je la patra religio. Alegrina, la filino de Ŝabtaj, kaj Merkado fariĝas intimaj amikoj, kaj finfine la klaĉo nomas ilin geamuloj.

En 1914 Sarina mortas, kaj Merkado dungigas sin ĉe araba azenpelisto vojaĝadanta tien-reen inter Hebrono kaj Jerusalemo. La aŭtoro en ĉi-paĝoj majstre vortpentras la teruran fortostreĉon, kiun devas fari la azenpelisto

dum tiu senripoza piedirado de tri tag-noktoj.

Dum Merkado tiel laboras, Alegrina ricevas svatojn flanke de tute por ŝi nekonvenaj aspirantoj. Unu, la diboĉula Hako, malĵuna vinisto, klopodas ekspluati la malfacilan situacion de la nun malriĉa Ŝabtaj, sed lia trudado, ankaŭ tui de Ĝamil-effendi, juna dano eks-ateŝeo, vaniĝas, ĉar la koro de Alegrina kaj tiu de Merkado jam marŝas en plena takto. Pli kaj pli proksimiĝas al krizo la malbona stato de la Ŝabtaj'a domo. Tiam ĝustatempe Merkado elpensas planon, pro kio li kuraĝe ruze entreprenas kaŝan penetron de la armelinioj inter Hebrono kaj Jerusalemo. Servigante al si la unikajn cirkonstancojn kreitajn de la angla-turka batalpozicio, li sukcesas manovri en Jerusalemo negocon varaĉetan kaj monŝanĝan, kiu riĉigas lin ĝis grado ebliganta lin savi liajn protektanton kaj amatinon.

La traduko estas laŭdinde modela, sed ni notis:

P. 27, "batita ŝoseo." Ĉu ne Konstruita? Ŝajne la tradukanto erare pensis pri la Franca "batir" (konstrui). Se ne, eble plibone, uzi "komune uzata," ĉefa, landa vojo." Kp. 124,131; 39, "li eniris kun kulto." Ĉu ne "kun (profunde) religia sento"? "Unika" ofte uzata anstataŭ "solnura," "nursola." "Unika" signifas "sola en sia speco." 89, "la maldekstra flugilo (de armeo)," (alo); 115,131, "kontinuiĝi" anst. simple "daŭrigi": "M. ekmovis la ŝultrojn, aludante (komprenigante per tio), ke al li estas tute egale . . .".

Eldonejo, N. Szapiro, Warszawa, Nowolipki 8. Paĝoj 140. Prezo 2 Sv. fr. Tradukis Levi Wiener. Havebla per B.E.A.

—ROBO.

KOMENSKY ANTAŬVIDIS ALVENON DE RADIO.

Tute nekonata eĉ al fakuloj pri Komensky (Comenius) estis la fakto, ke „la granda instruisto de l' popoloj“ skribis en la libro Schola ludus kelkajn rimarkojn, kiuj vere profete aludas alvenon de aviado, filmo, radio, televido: „ . . . venos la tempo kaj estos konstruitaj ŝipoj naĝantaj ne sole super la akvo; oni konstruos flugaparatojn kaj homoj flugos el Eŭropo al Azio kaj Afriko; estos konstruitaj aparatoj, kiuj ebligos, ke amikoj interparolu tra la aero trans distancoj de kelkaj centoj da mejloj, oni konstruos aparatojn kaj per ili estos eble vidi ĉion kiel vivan . . . Se vi volas, ke tiuj ĉi saĝaj aferoj realiĝu, zorgu, ke en ĉiu komunumo estu multe da saĝaj homoj, zorgantaj pri bona administrado de la komunumo, pri bona klerigo de la junularo; ĉar la plej granda riĉaĵo de la komunumoj estas saĝaj civitanoj kaj da tiuj estos sufiĉe, se la junularo estos gvidata al saĝeco“.

Rememoru la vortojn de Komensky pri la lingvo internacia, por kompletigi al vi la bildon de la granda genio ĉeĥa.

(El "Progress," Prahoo.)

SERIOZE KAJ SERCE

Se la bona Dio donas al vi spritecon, portu ĝin kiel vian glavon en la glav-ingo, kaj ne svingu ĝin por teruri la tutan kunularon.

—CHESTERFIELD.

La homo estas la sola kreitaĵo, kiu ridas kaj ploras; ĉar li estas la sola kreitaĵo, kiu rimarkas la diferencon inter tio, kio estas kaj tio, kio devas esti.

—HAZLITT.

"Mi opinias, ke estas hontinda afero, ke komediistoj ricevas pli grandajn salajron ol la ministroj!"

"Ho, mi ne. Plejparte ili estas pli amuzaj."

"Vi diras, ke vi kaj via edzino neniam malpaĉas?"

"Neniam—Ŝi agas laŭ sia volo, kaj mi agas laŭ ŝia."

Trompadi homojn en kredon, ke vi estas tio, kio vi ne estas—jen la esenco de la triviala karaktero.

Mi kredas, ke ordinare timo antaŭ libera diskutado indikas nefortikecon de interna konvinko en tia timanto; kaj ke troa sindetenemo esprimadi la proprajn opiniojn estas signo de malforta karaktero.

—OLIVER W. HOLMES.

Misiisto skribante al siaj parencoj diris, "Bedaŭrinde mi ne ankoraŭ sukcesis persvadi la indiĝenojn, ke ili ne manĝu homkarnon; sed dank' al Dio, ili lernis uzi tranĉilon kaj forkon."

"Mi ne presos tian sensencaĵon!" diris la redaktoro fierege, dum li redonis la manuskripton.

"Nu, ne necesas, ke vi estu tiel aroganta pro tio," respondis la verkisto. "Vi ne estas la sola, kiu rifuzas presi ĝin."

"Mia edzino ne diris eĉ unu vorton al mi hodiaŭ, kaj estas la datreveno de mia nasktago."

"Gratulojn!"

LI: Ĉu vi rimarkis, ke tiu beleta fraŭlino ridetis al mi?

SI: Jes, mi ne povis ne ridi ankaŭ, kiam mi vidis vin por la unua fojo!

Mussolini kaj Lingvoj.

Diras la Daily Telegraph: ". . . la angla lingvaĵo de Mussolini estas bona; lia parolposedo de la franca estas perfekta. Kun Kapitano Goering ankaŭ en germana li interparolis flue. Krome, li havas tre utilan konon de la hispana. Ĉiuvespere por sekurigi al si bonan dormon li legas libron en la franca, la germana, la angla, aŭ alia lingvo dum horo. Per tio li konstante tenas tiujn lingvojn por si faciluzaj."

Ni rekomendas al La Duĉo Esperanton, sed ne kiel dormigilon!

LA FAKTURO.

Knabo, kiu ĵus eniris la butikon de epicisto.—"Unu funton da sukero je kvardek centimoj, unu funton da butero je du frankoj, duonfunton da fromaĝo je okdek centimoj, unu kilogramon da kafo je kvar frankoj, kvindek kaj unu litron da vinagro je naŭdek centimoj. Se mi donas al vi dek frankojn, kiom vi repagos al mi?"

Spicisto, skribinte ĉion sur peco de papero.—"Nu, unu frankon kvardek."

Knabo.—"Bonvolu doni al mi tiun fakturon; ĝi estas mia lerneja tasko por morgaŭ matene. Danke."

(El "Revuo Orienta.")

LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO.

Baldaŭ la suno leviĝos. La ĉambro estas tre aermanka.

De tempo al tempo Aligatorio rigardas la muron. Subite ĝi tre interesiĝas; ĝi sin trenas kelkajn kolorojn pli proksimen al la intermureto, kaj ĝia korpo travibras. La haroj sur ĝia kolo ekhirtiĝas kaj la batallumo montriĝas en ĝiaj flavaĵoj okuloj. Ŝi scias la signifon de tiu ĉi kaj ekprenas la bastonon.

Estas fendego ĉe ambaŭ flanko de la malalta parto de unu el la platoj en la intermureto. Malbonega paro de malgrandaj globetsimilaj okuloj bruletas ĉe unu el la truoj. La serpento—ĝi estas nigra—malrapide elglitas ĝis ĉirkaŭ unu futo, kaj movas la kapon supren kaj malsupren. La hundo kuŝas senmove, kaj la virino sidas kvazaŭ ensorĉita. La serpento elglitas pluen. Ŝi levas la bastonon, kaj la rampaĵo, kvazaŭ subite eksentante la danĝeron, metas la kapon en la truon ĉe la alia flanko de la murplato, kaj rapide komencas tiri la voston post ĝi. Aligatorio eksaltas, kaj enfermas la buŝgon. Ĝi malsukcesas, ĉar ĝia nazego estas granda, kaj la serpento estas en la angulo inter la murplato kaj la planko. Ĝi ree ekmordas kiam la vosto preterglitas. Nun ĝi ekkaptas la serpenton kaj tiregas ĝin.

Bat! Bat!—la bastono frapas la teron. Aligatorio ree tiregas. Ĝi havas la serpenton nun—nigra rampaĵo, longa je kvin futoj. La kapo leviĝas por pikfrapi, sed la hundo tenas la malamikon apud la kolo. Ĝi estas granda, peza hundo, sed rapida kiel foshundo. Ĝi skuas la serpenton kvazaŭ ĝi sentas la

Originan Malbenon komune kun la nomaro. La plej aĝa knabo vekiga, ekprenas sian bastonon, kaj penas ellitiĝi; sed lia patrino devigas lin resti tie, per fersimila manpremo.

Bat! Bat!—la dorso de la serpento rompiĝas en kelkaj partoj. Ĝia kapo estas trakasita, kaj la nazego de Ahgatoro ree estas senhaŭtigita.

Ŝi levas la frakasitan rampaĵon per la bastonpinto kaj ĵetas ĝin en la fajron. Tiam ŝi amasigas la brullignon kaj rigardas dum la serpento forbruliĝas. La knabo kaj la hundo observas ankaŭ. Ŝi metas la manon sur la kapon de la hundo, kaj la tute sovaĝa kolera lumo forlasas ĝiajn flavajn okulojn. La pli junaj intanoj trankviliĝas, kaj baldaŭ ekdormas. La knabo staras momenton, en sia ĉemizo, observante la fajron. Baldaŭ li rigardas al ŝi, vidas la larmojn en ŝiaj okuloj, kaj ĵetante la brakojn ĉirkaŭ ŝia kolo, ekkrias: "Patrino, mi neniam iros brutarpei—kondamnu min, se mi ĝin faros!"

Kaj ŝi premas lin al sia ellacigita brusto, kaj kisas lin; kaj tiel ili sidas kune, dum la pala taglumo aperas super la sovaĝejo.

(Fino)

HUNGARIAN POST MOVES.

POSTCARDS WITH OFFICIAL ESPERANTO TEXT.

Office of Gen. Director,
Budapest, 29/4/33.

Sirs,—I have the honor to inform you that the Administration of the Hungarian Posts has now published a series of postcards, 16-filler denomination, with 16 different illustrations, and bearing explanatory texts not only in Hungarian and French but also in Esperanto.

Yours, etc.,

(Chief Director) Szalay.
Hungarian Posts and Telegraphs,

This is possibly the most important step taken by a high authority in favor of Esperanto since the language was accepted as "clear" by the International Telegraphic Union in 1925. It means that in a country of 11 million people postcards bearing Esperanto text can be bought at every post office. The propaganda value of such is surely hard to overestimate, and the innovation strengthens the claim that Esperanto is steadily gaining prestige in influential quarters. As a land more or less culturally isolated by reason of its language being of the remote and little studied Finno-Ugric group, Hungary daily feels its accentuated difficulties caused by language diversity. It is not surprising then that the postal authorities of the country should adopt Esperanto as one of the chief means in bringing order from chaos.

The success is the result of long and

persistent labor by the International Central Committee of the Esperanto Movement and Hungarian Esperantists, who for many months have made the matter the object of careful planning and tactful execution. Furthermore, one may be certain that the Chief Director, Baron Szalay, as an eminent polyglot and specialist in his calling, weighed well all the implications and possible consequences attendant on the decision before making it. He opened the Universal Esperanto Congress at Budapest in 1929.

These illustrated cards are beautifully produced. They bear a special printed stamp. The view is on the left hand side together with explanatory text in Hungarian, French and Esperanto. They may be used inland, and without further franking for communication with Austria, Germany, Italy, Rumania, Czechoslovakia, Vatican State and Poland. With the added requisite stamps they may be posted to any part of the world. For the present the issue will be confined to the 16-filler denomination, but it is hoped to see the series extended to the higher ones.

The success is highly encouraging to every Esperantist and to all those internationally minded; but it will be necessary to consolidate the position. Voices appreciative of this utilising of Esperanto in a fresh field should, from all corners of the world, be directed to the right quarter. This present edition should, with the right public recognition, mark the beginning of the permanent application of Esperanto in the service of the world's post.

Let your approval find expression in a card to Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado, 11 Rue Mont St. Blanc, Geneve, Svislando, who are organising the collective response to the progressive step just taken.

(From "Heroldo de Esperanto," Koln.)

KRONIKO.

Coburg Esperanto Club, Victoria.—La klubo senhalte progresas. Tion montras fakto, ke en junio aliĝis ankoraŭ naŭ membroj. La libreja komitato elektis la sek-ion (s-ro Spencer) bibliotekisto, kaj raportas pri la unua aĉeto de dek verkoj. Membroj povas pruntepreni legaĵojn ĉe la butikoj de s-ro Spencer, en Victoria Street. La klubdelegitoj, kiuj ĉeestis la kunvenon de la A.L.E.A., substrekas la neceson de mona subteno flanke de tiuj, kiuj volas helpi la disvastigon kaj praktikan

uzadon de la lingvo. Multaj anoj lastatempe ricevis leterojn kaj gazetojn el aliaj landoj.

"ESPERANTO" TAKES WYNN SELLING PLATE AT CHESTER.

At 12½ to 1 the plater "Esperanto," ridden by B. Carslake, won the above for Lord Willoughby de Broke at Chester, Eng., on May 4. The race was for two-year-olds, of £196.

NOKTURNO.

Estis ĉirkaŭ meznokto. La arbo-borderita eksterurbeta vojo estis kvieti. La elektraĵoj lampoj je interspacoj super la mezo de la vojo faris lagetojn el lumo sub si, kaj ĵetis flikaĵarajn desegnojn el lumo kaj ombro inter la arboj sur la trotuaron. Ĉirkaŭitaj de bone atentitaj ĝardenoj la domoj kvazaŭ dormis pace.

Ĉe stratangulo du amikoj staris interparolante. Estis nur malofte, ke ili povis pasigi vesperon kune sen la ĉeesto de aliaj, tial, antaŭ ol fine disiĝi, ili deziris iom plilongigi la kuneston. La interparolo pritraktis la enloĝantojn de la domo antaŭ kiu ili ĝustatempe sin trovis.

"Mi admiras Blogs," diris unu el la du. "Viro, kiu komencis sian karieron kiel simpla laboristo, memedukis sin kaj atingis sian nunan pozicion sole per sia propra peno, nepre devas esti iom neordinara."

"Eble vi pravas," respondis la alia. "Tamen, mi ne multe estimas Sinjorinon Blogs. Ŝi estas tro afekta, ĉiam tro bone vestita—kaj ne estas infanoj."

"Nuntempe estas pli mode preferi hundetojn . . ."

Je tiu-ĉi punkto la interparolo interrompiĝis per neatendita okazaĵo. Fenestro sur la flanko muro de la domo malfermiĝis subite kaj viro saltis en la ĝardenon. Surprizite la du amikoj rigardis unu la alian. Penso trafis ilin ambaŭ samtempe. Ŝtelisto! Fakte, dum la pasintaj kelkaj semajnoj okazis pli ol unu domrabo en la najbaraĵo.

Ili observis la viron en la ĝardeno. Liaj movoj ja estis suspektigaj. Momenton li staris en la ombro ĵetita de la domo, tiam, de ombro ĝis ombro li komencis ŝtelmarsi trans la ĝardeno, ne rimarkante la du observantojn. Ili sin kaŝis kviete apud la barilo ĉirkaŭ la ĝardeno. Laŭŝajne la viro ne intencis uzi la pordegon de la ĝardeno, ĉar li iris rekte al la angulo kie atendis la amikoj. Antaŭ ol atingi la bari-

lon li haltis por spioni la straton. Neniu preterpasanto aperis. Li grimpis super la barilon.

Guste kiam liaj piedoj trafis la pavimon la du amikoj sin ĵetis sur lin kriante: "Tiun-ĉi fojon vi ne savos vin."

Li provis forskui ilin, sed ili tenis lin firme.

"Kio estas al vi?" li demandis indigne. "Mi ne estas ŝtelisto. Mi ĵus vizitis la domon."

"Vizitantoj eliras porde, ne fenestre," diris unu el la amikoj sentence. Venu kun ni."

Ili ekprenis lin al la ĝardena pordego.

"Sed, sinjoroj," protestis la kaptito, "Ne faru skandalon. Mi estas Gerald Fitzherbert, de la teatra kompanio nun ludanta en la urbo."

Verdire, li estis sufiĉe eleganta. Sed la alia amiko pensis en si, ke ŝtelisto povus subteni elegantan aperon pere de ŝtelitaj vestaĵoj, tial li respondis eĉ pli sentence:

"Eble vi estas; eble vi ne estas tiu. Estas plibone certiĝi ol bedaŭri. Venu."

Sed la kaptito havis alian intencon. Li komencis barakti. Li estis juna kaj atleta, sed la amikoj, kvankam ne tiom agemaj, havis superaĵon laŭ pezeco. Tien-reen trans la trotuaro ŝvingigis la lukto, sed, malgraŭ la fortika baraktado de la kaptito, prosperis al la amikoj lin treni ĝis la pordego. Maljuna servisto kun pantolono surtirita sur la noktovestaĵo alproksimiĝis de la domo laŭ la aŭtomobil-vojeton. La tri viroj, ankoraŭ luktantaj, sin apogis al la pordego. La maljunulo malfermis ĝin, kaj la luktantoj falis kune sur la vojeton. Nerve kriante "Kio estas?", la maljunulo ŝancelmarsiis ĉirkaŭ ili simile al timigita, kova kokino. Neniu el ili rimarkis la alproksimiĝon de luksa aŭtomobilo laŭ la vojo.

Antaŭ la gvidilo estas s-ro Blogs. Lia dikmuskola korpo kuŝis nerigide sur la molaj sidkusenoj de la veturilo. La grandaj, kapablaj manoj tenis nestreĉe la gvidilon. Sur la fortaj trajtoj de lia vizaĝo, kutime sufiĉe bonhumora, akre malkontenta esprimo bildiĝas. Li pensis pri la edzino pli kaj pli malvarmiĝanta liaflanke, kaj pri la granda hejmo neniam gajigita de infanoj voĉoj.

Alveninte antaŭ la propra pordego li turnis la aŭtomobilon por eniri, sed ĉesigis ĝin subite. Ekmirigite li rigardis la scenon lumigitan de la brilaj antaŭlampo. Tri tute nekonataj viroj

luktis sur la grundo, kun la maljuna servisto kiel ekscitita rigardanto. La ĉeesto de tiu lasta avertis s-ron Blogs, ke eble la okazaĵo iamaniere koncernas lin persone. Li elpaŝis el la veturilo rapide.

Kiam li alproksimiĝis al la grupo, la luktantoj sin starigis. Unu el ili alpaŝis al s-ro Blogs por klarigi la okazaĵon. La dua tenis per la brako la trian, kiu sin turnis dorse kaj provis kaŝi la vizaĝon. En la daŭro de la klarigo la vizaĝ-esprimo de s-ro Blogs iĝis pli kaj pli maldolĉa. Kiam la klariganto haltis por repreni spiron, la alparolito demandis kviete:

"El kiu fenestro li elvenis?"

"El la dua sur la malproksima flanko de la domo," estis la tuja respondo.

"La ĉambro de Sinjorino Blogs!" ekkriis la servisto. "La juveloj!"

Neatendite la kaptito sin ekturnis al s-ro Blogs.

"Mi ne rabis ion al vi, sinjoro," li diris rapide, kolere. "Mi certigis vin, ke tiuj-ĉi sinjoroj tute eraras."

"Ho! Estas vi, ĉu?" diris s-ro Blogs. Kaj kvankam li parolis kviete, estis malvarma minaco en lia voĉo. La kaptito silentis. La du amikoj rigardis unu la alian embarasite: laŭŝajne la novveninto kaj la kaptito estas konatoj. Momenton s-ro Blogs rigardis s-ron Gerald Fitzherbert malestime, tiam, kun evidenta ĝuo, kaj per firme faldita pugno li subite batis al li la okulon. Biff!!!

La sekvantan tagon la du amikoj sin okupis per siaj diversaj aferoj sed sur iliaj vizaĝoj okaze briletis rideto kvazaŭ je la memoro de ia amuza okazintaĵo. Iu elegantulo klarigis al siaj konatoj kiel, la antaŭan vesperon, li hejmen venis iom ebria, faletis sur la pordmato kaj kontuzis la vizaĝon kontraŭ la perono. S-ino Blogs, pro nebona sano, subite decidis pasigi nedefinitan tempon apud la marbordo. Kaj s-ro Blogs intervjuis advokaton famkonatan pro la lerta pledo de maledziĝaj procedoj.

—HORATIO BAGS.

PIEDPILKO (FUTBALO).

Piedpilko asocia estas la plej disvastigita sporta ludo, alloganta plej grandan kvanton da aktivaj partoprenantoj-ludantoj kaj da spektantoj. La ludon faras batalo de du trupoj, konsistantaj el golulo (golejgardanto), 2 defendantoj, 3 interligantoj aŭ kuruloj kaj 5 atakantoj. La ludo okazas sur

ebena kvarangula ludkampoj, kiu estas limigata per linioj. Pli longaj linioj estas nomataj flanklinioj, plimallongaj —gollinioj. Tra mezpunktoj de la flanklinioj iras mezlinio. Mezo de tiu linio estas centro de la ludkampoj, ĉirkaŭ kiu oni desegnas centran rondon. Meze de la gollinioj troviĝas golejoj. Apud la golejoj estas desegnataj golspaco kaj punspaco. Ludilo estas pilko, havanta ekstere ledan kovrilon kaj interne kaŭĉukan globforman kameron. La tasko de ĉiu trupo estas enĵeti pilkon kiel eble plej multfoje en golejojn de kontraŭulo t. e. ĵeti golon, goli. La ludo daŭras 90 minutojn, dividitaj per paŭzo je du duontempoj. La ludantoj, krongojlo ĉe sia flanko, ne rajtas tusi pilkon per manoj. Se la pilko estas elĵetita trans flanklinio, ĝi estas enĵetata per manoj de ludanto de alia trupo. Se la pilkon transigis atakanta flanko estas farata golspaca ĵeto (per defendanto), se la pilkon elludigis defendanta flanko—angulĵeto (per atakanto). Pro krimetoj la konkurjanto punas per liberĵeto. Senpera golo rezultita de liberĵeto ne estas poentata. Pli gravaj krimoj estas punataj per 11-metra ĵeto. Senpera golo, rezultita de dekonumetra ĵeto estas poentata.

(La supra estas tirita el bulteno de La Sovet-Esperantista Unio.)
Futbalistoj traduku!

KONGRESOJ UNIVERSALAJ DE ESPERANTO.

Por facila sciigo ni donas ilin:—

Jaro	Urbo	Anoj	Landoj
1905	Boulogne	688	20
1906	Geneva	1,200	30
1907	Cambridge	1,314	35
1908	Dresden	1,500	40
1909	Barcelona	1,300	32
1910	Washington	357	20
1911	Antwerp	1,800	42
1912	Cracow	1,000	28
1913	Berne	1,203	30
1914	Paris	3,739	50
1915	San Fran.	163	16
1920	s'Gravenhage	408	27
1921	Prague	2,561	35
1922	Helsinki	850	30
1923	Nuremburg	4,963	38
1924	Vienna	3,400	43
1925	Geneva	953	35
1926	Edinburgh	960	36
1927	Danzig	905	34
1928	Antwerp	1,494	36
1929	Budapest	1,256	33
1930	Oxford	1,217	27
1931	Cracow	777	26
1932	Paris	1,618	36
1933	Cologne	?	?

[The Paris (1914) Congress was not held, owing to outbreak of war.]

ATENTU VIRINOJ!

MONOLOGO DE KOMIZINO

(kun pardonpeto al Sekspiro)

Ĉu edziniĝi aŭ ne edziniĝi?—
Jen la demando. Ĉu pli noble estus
Sin edziniĝi kun insulta edzo,
Aŭ stenografistiĝi, kaj labori,
Ho ve! por edzo de aliulino.
Ami—edziniĝi—kaj edzinule
Finfini zorgojn ĝenajn kaj trudemajn,
Virinajn heredaĉojn? Ho! jen estus
Dezirindega celo. Amindumi—
Edziniĝi—eble ekdeziniĝi—
Jen la pikilo! Kiaj malbonaĵoj
Veni povas dum edzecej songoj,
Post la forĵeto de l' deĵoroj niaj,
Farigi nin ruzegaj? Ho! jen tio,
Kio ŝancelas tiome da fraŭlinoj:
Alie kiu volus elportadi
La daŭran laboraĉon—la ŝercon
De la estro—insulton ĉefkomizan—
Turmentojn pezajn de l' oficubaĉo—
Haladzon de malkaraj cigaredoj,
Malbonodorigantan ŝian haron?
Si mem ja povas ĝin rapide fini
Edzece. Kiu do ne volus ŝanĝi
Por kuirej' malpuran oficejon,
Por forno aŭ lulilo, skribmaŝinon,
Krom tiu ĉi timeg' pri malbonaĵo
Venonta eble post mielmonato?
Kaj kiu do, en ŝvito kaj en ĝemo,
La ŝarĝojn oficejajn volus porti,
Se ne la tim' pri kio povas veni
En tiun edzinecon, tiun landon
Nekonatan, el kiu homoj multaj
Elvenis jam per fama voj' Reno'a (1),
Ja konsternigas nin, kaj nin instigas
Ke niajn deĵorojn ni tenadu,
Kaj ne al nekonataj aĉoj flugu?
Ho! tiel malkuraĝo fraŭlinigas,
El virinaro, tiel multajn anojn.

—Tradukis A.E.M.B. (Brisbane).

(1) Reno, usona urbo, en kiŭ oni povas facile havigi al si leĝan eksedziĝon.

Versoj por gasteja libro:

"Finas tempo de l'libero,

Ĉesas dolĉa ripozdaŭro;

Al la polva urbinfero

Hom' revenas kun bedaŭro.

R. SCHWARTZ.

"Amikeco estas la nektaraj gutoj,
kiuj ebligas al ni glutadi la naŭzan
medikamenton de la Vivo." Sam.
Johnson.

"Ĉiu homo bezonas en sia vivo fide-
lan amikon kaj malican malamikon—
la unua por lin konsoli kaj la dua por
teni lin ĉiamvigla." Sokrato.

"Ah, la nepriskribebbla komforto sin senti spirite senĝenata en kompanio de certa homo, kiarĉi ĉi ne bezonas kvazaŭ pesi ĉiun penson aŭ mezuri ĉiun vorton, sed povas ilin verŝadi libere en iliaj unuaj formoj, lolaĵon kaj bongrenon kunkune, plene sciante, ke fide-la mano ilin kribros, konservos la indan, kaj per la spiro de ama komprenemo la neindan blovos for." Dinah Mulock.

"Kion vi sercas ekstere, tion vi jam posedas interne." Guyon.

"Ĉiam estas pli facile gajni la koron de viro ol daŭre teni ĝin; oni gajnas ĝin per momenta ĉarmo—oni tenadas ĝin nur per prudento longa la tutan vivon."

"Vi pli bone helpas vian fraton montrante per la vivo tion, kio kristano estas ol per klarigado de tio, kion kristano kredas." Lewis Carroll.

Historia Instruisto: Kio okazis en 1483?

Klasano: Lutero naskiĝis.

H.I.: Bone. Kaj kio en 1487?

Klasano (post ioma paŭzo): Lutero fariĝis kvarjaraĝa.

RADIO COLUMN

Speakers are requested to send in by 16th August at latest, particulars of any broadcasts arranged.

Esperanto lessons will be broadcast from 3AR (Melbourne) at 7.45 p.m. on the dates mentioned below. An anecdote will be read at the end of each lesson to enable students to check their pronunciation.

July 22.—Edzo—La kuiristino tute fuŝis ĉi tiujn terpomojn. Ili estas tute malvarmaj.

Edzino—Ili ja estas tiaj. Mi timas, ke ŝi kuiris ilin en malvarma akvo.

August 5.—Simson (al fiŝvendisto)—Jetu al mi dekduon da tiuj trutoj.

Fiŝvendisto—Jetu ilin, sinjoro?

Simson—Jes, ĉar por tio mi povos iri hejmen kaj diri al la edzino, ke mi ilin kaptis. Mi eble estas nelerta fiŝkaptisto, sed mi ne estas mensogulo.

August 9.—Kuiristino trobakinte pecon de viando, kiu pezis kvar funtojn, forĵetis ĝin, kaj raportis al sia mastrino ke la kato formanĝis la viandon. La sinjorino metis la katon sur la pesilon, kaj la pezo de la kato estis ĝuste kvar funtoj.

—Nu, Mario, ŝi diris,—jen estas la kvar funtoj da viando sed kie estas la kato?

La Preternacio Konstancio. Leĝo rilate la enmigradon. Eliot, 2 Cambridge St., Willoughby, N.S.W.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Auckland Esperanto Society, 5/-, May, '34, (adv.) 5/6, May, '34; Mr. O. Behncken, 4/6, March, '34; Melbourne Esperanto Club, (subs.) £1/12/-; Mr. E. Pate, 4/6, May, '34; Sydney Esperanto Society (sales), £1/12/-; Mr. McDonald, 4/-, March, '34; Mr. Waterman, 5/-, July, '34; Miss Paling, 5/-, July, '34; Dr. Woolnough, 4/6, June, '34; Miss H. Nankivel, 4/6, June, '34; Miss M. Denham, 4/6, June, '34; Coburg Esperanto Group (sales), 8/8; Melbourne Esperanto Socy. (adv.), 3/-; Mr. Guilbert (gift) 10/-, (sub.) 4/6, June, '34; Mr. Dornbusch, 4/6, July, '34; Miss Sanderson, 4/6, May, '34; Mr. D. B. Thomson, 4/6, April, '34; Mr. Cox, 4/6, June, '34; Miss Irwin, 4/6, July, '34; Brisbane Esperanto Society (sales), 12/-; Mr. J. Girwood, 4/6, June, '34; Mr. J. Eliot (adv.), 2/-.

MELB. ESPERANTO SOCIETY.

The Annual Meeting of the Melb. Esperanto Society was held in the Scots' Church Hall, Russell St., on 4th July. The following were elected for the ensuing year:—President, s-ro P. T. B. Hudson; Vice-presidents, s-ro Ballard, D.B.E.A., f-ino. Bostock; Secretary, f-ino. L. M. Irwin, D.B.E.A.; Treasurer and Librarian, f-ino. V. Cox, D.B.E.A.

Reports were received from officers re the working of the Society in the past year. A cordial invitation is extended to new members, also to old members to renew their interest in the Society by frequenting the meetings. In welcoming members of other Clubs, the Society invites the co-operation of all for the propagation of our common ideal—Esperanto.—L. M. IRWIN, Sec. M. Esp. Soc.

Mr. and Mrs. Kidd and their little son from Brisbane were holidaying here during last month, and were cordially welcomed at the Society. A few Surrey Hills Esperantists gathered at the home of Mr. E. J. Cox to meet the Brisbane samideanoj, and a pleasant evening was spent.

NEW ZEALAND ESPERANTISTS!

For 12 years LA SUDA KRUCO has steadily served the interests of the Esperanto Movement in the Southern Seas. Through this issue, serving as the Bulletin of your Association, it earnestly appeals for your interest and support. Regularly appearing every 36th day, it will be mailed to you for 5/- a year.

Send your subscription NOW to: LA SUDA KRUCO, BOX 731F, ELIZABETH-STR., MELBOURNE.

PRI ANATOLE FRANCE.

De "Leti."

Antaŭ ne longe mi tralegis manuskripton en kiu iu karaktero (virino) plendis, ke ŝi neniam povas diferencigi inter la ironio kaj la sarkasmo. Ŝia edzo tiam klarigis, jene:—„Ironio, karulino, estas la plej bona punilo, kiun la Grekoj postlasis al ni por malkaŝi malsaĝecon kaj nejustecon. Por kontraŭi nescieman, superŝtican kaj antaŭjuĝeman zorgantaron de malsaĝaj moroj kaj kredoj, la Grekoj ne kuraĝis uzi rektan kritikon. Tial, ili inventis ironion, metodo diri la malon al tio, kion ili signifis." Fakte la Ironio ŝajnas ĝentile laŭdi la celitan objekton de kritiko, kaj unuatempe nur tre lertaj personoj povis diveni la kaŝitan signifon. Tamen, iom post iom, inter la lertuloj troviĝis eĉ la zorgantoj de la atakitaj konvencioj. Inter la Grekoj Sokrato estis devigita trinki venenajon! Tra la miljaroj aliaj batalantoj por la toleremo, kiu en la lasta analizo ĉiam samsignifas kiel persona libereco, ankaŭ suferis diversforman punadon. La esprimo de Ironio atingis sian plej lertan kaj ĝentilan ekfloron de sub la plumo de franca genio, Anatole France. Li neniam hezitis inter peza sarkasmo, kiu celas vundi, kaj ironio, kiu samtempe trapikas kaj tiklas la kritikiton. Ofte sub la ombro de pontifika kaj registara malpermesoj, Anatole France tamen vivis longe kaj mortis "kiel nemortemulo, ano de la Franca Akademio".

Pri La Paco Nur Post Finvenko.

Kiel laŭdinda kaj bongusta estas ĉi tiu afero, kiu kaŭzas, ke ni elektu bonefaritan, perfekte formitan, sveltan, maturiĝintan pacon, pacon, kiu alportos al ni honoron kaj gajnon, mallonge, pacon post nia fina venko. Vere, ĉi tiu bona paco eble atendigos nin dum ankoraŭ iom da tempo. Set ne urĝas. La Milito kostas al Francujo nur dek milojn da viroj ĉiutage. (daŭrigota.)

Respondo: Elefantidojn.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

The Princess and the Bean.

There was once a prince who wished to marry a princess, but it had to be a real princess. So he travelled about the whole world to find such a one, but everywhere there was something in the way. Princesses there were plenty, but whether they were real princesses he could not satisfy himself, for there was always something that did not seem quite right. He therefore came home again and was quite sad, for he wished so very much to have a real princess.

One night a terrific storm came on; it thundered and lightened and the rain poured down, till it was quite dreadful. There was then a knocking at the gate of the town, and the old King went to open it.

It was a princess who stood outside the gate. And, oh dear! what a state she was in! The water ran down from her hair and her clothes, in at the toes of her shoes, and out at the heels, but she said she was a real princess. "Well, that we'll soon find out," the old Queen thought. She said nothing, however, but went into the bedroom, and having taken all the things off the bed, laid a small bean upon the slabs, upon which she heaped twenty mattresses, and then twenty eider-down beds upon the mattresses. There the princess slept that night.

In the morning she was asked how she slept. "Oh, abominably badly!" she answered. "I have scarcely closed my eyes the whole night. Heaven knows what there may have been in the bed! but I lay upon something hard, so that I am black and blue all over my body. It is quite dreadful!"

It was evident then that she was a real princess, since she had felt the bean through the twenty mattresses and the twenty eider-down beds. No one could have so very fine a sense of feeling but a real princess. So the prince married her, for he knew that now he had a real princess; and the bean was placed in the royal museum, where it may still be seen if no one has taken it.

La Princino kaj la Fabo.

Foje estis princo, kiu deziris edziĝi kun princino, sed ŝi devus esti vera princino. Do li vojaĝadis tra la tuta mondo por trovi tian, sed ĉie estis io, kio malhelpis. Estis multe da princinoj, sed ĉu ili estas veraj princinoj li ne povas sin kontentigi, ĉar ĉiam estis io, kio ne ŝajnis tute prava. Li tial revenis hejmen kaj tute malĝojis, ĉar li tiel forte deziris havi veran princinon.

Unu nokton okazis terura ventego; tonbris kaj fulmis, kaj la pluvo falegis ĝis estis tute terure. Tiam estis frapado ĉe la pordego de la urbo, kaj la maljuna reĝo iris por ĝin malfermi.

Estis princino, kiu staris ekstere ĉe la pordego. Kaj, ho kara! kia stato estis al ŝi! La akvo defluis de siaj haroj kaj vestoj, en la supiedojn, kaj el la sukubutoj, sed ŝi diris, ke ŝi estas vera princino. "Nu, ni baldaŭ eltrovos tion," pensis la maljuna reĝino. Ŝi tamen nenion diris, sed eniris la litĉambron, kaj depreninte ĉiujn kovrilojn, metis malgrandan fabon sur plat-trabon, sur kiun ŝi amasigis dudek matracojn, kaj tiam dudek molanasajn litojn sur la matracoj. Tie la princino dormis tiun nokton.

En la mateno oni demandis, kiel ŝi dormis. "Ho, abomene malbone!" ŝi respondis. "Mi apenaŭ fermis miajn okulojn la tutan nokton. Ĉielo scias, kio povis esti en la lito! sed mi kuŝis sur io malmola, tiel ke mi estas nigra kaj blua sur mia tuta korpo. Estas tute terure!"

Estis evidente, tiam, ke ŝi estis vera princino, ĉar ŝi sentis la fabon tra la dudek matracoj kaj la dudek molanasaj litoj. Neniu povus havi tian delikatan senton de palpado krom vera princino.

Do la princo edziĝis kun ŝi, ĉar la sciis, ke nun li havas veran princinon; kaj la fabo estis metita en la reĝan muzeon, kie ĝi ankoraŭ povas esti vidata se neniu ĝin forprenis.

(Legantoj komparu ĉi tiun tekston kun tiuj de Zamenhof—Vol. 1, Fabeloj de Andersen—kaj Skeel-Giorling, ĉi-lastarekte el la dana originalo, Esperanta Biblioteko Internacia, N-ro 2.)

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masterton (N.Z.) Esperanto Club.—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Workop-rd., Masterton. Visitors welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro C. Brandon. Komunikadojn al

la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunveno: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18h.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo.

Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Coburg Esperanto-Grupo—Kunvenas ĉiujauĝe je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

NEXT NUMBER—August 23.
Latest Date for "Copy"—August 16.



(Nova Serio)

Redakcio-Ad ministracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 6 pencoj. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 156 (14th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

23 AŬGUSTO, 1933.

THE EDUCATIONAL VALUE OF ESPERANTO.

In view of the great need, under modern conditions, for a simple yet adequate international auxiliary language, which could be learned in all civilised lands, and freely employed in speech and writing in all walks of life, we desire to call attention to the merits of Esperanto, and its place in education.

This language has now stood the test of forty-five years' practical use. Its success has been demonstrated at no less than twenty-four International Congresses, commonly attended by upwards of 1,000 persons, representing thirty to forty nationalities. No interpreters are needed at these gatherings, or at the sectional meetings of specialists which are held in conjunction with them or at other times.

Not only is there a wide-spread and fluent use of the language for travel, cultural intercourse, and personal friendship, but its achievements for technical and professional purposes are already considerable. Esperanto lectureships have been established at the Universities of Liverpool, Geneva and Cracow; original works in the language have been published *inter alia* by Prof. Baudouin on Auto-suggestion, by Prof. Bovet on Psycho-analysis, and by Prof. Collinson on Language. Much scientific and technical matter has appeared, particularly in Japan, where it has included papers and treatises on such diverse subjects as the strength of materials, inorganic and organic chemistry, and meteorology; in the same country a pharmaceutical vocabulary has been issued in Esperanto, and several technical dictionaries

in the language have been published in Europe, including one of nearly 4,000 terms issued by the international society of Esperantist doctors. During 1931 alone, 1,204 Esperanto talks and 514 lessons were broadcast from wireless stations in 21 countries, including Japan.

The international society of Esperantist teachers has on its files the names of nearly 7,000 teachers (in sixty countries) who know the language, and over 1,000 schools (in thirty-two countries) where Esperanto classes have been set up. These include elementary and secondary schools in Great Britain, and it is of interest to mention that the Board of Education for England and Wales has for many years permitted school and evening classes in Esperanto when a request has been made for their establishment.

We advocate the adoption of Esperanto as the first language to be studied, after the mother tongue, in the schools of all countries, both on general grounds and for the following specific reasons:—

- (1) A working knowledge of Esperanto can be obtained in a remarkably short time compared with that required for national languages, which abound in difficulties of grammar, idiom, and pronunciation; thus the study of it is profitable even for pupils who have not the time or ability to learn an ordinary foreign language well enough to be able to use it.
- (2) It tests linguistic ability, and assists the teacher more rapidly to select the pupils who can profitably take up the study of

other tongues, to which it is an excellent introduction.

- (3) Its logical grammar, and the fact that its method of expression is lucid and unambiguous, tend to develop accuracy in the use of words.
- (4) A knowledge of Esperanto not only acts as a stimulus to the learning of other languages, but also leads to a more effective study of geography, including an interest, gained through correspondence, in the life of other countries in all parts of the civilised world.
- (5) Esperanto literature, both original and translated, is constantly increasing, and is already sufficient to justify a study of the language for its own sake.

We heartily associate ourselves with the efforts that are being made to introduce Esperanto as a regular subject of instruction, and to encourage its use in the schools of the world.

T. GRAHAME BAILEY, M.A., B.D., D.Litt., Reader in Urdu and Hindustani, University of London.

T. C. BAILLIE, M.A., D.Sc., Principal West Ham Municipal College.

W. E. COLLINSON, M.A., Ph.D., Professor of German, and Buchanan Lecturer in Esperanto, University of Liverpool.

CHAS. W. COWEN, M.A., President, National Union of Teachers, 1929.

C. B. FAWCETT, B.Litt., D.Sc., Professor of Economic and Regional Geography, University of London.

J. J. FINDLAY, M.A., Ph.D., M.Ed., Honorary Professor of Education, University of Manchester.

- ALEXANDRA FISHER, M.A., D.Litt., Headmistress, Girls' County School, Bishop Auckland.
- J. C. FLUGEL, B.A., D.Sc., Assistant Professor in the Dept. of Psychology, University College, London.
- S. MARGERY FRY, M.A., L.L.D., Late Principal of Somerville College, Oxford.
- G. P. GOOCH, M.A., D.Litt., Fellow of the British Academy.
- G. H. GREEN, M.A., Ph.D., Lecturer in Education, University College of Wales, Aberystwyth.
- T. GWYNN JONES, M.A., Professor of Welsh Literature, University College of Wales, Aberystwyth.
- N. P. JOPSON, M.A., Reader in Comparative Slavonic Philology, King's College, London.
- C. W. KIMMINS, M.A., D.Sc., Late Chief Inspector, Education Dept., L.C.C. (1904-23).
- JOHN A. PEART, M.A., Director of Education, City of Winchester.
- EMILY PHIPPS, B.A., Barrister-at-Law, Late Headmistress, Municipal Secondary Girls' School, Swansea. Late Ed. of "The Woman Teacher."
- W. RAMSDEN, D.M., Fellow of Pembroke College, Oxford; Emeritus Professor of Bio-Chemistry, University of Liverpool.
- NOWELL SMITH, M.A., Formerly Headmaster of Sherborne.
- G. A. SUTHERLAND, M.A., Principal of Dalton Hall, University of Manchester.
- J. R. R. TOLKIEN, M.A., Rawlinson and Bosworth Professor of Anglo-Saxon, University of Oxford.

(Reprinted from "The British Esperantist.")

BAPTADO DE LA PINGVENOJ.

(Noto: "L'Ile des Pingouins," verko de Anatole France, concernas ĉefe la sanktulon Mael, kiu ricevas signon de la ĉielo, ke li devos fari evangelian vojaĝon. En mirakla ŝtona barko foririnte, li sukcesas konverti sesdek insulojn kaj tiam revenas al sia abateco ĉe Yvern. Poste, konsternite aŭdinte, ke liaj konvertitoj refalas en paganisman, li denove ekiras al la insuloj, dum kiu vojaĝado li trafas sur la scenon de la jena priskribo, la Insulon de la Pingvenoj.)

La sankta homo jam preskaŭ ron-diris la insulon, ne renkontante iun loĝanton, kiam li atingis vastan cirkon formitan el rokoj brunflavaj kaj ruĝaj, plenan de belsonaj akvoŝtaloj, kaj kies supraĵo bluiĝis en la nubojn.

La rebrilado de la polusa glacitavolego brulis la okulojn de la maljunulo. Tamen lumeto ankoraŭ malforte penetris liajn ŝvelintajn palpebrojn. Li videtis animhavajn figurojn, kiuj sin prezentis en etaĝoj sur la rokoj, kiel

homamaso sur la deklivoj de amfi-teatro. Kaj sammomente, al liaj oreloj, surdigitaj de la daŭra muĝado de la maro, alvenis nebrua sono de voĉoj. Pensante, ke ĉi tio estas ja homoj vivantaj sub natura leĝo, kaj ke la Sinjoro vojaĝigis lin por ke li instruu al ili la leĝon dian, li ilin ekevangeliis.

Sin muntinte sur altega ŝtono en mezo de la sovaĝa cirko: "Loĝantoj de ĉi tiu insulo," al ili li diris, "kvankam vi havas etan staturon, vi aspektas malpli kiel trupo de fiŝistoj kaj maristoj ol kiel la senato de saĝa respubliko. Per via seriozeco, via silento, via trankvila sinteno, vi faras sur ĉi tiuj sovaĝaj rokoj kunvenon komparindan kun la Konskriptaj (1) Pastroj de Romo konsiliigantaj en la Templo de Venko, aŭ plue, kun la filozofoj de Ateno disputantaj sur la benkoj de la Areopago (2). Sendube vi posedas nek ilian sciencan, nek ilian genion, sed povas esti, ke, en rigardo de Dio vi pli gravas ol ili. Mi opinias, ke vi estas simplaj kaj bonaj. Promenante sur la bordo de via insulo, mi vidis nenian idolon de murdo, nenian postesignon de mortigado, nek kapojn nek kaphaŭtojn de malamikoj pendigitajn sur stangoj aŭ najlitajn sur la pordegoj de viaj vilaĝoj. Ŝajnas al mi, ke vi ne havas artaĵojn, kaj ke vi ne scias labori pri metaloj. Sed viaj koroj estas puraj kaj viaj manoj senkulpaĵ. Kaj la vero facile eniros en viajn animojn."

Nu, kion li vidis kiel homojn kun etaj staturaj sed kun seriozaj mienoj, tio estis gepingvenoj reunuigitaj de la printempo, kaj kiuj aranĝis sin en paroj sur la naturaj ŝtupoj de la rokaro, ĉiuj rektaj kun la majesto de iliaj grandaj blankaj ventroj. De momento al momento ili movis, kiel brakojn, siajn flugiletojn kaj faris paĉajn kriojn. Ili ne timis la homojn, ĉar ili ne konis ilin kaj neniam ricevis malbonon de ili, kaj estis en ĉi tiu religiulo iu dolĉeco, kiu rekuraĝigis la plej timemajn animalojn, kaj kiu ege plaĉis al ĉi tiuj pingvenoj. Ili sin turnis al li kun amika scivolemo, kun iliaj etaj rondaj okuloj pliflongigitaj antaŭe per blanka ovala punkto, kiu donis al ilia aspekto ion bizaran (F. bizarre: "strangeta, eksterkutima) kaj homan.

Kortuŝite de ilia akcepto, la sanktulo instruis al ili la Evangelion.

"Loĝantoj de ĉi tiu insulo, la tera tago, kiu ĵus leviĝis super viaj rokoj, estas bildo de la ĉiela tago, kiu leviĝas en viaj animoj. Ĉar al vi mi portas la internan lumon; al vi mi portas la lumon kaj la varmon de la animo. Kiel la suno degelas la glacion de viaj montoj, tiel Jesuo Kristo degelos la glacion de viaj koroj."

Tiel la maljunulo parolis. Kiel ĉie tra la Naturo voĉo alvokas voĉon, kiel ĉio, kio spiras en la taglumo, ŝatas alternativajn kordojn, tiel ĉi tiuj pingvenoj respondis al la maljunulo per la sonoj de siaj gorĝoj. Kaj iliaj voĉoj estis molaj, ĉar la pingvenoj estis en la sezono de la amo.

Kaj la sankta homo, konvinkita en si, ke ili apartenas al idolama popolo, kaj ke en sia propra lingvo ili faras aliĝon al la Kristana kredo, ilin invitis ricevi la bapton.

"Mi opinias," li diris al ili, "ke vi ofte banas, ĉar la kuvetoj en la rokoj estas plenaj de pura akvo, kaj mi vidis, dum mi venadis al via kunveno, ke kelkaj el vi ensaltis en ĉi tiujn naturajn banojn. Nu, pureco de la korpo estas bildo de spirita pureco."

Kaj li instruis al ili la devenon, la naturon kaj la efikon de la bapto.

"La bapto," li diris al ili, "estas Adopto, Renaskiĝo, Renovigado kaj Lumigado."

Kaj al ili li sinsekve klarigis ĉiun el ĉi tiuj punktoj.

Plue, beninte la akvon, kiu falis de la akvoŝtaloj, kaj redirinte la ekzorcizojn, li baptis tiujn, kiujn li ĵus instruis, verŝante sur ĉiun kapon unu guton de pura akvo kaj eldirante la sanktan parolon.

Kaj li tiel baptadis la birdojn dum tri tagoj kaj tri noktoj.

Kunveno en Paradizo.

Kiam en la Paradizo oni konis pri la baptado de la pingvenoj, okazis nek ĝojo nek malĝojo, sed iu granda surprizo. La Sinjoro mem embarasigis. Li alvokis kunvenon de klerikuloj kaj doktoroj kaj demandis ilian opinion, ĉu la baptado havas validecon.

"Estas nule," diris Sanktulo Patriko.

"Kial estas nule?" demandis Sanktulo Gal, kiu evangelie konvertis la popolon de Kornvelo (A. Cornwall) kaj instruis al la sankta homo Mael liajn apostolajn laborojn.

(Granda disputo sekvas inter la sanktuloj. Kelkfoje la Sinjoro devas pacigi la kunvenon, kaj fine Li akcep-

tas la konsilon de kvietanima Hermas, kies patrino estis Safiro. Noto de la trad.)

Kiam ordo estis restarigita, maljunulo Hermas sin levis kaj malrapide parolis ĉi tiujn vortojn:

"Mi vin laŭdas, Sinjoro, ĉar Vi igis, ke mia patrino Safiro, naskiĝu inter Via popolo en tiu tempo, kiam la roso de la ĉielo refreŝigis la teron naskdolorantan pro ĝia Savonto. Kaj mi al Vi laŭdas, Sinjoro, ĉar Vi donis al mi, ke mi vidu per miaj mortemaj okuloj la Apostolojn de Via Dia Filo. Kaj mi parolos en ĉi tiu solena kunveno, ĉar estas Via volo, ke la vero eliru el la buŝoj de la humilaj, kaj mi diras: 'Ŝanĝu ĉi tiujn pingvenojn en homojn. Estas la sola decido, konvena al Via justeco kaj al Via pardonemo'".

Kelkaj doktoroj petis permeson paroli, aliaj ekparolis. Neniu aŭskultis, kaj la tuta konfesoraro tumulte ŝancelis siajn palmobranĉojn kaj siajn kronojn. La Sinjoro, per unu gesto de la dekstra mano, pacigis la kvirelojn de siaj elektitoj.

"Ne plu konsiliĝu," li diris, "La opinio esprimita de milda, maljuna Hermas estas sola konvena je miaj eternaj planoj. Ĉi tiuj birdoj estu ŝanĝotaj en homojn. Mi antaŭvidas per tio kelkajn malfacilaĵojn. Multaj inter ĉi tiuj homoj faros pekojn, kiujn ili ne farus kiel pingvenoj. Certe, ilia sorto, per ĉi tiu ŝanĝo, estos malpli bona ol se ili estus sen ĉi tiuj bapto kaj enkorpiĝo en la familion de Abraham. Sed estas konvene, ke mia antaŭscio ne forprenu iel de ilia libervolo. Poŝ ke mi ne malhelpu homan liberecon, mi ignoros, kion mi scias; mi remetos sur la okulojn la nebulon, kiun mi travidis, kaj en mia blinda klarvidipovo mi lasos, ke mi surpriziĝu je tio, kion mi prae vidis."

Kaj tuj alvokante la ĉefangelon Rafaelo:

"Vi trovu," li al li diris, "la sanktan homon Mael; informu lin pri lia eraro kaj ordonu al li, ke, armite per mia Nomo, li ŝanĝu ĉi tiujn pingvenojn en homojn."

(1) **Konskriptaj:** L. conscriptus, participo de conscribere, enregistri. La Konskriptaj Patroj; tiel nomitaj ĉar iliaj nomoj estis enregistritaj sur la skribulaĵo de la senato.

(2) **Areopago,** kaj postaj litoj.

Vidu la Novan Testamenton ĉe Agoj 17/19-31.

POST BAG.

A.E.A. in C.—According to the Universala Vortaro -ant signifies "the ending of the present participle active in verbs," that is, one performing the action denoted by the root; -ul signifies "person noted for" (or better, person characterised by). In other words, -ant stresses the doing of the action; -ul stresses the characteristic, inherent or incidental, of the individual. The difference, in our particular case at least, is a fine one, and "komenculoj" is as good as "komencantoj" for the purpose of our heading.

Bo. in T.—"Parker" is a root of the U.V. and signifies that which the English mean by "by heart." "Perkore" would not have that signification, because one does not learn by the heart, but by the memorising faculty of the brain. Very likely Zamenhof was influenced by the French "par coeur." Although the adverbial form is most used, one finds also "parkeri," "parkeri," "parkera." Notice also that he gave us, too, the form "volont" as a root with a special meaning, not the same as the participle of "voli."

Abituriento.—Kompreneble ni devas eviti doni impreson, ke la tipa Espisto estas filistro, malŝatanta entute la klasikajn lingvojn. Niaj kritikaj atakoj estas tute nur kontraŭ la troa pretendemo de tiuj, kiuj laŭ nia sincera opinio faras asertojn favore al tiuj lingvoj absolute senbazajn. La studado de mortintaj idiomoj, ekster ĉia diskuto, ankoraŭ havas sian valoron.

S-ino C.T. en N.Z.—La radiko "koneks" troviĝas en la plimulto de modernaj vortaroj. La Plena Vortaro difinas: Koneksa:—Interligita; proksime interrilata kun analoga afero.

ZAMENHOF- KAJ ESPERANTO-STRATOJ.

Laŭ novaj informoj ni povas la donitan nomaron kompletigi. Pri iuj urboj nun nomataj ni ne havas fidindajn sciigojn, ĉu la menciata nomo estis efektive donita kaj ĉu la okazinta decido ne estis ŝanĝita. Tiel okazis ekzemple en Brno, kiu do ne havas—kontraŭe al gazetaj sciigoj—straton de Zamenhof.

Ni estos tre dankaj por ĉiu sciigo koncernanta ĉi tiun aferon.

Liepaja (Latvio)—Esperanto iela.
Bergen - op - Zoom (Nederlando)—Plaats van dr. Zamenhof.

Bor-Haida (Ĉeĥoslovakio)—Zamenhofgasse.

Dusseldorf (Germanio)—Samenhofweg.

Vich (Hispanio)—Carrer Dr. Zamenhof.

Mulhouse (Francio) — Rue Dr. Zamenhof.

Neuenahr (Germanio)—Zamenhofstrasse. "La Progreso," Praha.)

PROFESSOR LODEWYCKX AND ARTIFICIAL LANGUAGES.

Everyone interested in the problem of International Language welcomed the series of talks given by Professor Lodewyckx over 3AR recently. We feel, however, impelled to comment on two of the points touched on by the lecturer, viz., the strength of the organised Esperanto movement, and the fitness of Esperanto as a literary medium.

The professor said: "Statistics published five years ago showed some 50,000 Esperantists organised in groups or associations throughout the world; probably the actual number of people practising the language amounted to between 500,000 and a million." This is only partly correct. The statistics referred to were compiled by Dr. Dietterle, president of the German Esperanto Federation, in 1928. His honest and conservative estimate, most carefully arrived at, gave "126,508 Esperantists of whom we have trustworthy knowledge. They are found in more than 100 countries, in more than 7,000 places of the world. Of these 41,751 are organised in 1,776 groups . . . The figures are, however, incomplete, and therefore too low." Authorities at the time calculated that it would approximate to the truth to say that the 126,508 represented around ten per cent. of those using Esperanto throughout the world. (Vide "Esperanto," Geneva, July, 1928.)

It may be added that in 1922, owing to political causes, the Soviet Esperantists severed connection with the central body in Geneva, the Universal Esperanto Association. This fact made it extremely difficult to rightly appraise the strength of the movement in Russia, where Esperantists may be found in the most remote places of that vast dominion. Only in recent years has a definite organised plan been formulated to gather these individual adepts into the Soviet Esperantist Union.

Then said the professor: "Basic English is not really suitable for literary use. The older auxiliary languages, Esperanto, Ido, etc., being even more artificial in structure and further away from natural living languages, are even less suitable to be adapted to literary use, at least in their present forms. How such a language might develop, once generally accepted and widely used, it is hard to say. Perhaps it is

not unthinkable that a real literary language might evolve from it later."

Well, as to Basic English, we will not differ. We venture, however, to set down a few expressions of opinion recently given by well-known European writers, which make it clear at least that there is room for difference in assessing the literary standing of Esperanto.

Stepan Zweig, author of "Sergeant Grischa," writing to those responsible for the Esperanto version of his "Eyes of the Eternal Brother," said: "How thankful I am to you that I now possess my book in that language which links together all European languages, and does more for the intercomprehension of the peoples than all the congresses and gaudy demonstrations" (Vide "Heroldo de Esperanto," Koln, 27/2/32).

Prof. Ossendowski, world-famed author of "Beasts, Men and Gods," has said: "Esperanto can play an important part in diffusing among the people the fruits of a common artistic and literary life. Translation could be made for example from Polish into Esperanto and so spread throughout the world without the necessity for putting it into the many national tongues, which latter process is hurtful to the character and psyche of the works so treated."

Ludwig Renn, author of "War," has used Esperanto as a medium for his artistry in words, both in poetry and prose.

Prof. Charles Baudouin, litterateur and psychologist, is also an Esperantist. He said: "I find that I can write my poems in Esperanto as easily as I can in my mother-tongue, French." He has written in original Esperanto "La Arto de Memdisciplino" (The Art of Self-discipline).

Mihaly Babits, possibly Hungary's greatest living literary son, has seen with gratification some of his writings in Esperanto. Frederik Karinty, another leading Hungarian writer, is an Esperantist, and gladly sees his work appear in that language.

Selma Lagerlof, Nobel Prize winner, Swedish woman of letters, in an interview ("Literatura Mondo," April, 1933) spoke glowingly of Esperanto as a literary medium, and gave full consent for the publication in the language of all her books. The second, "Mr. Arne's Money," has just been an-

nounced in the Esperanto press of 60 countries.

We could go on citing the favorable opinions of present-day litterateurs relative to Esperanto, but we hope our end has been attained. And we will not do more than mention the field of translation from the classics of the world, believing that most people know of the Esperanto Bible, the Esperanto versions of Shakspeare's Tragedies, and the rest. Suffice it to say that the great labor of Dante is being now rendered into the international language by the Hungarian polyglot Kalocsay.

Says W. Matthews in "International Language" (Dec., 1930): "Esperanto has the colorful vowels of Italian and Spanish; and is richer in consonant sounds than Italian. In speech it sounds very much like Italian; Compton Mackenzie has confessed as much . . . I should like to quote the famous sonnet of Dante, La Donna Mia:—

Tanto gentile e tanto onesta pare
la donna mia, quand'ella altrui saluta,
ch'ogni lingua divien tremante muta
e gli occhi non ardiscon di guardare.

Ella sen va, sentendosi laudare,
benignamente d'umilta vestuta;
e par che sia una cosa venuta
di cielo in terra a miracol mostrare.

Mostrasi si piacente a chi la mira
che da per gli occhi una dolcezza al
core
che intender non la sa chi non la
prova.

E par che dalla sua faccia si mova
uno spirito soave e pien d'amore,
che va dicendo all'anima: sospira!
Here is the Esperanto translation,
which conserves, I think, more of the
beauty of the original than could
English:—

Aperas jen, modeste kaj ĝentile,
estrino mia kun la gest' saluta;
tremante, ĉiu lango iĝas muta,
en bril' okuloj klinas sin humile.

Sentante laŭdojn, iras ŝi trankvile,
de l'honesteco envestite tuta,
sur teron kvazaŭ ĉielalto kruta
fluigis mirindaĵon perflugile.

Kaj ŝi aŭfable donas por admiroj
dolĉecon tian per okul' al koro,
ke tiu nur ĝin konas, kiu provas.

De ŝiaj lipoj sin karese movas
spireto ama, plena de favoro,
ke diras al anim': al mi, sopiroj!"

We could quote equally the lines

from certain of the best done in original Esperanto.

Having shown something of the beauty of spoken Esperanto, we must close with an example of the fidelity with which Esperanto can render prose text. The following is taken at hazard from "The Robbers," Schiller:—

Er wird jede Minute die Ihr ihnen
getodtet, jede Freude die Ihr ihnen
vergiftet, jede Volkommenheit die Ihr
ihnen versperret habt, von Euch for-
dern dereinst.

French translation of Regnier, of the French Institute: Il vous demandera compte un jour de chacune des minutes que vous leur avez enlevées, de chacune des joies que vous leur avez empoisonnées, de chaque perfection où vous les avez empêché d'atteindre.

Esperanto translation of Dr. Zamenhof:—Ĉiun minutojn, kiun vi al ili mortigis, ĉiun ĝojn, kiun vi al ili venenis, ĉiun perfektecon, kiun vi al ili baris, li iam ekpostulos de vi.

FOR YOUR BOOKSHELF.

"Idoj de Orfeo," Bulthuis, 4/6.

"Tri Angloj Alilande," Merchant, 1/6.

Postage extra, and obtainable from:

Melbourne Esperanto Society,
Box 731F, G.P.O., Melbourne.

RADIO COLUMN.

Speakers are requested to send in by 20th September at latest, particulars of any broadcasts arranged.

Esperanto lessons will be broadcast from 3AR (Melbourne) at 7.45 p.m. on Saturdays Sept. 2nd, 16th, 30th.

The lecturer will be pleased to answer questions relating to grammar and pronunciation. Address all inquiries to "Esperanto," care of 3AR.

The Pyke Memorial Examination in Esperanto will be held early in November. It is open to all students of the international language residing in Australia. A certificate of competency is awarded to successful students and, in addition, those who commenced the study of Esperanto on or after Nov. 1st, 1932, are eligible to compete for a special prize of £5/5/-. Examining committees have been appointed in Brisbane, Sydney and Melbourne. Intending competitors are invited to send a stamped and addressed envelope for a test paper to R. R. Rawson, Hon. Secretary, Pyke Memorial Examination, 169 Exhibition St., Melbourne.

Press errors:—p. 67, col. 1, last line but one. "inda la plumo" (read: inda la plumon); col. 3, line 10, "ateŝeo" (ataŝeo); p. 71, col. 3, line 47 "Set" (Sed).

Pro teknika kaŭzo la litero "ŝ" nur malfacile povas aperi pli ol unu fojo en la sama linio.

En la peco pri "Hamleto" en la junia n-ro bedaŭre reproduktiĝis preseraro ("tempo" anstataŭ "templo"). La tuta demando pri la armeoj da presfuŝaĵoj en la tradukitaj verkoj de Zamenhof postulas apartan artikolon, kiu sufiĉe nudavorte draŭs tiujn respondecajn pri la aĉaj eldonserioj:

ESPERANTO ON THE MARCH.

Bishop Eltschknor of Praha, Czechoslovakia, is the "first Esperantist bishop" in the world. He speaks the language fluently. He has delivered sermons in Esperanto in the Church of St. Ursula, in the Czech capital.

Prof. Piccard, the stratospherist, has declared himself favorable to Esperanto, which he asserts would be of the greatest use to science.

The Manchurian Esperanto-federation is striving to establish Esperanto as the official language for international communication in the new state of Manchukuo.

In Sweden during 1932, 10,530 textbooks, 4,000 sets of correspondence courses, 3,000 dictionaries, and 17,000 "keys."

In England Esperanto is being taught in 27 schools to some 1,000 pupils. ("British Esperantist.")

In France it is being taught in 45 schools. The patronal committee of the French Society for the Propagation of Esperanto contains more than a hundred Parliamentarians of every political color. ("La Movado.")

LATINISTOJ KAJ ANGLA PROZO

Estas absolute vera diro tio, ke treege malfacile estas uzi la anglan lingvon korekte kaj koncize; sed ke neniu povas tiel uzi ĝin sen antaŭa fundlerno de l'latina estas diro nur tre parte vera.

Bunyan, kiu tute malsciis la latinan, verkis pli klasikan anglaĵon ol tiu de Bentley, unu el la plej erudiciaj latinistoj. Dickens, kiu ne estis latina instruitulo, estis pli korekta kaj belesprima verkisto ol Thackeray, kiu bone sciis la antikvan idiomon. Jane Austen, kiu ankaŭ fremdis je la latina, verkis pli ekzakte kaj koncize ol Scott, kiu en alta grado posedis la lingvon de Cicerono. Mark Twain, malforta rilate la latinan, naskis multe pli trafespriman prozon ol la antikvalingva lertulo Swinburne. G. B. Shaw, ne tirinte sian stilarton el mortintlingvaj fontoj, tamen donis kaj donas al ni verkojn pli riĉajn je akra, penetra frazologio ol tiuj de Max Beerbohm, kiu eduke ricevis la scipovon tiel imiti.

Finfine, multe da homoj, malgraŭ tio, ke ilia klasika lingvosocio estas vasta, verkis lingvaĵon, pri kiu oni povas aserti, ke centoj da simplaj homoj, kies modestaj nomoj estas nur malfacile troveblaj en la literatura historio, povas ĝin superi laŭ stilo kaj laŭ gramatika korekteco.

(Reverkiĝa laŭ paragrafo en "English for the English," de G. Sampson.)

SERIOZE KAJ SERCE

Mi pensas, ke estas nenio en la mondo komparinda kun la avido per kiu virinoj povas forgesi tion, kio foje estis ĉio al ili. Per tiu ĉi mirinda povo de forgesado, ne malpli ol per sia kapablo de amo, virinoj estas unu el la veraj fortoj de la naturo.

—Anatole France en "La Povo de la Antaŭjuĝo."

"Nenia lingvo povas egali la lingvon zulan pri kunmetitaj vortoj," skribas korespondantino en la "Virina Spiegulo." "La nomo de mia edzo en Zulu-lando estis Umkuzubela, kaj tiuj dek literoj signifas: La etulo kun la nigra kapo kiu ĉirkaŭkuras tre rapide kaj faras multan laboron." Ni havas multajn kunmetitajn vortojn en Esperanto, sed mi dubas ĉu ni povas egali ĉi tiun.

Flegistino—Tiu filmaktoro kiun oni portis en la hospitalon antaŭ unu horo estas tre bela.

Doktoro—Jes, sed ne mezuru lian temperaturon. Li plendis pro la fakto ke kvin flegistinoj jam faris tion.

Viro povas konstrui por si tronon el bajonetoj, sed li ne povas sidi sur ĝi.
—Dean Inge.

Du irlandaj kamparuloj kaŭris post kreskaĵbarilo kun bastonegoj, por mortigi sian avaran luiganton, kiu estis venonta por kolekti la lupagon. Kiam post multaj minutoj li ne venis, unu diris al la alia—"Mi esperas ke neniu malbonaĵo okazis al la kompatinda maljunulo!"

Estas pli bone ne scii tiom multe, ol scii tiom kio efektive ne estas,
—Josh Billings.

Sed kio estas la libereco, sen saĝeco kaj sen virto? Ĝi estas la plej granda el ĉiuj eblaj malbonaĵoj; ĉar ĝi estas malsaĝeco, malvirto kaj frenezeco, sen kulturado kaj sen disciplino.—Burke.

"Kie vi studadis la pentroarton?" juna studento foje demandis al Whistler.

Tuj tiu respondis, "Kie ajn mi estis."

Loĝanto (plendante)—Tiu-ĉi estas abomena! Mi estas restinta en tiu ĉi

loĝejo dum pli ol unu semajno, kaj mi ne havis purajn viŝilojn, kaj neniam mi povas trovi la sapon por la lavado.

Dommastrino—Nu—vi havas langon en la kapo, ĉu ne?

Loĝanto—Jes—sed mi ne estas kato!

"Donu al mi kison," petegis la junulo, kiu sidadis kun la bela junulino, post valso.

Si ne respondis.

"Mi petegas—Ĉu vi ne donos al mi kison?" li ree demandis, pli laŭte.

Si tute ne respondis.

"Ĉu vi estas surda?" li fine kreigis.

"Ne," ŝi respondis akre, "Ĉu vi estas paralizita?"

Turisto (en kampara vilaĝo)—Kio estas la ĉefaj vidindaĵoj ĉi-tie?

Vilaĝano—Por la personoj el la urbo—niaj montoj. Por la vilaĝanoj—la personoj el la urbo.

Si—Ĉu vi okupis tian longan tempon por gajni la patran konsenton?

Li—Ho, ne! Li ne povis trovi la korktirilon.

Si (plorante)—Vi rompis la promeson kiun vi donis al mi.

Li—Ne ploru, karulino; mi donos al vi alian.

Kiel malsimilas hundo, kiu postsekvas postesignojn, al homo gajninta la diplomon de la B.E.A.?

La unua marŝas naz-al-tere.

La dua marŝas naz-alt-aere.

PLI PRI JAN WELZL.

(Vidu La S.K. Nov. 1931)

Lau "The Quest for Pocahontas Treasure" (La Serĉo al Polusa Trezoro) la dua verko de la aventurama ĉeĥo Jan Welzl, leonino—negrava objekto—ne povas timigi alaskanon aŭ Aleŭtian indianon. Ni devas supozi, ke tiuj harditaj de l'naturo homoj eĉ partoprenas kun la ursoj ĉi ties preferatan ludon, nome la ĉirkaŭpremadon. "Unu el la homoj," diras Welzl, "surmetas maskon el urspelto, gantojn el la sama; kaj ĉirkaŭ la bruston li firme nodas ledaĵon provizitan per du longaj akraj tranĉiloj rigide elstarantaj. Li tenas krome tranĉilon en ĉiu mano . . . la furioza besto, en ĝia karakteriza korp-teniĝo, starante sur la postaj piedoj, ĉirkaŭprenas la ĉasiston. Je tio la du tranĉiloj enpenetras la ursan bruston kaj sammomente la kuraĝa homo enpikegas la du mane tenitajn armilojn en la ventron de sia antagonisto . . . Mi ofte vidis tiajn batalojn kaj rigidigis de timo, kiam la indiano kvazaŭ formāl-

aperis en la tenegon de la besto."

Sed plue, laŭ Welzl, oni rigardas la ursojn de la glacia nordo kiel tute netimindajn. Oni jungas ilin al sledoj kaj eĉ en unu kazo servigis ilin kiel sendknaĵojn kaj gajigantojn en drink-ejo. La rakontoj de Welzl pri frutempa Alasko sufiĉe tre sensacias sed lia maniero fari ilin estas ja naiva. Ekzemple: "Junaj sinjorinoj venis tien el preskaŭ la tuta mondo. Ili gajnis la vivrimedojn per dancado; kaj kiam ili renkontiĝis kun orfosisto ili penis lin logtiri en sian reton. . . . Mi dubas, ĉu iu el tiuj inoj venis al bona vivfino. Komprenoble ilia sorto multe dependis de la karaktero de la fosistoj kun kiuj ili konatiĝis. Kelkaj el tiuj ĉi estis tre krudmoraj uloj. Foje ili ekprenis per la kruroj unu tian sinjorinon kaj jetis ŝin en riveron kaj lasis al ŝi naĝi." (El "John o'London's Weekly.")

KELKAJ DEMANDOJ PRI VIROJ

Antaŭ nelonge mi legis en libro de George Moore (Saluton kaj Adiaŭon) la sekvantan perlon de saĝeco: "La takto de virinoj ne povas esti tro laŭdita: ili devas ekzerci ĉiom da sia takto por kunvivi kun ni: kaj ili faras ĉi tion tre bone, ŝajnigante intereson en niaj ideoj, trompante nin—sed kiel ĉarme—akceptante la religiojn kiujn ni verkas, kaj la moralojn pri kiuj ni ŝatas nin ĝeni, kvankam ili komprenas nek moralojn nek religiojn, nur amantojn, infanojn, kaj florojn. Mirinda raso estas la raso de la virinoj, tute ne komprenata de la viroj."

Mi formetis la libron, kaj mi miris ne pri la miriga raso de virinoj, sed de viroj. Ĉu estas eble ke ili vere kredas ĉion kion ili diras pri virinoj? Ĉu la amaso de sensecaĵoj kaj mensogoj kiujn ili elŝutas estas pripensita? aŭ ĉu ili ĝin faris sole per refleksa agado? Kiom da fojoj mi legis ĉi tion aŭ tion pri virinoj: ili havas korojn, sed ne cerbojn; sentojn, sed ne racion; intuicion, sed ne inteligenton; ili povas vivi sen mono, sano, belo, sed ne sen viro; ili povas forgesi Dion, virton, ĉastecon, sed ne la unuan kison; ili preferas hejmkamenon al famo, trono, aŭ mondovo, —ktp. ktp. Kaj nun por nia sciigo alvenas ĉi tiu valora ero.

Kio estas al la viroj? De kio ili suferas? Ĉu ili neniam renkontis virinojn kiuj forgesas la amantojn tuj kiam ili foriras, kiuj ne havas takton, kiuj ne multe ŝatas infanojn aŭ florojn, kiuj vere interesiĝas pri ideoj ĉiaspecaj, kaj kiuj rifuzas konsideri la trompadon al la viroj kiel necesa parto de ina ekipo?

Estus interese scii ĉu ĉi tiuj elparoladoj pri virinoj estas tute sinceraj, aŭ ĉu ili devenas de ia subtila memflatado ke la viroj forte penas subteni kelkajn lastajn komfortigan iluziojn lasitajn al ili el ŝanĝiganta kaj renversata mondo.—NIRINO.

RECENZOJ

La Hontemulo; La Unua Kiso. De Herman Bang, trad. Leono Vienano. Eld. N. Szapiro, Varsovio, Nowolipki 8, Pollando.

32-paĝa skizo pri la mallonga vivo de bela junulo, kiu venas al malbona fino. Konsumata de troa sekspsika stato, li forlasas lerni solidan metion, prefere ŝatante kiel kelnero. La anime malsanecan kunestadon de parfumitaj virinoj, kaj sin mortigas post freneza vizito al bordelo. Leginte ĉi tiun ni rememoras pri la trafaj diroj de Keyserling, Tagore kaj Gandhi, inter aliaj, kiuj asertas ke Eŭropon obsedas seksinkubo koruptanta en forta grado ĝian spiriton kaj intelekton. Ekspluatante la komunan malsanon, la komerca reklamo, la teatro, kaj la literaturo haladzas la deziran fetoron.

La lingvo de ĉi tiu serio estas daŭre altnivela. "Senedziga infano" (eksteredzeca . . .); "Jazono" (A. Jason, Greka Iason: ĉu ne pli bone Jasono?).

Pola Folkloro kaj Popolkanto, originale verkita de S. Grenkamp. Eld. Esperantista Voco, Jaslo, Pollando. Paĝoj 60, prezo 1.60 sv. f.

Malgranda verko, sed evidente bazita sur profunda simpatia legado kaj intima kono de la pola popolo. Lerte li analizas per malmultaj bone elektitaj vortoj la ennaskajn karakterojn de la diversaj regionaj tipoj kaj esploras la fontojn el kiuj ŝprucas la kantemo kaj amo al la tradicio, kio igas tiele interesa kaj kolorvaria ilian festan kaj ceremonian vivon. Impona listo de 38 verkoj el 5 lingvoj atestas la paciencajn studstreĉon de la kompilinto-aŭtoro.

S-ro Z. Zaleski, eminenta kritikisto kaj literato, lekciisto ĉe la pariza kaj varsovia universitatoj, skribis jene en antaŭparolo:

"Dank'al la invento de d-ro Zamenhof, la esperantistoj disemitaĵoj en la tuta mondo posedas nun praktikan interkomprenilon, faciluzeblan instrumenton, por transdoni sciencan, pensojn, eĉ valorojn precize literaturajn."

Tre meritplena laboraĵeto. Notoj: "monotonio" (unutoneco); "sublima" (superbela); "kompostas legendojn" (komponas . . .).—ROBO.

COBURG ESPERANTO CLUB.

Nove elektita komitato aranĝas programon por festvespero okazonta en sept-o, ĉe kiu ni celebros la unuan datrevenon de nia klubo. Inter diversaj amuzaĵoj troviĝos ankaŭ teatraĵeto, por kiu la roluloj nun faras diligente la antaŭprovojn. Invitojn ni sendos al reprezentaj anoj de la ceteraj kluboj. Celante pliampleksigi je plejble

modera elspezo nian novofonditan bibliotekon, ni decidis anonci deziron doni librojn kaj gazetojn kontraŭ Esperantaj verkoj. La bibliotekisto danke ricevis du binditajn librojn de S-ro E. Hearne, klubano.

LINGVAJ DEMANDOJ.

Pri la sufikso -in. Troveblaj en nia literaturo estas formoj kiaj "virgino, belino, teoriino, revoluciino" (la lastaj du en "Sennaciera Revuo" 10.3.33) anstataŭ la formoj "virgolino" k.c. Lau nia ĝisnuna kono la sufikso -in povas esti metata nur ce substantivaj radikoj sekshavaj (porko; pork-in-o, insekto, insekt-in-o) kaj tute ne ĉe radikoj adjektivaj kaj neŭtro-substantivaj.

Lau la Universala Vortaro ni komprenas ke vortoj kiaj "belino, revoluciino" devas signifi virinsekshava belo, revolucio havanta virinan sekson! Komprenoble absurdo. Plue, se iu defendanta tian formadon respondus ke "belino" signifas "bela ino" ni rebatus. Ĉu do li kuraĝus skribi "fortino," "soifino," "parolemino" anstataŭ "fortino" k.c.? Kaj se vere "virgino, belino, junino" estas virinseksaj animoj, ĉu "virgo, belo, juno" estas uzeblaj por nomi la virseksajn?

Kelkaj vidas en ĉi tiu strangaĵo ankoraŭ minacon al nia unueco de vortokonstruado. Tiuj favorantaj ĝin ja povas citi el Grabowski. Sed la fakto ke tiu majstro-stilisto prove tiel kunmetis neniel signifas, ke ni sendemande akceptu kiel bonan ĉiun apartan formon de li enkondukitan.

Al H. K. Pri la formoj **antaŭ ol** kaj **antaŭ kiam**.—La unuan formon oni trovas ĉe la plej multaj aŭtoroj, sed kelkaj, opiniante ke tia ideo enhavas per si mem aferon de tempo pli ol komparon, anstataŭigas nun ol per **kiam**, kiu estas logike tute bona. Oni memoru, ke en Esperanto la ĝisnuna neuziteco de tia aŭ alia formo ne signifas, ke tia formo estas neuzbla, se ĝi estas per si mem logika kaj konforma al la spirito de nia lingvo. Antaŭ kiam estas en tiu kazo. Kabe uzas ĝin en "La Faraono."

Al en Y. **Formato 14 x 20cm.** Ĝis nun neniu vortaro nek lernlibro montras kiel legi "x." Oni povas legi "per," ĉar ĝi estas signo de obligo.

C. en P. "**Pins and Needles.**" Tre dube ke laŭvorta traduko estus komprenebla. La angla signifo estas: the pricking, tingling sensation attending the recovery of feeling in a limb which has "gone to sleep"; fornication. La francoj diras: la main me fourmille; avoir des fourmis dans les jambes. Kial ne diri: Formikoj marŝas (promenas) en miaj piedoj?

Bo. en H. **Tribuno.** Estas domaĝe ke iuj uzas la vorton en senco de "estrado," "podio," pro tio ke verkante pri la historio de antikva Romo oni devas uzi ĝin por traduki la latinan "tribunus" (tribune) kiel en "tribunus plebis" (A. tribune of the plebs). La latina "tribunal" signifas "raised platform." En la angla "tribune" havas ambaŭ signifojn.

Ta. in G. **Ĉiuj la.** Kelkaj profunde studintaj la lingvon, inter ili s-roj Bailev. Butler and Gordon, aŭ plene aprobas aŭ rigardas kiel diskutindan la uzon de "la" post "ĉiuj" kiam "ĉiuj" signifas la tuton de menciitoj. Tamen ni ne konas lernlibron, kiu tiel konfirmas.

Ge. en Ro. **Afero.** Privat en "Karolo" skribis: Li eniris butikon por aĉeti aferojn. Tia uzo estas nun malofita, sed en la fruaj tagoj oni ofte ĝin vidis. Vidu Boirac' an Vortaron. En la Deutsch - Esperanto Wörterbuch de Pfeffer ni legas: Ding—ajo, objekto, kozo. La lasta estas F. chose, I. H. cosa.

K. en ti. **"Pri" kiel prefikso.** Ne estas kutime prefiksi "pri" en vorto esprimanta aplikon de substanco. Oni diras "olei" buteri, ciri, koti, korki, ori, gudri" ktp. Oni ja diras "prisemi la kampon," ĉar oni semas semon. Oni diras "orumi" nenecese. "Oritaj" (Rabeno de Baharah).

Ni kore petas kunlaboron de ĉiuj por tiu kolumno. Demandojn kaj respondojn kaj komentojn pri respondoj ni volonte presigus. Ni celas per kiel eble plej multpersona diskutado ataki kaj venki tiujn prilingvajn problemojn, diversgrade gravajn, kiuj jen kaj jen dancas antaŭ la cerbojn de Esperantaj literaturemuloj.

VIZITO AL LA "KOELN."

En la tago kiam la germana krozoŝipo Koeln elĵetis ankron en Sidnejan Havenon diris mia amiko: "La Koeln alvenas hodiaŭ kaj la venontan sabaton ĝi malfermiĝos por publika inspekto. Ĉu ni iru ĝin vidi?" Avide mi konsentis.

Venis sabato, malhela, iom pluvema. Ni atingis la 4an Enŝipiĝejon, ĉe la Rondkajo, je dek minutoj post la dekvara kaj tuj aliĝis al atendlinio jam tre longa. Tie ni restis tutan horon, puŝante, puŝigante, sanceligante, reakirante la ekvilibrilon kaj ŝajne farante ĉion krom antaŭen-iri. Fine tamen ni trovis nin transe de la pordego, kun junulino febre tenanta mian dekstran brakon, kaj tute perdinte mian amikon. Liberiginte min el la obstina virina mano, mi retrovis la kamaradon, kaj ni nin direktis al la pasponteto. Sed tie ĉi estis homamaso preskaŭ tiel demsa, kiel tiu, kiun ni ĵus postlasis. Apenaŭ evitante trapikon de l'balustro, mi sukcesis atingi la ferdekon de la ŝipo, kaj tie atendis ĝis alflankiĝis mia kunulo, kiu, penegante liberigi la palton for de tiu pikilhava balustro, jam dek minutojn baris la ponteton, ĉirkaŭate de la blasfemoj de la kolera amaso. Kun sento de granda sensarĝiĝo ni foriris laŭ mallarĝa koridoro kaj komencis esplori la Koeln.

Tuj nin impresis la manko de spaco pro la granda kvanto de maŝinaro kaj aparato—kaj la amemo de la ŝipanoj al la lokaj knabinoj belaj, nebelaj kaj malbelaj. Ni vidis nenium forpuŝi siajn admirantinojn, sed nia decosento ofendiĝis, kiam tri blondaj granduloj

senhonte ĉirkaŭprenis tri junajn virinojn dum alia blondulo ilin fotografis. Ni forrapidis!

Tiam ni babilis angle kaj germane kun suboficiro, post kio ni trovis du ŝipanojn, kiuj skribis siajn nomojn per gotaj literoj (je mia speciala peto) en mian poŝlibron. Tie ĉi ni ja devis paroli tute germane, ĉar ili ambaŭ sciis nek Esperanton nek la anglan. Deirinte de ili, ni vagis tien-reen sur la supra ferdeko, esplorante la paflegojn, boatojn, kompason kaj ĉian troveblan interes-aĵon. Ofte ni haltis por paroli kun membroj de la ŝipano, kiuj ĉiam estis ĝentilaj kaj komplezemaj.

Sed subite ni ekkonscisis, ke subiras la suno, eknoktigas. Ni malsupreniris kaj trovis junan kadeton deĵorantan, kiu iom sciis la anglan. Li plaĉis al ni pli ol iu ajn alia sur la ŝipo. Longan tempon ni diskutis kun li interes-aĵojn—"nian Pontegon," Sidnejon, kaj Aŭstralion ĝenerale. La lumoj de la urbo jam trembrilis trans la Haveno, kiam ni fine adiaŭis nian novan amikon kaj eliris el la krozoŝipo. Penseme ni rapidis al la pramstacio; mia kamarado rompintis la silenton:—"Ĉiam mi memoros tiujn germanojn; ili estas boneguloj."

(A. TOWSEY)

PRI "PSEŬDOSUFIKSOJ"

Interesa kaj ankoraŭ aktuala estas la jena artikolo de Bernard Long, en "Literaturo" por okt-dec., 1922. Almenaŭ kelkaj el tiuj laŭvoĉe krietaj favore al senindulga forigo de tiuj "pseŭdosufiksoj" tre supozinde ne sufiĉe studis tion, ke ĉe la Majstro-verkoj ofte troviĝas tiuj formoj ekz. "modifkacio, racionala, provincialismo, hermetike, uzurnatoro."

"Tendenco montriĝas en la nuna E. literaturo forlasi la uzadon de vortoj finiĝantaj per -oro, -acio k.t.p. kaj anstataŭigi ilin per formoj kunmetitaj el pli simplaj radikoj. Ekz., "inspektisto" por "inspektoro," "redaktisto" por "redaktoro," "redaktejo" aŭ "redaktistaro" por "redakcio" k.t.p. Oni uzas novajn formojn kiel "konversi" (por "konversacii"), "kondoli" (por "kondolenci") . . . Multaj el la (plilongaj) formoj jam de jaroj ekzistas en la lingvo, multaj nun estas "oficialaj," kaj multaj estas plene Zamenhofaj. Tiaj vortoj ofte taŭgas por specialaj sencoj, kaj ankaŭ ili ne ĉiam havas eĉ la saman signifon kiel la kunmetitaj formoj. Ekz., "bankiero" havas pli difinitan sencon ol "bank-isto"; "rezignacio" tute ne signifas la samon kiel "rezigno," nek "formacio" kiel "form-ado," nek "konduktoro" kiel "konduk-isto" (kaj tie ĉi la radikoj estas malsama, nome, kondukt (or) kaj ne konduk) . . . "Prokuroro" estas speciala persono, tute alia ol "prokur-isto." "Konfirmacio" kaj "Reformacio" taŭgas por siaj specialaj signifoj, kaj povas tre bone resti kune kun "konfirmo" kaj "reformo."

Li fermas per kelkaj estis zorga pri tiaj vortoj, kaj ne elgladi pitoreskecon kaj utilan nuanĉecon el la lingvo.

Kinulo (filmadisto) el Sovetio, 21-jaraĝa, serĉas korespondantojn el Aŭstralio, Nov-Zelando, Tasmanio kaj aliaj insuloj. Li nepre respondos al ĉiuj per il. p.k. Skribu esperante aŭ ruse. K-do Kozlov, A.A., Vorenej c-co., ul St. Razina 41, kv. 8, U.S.S.R.

"Coburg Esperanto Group" deziras aĉeti librojn bonstatajn por fondi bibliotekon. Sciigu al sek-io: G. W. Burns, 21 High-st., Coburg, N13., Vic.

For 4/- a Year.

For 4/- a year we offer to supply copy of La S.K. to any foreign correspondent or local institution at request of any of our subscribers.

We would also remind those who are behind in their "abono" that their delay represents a deadweight drag on the wheel of progress. Our task of bringing out the double-size "Suda" calls for the loyal collaboration of all. We ask those concerned to think what our organ means to the movement, and then write out that postal order.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

DE ANATOLE FRANCE.

En 1907.

Industria perforto naskigas militan perforton . . . Komerca konkurenco ekbruligas internacian malamon, kiu finiĝas nur kun sango. Kiel la feŭda ŝtato, tiel ankaŭ la kapitalista ŝtato, volviĝas en milito. Sub la ekzistanta reĝimo la naciista produktado estas la paflegoj, kiuj starigas doganmurojn, malfermas komercvojojn. Milito de eksterminado neeviteble sekvas el la ekonomiaj kondiĉoj, kiuj direktas la civilizitan mondon.

Justeco kaj La Homoj.

La homoj ne sufiĉe perfektigis ekzerci justecon en la nomo de virto; la leĝo de la vivo devas esti indulgo kaj bonkoreco.

La Vera Dio.

Ĉe Theophile Gautier unu tagon, Baudelaire vidis sian amikon Charles Asselineau kun malbelega idoleta skulptita de Konga nigrulo el la trunketo de figarbo. Ĝi estis la figureto de viro kun kapo dufoje tiel granda, kiel la korpo, kaj kun buŝo de orelo al orelo. "Kiel terure la objekto aspektas," ekdiris Asselineau, formatante ĝin malaprobe.

"Zorgu," avertis Baudelaire, "Supozu ke ĝi estus la vera dio."—Tradukis Leti.

Knabeto kaj Knabineto.

En granda urbo, kie estis tiomege da personoj kaj domoj ke ne sufiĉis spaco por ke ĉiu havu eĉ etan gardenon, kaj kie ili plejparte devis kontentiĝi per floroj en florpotoj, loĝis du malriĉaj infanoj kiuj havis ĝardenon iom pli grandan ol florpoto. Ili ne estis gefratoj, sed tiel amis unu la alian kvazaŭ ili estus tiaj. Iliaj gepatroj loĝis precize kontraŭe en du mansardoj, ĉar kie la tegmento de la unu domo estus kunliganta la alian, se ilin ne apartigus la kanaleteto kuŝanta inter la du, tie estis en ĉiu domo fenestreto, kaj oni nur devis tranpaŝi la kanaleton por atingi de unu ĝis la alia.

Ekster ĉiu fenestro estis granda ligna kesto, en kiu kreskis kelkaj kuirherboj kaj rozarbeta, florantaj egale bone en la du. Venis en la kapon de la gepatroj la ideo meti la kestojn transflanke super la kanaleteto, tiel ke ili atingis preskaŭ de unu fenestro al la alia, aspektante simile al du muroj kvazaŭ kronitaj per floroj. Pizoj malsupren pendis sur la flankoj de la kestoj, kaj la branĉoj de la rozarbetaj antaŭen sin klinis unu al la alia, tiamaniere ke ili aspektis preskaŭ kiel triumfarko el folioj kaj floroj. Ĉar la kestoj estis tre altaj kaj la infanoj ne permesitaj surgrimpi sur ili, ili ofte ricevis permeson eliri el la fenestroj, kie, sidiĝinte sur siaj taburetoj, ili kune ludadis.

(daŭrigota.)

A Little Boy and a Little Girl.

In a large city, where there were so many people that there was not room enough for all to have even a little garden, and where they were mostly, therefore, obliged to be satisfied with flowers in flowerpots, there lived two poor children who had a garden a little larger than a flowerpot. They were not brother and sister, but were as fond of each other as if they had been so. Their parents lived exactly opposite in two attics, for where the roof of one house would have joined the other, only that they were separated by the gutter running between the two, there was in each a small window, and one had but to take a step across the gutter to reach from the one to the other.

Outside each window was a large wooden box, in which grew some kitchen-herbs and a rose-tree, flourishing equally well in the two. It occurred to the parents to place the boxes crossways over the gutter, so that they reached nearly from one window to the other, looking like two walls surmounted by flowers. Peas hung down over the sides of the boxes, and the branches of the rose-trees bent forwards towards each other, so that it looked almost like a triumphal arch of leaves and flowers. As the boxes were very high, and the children not allowed to climb upon them, they often received permission to get out of the windows, where, seated on their little stools under the rose-trees, they used to play together.

(To be continued.)

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

Masterton (N.Z.) Esperanto Club.—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Workshops-rd., Masterton. Visitors welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunveno: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18^h.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Coburg Esperanto-Grupo—Kunvenas ĉiujauĉe je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

Latest Date for "Copy"—Sept. 20.

NEXT NUMBER—Sept. 28.

En 1905.

Dum jarcentoj milito estas neforigebla kondiĉo de nacia ekzistado.—Nova ordo de aferoj, novaj sciencoj, eltrovoj, novaj ekonomiaj postuloj, altrudos pacan staton al la homoj, ĝuste samkiel ĝis nun la kondiĉoj mem de ilia ekzistado lokigis ilin kaj starigis ilin en stato de milito. Ne ni, eĉ la plej juna el ni, vidos la finon de la epoko de armiloj.

Per la Kristfratineto jen jam surtere La Preternacio Konstancia. Kia estas Konstancio? Kore klarigos Eliot, 2 Cambridge St., Willoughby, N.S.W.

La Preternacio Konstancia. Leĝo rilate la enmigradon. Eliot, 2 Cambridge St., Willoughby, N.S.W.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—

Mr. J. B. Galloway, 4/6, March, '34; Mr. G. Gordon, 5/-, June, '34; Mrs. Trewin, 4/6, Aug., '34; Mr. Ravelich, 5/-, May, '34; Mr. A. Hodges, 5/-, June, '34; Melbourne Esperanto Club (subs.), £1/10/-, (sales) 5/3; Mr. Flanagan, 4/6, Sept., '34; Mr. Kidd, 9/6, Oct., '35. Mr. A. J. Davis, 4/6, July, '34; Mr. Hudson, 4/6, July, '34; Mr. H. N. Love, 4/6, June, '34; Miss Bostock, 2/-, Dec., '33; Mr. J. Eliot, ad., 2/-; Coburg Club ad., 1/-; Miss Abbot, 5/-, July, '33.—12/8/33.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 6 pencoj. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 155 (14th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

28 SEPTEMBRO, 1933.

THE S.A.E. HAS BEEN FORMED!

What is the S.A.E.? These three letters stand for keener, more comprehensive and wideawake advancement of Esperanto, than has previously been attempted in Australia. At last, Australian Esperantists have taken a definite step in a really progressive direction. We refer to the Society for the Advancement of Esperanto. Membership of the S.A.E. is open to all in sympathy with its aims. Naturally, your first question is

WHAT IS THE S.A.E. GOING TO DO FOR THE MOVEMENT?

Let us look to our first line of action, La Suda Kruco. Twelve months ago a move was made to increase the size and to improve the contents of the only Australian Esperanto publication. What was the result? The circulation rose considerably. The next step will be to increase the size still further by the addition of a cover, but—before this can be achieved the circulation must be doubled. By doubling the circulation the cost per copy of printing would fall sufficiently to stop the present loss, which is only partly covered by private guarantees.

THIS IS HOW YOU CAN HELP.

If you already subscribe to La Suda Kruco, then subscribe also to the Society for the Advancement of Esperanto, by filling in and forwarding the enclosed form. The membership fee is 5/- per annum and will ensure that the paper is sent to any address you desire. Nominate someone who, in your opinion, may be interested and may become an Esperantist, and La Suda Kruco will be sent to that person for one year. You can nominate more than one person, but each nomination must be accompanied by a subscription of 5/-. A subscription of £1/1/- constitutes a patronship. Should subscriptions be unaccompanied by nominations, the committee will select addresses of prospective Esperantists from professional, educational, and social circles, and send a copy of La Suda Kruco monthly, accompanying the first number with a suitable letter. Your additional support to La Suda Kruco thus becomes a powerful instrument for the advance of Esperanto, and one which must inevitably result in increased support and wider influence, especially with those who are favorable towards, but who do not actively support the movement, merely because they have never previously been approached.

Then there are those Esperantists of yesterday who have slipped out of the ranks. Where are they now? We want them with us. If you know of an Esperantist who is not a member of one of the clubs, or who is not subscribing to La Suda Kruco, you can perform a valuable service to the movement by sending his name and address to the secretary of the S.A.E., who will immediately take steps to bring him back to the fold.

The S.A.E. is undertaking financial support for La Suda Kruco and is using the gazette as it has never been fully used before—to foster Esperanto in circles where it is at present only a name and nothing more.

It is the organization to which every Australian Esperantist naturally belongs. The committee of the S.A.E. are the younger adult members of the movement in Australia. If you are young you will support them; if you are older you will give your fullest co-operation, so that no energy or enthusiasm is wasted through lack of any guidance or counsel that your experience can offer. By so doing, you will ensure that the greatest measure of success crown the endeavors of this worthy enterprise; but, old or young, you must act now!

Hon. Secretary,

K. G. LINTON, 16 Chapel St., East St. Kilda, S2.

DE ANATOLE FRANCE.

(trad. Leti)

Pri Vortoj.

Kaj kiel ni povas difini vorton? Per vortoj! vortoj kiujn ni devas difini per aliaj vortoj, ili mem la temo de difino en simila maniero. Kaj kio estas vorto? Nur sono, murmuro, krio, grunto. La filozofoj penegge diferencigas inter la parolo de simioj kaj la nesilabigita lingvo de la animaloj. Sendube estas granda diferenco inter la du, sed ne komplete kaj fundamenta, ĝi ne estas diferenco de speco. Ambaŭokaze estas nur murmurado, grunto, kaj se estas larĝa diferenco inter la lamentoj de Antigone moranta por la benota taglumo, kaj la hurlado de batita hundo, ĝi estas ambaŭokaze fluado de sonoj elverŝitaj pro la suferanta karno. Ni konsentu, ke ni estas dotitaj per la parolpovo kiel estas la animaloj. Ĉu vi alspiras malkovri la sekretojn de la universo per la etaj vortoj, kiuj ebligas al ambaŭ homoj kaj bestoj, ke ili esprimu ĝojon, doloron, deziron kaj timon, elkriu sian malsaton, minacu malamikon, petegu amaton kaj tremigu la tutan aeron de la ĉielo per la tumulto de siaj emocioj? Kia fantastika penso!

Pri La Olimpaj Dioj.

La unu dio, se li faras eraron, alportas detruon al ĉiuj, kiuj kredas al li. Eĉ se li estas saĝa, li havas nur unu solan specon de saĝeco taŭga al unu sola speco de la homo.

La dioj de la Grekoj—pro la diverseco de ilia karaktero—pli taŭgas al la diverseco de la homa tmeperamento. Ĉi tiuj dioj kunloĝis harmonie, kvankam ili ne konsentis pri eĉ unu afero. En la Troja milito kelkaj helpis la Grekojn, aliaj la Trojanojn; Ĉi tio mem instruis al la Grekoj la toleremon. Estis tiam dio por ĉiu temperamento. Afrodito por la voluptemaj. Palas-Ateno por la serĉanto de la saĝeco, k.t.p. Neniu el ĉi tiuj dioj estis sen malforteco, sed iliaj malfortecoj estis reciproke korektivaj.

En ĉio estis pli da belo kaj sindeteno ol da povo kaj grandeco. Ili ne demeritis siajn adorantojn per egeco.

Ili estis humanaj.

Ilia historio estis kredebla, sed vi rajtis ne kredi al ĝi. Nuntempe . . .

La granda avantaĝo de la politeismo de la Grekoj estis, ke ne ekzistis dogmoj. Vi rajtis pensi kiel plaĉis al vi, eĉ pri la dioj, sen timo al io krom ebla nedaŭra ekkolero pro minacitaj prero-

gativoj aŭ ekscititaj pasioj. Sed la maltoleremo kun ĝiaj teruraj konsekvencoj estis nebla.

Mezepoka Milito.

En tiuj tempoj militpreparinta socio estis la sola konjektebla. La tuta rimedaro de la nacio tiam estis uzata por starigadi militon.

Pri La Floroj.

Por la floroj, Amo, la rekreado de la speco, estas la granda afero. Kreskaĵoj estas staraj, ili ne havas la rimedojn de sindefendo apartenantajn al animaloj, ĉar besto povas fuĝi; tial ilia ĉefa okupado estas certigi la daŭradon de sia speco. La tuta floro ekzistas por la Amo.

RADIO COLUMN.

We very much regret that the dates listed in the last number of "La Suda Krucio" for the Esperanto lessons from 3AR could not be adhered to. Occasionally it so happens that an alteration has to be made after this paper is printed. We would like readers to consider the dates given in future as subject to possible change. When an alteration is made it generally means that the lesson is given on the following Saturday night. Lessons will be given on the following dates at 7.45 p.m. The anecdotes given at the conclusion of the lessons are printed to enable beginners to check their pronunciation:

Oct. 7—Iru supren, Tomĉjo, kaj alportu al mi la noktoĉemizon de la infano," diris la patrino de Tomĉjo. "Mi ne volas," diris Tomĉjo.

"Ho, Tomĉjo! Se vi ne estas bonkora al via nova fratinetto, ŝi prenros al si flugilojn kaj forflugos en ĉielon."

"Nu, do, ŝi prenu al si flugilojn kaj flugu supren por la noktoĉemizo."

Oct. 21—1a Knabo: "Ĉu vi iam ridis ĝis plorado?"

2a Knabo: "Ho jes. Hodiaŭ matene la patro sidigis sur najleton. Mi ridis ĝis li ekvidis min. Tiam mi ploris.

RESOLUTIONS PASSED BY A MEETING OF MELBOURNE ESPERANTISTS.

Saturday, 2nd Sept., 1933.

1. That this meeting of Esperantists, believing that the time is now opportune for more-intensive propaganda on behalf of the international language Esperanto, proposes that a society be formed with the aim in view; and the name of the said society be "The Society for the Advancement of Esperanto."—Moved by Mr. Drummond; seconded by Mr. Linton.

2. That the membership of the S.A.E. be open to all who are in sympathy with the aims of the Society.—Moved by Mr. Rawson; seconded by Miss E. Godfrey.

2a. That the membership be a subscription of 5/- per annum for each member, and £1/1/- per annum for a patron: both to be entitled to a free copy of the Suda Krucio.—Moved by Mr. Thomson; seconded by Mr. Linton.

3. That this Society adopt as its official organ "La Suda Krucio," and shall subsidise, as necessary, the said paper as the first charge on its funds.—Moved by Mr. Cook; seconded by Miss Walford.

4. That in urging people to join the S.A.E. it will be brought before them, that the immediate aim of the S.A.E. is to arrange for a striking propaganda article to appear in each number of the Suda Krucio, and for the paper to be sent regularly to prominent educationists, social workers and others, whose support would be of value in furthering the cause of Esperanto.—Moved by Mr. Linton; seconded by Mr. Banham.

Office-bearers were elected as follows:—Secretary, Mr. Linton; Treasurer, Mr. Cook; Committee, Miss L. Walford, Mr. E. A. Turner, Mr. S. Cullell, Mr. Chamberlain, Mr. R. Banham, Mr. R. R. Rawson, with power to add.

Kamaradoj.

Du kamaradoj sidas en kafejo kaj vikle babilas. Subite unu el ili rimarkas, ke la dua fikse ekrigardas per siaj okuloj la punkton en la enirejo kaj ne interrompas la rigardadon.

"Kio tiel cin ekinteresis tie?"

RECENZOJ

La Sorĉistino el Kastilio: Salom Asch. Historia bildo. El la juda originalo tradukis Izrael Lejzerowicz. 148 paĝoj. Eldonis "Literatura Mondo," agente ĉe ni. Prezo broŝ. 3.50 sv. fr., bindita 5 sv. fr.

La paĝoj de la juda historio estas kune gluitaj de sango. "La antikvaj egiptoj batalis kontraŭ la juda nacio, la mezepoko—kontraŭ la juda religio, la dudeka jarcento—kontraŭ la juda raso." Jes. En la nunaj tagoj strange aktuala estas ĉi tiu terura rakonto el la mezepoko. La kortaŭza ĉapitro en kiu la aŭtoro priskribas la publikan forbruligon de la trezoroj de la juda kulturo, per lerta parafrazo, povus esti krönikaĵo de lastatempa stultago krime farita kontraŭ la homaro en certa centro de nia moderna civilizacio.

La rakonto estas interesa, malgraŭ la malĝoja medio en kiu ĝi disvolviĝas. Sed ne nur tio faras la verkon leginda. La aŭtoro sin montras zorga studinto de la periodo traktita: liaj observoj pri la diversaj, foje tre kuriozaj, konceptoj pri la Sankta Virino tenitaj de la tiamaj pentristoj; lia akralingva denuncio al la brutala, korupta superstiĉemo de la tradicie kruelega plebo de Romo; liaj galplumaj vortdesegnoj de la ne malpli demona persekutemo de la regantaj eklezi-ŝtatistoj kaj ilia satana ruzemo servigi siajn krimojn por ankoraŭ pli imponi antaŭ la trofacila kredemaĉo de la popolo—ĉio ĉi igas la verkon valora kontribuo al nia multfaceta literaturo. La kuraĝo de la eldonintoj elpresejigintan en mondon, kiu frontas novan sangoendon de kontraŭjuda besteco, vekas nian altan admiron.

S-ro I. Lejzerowicz, la tradukinto, mem sentima defendanto de sia popolo, sukcesis doni vivoplanan prezentaĵon de ĉi verko, kiu devenas de la cerbo de

"la plej granda verkisto de l'juda literaturo."

La trad. meŝ liston de vortoj uzitaj de li, sed ne troveblaj en la Plena Vortaro. Tamen tiu listo ne estas kompleta; mankas almenaŭ anksi', fascin', irit', rotund', ritual', kaj skafandr'. Du radikoj uzitaj por la sama afero: fanat', fanatik'; rivel', revelaci'. 24. terurigis, 76 teruriga (teruris, terura). Kion signifas III, ektikis; 56 ŝia knedita muskola nuko? 128, trubadoro estas laŭ P.V. "Provenca poeto de la mezepoko," ne simpla anonca plac-trumpetisto. 108, skafandrantaĵ en lagetojn da sango (baraktantaĵ en lagetoj da sango); 120 kaj aliloke, La patrino de l'amo, kies staturon (figuron) ili portas . . . 83, "metreso," uzita ankaŭ de Haefker, en senco de "kurtizano, pagita amaĵistino, amorsino" ne estas simpla "sinjorino." Maskituloj (maskitoj). Loth, Samson (Lot, Ŝimŝon laŭ la Zam-a Biblio); 132, "gemaro," hebrea vorto, devas ricevi difinon en la posta listo.

Legante ĉi tiun kaj aliajn verkojn venas la penso, ke Esperantaj verkistoj devas pli rigore penadi akiri unuecon, ne nur pri la formoj sed ankaŭ pri la signifoj de vortoj, alie post ne longe tre povos iuj verkadi belajn volumegojn ankaŭ pri la Esperanta semantiko. Ni celu kiel eble plej firman sencosamecon ĉe la apartaj vortoj de nia provizo, kaj evitu danĝeron, ke ĉi tiu havigu al si la karakteron de movanta sablo.

Realigo de Norma Socio, eld. Belisma-Koopera-Kulturejo. La 9a de serio verkita de Okamoto Rikiĉi, pri-traktanta la rilatojn de l'etiko kaj la ekonomio. La aŭtoro de ĉi tiuj libretoj evidente havas tre evoluintan kapon, plus fortan senton de interhoma justeco. Se zorge studitaj, liaj skriboj donas valorajn instigojn al la penso kune kun mirinda enrigardo en la animo de la moderne cerbumanta

japano. Interesatoj turnu sin al ni por plua informo.

Esperanto-Roman-Gazeto: F. Ellersiek, Wilms-str. 5, Berlin SW61. Duonmonata. Abono 6 markoj.

Unika entrepreno, per kiu s-ro E. celas meti antaŭ la E-istaron longan romanon per dusemajnaj kajeroj. La elektita rakonto, se ni povas juĝi laŭ la komencaĵ ĉapitroj, promesas eĉ superi la plejbonan "Pro Kio?," originale verkita de s-ro E. antaŭ 15 jaroj.

Oomoto Internacia: la plej grande impona E. gazeto en Japonujo, nun aperas sur 34 paĝoj. Ĝia junio n-ro estas bonaspekta kaj varihava. Ĉefrolo estas disvastigi la religion de Deguĉi, sed precipe allogas por okcidentanoj ĝiaj artikoloj pri penso kaj vivo de la japana popolo, ankaŭ la tambure verkitaĵ recenzoj kaj pri-Esperantaj skriboj de Jozef Major. Kredante ke la neologismemo de certa E. eldona rondo estas principe danĝera por nia literaturo ĉe aziaj legantoj, nia ekshungaruja sam-o ĝin atakas, sed ne klarigas kial ankaŭ en japanaj kaj ĉinaj verkoj troviĝadas riĉabunde la malbenataj novradikoj. Ni sentas jukon demandi, pro kio J.M. direktas siajn sagojn preskaŭ solnure al Budapeŝto; li povus ankaŭ tiel atenti pri la rusoj, kiuj en sia "proleta" verkado konstante, senbride servigas al si novajn vortojn.

Interesa porjuda artikolo de Emma Osmond; Studo pri Lafcadio Hearn; japanlingva lecionaro, kaj aliaj, faras la gazeton konservinda. Ĝia agente ĉe ni estas L. Thomson. (Robo.)

La kato kaj la telero.

Vizitante holandan vilaĝon, por serĉadi malnovajn meblojn, unu antikvaĵisto ekvidas sur la brika planko de la loĝejo de kamparano tre belan malnovan Delft teleron, en kiun la dommastro metas trinkaĵon por sia kato.

—Ho! La bela kato! ekkrias la antikvaĵisto, mi volonte aĉetus ĝin.

La kamparano konsentas por dek florenoj. La akrinto foriras, kunportante la beston, poste li revenas:

—Ĉi vi bonvolus ankaŭ vendi al mi la teleron? li diras; mi ne havas ujon por meti la lakton por la kato. Mi donos al vi unu florenon por tiu ĉi malnovaĵaĉo.

—Ne, respondas la ruza kamparano, mi konservas ĉi tiun malnovaĵaĉon. Dank' al ĝi, mi jam vendis ses katojn.

Senprudento.

Unu sinjoro eniras en magazenon de juvelisto.

Mi deziras gravurigi interne de tiu ĉi ringo, kiun mi destinas por mia fianĉino, la jenajn vortojn: "Gastono al sia kara Margareto."

—Jes, sinjoro, sed tio eble estas senprudenta, vi ne plu povos utiligi tiun ringon, se F-ino Margareto, aŭ vi mem, ne plu same opinios.

—Vi estas tute prava. Tiam metu: "Gastono al sia unika amatino."

(El "La Movado," Parizo.)

DO IT NOW!

5/-

Please accept my subscription of 21/- for one year to the Society for the Advancement of Esperanto, 169 Exhibition Street, Melbourne, C1., and forward monthly a copy of La Suda Kruco to each of the following:—

1 Name and Address for 5/-.....

4 Names and Addresses for 21/-.....

Your Own Signature.....

Your Own Address.....

"Mi observas MIAN palton; mi timas, ke oni ĝin ne ŝtelu . . . La cian oni jam delonge forŝtelis."

Yesterday you met one who used to be an Esperantist. Send his name and address to the secretary of the S.A.E.

NI DEZIRUS SCII:—

Kiam Kalocsay donos al ni "Hamleton" en vesto de "moderna" Esperanto?

Kiam iu eldonejo aperigos la Tradukajaron de d-ro Zamenhof en formo kaj maniero inda la Majstro-laboron?

Kiam oni ĉesos troigi en la raportoj pri Esp. progreso? (n-ro 5/1933 La Socialisto, "G. R. Sykes antaŭdiris baldaŭnan rekonon de E. en Aŭstralio").

Kiam certaj laŭte reklamitaj novaĵaj gazetoj E-aj eldonos sian duan n-ron?

Kiam ne-Esperantaj kritikantoj de nia lingvo, asertante ke ĝi ne taŭgas por la literaturo, legos E-ajn verkojn kaj tiam verkos detalan analizon studon por pruvi la pravecon de sia sinteno?

Kiam la "British Esperantist" ĉesos la absurdaĵon presadi en la angla lingvo recenzojn pri E. libroj?

PRI "DE PAGO AL PAGO.

En la n-ro Nov-a-1932 de La S.K. aperas recenzo pri la supra verko de L. Totsche. En ĝi estas dirite, paĝo 11, ke "Totsche nomas la verkaron de Baghy kiel 'destinita por levi nian poezion al la nivelo de la plej eminentaj naciaj literaturoj'". S-ro T. plendas, ke mi citis frazon el lia libro kaj ĝin rilatigis al Baghy, kvankam estas evidente, ke la frazo ne rilatas al li. Li estas prava, kaj mi petas pardonon pro la eraro, kiu estigis pro tro rapida lego. La plena frazo tekstas: "Nia literaturo fermentis, tie kaj tie ĉi sendepende de Baghy, eklaboris junaj viroj ĉizante la lingvon en tradukitaj aŭ originalaj verkoj, sed ili plejparte laboris por sia skribotablo, nur foje kaj foje aperigante ion, inter ili ankaŭ tiu genio, kiu jam tiam konscie laboris pri sia verkaro, destinita por levi nian poezion al la nivelo de la plej eminentaj naciaj literaturoj."

Se mi nun rajtas konjekti, la aludo estas ne al Baghy, sed al Kalocsay. Se tio ĉi ne estas vera, sendube klarige skribos al La S.K. s-ro T., kiu je nia sincera bedaŭro kuŝas en aŭstria sanatorio. Resanon! (R.B.)

Junulo dez. kor. kun knabinoj el ĉiuj partoj de Aŭstralazio. J. Ivičević, G.P.O., Auckland, N.Z.

Coburg Esperanto Club:—Finaj aranĝoj estas farataj por la jara danc-kaj festvespero. Ĉeesti oni povas per simpla invito; klubanoj kaj aliaj E. socioj en Melburno kaj ĉirkaŭ jam ricevis invitbiletojn. Jam de kelkaj monatoj progresintoj de la klubo vizitas sin reciproke ĉiun dusemajnon en siaj domoj. Nur E-on ili parolas ĉe tiuj kunvenoj, kio donas bonegan ekzercon al tiuj dezirantaj plifluigi la E. parolpovon. Ni proponas organizi E. -lingvajn debatojn ĉe tiuj vesperoj, kompreneble aldone al la regulaj vendredvesperaj klasoj en la Labor-Hall.

Vorto ne trovebla en La Plena Vortaro, sed uzita en ĉi tiu numero. "Semantiko": A. Semantics, semasiology; F. sémantique.—Tiu branĉo de la filologio, kiu pritraktas la signifojn aŭ sencojn de vortoj; la scienco klarigi la disvolvigon kaj ŝanĝojn de vortsignifo.

Whom have you enlisted in the movement?

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF.

(N-ro 7)

—:o:—

Mi scias, ke tre multe da esperantistoj havas la fortan konvinkon, ke por Esperanto estos plej bone, se en la daŭro de mia tuta vivo mi persone restos la sola kaj plej alta aŭtoritato en nia afero, ĉar neniam eĉ plej saĝaj komitatoj povas per malvarma, multkapa kaj blinde palpanta rezonado trovi la efektivajn bezonojn de nia lingvo tiel ĝuste kaj bone, kiel ilin trovas per sia sento kaj sperto tiu persono, kiu kreis la lingvon kaj laboris por ĝi kaj en ĝi tutan vivon. Mi konfesas, ke en rilato praktika tiu ĉi opinio havas en si multe da praveco. Sed ĝuste por tio, ke mia aŭtoritateco alportu al nia afero utilon anstataŭ malhelpo, estas necese, ke ĝi estu libervole kaj konscie akceptata, sed ne leĝe altrudata. Se la esperantistoj trovas, ke mia aŭtoritateco estas utila por nia afero, kio do malpermesos al ili ankaŭ poste rigardadi min kaj miajn verkojn kaj konsilojn kiel aŭtoritatecojn? Kiu malpermesos al la Centra Komitato klarigadi al la esperantistoj, ke pro la bono de nia afero estas dezirinde, ke la esperantistoj, kiel eble pli imitadu mian stilon? La diferenco estas tia, kiam la esperantistoj propravole kaj konscie rigardados min kiel aŭtoritaton, tiam ili volonte penos ĉiam imitadi mian stilon, kaj nia lingvo multe gajnos de tio ĉi ĉar unueco kaj unuŝpirtateco estas por ĉiu lingvo multe pli grava ol la plej severa logikeco, se tiu ĉi logikeco ne

estas absolute senduba kaj egala ĉe ĉiuj; sed se mia aŭtoritateco estos altrudata de mi mem kaj se ĝi estos nur "necesajo," sekvo de foresto de la plej alta juĝantaro, tiam oni sekvados miajn ekzemplon kaj konsilojn nur tre nevolonte, kaj kiel ajn mature priprenita estus ĉiu mia ago, ĉiam multaj personoj trovos ĝin erara, nelogika kaj sensenca, kaj ni havos konstantan disputadon kaj opozicion."

(El letero al s-ro A. Michaux, 1905. Citita el "Originala Verkaro," paĝo 432.)

PROFESSOR LODEWYCKX REPLIES TO LA SUDA KRUCO.

(see article in last issue)

The University of Melbourne,
August 26, 1933.

The Editor, "La Suda Krucio":

Dear Sir,—I have to thank you for sending me your last issue of "La Suda Krucio," in which you were good enough to devote an article to the series of talks which I gave recently over 3AR, one of which dealt with artificial languages.

Whilst realising that you would not find space to discuss fully all I said in a talk of twenty minutes, I am somewhat surprised that you are completely silent as to the content of 90 per cent. of my talk, dealing amongst other things with the advantages of Esperanto, and that you confine yourself to two points, viz., the strength of the organised Esperanto movement, and the fitness of Esperanto as a literary medium.

May I be allowed to reply briefly to your criticism on these two points. My statistical information is derived from Brockhaus and my round figure of 50,000 was more than 8000 above the actual 41,751 organised Esperantists in 1928. In order to avoid giving too many statistics, I omitted the 126,508 Esperantists of whom Dr. Dietterle at the time had trustworthy knowledge, but added that the actual number of people practising the language amounted probably to between 500,000 and a million. You say that authorities at the time calculated that it would approximate ten times 126,508, i.e., about 1,265,000. Of course this is mere guesswork; and even this very high estimate is not very much above my figure of 1,000,000.

And now the second point. You quote a number of writers, such as Zweig, Ossendowski, Renn, Baudouin, Babits, S. Lagerlof, who have testified to the fitness of Esperanto as a literary language. But surely you are aware that it would be very easy to quote as many authorities who hold opposite views. I shall not take up your space in doing so, but only refer to the opinion of Professor A. Meillet, the greatest representative of linguistic

science in France to-day. Meillet is rather favorable to the idea of an artificial auxiliary language and fully recognises the value of Esperanto as a vehicle for international intercourse, for scientific publications, etc.; but where it comes to the literary use of Esperanto, he is very sceptical and says:

"Les esperantistes ont commis des naivetes, ainsi quand ils ont traduit en esperanto de grandes œuvres litteraires universellement connues. La litterature est le dernier des usages auxquels peut etre employee utilement une langue artificielle. Pour tout ce qui est du style, la litterature vit de la valeur expressive des mots et des tours de phrases, de l'originalite des ressources propres a chaque langue. Une langue artificielle se prete a l'expose pur et simple de faits et d'idees qui ne sont pas trop delicatement nuances; mais elle est, par sa nature meme, inapte a l'expression litteraire. Et, du jour ou elle acquerrait le caractere expressif et idiomatique d'une langue traditionnelle, elle aurait perdu de ce fait les qualites essentielles qui lui donnent sa raison d'etre." (A. Meillet, *Les Langues dans l'Europe Nouvelle*, 2nd edition, p. 281).

As you see, Meillet is far more emphatic than I am in denying the fitness of Esperanto to be used as a true literary language.

Before closing this letter I wish to add that, although not convinced that Esperanto is the best possible international language, I am in full sympathy with the aims of the Esperanto movement and wish you all possible success in your endeavors in Australia.

With kind regards,

Yours faithfully,

A. LODEWYCKX.

[The Esperantists have done some naive things, as, for instance, when they translated into Esperanto great works of literature known throughout the world. Literature is the last thing for which an artificial language can be usefully employed. In all that appertains to style, literature depends on the expressive value of words and of phrasing, on the originality of resources peculiar to each tongue. An artificial language stands ready, as it were, to set forth purely and simply such facts and ideas as are not too subtly nuanced; it is, by its very nature, unfitted for literary expression. The day that should see it acquire the expressive and idiomatic character of a traditional language, would see it to have lost, by virtue of that acquirement, the essential qualities that give to it its raison d'etre. Translation of above French text, by "La S.K."]

Professor A. Lodewyckx.

Dear Sir,

I thank you sincerely for your letter of the 26th inst. and regret that the article in the S.K. was inadequate to cover your lectures. I merely picked out the two points that as an Esperantist I thought might provide comment.

We agree that the quoting of well-known names in favor or disfavor of Esperanto is more or less unprofitable. Such a procedure converts but few of those already convinced one way or the other. I would, however, beg leave to mention in connection with the name of Meillet that of the great Jespersen, who, although not stressing the literary potentialities of his Novial, nevertheless suffers "Mondo," the organ propagating his language, to publish in Novial pages of translated work distinctly literary. He himself in former years wrote Ido with effect in polemical articles. It is hard to believe that such a philosophic, penetrative mind as his could apply itself to the task of inventing a language without trying to incorporate in it those elements or characteristics which would give it the potentiality of becoming a literary tongue. If, as I believe is true, Jespersen holds the belief that an artificial tongue can become a finely discriminating literary instrument, then we have one great philologist against another.

In all my reading on the subject of inter. lang. during the past ten years I have never once seen a thoughtful, painstaking article or study written to disprove the fitness of Esperanto as a literary medium. Such an article should take the form of a detailed analysis of a given translation in Esperanto, compared faithfully with the original text. Such, of course, postulates an intimate knowledge not only of Esperanto grammar, but of Esperanto semantics, of the "literary" (I quote the word to avoid the imputation of begging the question) evolution and the tradition of the language. General, vague denials a-plenty, but no serious attempt to demonstrate the truth of the assertion. On the other hand, there are several finely wrought studies on the flexibility of Esperanto in translation. Prof. Collinson, several clergymen on the Hebrew Bible and the Esperanto version, and Prof. Waringhien, Lille Univ., in his "L'Esperanto et la Stylistique" have revealed a careful study of the question. The lack of studies of this kind unfavorable to Esperanto is the more remarkable when one considers the wide field offered to such criticism by the low standard of so much of our Esperanto translations. Of course, the fault here lies with those Esperantists who, possessing little or no literary sense, and furthermore in many cases having an incomplete mastery of the inter. lang., have undertaken work beyond their power or comprehension.

There is, however, work both in

prose and poetry that really merits the attention of those interested in the relation of international language to literature.

True it is that many scholars and men of affairs agree that Esperanto is well fitted to serve in the non-literary field—science, commerce, travel. It does seem rather a pity that a risk should be run of alienating this body of opinion by an undue stressing of the literary features of Esperanto. For after all this is a question that would answer itself in time, after the establishing of Esperanto in practical fields.

Touching the last sentence of Meillet quoted by you, I would say that certain leading Esperanto writers, headed by Kalocsay and the "Budapest school," are endeavoring to develop and enrich Esperanto by enlarging its vocabulary, elaborating for it a prosody, and experimenting with its syntax, after the manner of poets and word masters the world over. They affirm that Esperanto may well be developed along a literary path without in any way interfering with its simple grammar and vocabulary "of the people." Esperanto, as such, may always be easily learned by folk wishing to use it only for intercourse, and so on, and not to read its higher literature, which, as in the national languages, is only for those who are prepared to devote time and study to the appropriation of its treasures.

My dear sir, you will, I trust, regard yourself as being under no moral obligation to answer this unsolicited and lengthy letter, and accept my thanks for your kindness and sympathy in the matter.

I am,

Yours truly,

R. BANHAM.

University of Melbourne,
5 September, 1933.

The Editor, La Suda Krucio:

Dear Sir,

I thank you for your interesting letter which I received yesterday. I do not deny the possibility of Esperanto or another artificial language developing into a literary language. It only requires men of great literary genius using such a language for original production.

I think you might publish my letter of 26th August with your reply.

Yours faithfully,

A. LODEWYCKX.

Naivulo.

Sinjoro demandis sur la strato fiakriston: Kiom oni pagas ĝis la stacidomo?—Tio ne kostas multan monon. Por vi mi volas kalkuli 10 kronojn.—Mi dankas, mi volis nur scii, kiom mi ŝparus, se mi piedirus.

REVENO

(de Henry Lawson)

—:o:—

La fremdulo marŝis en la spicistan butikon, ĉe la stratangulo, kun la aspekto de viro, kiu estis reveninta post multaj jaroj, por vidi iun, kiu ĝojus lin vidi. Li demetis sian pakaĵon, kiu konsistis el volvitaj lankovriloj, de la ŝultro, kaj starigis ĝin kontraŭ la muro, kun intenco malrapideco; tiam li metis la kubuton sur la montrotablon, mankarezis la barbon, kaj ridetis ŝerceme al la butikisto, kiu baldaŭ respondis per necerta rideto.

"Bonan tagon," diris la spicisto.

"Bonan tagon."—Paŭzo.

"Bela tago," diris la spicisto.

"Jes—estas bela tago."—Paŭzo.

"Ĉu mi povas servi al vi?"

"Jes—diru al la maljunulo, ke estas viro kiu volas paroli kun li por unu momento."

"Maljunulo? Kiu maljunulo?"

"Hake, kompreneble—maljuna Ben Hake! Ĉu li ne estas hejme?"

La spicisto ridetis.

"Hake ne estas ĉi-tie nun. Mi estas ĉi-tie."

"Kiel tio okazas?"

"Nu—li vendis la butikon al mi antaŭ dek jaroj."

"Nu—mi supozas ke mi trovos lin ie en la vilaĝo?"

"Mi pensas, ke ne. Li forlasas la kamparon, kiam li vendis la butikon. Li—Li estas mortinta nun."

"Mortinta! Maljuna Ben Hake?"

"Jes. Vi konis lin, ĉu ne?"

La fremdulo ŝajne estis perdinta iom de sia certeco. Li turnis sian flankon al la montrotablo, apogis sian kubuton sur ĝin, kaj rigardadis tra la pordo, laŭ la Sunsubira Vojo.

"Vi povas doni al mi duonfunton da tabako," li diris kviete. "Mi supozas, ke juna Hake estas en la vilaĝo?"

"Ne, la tuta familio foriris. Mi pensas, ke unu el la filoj estas negocisto en Sydney nun."

"Mi supozas, ke la McLachlan familio ankoraŭ loĝas ĉi-tie."

"Ne—La maljunaj gepatroj mortis antaŭ kvin aŭ ses jaroj; la filoj estas en Kvinlando, mi pensas, kaj ambaŭ filinoj edziniĝis kaj loĝas en Sydney."

"Ah—nu!—Mi vidis, ke vi havas la fervojon ĉi-tie nun?"

"O, jes. Ses jarojn!"

"La tempoj multe ŝanĝiĝis."

"Jes, certe."

"Mi supozas—mi supozas, ke vi povas diri al mi kie trovi maljunan Jimmy Nowlett?"

"Jimmy Nowlett? Mi neniam aŭdis tiun nomon. Kion li faris?"

"Li estis 'bullocky (1)'. Li portadis komercaĵojn de la montoj, antaŭ ol la fervojo venis."

"Eble antaŭ mia alveno. Neniu de tiu nomo loĝas ĉi-tie nun."

"Nu, do.—Vi povas doni al mi funton da sukero."

"Bone. Ĉu estas longe deponi via lasta vizito al ĉi-tiu vilaĝo?"

"Dek kvin jarojn.—Mi supozas, ke mi ne memorigas vin pri iu, kiu loĝas ĉi-tie?"

"N-ne!" diris la spicisto, ridetante. "Mi ne povas diri tion."

"Nu, do!—Certe la homoj loĝas en la sama loko?"

"Ne—la maljunulo mortis kaj—"

"Kaj kie estas Jim? Jim ne mortis?"

"Ne—li edziĝis kaj iris al Sydney." Longa paŭzo.

"Ĉu vi povas—diris la fremdulo, hezite. "Ĉu vi—mi supozas, ke vi konis Mary Wild?"

"Mary?" ridetis la spicisto. Tio estis la fraŭlina nomo de mia edzino. Ĉu vi ŝatus sin vidi?"

"Ne, ne! Eble ŝi ne memorus min."

Li rapide prenis sian volvitajn lankovrilojn kaj metis la pakaĵon sur la ŝultrojn.

"Nu—mi devas iri."

"Mi supozas, ke vi kampos ĉi-tie por Kristnasko?"

"Ne—estas nenia kialo—mi iros antaŭen. Mi intencis pasigi Kristnaskon ĉi-tie. Fakte, mi venis de malproksime, tiucele. Mi intencis pasigi unu Kristnaskon pli kun maljuna Ben Hake kaj la aliaj knaboj—sed mi ne sciis, ke ili moviĝis tiel malproksimen al la okcidento. La malnovaj kamparuloj formortas."

Estis rideto en liaj okuloj, sed la barbkovritaj lipoj iom tremetis.

"La tempoj ŝanĝiĝis. La malnovaj domoj aspektas same, kaj la malnovaj pendsignoj bezonas kolorigon, same kiel antaŭe: kaj jen estas tiu malnova barilo, kiun mi kaj Jimmy Nowlett kaj Ben Hake konstruis antaŭ dudek jaroj. Mi estas marŝinta kaj vojaĝinta longajn distancojn deponi tiu tempo. Sed la tempoj ŝanĝiĝis—almenaŭ la homoj ŝanĝiĝis.—Nu, mi devas ekiri. Estas nenio por deteni min ĉi-tie. Mi reiros laŭ la vojo. Estas pli malvarmete,

marŝadi dum la nokto."

"Jes.—Nu, adiaŭ."

"Bonan tagon. Gajan Kristnaskon!"

"Eh? Kio? Ho, jes. La saman al vi. Adiaŭ!"

"Adiaŭ!"

Li forvojaĝis, for laŭ la Sunsubira Vojo.

(Tradukis M. C.)

(1) "bullocky": veturigisto de ĉaro trenata de kastritaj bovoj. En Aŭstralio oni multe uzas tiajn por transporti lanopakegojn kaj grensakojn de la bienoj al la fervojstacioj.

CONCERNING "HAMLET."

(See p. 60, La S.K., June, 1933.)

—:o:—

On this interesting problem we have received the following letter:—

Maradomo, Glan-y-mor Road, Penrhyn Bay, Caernarvonshire, Wales, 31 July, 1933.

Dear samideano,

The word *tempo* is not a printer's error; the correct word *templo* appears in the original (1894) edition of Hamlet, which forms part of the "Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto"; and when Zamenhof compiled the "Fundamenta Krĉstomatĉio" in 1903 he included the first act of Hamlet and restored many of the original forms, *templo* being among the number; see F.K., p. 423.

After the publication of Dr. Pierre Corret's article in "The British Esperantist" of May, 1920, I corresponded with him on the subject. There cannot be any doubt that the unnamed "korektisto" was de Beaufront. Dr. Corret wrote to me that de Beaufront "akre plendis" of the restoration of the original words in the Krestomatĉio.

Regarding the extract from Ham'et quoted in "La Suda Krucio" of June 12, 1933, it should be noted that, in four editions which I have consulted, there are commas before and after the word *creŝcent*; this marks the said word as an imperfect participle, and clearly justifies Zamenhof's choice of *kreskante* in preference to *kreskanta*. The word *sama* occurs in all editions of Hamlet, but in the English I cannot find anything to suggest *sama*, nor *sana*, nor any word which might have been misprinted *sama*. In the fifth line the English "grows wide," demands "larĝiĝas" rather than "ŝanĝiĝas"; "mal-ico" has no counterpart in the English;

cautel (old French *cautelle*) signifies **cunning, subtlety**. Zamenhof's seventh line might well be replaced by the following (if alteration were thinkable):

Nenia malpuraĵo nun makulas.

It seems to me that Zamenhof's rendering, with the few changes here suggested, gives an entirely satisfactory idea of the English original; and bearing in mind that his translation was made by way of a German one, we see convincing evidence of the fact that Zamenhof was, in Fraser Tytler's words, "a man of no ordinary skill."

I am,

Cordially yours,

William Bailey (L. Akad.).

FROM THE BRITISH ESPERANTIST OF MAY, 1920.

The following excerpt from the article written by Dr. P. Corret in the above issue throws further light on the matter:

"Antaŭ mi, sur la tablo, kuŝas du libroj, du frataj libroj: malnovaj verkoj de d-ro Zamenhof, La Batalo de P'Vivo kaj Hamleto,—sed tamen kiom malsamaj!

"Ili ja ne estas originalaj eldonoj; sed nur represajoj, kaj la represintoj uzis du tre malsamajn metodojn. La unua libro redonas al ni tute fidele originalan tradukon, faritan en la unuaj jaroj de Esperanto; la dua estas bedaŭrinde difektita de iu teoriema 'korektisto,' kiu faris en ĝi ŝanĝojn, ŝajne sen la aprobo de la tradukinto. D-ro Zamenhof ja konstante uzadis ankoraŭ ĉiam: post la represo de Hamleto formojn el ĝi forigitajn . . .

"D-ro Zamenhof skribis:

Kun la kreskado de la templo ŝanĝiĝas la spirito kaj la servo Interne.

"Evidenta preseraro,' diris al si la korektisto. Tie ĉi Laerto parolas al sia fratino pri la amo de Hamleto kaj diras, ke ĝi sendube forpasos samtempe kun lia ĵuneco. Evidente, la parolo estas pri forpaso de tempo, kaj ne pri ia templo' . . . Kaj li tute kontente anstataŭigis 'templo' per 'tempo,' ne rimarkante, ke Laerto komparas la homan korpon kun templo en kiu la spirito-pastro 'faras servon interne.' Shakespeare skribis: 'as this temple waxes, the inward service of the mind and soul grows wide withal!'

[La S.K. thanks Mr. Bailey for his kind interest and help.]

Jurnalisto: Kiaspecan reserĉon nun faras la profesoro?

Servisto: Plejmulton de l'tempo li serĉadas la okulvitrojn.

Do you enjoy reading "La Suda Kruco"? Tell others about it.

EL GERMANA PLUMO

La jeno estas eltirita el "La Mortado," de Prof-o Hermann Nothnagel, trad. B. Selzer.

"La teruoplenaj opinioj pri la fizika mortado plej multe ekzistas nur en la imago. Vere turmentoplena ĝi estas nur en malmultaj okazoj, kaj ĝuste tiujn plejparte la homo mem faras al siaj kunhomoj: morton per fajro kaj torturoj. La naturo estas multe pli kompatema ol la homo—se ĝi sole kaj ĉiam povus efikadi kaj se la homa gento alvenus ĝis la natura fino de la vivo, vere, ni povus pri la mortado pensi tiel, kiel laculo sopiras la dormon, la dolĉan konsolanton kaj refreŝiganton. Sed ankaŭ preskaŭ ĉie cetere, kie ĝi mem kondukas al la mortado, ĝi kompateme disetendas vualon, por kaŝi la timon kaj teruron de sia tremanta kreitaĵo. Ne fizike estas turmenta la mortado—turmenta estas la anima mort-angoro.

"Kaj ĉi tiu lasta?

Unu treege estimata amiko ofte esprimis la deziron, povi ĉe klara konscio disiĝi de la vivo. Tiu ĉi deziro estis tiel urĝa, ke li postulis de sia kuracisto, kiu al mi tion rakontis, la nebran promeson, certe malkaŝi al li, kiam laŭ homa antaŭvideblo lia fino alvenos. Li estis malsana je kalkiĝo de la kronaj arterioj de la koro kaj de kaŭzita de tio fortaj atakoj. Dum tia atako lia kuracista konsilanto diris al li: "Nun la stato estas supezeble serioza." Tiam li kunvokis sian familion kaj pasigis kun ĝi en soleco ankoraŭ kelkajn tagojn en serena animtrankvileco, en mensa ekvilibro, kviete atendantante la finon—kiel sublima modelo de klaranima homeco. Estas vero, li estis viri, kiu, en sia ĵuneco, ofte persone interrilatis kun Goethe, kaj kiam li, postrestinta ideala figuro el la grandaj oraj tagoj de Jena (1), fariĝis maljunulo, oni prave pri li diris: Neniu foriras de li sen la sento, ke li fariĝis pli bona.

Kial io puŝas min, memori ĉi tie tiun subliman homon? Ĉar lia dignoplena ekzemplo instruas, kiel homo saĝa kaj bona penŝas pri la mortado. Estas vero, ke nur malmultaj luktas kaj atingas tiun ĉi majestecon de la menso; ĉe malmultaj nur, uzante la vortojn de Sokrates, la bona demono parolas en la brusto tiel laŭte, ke ili nenion aŭdas krom la tono de lia voĉo, kaj ĉe tio forĝeŝas je mortado kaj morto. Sed tiuj ĉi malmultaj estas liberaj de la efektiva teruro de l'morto, de la anima mort-angoro. Ili povas, kiel Sokrates, kiam li devis trinki la kalikon da veneno, eldiri: "Nu do Kriton, fartu bone! Se la dioj tiel volas, ĝi estu!

(1) Jena: germana universitata urbo, centro de kulturo.

Wideawake Esperantists belong to the S.A.E. Do you?

LA DOMBRULO.

Ekzistas kelkaj vortoj, kiuj terure frapas la homkorojn. Milito, pesto, ŝippereo, dombrulo. Militon kaŭzas la egoismo de la nacioj; pesto venas pro malpuro kaj nezorgo. Kiam venas la grandaj ventegoj eĉ lerta direktado ne povas malebligi ŝippereon. Sed dombrulo estas farata de la destino; ĝi estas malatendita, tial pli terura. Jen tie staras loĝejo, sekvantan tagon ĝi ne estas plu tia, sed nur bulo da cindroj. Saltas fajrero el ankoraŭ ardetanta brulaĵo kaj ekflamiĝas la domo.

En malproksimo la ĉielo estas ruĝa, kaj homoj ĉekuras el ĉiu sia domo, por ke ili vidu la spektaklon. Tra pordegoj markitaj "Privataj" iras ni, ne atentante. Ni promenas sur la florbudojn de fremdaj homoj, por ke ni pli oportune rigardadu. Alrapidis la fajrobriĝado, trembrilas la flamoj sur la kaskoj de la estingistoj. Ŝanĝiĝas en sangokoloron la akvo de la ŝprucmaŝino, tordiĝas kiel serpentoj la flekseblaj tuboj sur pavyimo. Igas glitigaj la vojoj, tamen ankoraŭ venadas homoj, ankoraŭ forkonsumiĝas en flamojn la domo.

La brulanta konstruo estas tiu de la gardisto, kiu prizorgas la pilkrulan herbejon. Anoj de la pilkrula klubo eksaltas de angoro, vidante pezajn botojn paŝegi sur ilian belan parketon.

Eĉ kiam oni jam estingis la flamojn, ankoraŭ, alpuŝiĝas scideziruloj por fikse rigardi la ruĝon, sed—mi enokule havas cindreton, do devas foriri.

Originale J. Gray.

La Preternacio Konstancio.

Regas tie la Reĝo, sur konstanta tronseĝo,

Kaj en formo etera de la propra Am-Leĝo.

Atentu, aventurulo! Per la Kriŝfratineto (Elkreskantimo de la cerbo de brita bubo), jam naskiĝis surteren LA PRETERNACIO KONSTANCIO. Tio ĉi estas nek Religio, nek Teorio, nek Scienco, nek ia Ismo, sed vera viva afektiva REGNO. Ĉiam staras malferma la nefermdeya pordego de Konstancio: tamen, bone komprenu la fakte enironto, ke, enirante, li tuj do submetas sin en la manon kaj povon de la Tjea Dio, la leĝo de Konstancio, la leĝo de l' AMO-MEM.

Por pluaĵ liberaj klarigoj, vole perpoŝtu al K'ano Joab Eliot, 2 Cambridge St., WILLOUGHBY, N.S.W., Aŭstralio.

Pri spegulo, kaj kiel ĝi rompiĝis.

Kiam ni atingos la finon de ĉi tiu historio ni scios pli ol ni scias nun, ĉar ĝi temas pri malbona sorĉisto, unu el la plej fifaraj sorĉistoj. Unu tagon li sentis grandan ĝojon, ĉar li faris spegulon, kiu havis ĉi tiun proprecon, ke kio ajn bona aŭ bela, kiam reflektata en ĝi, estiĝis preskaŭ ĝis nenio, sed kio ajn seninda kaj okumalplaĉa aperis en ĝi klare, kaj fariĝis eĉ pli malbela. La plej belaj pejzaĝoj, kiam vidataj en ĝi, aspektis nur kiel kuirita spinaco, kaj eĉ belvizaĝaj personoj fariĝis fortimige malbelegaj, aŭ staris sur sia kapo kaj aspektis ridindaj. La vizaĝoj estis tiel distorditaj, ke ili ne povis esti rekonataj, kaj se iu havis lanugeron, kiel ajn malgrandan, ĝi nepre etendiĝis sur nazon kaj buŝon. Kiam io bona aŭ senpeka eniris la homajn kapojn, estis ridaĉo sur la vizaĝo de la spegulo, kaj la sorĉisto tutkore ridis pro sia sagace elpensita inventaĵo. Ĉiuj, kiuj vizitadis lian lernejon de magio, anoncis ĉie, ke miraklo okazis, kaj ke nun, por la unua fojo, oni povas vidi tion, kio vere estas la homo kaj la mondo. Ili ĉirkaŭkuris ĉie kun la spegulo, ĝis fine ekzistis neniu homo kaj lando, kiuj ne estis distorditaj per ĝi. Ne kontentaj pro ĉio tio, ili suprenflugis al la ĉielo kun ĝi; sed la spegulo tiel forte skuiĝis pro sia propra ridaĉo, ke ĝi elglitis, el iliaj manoj, kaj falinte malsupren ĝis la tero, rompiĝis en centojn da milionoj da bilionoj da pecetoj kaj eĉ pli; kio kaŭzis pli grandan malutilon ol antaŭe, ĉar kelkaj el la pecoj estis ne pli grandaj ol polvoj. Ĉi tiuj ĉirkaŭflugadis en la aero, kaj kiu ajn ricevis ilin en la okulojn, tiu vidis la tutan homan rason distordita, ĉar ĉiu peceto, kiel ajn malgranda, konservis la proprecon de la tuta spegulo. Kelkaj homoj eĉ ricevis malgrandan pecon de la spegulo en sia koro, kaj tio estiĝis terura, ĉar la koro fariĝis kiel bulo da glacio. Kelkaj el la pecoj estis tiel grandaj, ke ili estis uzataj kiel fenestrovitroj, sed tra tiajn oni ne saĝe rigardus al amikoj. Aliaj pecoj estis fabrikataj kiel okulvitroj, kaj tiam ĉio ja malĝustigis, precipe kiam personoj surmetis ilin, por ke ili bone vidu kaj juste agu. Kaj iom de la polvo de la disrompita spegulo ankoraŭ ĉirkaŭflugas en la aero, kiel oni malfeliĉe vidas en ĉiu tago.—E.C.

Which treats of a Looking-glass and the Broken Pieces.

When we have got to the end of this story we shall know more than we do now, for it is of a wicked sorcerer, one of the very worst sorcerers. One day he was in high glee, for he had made a looking-glass which possessed this peculiarity, that everything good or beautiful reflected in it dwindled down to almost nothing, but whatever was worthless and unsightly stood out boldly, and became still worse. The most beautiful landscapes, when seen in it, looked only like cooked spinach, and even handsome people became repulsive, or stood on their heads and looked ridiculous. The faces were so distorted that they could not be recognised, and if anyone had a freckle, never mind how small, it was sure to spread over the nose and mouth. When anything good or innocent entered a man's head, there was a grin on the face of the looking-glass, and the sorcerer laughed heartily at his ingenious invention. All who attended his school of magic related everywhere that a miracle had happened, and that now, for the first time, one could see what man and the world really were. They ran about everywhere with the looking-glass, till at last there was no man and no country that had not been distorted by it. Not satisfied with this, they flew up towards heaven with it; but the looking-glass shook so violently with its own grinning that it slipped out of their hands; and having fallen down to the earth it broke into hundreds of millions of billions of pieces, and still more, which caused greater mischief than ever, for some of the pieces were no larger than dust, and these flying about in the air, whoever got them in his eyes saw the whole human race distorted, for each particle, however small, retained the peculiarity of the whole looking-glass. Some men even got a small piece of the glass in their hearts, and that was dreadful, for the heart became like a lump of ice. Some of the pieces were so large that they were used for panes of window-glass, but it would not do to look at one's friends through them. Other pieces got made into spectacles, and then indeed all went wrong; particularly when people put them on in order to see right and to be just.

And some of the dust of the broken glass is still flying about in the air, as is seen, unfortunately, every day.

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

Masterton (N.Z.) Esperanto Club.—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Workson-rd., Masterton. Visitors welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: s-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram

Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18^h.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Coburg Esperanto-Grupo—Kunvenas ĉiujauĉe je la 8a vespere ĉe la Labour

Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following:—Miss Saw, 4/6, July, '34; Coburg Esperanto Group (sales), 8/8; Mr. N. M. Bell, 5/-, May, '34; Melbourne Esperanto Club (subs.), July, 18/-; (sales) July, 12/10; Mr. J. Mader, 5/-, Aug., '34; Mr. H. Byatt, 4/6, July, '34; Mr. H. V. Taylor, 4/6, Sept., '34; Miss L. R. Bell, 4/6, July, '34; Miss Jean Searle, 4/6, Sept., '34; Melbourne Esperanto Club (subs.), Aug., £1/4/-, (sales) 4/4; Mr. D. McInnis, 9/-, July, '34; Adelaide Esperanto Club (sales), 12/-; Mr. D. P. Mason, 4/6, Sept., '34; Miss Cox (adv.), 2/-.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 6 pencoj. :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 156 (14th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

3 NOVEMBRO, 1933.

AN EDUCATIONIST LOOKS AT ESPERANTO

When anyone speaks of the educational value of a subject of study, he may have in view any of the following points:—(a) The efficacy of the course of study as a means of training the mind; (b) The desirability of the subject as an addition to the pupil's general stock of knowledge, with any consequent effect on his usefulness as a member of society; (c) Its value as an aid to the acquirement of other subjects; and (d) Its practical utility in daily life.

Many of its advocates of Esperanto are inclined, not unnaturally, to look chiefly at its utilitarian side; others, quite reasonably, look on it as a fascinating hobby, without troubling themselves about its educational value at all. There are, however, many students of Esperanto who have become very strongly impressed with its cultural value; and it is quite arguable that even if the language had no practicable application at all it would still be worth teaching in schools, in addition to, or in place of, some of the subjects which are now regarded mainly as educational in the more limited sense and have little immediate bearing on practical affairs.

An adequate conception of the educative effects of Esperanto is hardly possible except to those who have themselves learnt and used it (and this fact is largely responsible for the prevailing indifference to the language on the part of the teachers and educationists), but the reader may be

helped to understand the point of view of its advocates by the following remarks on some of the advantages which it offers.

The study of Esperanto leads to clear thinking, and to a better knowledge of the basic principles of language as such. In Esperanto, each root-word expresses a single fundamental idea, and is essentially thought translated into language. The basic idea expressed always remains the same, in whatever connection the root may be used, and whether it is employed literally or figuratively. In the national tongues, this principle is overlaid and largely concealed by conventional forms of speech which makes the languages, to some extent, into codes rather than direct expressions of thought; they are full of "set phrases" and concatenations of words which in certain contexts are the only "correct" forms to employ, even when by all the rules of logic and common sense some other form would do as well—and often better. In other words, national tongues have to be learnt largely by rote; and the student, being unable to "make them up as he goes along," is seriously hindered in his progress and often completely discouraged. Any real mastery of a foreign language, outside the ranks of those with special linguistic ability, or exceptional opportunities, is thus extremely rare.

Many other illogicalities are met with in studying national tongues, and one or two examples of a simple kind

may be useful. In French, the sun is masculine and the moon feminine, although there is no intrinsic justification for any sort of "sex" in these objects; and the same principle (or lack thereof) goes all through the language, in which every noun possesses one of these two "genders"—to use the term employed to distinguish the grammatical sex from true sex. On the face of it German, with its "neuter" nouns, is better in this respect; but the student of German soon finds that actually he is in even worse case than when learning French, as ordinary "common nouns" are not (as might be supposed) necessarily neuter, but may be masculine or feminine. Incidentally, in this case the sun is feminine and the moon masculine; while, to complete the confusion, a girl and a woman are neuter!

Again, in French, an adjective may precede, or may follow, the noun it qualifies, but as a rule only one method is correct in any given case; and sometimes, when both are alleged to be possible, it turns out that the meaning of the combined expression (noun plus adjective) is radically affected by the position of the adjective.

All the multifarious "rules" given in the most voluminous textbooks are inadequate to cover the peculiarities of this and other kinds occurring in the national languages. In Esperanto, on the other hand, logic and common sense reign supreme; as soon as the student has grasped the fundamental

meaning of any root, he can employ the root freely, and also form any desired compound of two or more roots to express his ideas. He can please himself as to the position of the adjective, which cannot change in meaning (though it may possibly gain or lose in emphasis) by being put before or after its noun; and he has no difficulty with gender, since (as in English) everything that is not really "he" or "she" is logically treated as neuter, and called "it."

The student of Esperanto can himself check the accuracy of his words and sentences; and can always be sure that if he uses direct, simple, grammatical phraseology, whether it be exactly that of the more experienced and fluent speaker or not, he will be using correct Esperanto and will be understood. Elegance of style is a secondary matter, which can be acquired by reading and practice in composition.

The headmistress of an English school for girls where the language is taught has written:

Esperanto has been found helpful in the teaching of many subjects, particularly English Literature. If we come across a difficult passage, with involved construction, instead of asking the children to analyse or paraphrase it, I often ask them to put particular words into Esperanto, telling them any necessary root which may be unfamiliar to them. According to their degree of success in constructing the required words, I can at once ascertain how far they have grasped the meaning of the original. The stock phrase on such occasions is: "If you can't put it into Esperanto, you don't understand it."

The permissibility (as well as the necessity) of constant word-building is a great attraction to children, and also to adult learners, during their Esperanto studies, and is often a real delight even to the expert, who in speech or writing can frequently "short-circuit" his meaning by an expressive compound word, possibly made up for the occasion (and very likely unconsciously), which will at once be understood by his hearers even if they have never met it before. (Mia samsortano is a neat way of putting the man "in the same boat" as myself; samlandano is simpler than fellow-countryman, and ekplori than to burst into tears.) Furthermore, as already indicated, there is absolute freedom in the use of Esperanto roots: for example, while unteachable may be a good English word, many might hesitate to employ the corresponding form unlearnable (though it is just as logical and its meaning is clear), but in Esperanto both *neinstruebla* and *neler-*

nebla, being equally correct grammatically, are equally admissible.

Esperanto is a great help to the acquirement of other languages (especially Latin and the more purely "Romance" tongues of to-day, but also English, German, Dutch, Swedish, etc.). It will be understood that the remarks made above regarding the difficulties and illogicalities of national languages are only intended to show the difference between these tongues and Esperanto, and in no way to suggest that their study should be dropped. In the case of anyone with the requisite time, ability and opportunity, whether at school or in later life, there are many reasons why the study of such languages should, on the contrary, be encouraged; and it is often found that a knowledge of Esperanto influences a student in that direction. The amount of Esperanto that can be acquired in a few months by an ordinarily intelligent pupil provides a stock of words which are extremely useful in further language study, since not only does the everyday vocabulary of Esperanto contain a large number of roots which (in the same or closely similar forms) occur in several of the European tongues, but it also provides many which will be met with in at least one or two of them. Apart from fully "international" roots, such as *elast-, elektr-, lokomotiv-, mikroskop-, telegram-*, and many others soon met with by the Esperanto student, most of the roots come direct from Latin, or from Latin through modern Romance tongues, and the rest are largely taken from English and German.

The English-speaking student of Esperanto also becomes familiar with the use of the accusative or objective case, which he will meet with in, e.g., Latin and German; and with the pluralising of adjectives which is a feature of these and many other non-English languages.

Esperanto leads to a more accurate and extensive knowledge of geography. Unless a pupil at school has a natural taste for geography, he will probably acquire only the limited amount which can be impressed on his mind in the time actually devoted to the subject; and much of that he will afterwards forget. Many adult Britons have but the haziest notions of the size, position and importance of more than a very few foreign countries, but a course of Esperanto, supplemented as it so commonly is by the exchanging of post-cards or letters with students in five, ten, twenty or thirty foreign lands, gives a broad general education in world geography, and arouses a desire to be more fully informed about other countries and their peoples, with results unattainable in any other way.

A study of Esperanto gives the pupil a greater and more intelligent sympathy with other nations than his own, and a wider acquaintance with their literatures and modes of thought and action. This is an aspect of the mat-

ter that in some ways specially concerns adult students who have not had much opportunity of coming into sympathetic touch with foreign peoples. By Esperanto correspondence, and by reading Esperanto translations from the literatures of foreign countries, it is possible to gain a breadth of outlook, and a sense of international solidarity, which it would be very difficult to ensure by other means.

An important point about Esperanto translations is that they are usually made by persons speaking the same mother-tongue as the author, and so tend to represent the original more faithfully than the ordinary run of translations from foreign languages, which are commonly produced by "aliens." Thus, a translation from French into English will for obvious reasons generally be made by an Englishman, whereas a translation from French into Esperanto will be made by a Frenchman, who may be presumed to be more conversant with the subtleties of the original language. An added advantage of Esperanto in this connection is that works from some of the less-known literatures (such as those of Estonia, Finland, Bulgaria and Japan) are readily available in the international tongue.

Enough has now been said to show that the influences bearing on the student of the language must inevitably broaden his education in a remarkable way. He cannot fail to become a more efficient citizen of the world, as well as of his own national State, by realising more effectively the "unity in diversity" which characterises the peoples of the globe, and thus promoting the idea of international harmony which was the inspiration of Zamenhof and the early pioneers of the movement.

BERNARD LONG.

(In "International Language," London.)

"AL LA NACIOJ KIO MANKAS?"

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Ankoraŭ la mondo emas anstataŭigi la Sanktan Amon per ia religio, ia ismo, ia internacia ligo aŭ lingvo k.t.p. Sed la historio, precipe de la postmilita tempo, konfirmadas la aserton de la benanta Zamenhof, ke eĉ Esperanto povas atingi le celon nur pere de la Amo Mem. Per si mem nek ligo nek lingvo estas la Amo. Sen amo ankoraŭ Esperanto estas nur mizera vanaĵo, krono el ŝaŭmo de l'abisma haosa pra-Vulkano mem.

"Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo."

(J.E., 13/10/33.)

S.A.E. PROGRESS IN FIRST MONTH. BUT FURTHER YET!

—o:—

The Society for the Advancement of Esperanto made definite progress in its first month. Several members and patrons were enrolled and favorable comment was aroused. Teachers, university graduates and other professional people received a copy of La Suda Kruco together with an explanatory letter. Esperantists in the Commonwealth who do not belong to an Esperanto organisation were similarly introduced to the Society. Further progress calls for your help! There is room for all your loyalty in following up these initial thrusts. The S.A.E. is the only body of its kind in Australia. Forward 5/- and become a member, or 21/- and become a patron. This will bring you La Suda Kruco regularly; you will help the paper's circulation, lead to its improvement, and assist the Esperanto movement generally. If you are already a subscriber to the paper, nominate someone to receive the extra copy; if a patron nominate four. Write to Mr. K. Linton, hon. sec., 16 Chapel Street, St. Kilda, S2, or enquire at 169 Exhibition street, Melbourne. But please act at once!

KRONIKO.

Coburg Esperanto Club, Viktorio:

La kvaran datrevenon de la klubo festis anoj la 12 Sept-o per interkonatiga vespero kaj danco. Membroj kaj iliaj amikoj kaj reprezentuloj de aliaj grupoj estis plezurigitaj per koncerteroj, dancoj kaj interbabilo. Precipe plaĉis pianosolo de f-ino D. Williams, citroludo de s-ro Zaren, violonpecoj de s-roj Beaumont kaj Smith, Esp-a kaj Anglalingva deklamoj de Joice Petrie, danco kaj Esp-a deklamo de Lorin Hearne, kaj nelonga propaganda prezentaĵo de la membraro.

Ricevinte bonvenon pere de la prez-o, s-ro Williams, s-ino Nenedek, pola Esp-isto, esprimis en Esp-o sian plezuron esti inter la kunvenintoj. S-ro Williams tradukis sian parolon Anglen por tiuj ne sciantaj Esp-on. Li diris, ke li sentis fundan impreson pro tiu praktika elmontro de la utileco de Esp-o, ĉar s-ino Nenedek ja ne parolas la Anglan.

La ĝuatan vesperon ili devis kontraŭvole fermi ĉe noktomezo.

Studantoj, kiuj celas gajni la Pyke Memorial Diploma, nun solide pro-

gresas, instruata de s-ro G. Burns. Ankaŭ klubanoj el aliaj klasoj bone lernas. Novajn membrojn ni de temp' al tempo enregistras, sed bedaŭre perdis provizore kelkajn malnovajn, tial ke tiuj foriris kamparon, serĉantaj laboron. Nia jarkunveno okazis la 19 Okt., kiam elektitoj enoficiĝis por 1934. Celante plifortigi kaj -utiligi la klubon, anoj arde kaj diversidee planas, por ke 1934 verku belan paĝon en ĝia historio.

Masterton Club, Nov-Zelando: Dum Sept-o la klubo bone progresis: la membraro fidele vizitadis la kunvenojn. La ĉefa okazo estis "MOK-kongreso." S-ro Dewar, D.B.E.A., agis kiel prezidanto; s-ro J. B. Johns, en la rolo de M.P., bonvenigis la delegitojn al la klubo. Raportoj de la Kuripuni, Bagwash, Verdŝtelisto kaj Mangapakeha klubdelegitoj estis akceptitaj. Akompanante sin je la piano, f-ino Alice Winhall kantis La Espero. Poste la ĉeestantoj fariĝis gastoj de la klubkomitato, kaj ĝuis programon aranĝitan de s-ro Franks.

S-ro Fred Miroslav Paulinovich, el Jugoslavio, kiu aliĝis al la klubo antaŭ 5 jaroj, trapasis sian ekzamenon por la D.B.E.A. diplomo. Ni speciale gratulas s-ron Pavlinovich, ĉar li scias la anglan lingvon jam de ok jaroj. Ĉiam entuziasma laboranto por nia afero, li certe indas ĉi tiun honoron.

(Ni petus raportantojn bv. doni la plenan titolon anstataŭ nura abreviacio, kiam temas pri malvaste konataj organizoj k.s. Ekzemple, multaj cerbumos pri MOK, kaj kio signifas "en la rolo de M.P.?"?)

BRISBANA ESPERANTO-SOCIETO.

En la pasinta monato la komitato de la Brisbane Esp. Soc. aranĝis du tre sukcesajn festojn. La unua estis pikniko al Moggill, bela kampara loko dek mejlojn de urbo Brisbano. La piknikantoj, da kiuj la veturilo portis bonegan nombron, tutkore ĝuis la ekskurson, ludante k.t.p. S-ro P. Proctor paroladis pri siaj vojaĝoj en Japanujo, kio tre interesis ĉeestantojn; ankaŭ donis plezuron unu juna filo de s-ro N. G. Mills per sia "Fajrobrigadano, savumian infanon!"

La dua festo okazis ĉe la hejmo de ges-roj N. G. Mills, Moorooka, la 19an de Septembro. La gastoj vigle dancadis kaj ludadis, kaj s-ro Dean faris banĝomuzikon alte plaĉan al la gastoj. F-ino R. Macpherson deklamis originalan verkon, per kiu ŝi forte ridigis ĉiujn aŭskultantojn. Premiojn ili aljuĝis al f-ino E. G. Parry pro vortkonkurso, kaj al f-ino D. Mason por fajfkonkurso. La unua ricevis korbon da fruktoj, la dua tualetskatolon.

F-ino E. B. Carrick donacis kvantegon da fragoj kaj kremon; tiuj estis venditaj por la Societo.

Vesperofine la prezidanto, s-ro S. Leon Parry, nome de la Societo, kore dankis ges-rojn Mills pro la malavara maniero en kiu ili disponigis sian hejmon al la Societo.

(Ni salutas ĉi tiun novaĵon el nia Brisbane centro, kaj sincere petas regulan sendadon de tiaj el ĉiuj ŝtatoj. Red.)

ENTERTAINMENT.

The Melbourne Esperanto Club is this year celebrating the birthday of Zamenhof, the founder of the International Language, by means of a "Kiel Plaĉas al Vi" Social Evening. All samideanoj and their friends are invited—there will be no charge for admission; one merely has to blandish the doorkeeper with a silver coin to be sure of admittance. There will be three special items in Esperanto—and for the rest, one does as one pleases—hence the name of the evening.

Remember the time, date and place—8.30 p.m. at Australian Church Hall, Russell Street, on Wednesday, 6th December—the first Wednesday in December.

Special Note! At the above Social the results of the Pyke Memorial Examination will be announced, and the special prize and certificates presented.

You know of a prominent person favorably inclined to Esperanto. Let us have the name and address.

FOR YOUR BOOKSHELF.

"Interrompita Kanto,"—Orzeszko, 1/3. A large selection of literature, text books, dictionaries, stationery, badges.

Melbourne Esperanto Society,
Box 731F, P.O., Melbourne.

RADIO LESSONS.

Esperanto lessons will be given from Station 3AR, Melbourne, at 7.45 p.m. on the dates given below. The anecdotes given at the conclusion of the lessons are printed to enable beginners to check their pronunciation:—

Nov. 18th.—"Ĉu via onklo estis mense sana ĝis la fino?"

"Mi ankoraŭ ne scias. Oni legos lian testamenton morgaŭ."

Dec. 2nd.—Ŝi: "Mi tre maltrankviliga, Vilĉjo."

Li: "Pri kio, karulino?"

Ŝi: "Mi scivolas, ĉu mi efektive estas la sola knabino, kies monon vi amis."

RECENZOJ

La sekvantaj verketoj devenas de N. Szapiro, Warszawa, Nowolipki 8. Ili havas ĉiu ĉ. 38 p. Prezo nemontrita.

La Vizio; La Veŝto. De B. Prus, aŭtoro de "La Faraono"; trad. Lidja Zamenhof. Altnivela rakonteto. Nekredema pola kuracisto kutimas neadi, ke saĝe estas sekvi la ordonon, "Amu viajn malamikojn." Tamen, en stranga vivkrizo akompanata de mistera halucinacio, li decidis agi laŭ tiu Vorto, kio sekvigas frapan rezulton. Traduko bonega. Sed notinde: uzado de nenececa "kontinuigi," anst. simple "daŭrigi." p. 19, plumeraro, "en la kritika momento" (kriza); 18 "ŝi estis decidita" (decidinta). La dua verketo estas delikattuŝa bildo de feliĉa paro, kies kunulecon en la vivo minacas malsano de la edzo. Per honestaj, amemaj trompoj ili klopodas animtrankviligi unu la alian—en kio veŝto grave rolludas.

Fraŭlino Ida, de L. Biro; **La Vojo Melrupren,** de K. Porzsolt. Trad. L. Rereips. F-ino Ida emas sinmortigi ĉar ŝi ne havas doton por edziniĝi kun s-ro Jovanoviĉ: ŝi subite heredas onklan riĉon—kaj jen, strange malbeliĝas por ŝia vido tiu, kiun antaŭe si tiom arde prispiris. La dua estas ankoraŭ ekziko pri junaj geedzoj, kiuj trafas en mizeron. Ili malsategas; ŝi sin vendas por pano. Antaŭ tio ĉi la edzo tremas de hororo, flugkuras la palacon de l'orgio por vana provo tiregi la perdulon el la abismo. Tamen, fine la stomako venkas la koron; ankoraŭ li manĝegas el ŝia provizo—kaj "la trian tagon li batis la edzinon, ĉar ŝi ne alportis al li vespermanĝon." Terura ĉapitro de homa sorto, legata en la flamlumo de l'infero.

Amo kaj Pano; Aŭtuno: Augusto Strindberg. Trad. Leono Vienano. Dirende, ke ĉi tiu libreto ne atingas la bonegan nivelon de la serio al kiu ĝi apartenas. Ĉu tiu fakto devenas de tio, ke la tradukinto, polo, verkis laŭ nesufiĉe komprenata de li sveda originalo, aŭ sekvis ne tre bonan traduktekston? Ĉiokaze, asertinde estas konsilo: la verkojn de Strindberg devas traduki nur svedo aŭ iu perfekte posedanta la svedan lingvon kaj funde elscianta la filozofion de tiu satirema pesimisto.

La Mistero; Unu Horo. P. Romanov. Tradukita de Isaj Dratwer el la rusa. Du seksopsikaj studetoj subforme de dialogo inter ruĝarmeano kaj burĝa knabino, kaj de leteroj de virino al konfidato. Per simplaj medioj la aŭtoro pens'pike, eĉ provoke, prituŝas la ludadon de la sentoj inter la seksoj kaj sin montras multe pripensinta tiun misteron, eternan kiel la mondo. Valora por legantoj estas la aŭtobiografieto de la verkisto. Notoj pri lingvaĵo: 8, "malbona triumfo" (malica . . .); 28 "virto al (de) neniu bezonata"; 29, "drakajn leĝojn" (leĝojn de Drakono; drakonajn leĝojn). (ROBO.)

SOCIEDADE PROPAGANDA DE PORTUGAL

(Touring Club de Portugal), public utility by Government decree, Lisbon, Largo do Chiado, 12-2, has just opened an Esperanto Section, and asks for "Esperantajoj" from Australia, which it is intended to use in its exhibitions. Fitting acknowledgement will be made.

Prospekto de la Mnemonika Instituto de d-ro Fajnstejn, Vilno, Zawalna 15-11, Poland. Ĉu vi volas facile memori la korelativojn, la adresojn de viaj korespondantoj, viajn ŝuldbonojn al Esp. gazetoj, kaj la neologismojn? Se jes, do metu vin en kontakto kun la supra, kiu je modera kosto donos al vi la mensan ekipon posedatan de liaj feliĉaj kursfiniĝintoj.

Jarlibro de la Tutmonda Asocio Kolektanta; J. Takacs, Jablonne N. Orl., Ĉeosl. Valora nomadreso de registritaj kolektantoj. 0.60 sv. fr.

Unua Slovaka Kristana Princo; Mil cent jaroj de Kristaneco en Ĉeosl. teritorio. Laŭ verko de d-ro Hodal, kompilita St. Kamaryt. Libreto 14-paĝa. Bele presita, sed pro la eteco de la literaro ni sugestus, ke la eldonistoj suplemente donu grandigan vitron kun ĉiu ekzemplero.

GODOLLO JAMBOREE AND ESPERANTO.

In an optimistic but well-balanced and suggestive report of the International Scout Jamboree at Godollo, Hungary, this year, P. Balkanyi (Address: Budapest poŝto 507) writes interestingly of the work done for and by Esperanto among that huge gathering of boys drawn from the four corners of the globe. He compares the results with those achieved at the gathering of 1932 and concludes that the language has made definite if modest advance in this field. Although the Esperantists present numbered only 180 to 200, around one per cent. of those attending, effective work was carried out by them. The little body was widely representative, coming from England, Australia, Austria, Czechoslovakia (30), Estonia, Finland, France (15), Germany, Spain, Hungary (90-100), Italy, Wales, Latvia, Lithuania, Holland, Norway (10), Poland (3), Portugal (Madeira), Rumania, Scotland, Sweden, Switzerland, and Trinidad (5). (Full report in "Heroldo de Esperanto," 3 Sep., 1933.)

Some 3000 leaflets in 4 languages (among them, we take for granted, Esperanto.—Editor) and 2000 copies of the "Skolta Bulteno" were distributed; Esperanto songs were sung at

the official camp fire before 2000 people; Esperantists took up duty at the bank, ticket office, radio station (from which salutations also in Esperanto were sent to the world) and at the camp police station (1). Esperanto was mentioned twice on the official program.

Godollo, which marks the beginning of intensive propaganda among Scouts, made many friends for Esperanto. Time and again it was proved before thousands of lads that those knowing Esperanto were able to converse in it with an ease rare indeed among those having chosen the thorny path of a national language. Scouts from New Zealand, India, Ceylon, Palestine and Egypt promised to learn the language and to become local representatives of the Scout Esperantist League. In short, there was much to encourage those concerned to further strenuous effort in 1934. By the way, there is talk of a Pan-Pacific, if not a World, Jamboree in Melbourne for Centenary year.

OPINIOJ PRI MONDOLINGVO.

La artefarita lingvo estas ebla kaj oni povas trovi la sciencan, de kiu ĝi dependas. Kun la helpo de tiu lingvo vilaĝano juĝos pri la esenco de l'aferoj pli facile ol nuntempe juĝas la filozofoj. Descartes, 1629.

Internacia lingvo antaŭsignas grandan ekonomion en la elspezado de energio ĉe la homaj interrilatoj, kaj en tiu ekonomio de elspezo estas la esenco de civilizacio. Prof. W. Ostwald.

La penso de konservatuloj obstine asertas, ke Esperanto estas utopia entrepreno. La efektiva, naturleĝe evoluanta realeco ne rapidante, sed ĉiam pli certe, renversas la opinion de la konservatuloj. M. Gorkij, 1921.

Neeviteble estos bezona al la diversaj nacioj ia unu komuna lingvo. Konstrui novan lingvon estas ebla. Comenius, 1592-1670.

Diverseco de la lingvoj estas unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la vivo. Voltaire.

Mi ĉiam estis adepto kaj daŭre estas adepto de tiu vidpunkto de Lenin, ke en la epoko de l' mondskala venko de socialismo, kiam la socialismo firmiĝos kaj enradikiĝos en la vivo, la naciaj lingvoj devos neeviteble kunfandiĝi je unu komuna lingvo, kiu kompreneble estos nek la grandrusa, nek la germana, sed io alia. Stalin.

(La homoj) siatempe kapablos plengrade regadi la lingvon—produktajn de la homspeco. Karl Marx.

Mi ne neas la eblecon de Esperanto aŭ iu alia arta lingvo disvolviĝi en literaturan lingvon. Por tio nur estas necesaj homoj de granda literaturo genio, uzantaj tian lingvon en originala verkado. A. Lodewyckx, M.A., Litt.D., profesoro de la Germana lingvo ĉe la Universitato de Melbourne (1933).

Lingvoj artefaritaj estas ĉiuj pli malpli naturaj, la naturaj—pli malpli artefaritaj. Ĉefa afero estas: akceli la evoluon de artefarita lingvo, eĉ se ĝi ne estas la plej perfekta. Prof. Schuchardt (Graz).

La lernado de multaj lingvoj estas ja necesa malbono, kiu tamen, atinginte fine la troecon, devigos la homojn trovi helprimedon; kaj en iu malproksima estonteco ekzistos por ĉiuj unu nova lingvo, unue kiel komercingvo, poste kiel lingvo por spiritalaj interrilatoj ĝenerale, tiel certe, kiel iam ekzistos la aerveturado. F. Nietzsche.

NOVA ELDONO ESTAS URĜA.

Legante "La Rabeno de Baharah" kaj la ceterajn librojn de la sama serio (eld. Esperantista Centra Librejo, Parizo) oni devas ĉe preskaŭ ĉiu paĝo halteti pro preseraroj. Tiu frukto de nezorga kaj indiferenta metiado estas trea hontindaĵo, precipe kiam estas en la verkoj de Zamenhof, ke tiuj fusaĵoj estas tiel multenombraj. Ne nur tio estas plendinda sed ankaŭ la tuta maniero prezenti al la publiko la literaturan rezulton de lia oferema, laborplena vivo.

Ĉu ni ne rajtas aserti, ke fortike binita, bonpapera eldono, tute libera de presfuŝo, kaj eĉ havanta ĉepiedajn notojn komente pri la teksto, trovus volontan aĉetadon de la Esperantistaro ĝenerale? Eĉ se tiu aserto estas troa, tamen devas esti multaj studemaj Esperantaj legantoj, kiuj konsciante pri la nekontentigo de la zamenhofaj tekstoj tiel aĉe eldonitaj, facile flankenmetus ilin kiel amare ridindajn kuriozaĵojn kaj tuj havigus al si la novan, bone kompostitan kaj belaspektan serion. La laŭdinda faro de d-ro Dietterle donas belan ekzemplon. Lia bonega "Originala Verkaro de d-ro Zamenhof" (Ferd. Hirt, Leipzig), zorga, majstra kompilo, troviĝas jam sur multaj bretoj. Ekrigardante al ĝi la zamenhofano ĉiam ankoraŭ demandas al si, **Kiam venos la tago en kiu mi vidos tutan komentitan tradukaĵaron de la Majstro sidantan en sia kompanio?** Ne temas pri ia troa postulemo de libro-maniuloj avidaj manĝi luksajn volumojn, sed efektive pri natura, rajta deziro de studentoj

posedi fidelajn laborilojn kaj havi sub la okuloj presezemplojn pli dece konformajn kun la meritoj de nia Instruanto ol la mizeraj surgatoj nun vendataj.

SINJORO VIRBOVLANO KREIS NOVAN LINGVON.

Laŭ Sekretaj Dokumentoj iom aliiĝitaj verkis L. Thom.

Komprenoble ĉiu en la Ĉiea Klubo konsideris sinjoron Virbovlano. Ne paganta ano li estis dum tri monatoj. Kiam nia beleta kasistino petis lin pri la kotizaĵo, li eksciĝis. Sed dum lia membreco, Bovĉjo, kiel la ŝerculoj lin karesnomis, lernis multon pri la lingvo internacia, kaj eĉ povis diri, "Ki'l vi san's?", "Bon'n v'sper'n," kaj Ĝi sla." Nun, ho ve, Bovĉjo estas mortinta, kaj ne decas, ke oni rakontu pli da malbonaĵoj pri li.

Sed homo nur devas morti, por ke lia dumviva famo disvastiĝu. Kiam li mortis oni eksciis, ke sinjoro Virbovlano vivis ageman vivadon, ke li havis sennombrajn plorantajn amikojn, kiuj bedaŭris lian forpason. Kiam li estis Ĉie-ulo, ni malmulte sciis pri li: ne eĉ ni sciis, ke li havas edzinon. Tamen ĉi tiu fakto eble ne surprizas iun, ĉar Ĉie-aj Kluboj ekzistas kiel rifuĝejo por edzoj. Tamen ni vere surpriziĝis eltrovi post lia morto, ke sinjoro Virbovlano estis ano de la Imperia Ligo por Defendi la Imperion — komprenoble kontraŭ la danĝeroj, kiuj verŝajne ĉirkaŭas ĉiun imperion. Iu nun rememoris, ke laŭ la raporto en jaro 19—, li detruis la ĉapelon de homo, kiu ne forprenis ĝin dum la kantado de la Nacia Himno. La pacjuĝisto monpulis Virbovlanon je dek ŝilingoj, plu dek kvin ŝilingoj pagotaj al la posedanto de la ĉapelo, krom kvin ŝilingoj pro leĝkosto, sume unu funto kaj dek ŝilingoj, alternative, unu monaton. Virbovlano pagis kaj ankaŭ volonte pardonpetis al la ĉapelbatito, kiu estas surdmutulo, kaj estis tute senintence endanĝeriginta la Imperion ĉar li ne aŭdis la muzikon.

Poste kara Bovĉjo eksciĝis de la Imperia Ligo, kiu kostis al li tiel kare, kaj aniĝis al la Alliance Francaise. Almenaŭ unufoje en ĉiu jaro li elkriegis, "Vive la France," ĉe la festeno, sed nur post li estis senkomprenne aŭskultinta dek paroladojn en fuŝeparolita franclingvo kaj toaste trinkinta dek glasojn da vino. Li neniam lernis ion

pri la franca lingvo krom la vortoj, Je, tu, il, elle, ĉar la manko de iu aparta vorto por esprimi la ideon "ĝi," tute haltigis lin.

Dum la milito sinjoro Virbovlano estis simpla, patriota homo. Li hurais la venkojn, grincis la dentojn pro la malvenkoj, kaj ploris, kiam la propra filo falis en la tombon. Post la milito, ebruiĝita de postmilitaj politikistoj, li ĵaris neniam denove akcepti "malamikon" en sia domo. Kvin jaroj forpasis. Tiam lia filino edziniĝis je juna germano. Liaj amikoj diris, ke Bovĉjo agis kiel ĝentilhomo. Li pardonis al ĉiuj, esceptante nur la Kajzeron.

Post la edziniĝo de sia filino, sinjoro Virbovlano estis nekonsolebla, ĝis iu sugestis al li, ke li lernu Esperanton. Komprenoble nur personoj, kiuj estas sur la rando de la Abismo de l' Malesperemuloj, lernas lingvon. Sed ĝis nun sinjoro Virbovlano opiniis, ke Esperanto nur povas esti danĝera internaciismo. Tamen kio ajn estas la vero pri la koro de la homaro, estas vere, ke la koro de individuo povas aliformiĝi. La koro de sinjoro Virbovlano ŝanĝiĝis, plimoliĝis, pliboniĝis, kaj se nur nia beleta kasistino ne estus demandinta lin pri eta afero, oni ne povas konjekti al kia altaĵo sinjoro Virbovlano ne estus sin levinta. Kaj plue, se la morto ne estus kaptinta nian Bovĉjon, li estus preninta teruran venĝon kontraŭ la Ĉiea Klubo, kaj kontraŭ la movado, kiun ĝi havas la honoron propagandi. Silente en sia ĉambreto Bovĉjo estis verkanta mortigan baton kontraŭ ni—sed li ne ĝisvivis ĝian finiĝon. Antaŭ ol li mortis, kaj kiam li sciis, ke li baldaŭ devas alvizaĝi la Nigran Diablon, la fundamenta bonkoreco, kiu direktadis lian vojon dum la vivo, denove evidentiĝis. Sed ni klarigu.

Eble ok jarojn de post sinjoro Virbovlano lastafoje vizitis la klubon, ni informiĝis pri lia morto. Ni jam de longe pardonis lin pro la nepagita kotizaĵo, sed lia nomo ja restis sur nia membra listo. Leteron de kondolenco, laŭ instruo de la prezidanto, la sekretario skribis al la vidvino de Virbovlano. Sekvantan poŝton, venis dankletero de la vidvino, en kiu ŝi skribis jene:

Mia edzo postlasis ian proprajon, kun instrukcioj en sia testamento, ke mi transdonu ĝin al via estimata klubo. Ĉu viaj laŭleĝe rajtigataj oficistoj bonvolos viziti min post la

kvina horo vendrede?

Ha! Ĉu ĝi estas konsciencmono! Tiel pensis nia prezidanto. Eble estas Cerbumaĵoj for! Venis la difinita horo, kaj ankaŭ samideanoj D— kaj C— antaŭ la pordo de la vidvino, kiu agrable ilin akceptis. Ŝi forviŝis unu larmon de la vango, kiam ili menciis la nomon de la kara mortinto, kaj transdonis al ili sigelitan koverton, dirante, "Bonvolu, sinjoroj, senĝene legu la leteron tuj. Mi estas la kuratoro de la tuta postlasitaĵo, kaj eble vi havos ion por sciigi al mi."

Kun apenaŭ firma mano sinjoro D— malfermis la koverton, kaj sinjoro C— ankaŭ legis la skribitaĵon de super lia ŝultro.

"Ne, sinjorino Virbovlano, ni ne havas por vi ion aldonitan—la letero kune kun malgranda notlibreto estas la solaj aferoj, kiujn via edzo postlasis al nia klubo."

Sinjorino Virbovlano apenaŭ kaŝis senton de faciligo kaj diris, "Mia edzo multe interesiĝis pri iu lingvo dum siaj lastaj jaroj."

"Efektive, mi tiel komprenas de . . ." komencis sinjoro D—, kiam li sinjorino enmetis, "Jes, li diris al mi, foje, ke li simpligas la francan lingvon tiel ke li mem povos ĝin lerni. Fakte, mi komencis dubi, ĉu li ne freneziĝis"

"Sed iu, kiu konis sinjoron Virbovlano, ja ne povus tiel opini . . ."

"Feliĉe, ĉi tiu lingva afero estis lia sola strangaĵo. Mi ne plu detenos vin, sinjoroj," ŝi findiris, kaj ni tuj faris adiaŭon.

Silente sinjoroj D— kaj C— reiris al la Ĉiea Klubo, kiu kunvenas ĉiuvendrede. Fakte estis, ke sinjoro Virbovlano estis kompilinta novan lingvon kaj ĝin postlasinta al la klubo. Li faris proponon, ke la klubo vendu la lingvon al la filmdirektoroj, kiuj tiam posedos la pres-kaj parolrajtojn de Internacia Lingvo, de kiu ili havigos al si egajn gajnojn. Pro tio la film-industrio certe subtenos la aferon. Sinjoro Virbovlano ankaŭ proponis, ke la klubo uzu la vendmonon pagotan de la filmdirektoroj kiel rimedojn propagandi—Esperanton. Jen, la koro de sinjoro Virbovlano restis fidela al nia afero

Kaj pri la lingvo Kelkajn detalojn ni aldonas—Artikoloj estas le, leŝ, kaj un (france elparolotaj); pronomoj—je, tu, il, elle, kaj te (ĝi) (france elparolotaj) ekz. Le homs . . .

Finaĵo s ne-elparolota sed kial daŭrigi senutilan aferon? Kompren- eble sinjoro Virbovlano—nia kara Bov- ĉjo—aŭ ŝercis aŭ freneziĝis. Sed haltu unumomente! Nun venis la kremo de la ŝerco, se ĝi estis serco, aŭ la lakto de la kokoso, se ĝi estis frenezaĵo. La Vortarego? "Ĝi estu el ĉiu vorto en la mondo." Komence, nur la Angla Vortarego de Murray, poste la Franca Vortarego, tiam la Hispana, Itala, eĉ fine la Ĉina kaj Japana, sed en romanaj presliteroj

"Mi volas," skribis sinjoro Virbovlano, "faciligi la vojon de ĉi tiuj verkistoj en la internacia lingvo, kiuj enkondukas novan radikon en ĉiu frazo Ili estas kuraĝaj homoj, sed, mi kredas, ne tiel kuraĝaj, kiel la legontoj de iliaj verkaĵoj."

Nu, kiam Bovĉjo estis kun ni, li ĉiam estis serioza homo, kvazaŭ fakte li havis sekretan malĝojon Nur la morto povis malkovri, ke li havis animon, kiu ridis.

BONA IDEO.

Kiam mi loĝis ĉe hotelo en kampara urbo lastan semajnon, iu petis min skribi ion en aŭtograf-libron. Mi ne estis sufiĉe lerta verki originalan kaj mi konsciencie rifuzas skribi tiujn mal-freŝajn kaj sensanĝajn frazojn, kiuj enuigas onin, kiam oni tralegas tiajn librojn, do mi malinklinis skribi ion ajn. Sed la amikino persistis, kaj fine mi senpacience skribis esperante— "Kiam vi ĉi tion estos tradukinta, vi komprenos, ke mi estas skribinta nenion."

"Kio ĝi signifas? Kia lingvo ĝi estas?" Ŝi petis.

"Aŭskultu al la radio sabatvesperon por respondi," mi diris.

Sed ŝia scivolemo estis ekscitita. Ŝi ne volis atendi. Ŝi demandis de la aliaj ĉeestantoj, "Kia lingvo ĝi estas?"

"Ĝi estas franca, greka, hispana, germana k.t.p." ili sugestis.

"Ne," mi al ĉiu respondis.

"Lasu min ĝin ekzameni," diris juna viro. "Ĝi estas anglalingvaĵo malordigita," li triumfe ekkriis, kaj provis malsame ordigi la literojn.

Fine mia amikino petis siajn instruistojn, kaj unu sciis, ke ĝi estas Esperanto.

Almenaŭ mia ŝerceto prezentis la vorton "Esperanto" al kelke da homoj nekonantaj la lingvon, kaj eble semo falis en bonan teron. Post scivolemo eble venis studado.—E.G.L.

PRI FAMA HIMNO.

Sinjoro W. Maxwell Lyte, unu el la malmultaj ankoraŭ vivantaj idoj de la aŭtoro de la himno "Abide with me" (Restadu kun mi), en letero al "The Times" diras: Nur tiuj, kiuj scias pri la tragediaj cirkonstancoj en kiuj la aŭtoro verkis la belan himnon, povas klarigi la internan signifon de la vorto "Fast falls the eventide" (rapide vesperigigas).

Mia praavo, pastro Henry Francis Lyte, la aŭtoro de la himno, estis vikario de Lower Brixham, tiam pentrinda malgranda vilaĝo de fiŝkaptistoj sur la marbordo ĉe Torbay. Li verkis multenombrajn poemojn kaj himnojn, el kiuj iuj troviĝas en la kolekto "Hymns Ancient and Modern" (Himnoj antikvaj kaj modernaj).

Dum la lastaj jaroj de sia vivo li donis sin al la servado al la en Brixham malriĉa fiŝkaptistaro, inter kiuj troviĝis multaj el liaj plej intimaj amikoj. Tiu laboro grave difektis lian sanon, sed li persistis je sia nobla laboro ĝis lia sano tute ruiniĝis pro la troa streĝado de liaj fortoj, kaj lia kuracisto diris, ke li devas tuj veturi alilanden. Tiam li estis mortanta je ftizo.

En la vespero de la proksima dimanĉo li predikis adiaŭan predikon en la preĝejo de Lower Brixham, kaj post la Diservo li malrapide piediris al sia hejmo ĉe Berry Head. Tiun vesperon okazis unu el la gloraj sunsubiroj iufoje vidataj ĉe Torbay.

La suno estis subirante en belega glorlumo, kaj la purpuraj montetoj de malproksima Dartmoor nigrete elstaris kontraŭ flamanta ĉielo. En la antaŭaĵo kuŝis Brixham-haveno, simila al lageto el fandita oro. Survoje al sia hejmo la poeto kelkfoje haltis por ripozi kaj rigardadi tiun mirindan naturan spektaklon.

Oni povas bone imagi liajn sentojn. Li ĵus adiaŭis por ĉiam siajn paroĥanojn, kaj li sciis, ke li povas vivi plej multe nur kelke da semajnoj. La mortanta tago insiste rememorigadis lin pri lia finiĝanta vivo.

Dum tiu irado hejmen li preĝis, ke antaŭ ol li mortos estu permesate al li verki por la homaro unu konsolan komunikon, kiu ĉiam daŭros. Alveninte sian domon li eniris la kabineton kaj tie tuj verkis tiun senmortan himnon, kiu pli riĉigis la Anglan lingvon kaj portis pacon kaj konsolon al milionoj da homoj.

Lia preĝo ja plenumiĝis. Neniu, sciante pri la cirkonstancoj en kiuj la himnon verkis pastro Lyte, povas kanti ĝin sen tio, ke li sentas en ia grado la emociion, kiu inspiris la poeton, dum tiu verkis pri la vesperiĝo de sia vivo.
(El la Angla tradukis Gego.)

Ombroludo.

So successful was the "Ombroludo" given by members of the Melbourne Esperanto Club at a recent concert that another effort of the kind will be given at the next Social Evening—"Kiel Plaĉas al Vi" at Australian Church Hall on the first Wednesday evening in December.—Even if you are a stranger to Esperanto you will be able to follow the Shadow Show behind the screen. In the last event, a notable Secretary of an even more notable Esperanto Club was surgically provided with a new heart! What may happen next time????? There is no charge for admission—but one may blandish the doorkeeper with a silver coin.

Don't forget Wellington Club's Zamenhof Evening on 12th December!

POR VIRINOJ.

Gravedulino, loĝanta en tendaro sur ĉefa vojo, kiun oni konstruas inter du urboj en la centro de Kvinlando, infektigis per subita malsano, kiu igis ŝin tute senkonscia. Dekunu viroj portadis ŝin dektri mejlojn, el kiuj tri kondukis tra preskaŭ nepenetrebila arbustaro kaj trans senpontaj riveretoj, antaŭ ol ili atingis ambulancon.

La virino malsaniĝis dum la nokto. Je sunleviĝo rajdisto galopis de la tendaro al la plej proksima telefono por alvoki ambulancon de la plej proksima urbo. Dume la dekunu viroj, sen matenmanĝo, ekiris por atingi la vojon, malproksime je tri mejloj, portante la senkonscian virinon sur homportilo el arbetoj kaj kanvaso.

Ili atingis la vojon post nervostreĉa travivaĝo, sed la ambulanco ne estis videbla, kaj la viroj daŭrigis la marŝon por renkonti ĝin. Ili estis irintaj dek mejlojn plu, antaŭ ol atingi la ambulancon, kiu devis halti pro la malbonaj vojoj, kaj estis la kvina horo kaj tridek posttagmeze, kiam fine la virino estis akceptita en la hospitalon.—M.C.

Join the S.A.E. and give impetus to the movement.

NI RIDU!

"Ne, min mirigas ne tio, ke homoj malkovris en la ĉielo stelojn, sed tio, kiel ili scipovis ekkoni ĉiujn iliajn nomojn."

Bonaj Aĉetistoj.

Komercisto de vitrilaro faras estimkapklinon al preterpasanta gea paro. La kamarado de la komercisto lin demandas:

—Ĉu ili estas cial gekonatuloj?

—Ili estas miaj plej bonaj aĉetistoj; eĉ unu tago ne okazas en kiu ili ne batas vitrilaron sur la kapoj unu de alia.

Kiu Kiun?

Patro: Moŝko, ĉesu tiri la katon je la vosto!

Filo: Kiu tiras? Ĉu mi? Ĉu vi ne vidas, ke ĝi tiras, mi do nur tenas.

Suvorov.

"Kiom da tempo vi donas al mi por vojpreparo?" demandis Suvorov la policiston, kiu alveturis, por deklari al la ĉefarmeestro la caran ordonon pri la ekzilo en vilaĝon sub observo.

"Nur KVAR horojn."

"Mia Dio, kiel kompat-malavare . . . Mi nur dum UNU horo estis min preparanta al milito kontraŭ turkojn . . ."

Kaj preninte sub-brake kesteton da paperoj, li surmetis la mantelon, krucsignis la hetmanojn kaj diris al la mirigita oficisto:

"Preta; bonvolu sekvi min sur la peronon . . ."

Kaj Suvorov forveturis . . .

Geedzoj.

LI: Al ni estas tre facile geedziĝi, ĉar mia patro estas pastro.

ŜI: Vere, kaj MIA patro estas advokato.

Ankaŭ Kamarado.

Falis ebrulo en kavon, kuŝis kaj rigardis ĉielon, ĝuste rimarkis tie falantan stelon kaj diras: "Ho ĉielo, kaj ci ankaŭ ebruliĝis . . . Hm."

Niaj Lernantoj.

Instruisto: Ivanov, kia tempo estas la plej oportuna por pomkolekto?

Ivanov (iom pripensinte): Kiam la mastro deturnis, kaj lia hundo estas alĉenigita.

Proverbo.

"Ne ĉiu brilanto estas diamanto"—estas bona popola proverbo. Nu, infanoj, ĉu vi ne povas doni ekzemplojn?

Ekzemple, via pantalono, s-ro instruisto.

Signo de Civilizo.

Okazis en maro ŝippereo. Negranda parto de la ŝipanaro sin savis kaj naĝe atingis la bordon, kiun ili opiniis esti senhoma insulo. Post longaj vagoj ili

subite vidas antaŭ si sur arbo pendigiton.

Gloro al Dio, ekkriis unu el ili, ni trafis civilizan landon!

Li Resanigis.

Renkontiĝis popola kuracisto kaj vilaĝano.

"Nu, sinjoro, kiel fartas cia edzino?"

"Gloro al Dio, bone—"

"Jen, ci nun vidas. Ci ne volis, ke mi operaciu ŝin, sed danke la operacion ŝi restis viva."

"Ho, kien ci trafis? . . . Ja mi duan jaron estas edzo de DUA edzino, la unuan do, mi enterigis."

Malgranda Karlo vidis la unuan tojon sur la kampo erinacon. Baldaŭ post tio li trovis sur la strato kaŝtanan, kiu estis ankoraŭ en la ŝelo. Goje li anoncis sian trovitaĵon al la patro per jenaj vortoj: Pacjo, imagu nur, kion mi trovis sur la strato—erinacon ovon!

International Drama.

Are you interested in the International Drama? From Scotland to Hungary is a far cry, but a one-act play from each of these countries will be given in Esperanto at the next concert of the Melbourne Esperanto Club at the Australian Church Hall, Russell Street, on the first Wednesday evening in December. Remember, there is no charge for admission—you merely blandish the doorkeeper with a silver coin, that is, if you have one.

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF.

(Nr-o 8)

(La sekvanta letero estis skribita de D-ro Zamenhof al la redaktoro de la nova esperanto-organo laborista en jaro 1910.)

"La belan honoran ekzempleron de la 'Laborista Esperantisto' mi ricevis kun plezuro kaj mi sendas al vi mian sinceran dankon. Al la nova gazeto mi deziras plej bonan sukceson kaj mi esperas, ke la sukceso certe ne mankos, ĉar mi konas vian energion kaj laboremecon. La kampo, kiun vi elektis por via laborado, estas tre grava: eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertis la utilon de Esperanto, sed ili ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo." (Vidu "La Socialisto," Wien, 1-9-1929, p. 76.)

PARALLEL TRANSLATION

Artifiko de Lernbubo.

Iu knabo en la klaso staris ĉiam ĉe la honora loko; neniam mi povis superi lin, malgraŭ ĉiuj miaj penoj fari tion. Tago sekvis tagon, kaj ankoraŭ ĉiam li tenis sian lokon, spite mian intensan konkuradon, ĝis fine mi ekobservis, ke, li kutime palpas per la fingroj certan butonon ĉe la malsupra parto de sia veŝto, ĉiam kiam iu metis al li demandon. Sajnis bona al mi, do, fari tiun butonon, kaj en malbona momento mi tion faris per tranĉilo. Kun ega maltrankvilo mi atendrigardis la rezulton de mia ago, kaj ĝi sukcesis ja bone. Kiam la knabo estis pridemandita, liaj fingroj ekserĉpalpis la butonon, sed vane. Tre ĝenate, li direktis la rigardon sur ĝian lokon, sed li povis nek ĝin vidi, nek ĝin fingrekarsi. Li staris konfuzata; kaj mi prenis lian lokon de honoro. Tiun lokon li neniam plu gajnis, kaj, mi kredas, neniam suspektis tiun, kiu faris la malbonon kontraŭ li. Ofte, post tiu tempo, apudpasante lin, mi sentis konsciencomordon, kaj ofte mi decidis iel kompensi lin, sed ĉiam la decido restis nur simpla bonintenco.

Kvankam mi neniam refaris parolan konatecon kun li, mi ofte lin vidis, ĉar li plenumis ian modestan oficon en iu kortumo en Edinburĝo. Kompatindulo! Mi kredas lin nun mortinta; li frue en la viraj jaroj fariĝis viktimo de la alkoholo.—Walter Scott ("Aŭtobiografio").

A Schoolboy's Trick.

There was a boy in the class who stood always at the top; nor could I with all my efforts supplant him. Day came after day, and still he kept his place, do what I would, till at length I observed that, when a question was asked him, he always fumbled with his fingers at a particular button in the lower part of his waistcoat. To remove it, therefore, became expedient in my eyes; and in an evil moment it was unmoved with a knife. Great was my anxiety to know the success of my measure; and it succeeded too well. When the boy was again questioned, his fingers sought again for the button, but it was not to be found. In his distress he looked down for it; it was to be seen no more than he felt. He stood confounded, and I took possession of his place; nor did he ever recover it, or ever, I believe, suspect who was the author of his wrong. Often, in after life, has the sight of him smote me as I passed him; and often have I resolved to make some reparation; but it ended in good resolutions. Though I never renewed my acquaintance with him, I often saw him; for he filled some inferior office in one of the courts of law in Edinburĝo. Poor fellow! I believe he is dead; he took early to drinking.—Walter Scott (Autobiography).

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

Masterton (N.Z.) Esperanto Club.—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Worksoo-rd., Masterton. Visitors welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiutage je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram

Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejoj: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marĉe vespere je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18h.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro V. Rutland; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Prisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2an kaj 4an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-st.: proksime de konstruo "State Insurance." Prez. kaj sek. provizora: s-ro Leon. Parry. Vicprez-oj: s-roj O. Behncken (del. UEA) kaj M. Hyde; Bibliotekisto: f-ino E. B. Carrick, Office Supt. Teleg., Brisbane, Queensland.

Coburg Esperanto-Grupo—Kunvenas ĉiujauĉe je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ

Grand Teatro). Prezidanto, s-ro Hearn; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Mr. W. King, 10/-, Aug. '35; Mr. E. C. Jack, 10/-, June, '35; Mrs. W. J. Butler, 5/-, Apl., '34; Miss D. Walder, 1/4; Mr. J. A. Nairn, 4/6, Sept., '34; Coburg Esperanto Group (sales), 7/4; Mrs. Mathie, 4/6, Sept., '34; Mr. J. O'Connor, 4/6, Sept., '34; Mr. J. Invicevic, 5/-, Sept., '34; Mr. J. Invicevic (adv.), 1/-; Melbourne Esperanto Club (profit from Concert), £2/16/-; Miss Fleming, 4/6, Sept., '34; Mr. W. Gray, 4/6, Sept. '34; Miss Chisholm, 5/-, June, '34; Coburg Esperanto Group (sales), 7/4; Miss Hannaford, 5/-, June, '34; Mr. Takahasi, 5/8, Aug., '33; Sydney Esperanto Society (sales), £1, (adv.) 5/6; Mr. Atkinson, 4/6, Sept., '34.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 6 pencoj. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 157 (14th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

9 DECEMBRO, 1933.

VOLAPUK, AND AFTER.

It is indeed good to realise that our world is not peopled wholly by "angels who fear to tread"; because of those who dare the world moves on.

To a German parish priest, Johann Martin Schleyer, mankind owes the first decisive step forward in the march to an international language. For a few brief years his Volapuk was actually used, and, in spite of his failure, the fact remains that he took a stumbling step forward while others had merely discussed the possibility of walking. We now smile at the rude machines of Santos-Dumont and the brothers Wright, but these pioneers, we must remember, actually left the ground, and without their patient groping and courageous blundering nothing would have been achieved.

The story of Volapuk's rocket rise and fall is told fully in "A short history of the international language movement" (A. L. Guerard, London, 1922), and the now incomplete but well-written "International Language" of W. J. Clark, London, 1912, contains a pithy chapter. Esperantists will find in "Historio de la Mondolingvo" (E. Drezen, Leipzig, 1931) a detailed critical account of the brief but colorful life of the language. The weightier

encyclopedias also give space to the matter.

Volapuk lingered till 1911, when it passed away with its inventor, aged 80. Its collapse, it is true, created a prejudice in the public mind against the idea of an international language, but this has passed. To-day one finds hard-headed business men ready to take a risk, as witness the faith of certain Continental publishing firms relative to Esperanto.

As Zamenhof, the author of Esperanto, in speaking of Volapuk, said:—"Schleyer was the true father of the international language movement; he was the first to say, 'I wish not only to dream, but also to labor for my idea.' While all around slept, he created the practical movement. Volapuk was not vanquished by Esperanto it perished of itself, while Esperanto was yet too weak to vanquish anything. It perished not by reason of its strange sound or any similar cause, for one can become accustomed to anything. What today seems crude, tomorrow will appear quite natural and beautiful. By long use the idiom even of the most barbarous tribe would become a rich, elegant and fitting language. Volapuk perished chiefly on account of one

important error—an absolute lack of the power of natural evolution. For every new word or form the language had constantly to depend on the decision of one person or of a committee only too ready to dispute among themselves. As on a stick planted in the earth, new leaves and branches cannot naturally grow, but must be sculptured or glued on, so with Volapuk. Had it not been for that error, which unfortunately no one could correct, we all probably would be speaking it today. But that regrettable error, caused not by lack of talent or industry, but by a too rapid publication, without sufficient proof in practice, in no way detracts from the merit of its author, who first powerfully shook the world on behalf of our idea."

Language knows no pope; and Schleyer erred in attempting to copyright Volapuk. Unity and continuity are essential to the development of an international language, whose normal life, like that of a nation, must be a constant compromise between the conservative and progressive elements.

Before Volapuk had flashed on the mind of Schleyer, young Lazarus Zamenhof, a Warsaw student, was planning a sounder scheme, and today

international language and Esperanto are for most of us the same thing. In Esperanto is bound up the fortune of all those who hope for the success of an auxiliary tongue. It seems certain that the system ultimately accepted will be either Esperanto or an adaptation of it.

The lesson of Volapuk was not lost on Esperanto's guides, who, realising that individual reform means death, agreed on an absolute, standard grammar and gave unswerving loyalty to a small book containing the first vocabulary of the language, its 16 grammatical rules and a few exercises. This they called the Fundamento, which is as the law and the prophets. Everything contrary to the Fundamento is not Esperanto. But is there not danger from the opposite direction? How can progress be reconciled with the inviolable authority of an infallible document? It is answered that the Fundamento, although a norm, is by no means limitative, for any person may introduce new words into the language. All words common to the major European tongues may be used with the precaution that they assume Esperanto orthography. If the new word be clear, euphonious and necessary it will spread by natural imitation and in due course be officialised by the Esperanto Academy, which at intervals issues additions to the list of official roots. It thus plays a role similar to that of the Academie Francaise. If two words are proposed for the same idea they fight it out. Sometimes a neologism is never recognised, and so dies; perhaps some of the older forms become obsolete. Sometimes both forms survive as more or less synonymous, and are used side by side. At no time will there be a break in the development of the language: never any arbitrary intervention. Thus one has growth—reasonable liberty reconciled with the paramount need for unity.

Esperanto owes its success primarily to its great, though not unique, qualities, partly to the wise tactics of sacrificing theoretical perfection to unity and continuity; but most of all to an exclusive virtue which many of its critics fail to comprehend—its spirit. Although only a language, and disclaiming any other purpose, it nevertheless is characterised by an "inner idea," a basic striving for human brotherhood. This is the reason why, with many, it engenders an enthusiasm

which approaches an almost religious fervor, as though it were a new evangel. It is the bond that unites its adepts, making them, as it were, a "supernation," the embryo of the future world state. Men of all races and religions have found communion in that spirit, strong enough to give a constricted language the capacity for emotional expression equal to that of the national tongues. Esperanto, totally independent of any individual authority, with its healthy resistance to sudden change, its power of inner growth, its practical application and high idealism, presents a soundly organised service to all who will avail themselves of it. Pioneer Schleyer's brilliant failure, light-bringer to those that followed after, surely helped to this end, and its full story today makes brave reading.—R.B.

NIA POŝTO.

D-ro F. W. en S. La E. alvoko adresita al ne-Esp. skoltoj ne efikus. Ni bezonas anglalingvajn por disdono inter ili.

S. en L. Viaj demandoj montras vin funda studento de la Zam-aj tekstoj. Fabeloj de A. Vol. 2, p. 152: "Tie aŭ alie." Malfacile estas, kredi, ke Z. tiel skribis konscie. Devas esti: Tie aŭ aliloke, aŭ eventuale kiel provo "tie aŭ ali-ie." Ĝi povas esti ankoraŭ ekzemplo de ekstermana prituŝo, kun celo "plibonigi" aŭ "kurtigi" (mallongigi) oftan vorttrion.

"Pasagero" (La Rabistoj, p. 59): Uzita ŝajne en senco de piedvojaĝanto, kaj ne laŭ Kabe kaj la ceteraj vortaroj. Eble ni jam povu nomi ĝin arhaismo. Kp. vetur' vojaĝ' piedir'.

"Kiu rigardis sin kiel kompetentajn" (O.V. 386): Interesa ekzemplo de la akuzativo post "kiel," ĉar sen "kiel" la frazo havus la saman senco kun la nominativo predikate: "Kiu rigardis sin kompetentajn." Eble ni povus klarigi la du formojn jene: 1. Kiu rigardis sin kiel ili rigardus kompetentajn personojn. 2. Kiu rigardis sin esti personoj kompetentajn.

H. in Ul. The Language Committee was founded at the Boulogne Congress in 1905. Its task, according to the rules approved in 1912, is "to give care to the conservation of the principles of the language, and to supervise its evolution."

The number of Committeemen is not limited. In 1932 there were 129 mem-

bers, who represented 26 languages. The Committee elects its own members, but the national and specialist associations can recommend candidates.

From those of its members who possess special linguistic qualifications and who have the means of effectively co-operating in the work to be done, the Committee elects a higher commission, called the Language Academy. This body consists of not more than 18 members. Its president is now M. Rollet de l' Isle.

J. E. en W. Viaj rimarkoj estas iom severaj. Konfese, ke ankoraŭ sentiĝas certa nesistemeco rilate la fak- kaj profesinomoj. Ekz., filologo, fizikisto, anatomiisto. Legindaj ĉiutukonekse estas "Fremdvortoj en Esp-o" de P. Neergaard, kaj la koncerna recenzo fare de Kalocsay en Bibliografia Revuo Nr-o 3 (eld. Lit. Mondo). Vi speciale indigniĝas pri "astronomo," kiu laŭ via opinio devas signifi ne homon sed astron plus nomo, do stelonomo! Sed la vorto estas grekdevena kaj signifas etimologie ne stelonomo sed leĝo pri la steloj. G. asteer—stelo; nomos—leĝo; astronomia (astronomio, stelscienco); astronomos, (astronomo, stelsciencisto). Vi devas lasi influi ankaŭ la fakton, ke por la stelsciencisto la Francoj sialingve uzas astronome, kaj la Hispanoj kaj Italoj astronomo. Cetere vi rajtas uzi en E-o astronomiisto anst. astronomo.

NASKIĜO.

Al Hilda (naskita Dawes), edzino de Reginald F. Banham, ŝia dua infano: Margareto Ruth. Ambaŭ bonsanaj.

RADIO LESSONS.

Esperanto lessons will be given from Station 3AR, Melbourne, on the dates given below. The anecdotes given at the conclusion of the lesson are given to enable beginners to check their pronunciation:—

Dec. 16.—Juĝisto: "Mi rimarkas, ke vi ŝtelis ne nur cent pundojn, sed ankaŭ grandan kvanton da juveloj."

Akuzato: "Jes, sinjoro; mi memoris, ke la mono sola ne alportas feliĉon."

Dec. 30.—"Kial vi rigardas min tiel, etulo?"

"Ĉar panjo diras, ke vi trinkas kiel fiŝo, kaj mi deziras scii kiel fiŝo trinkas."

Heinrich Gorlich, Teplitz Schonau, a.o. Krankenhaus, Ĉeĥoslovakio, serĉas seriozajn kor. pri socialismo kaj la lab. movado ĝenerale.

N. Z. E. A. SECTION.

(13th Official Bulletin).

Activities during Concluding Quarter, 1932-33.

Although the operations of the complete year are to be fully reviewed in the annual report to be presented at the 5th New Zealand Congress to be held at Wellington from 26th to 28th December, it is perhaps expedient to include herein a brief survey of the NZEA's activities in the final quarter of the 1932-33 financial year. Such a survey will serve the useful purpose of assisting members to understand the extent and the value of the work which their national organisation is undertaking in the interests of Esperanto, and at the same time will remind them that their support is vitally necessary to the NZEA in order to ensure its smooth functioning.

Membership Matters.

Several members came forward during the quarter to increase the membership to a total of 93, which figure exceeds last year's total by 3; and 10 have already renewed for the forthcoming year. This is most satisfactory; and the increase may be taken as indication that bedrock has at last been reached, for in the preceding 12 months there had been a decrease of 13 members. May the new year bring an even greater expansion! With the membership so well maintained, it is confidently expected that when the NZEA's accounts are closed at the end of the year a small surplus will be revealed. Donations (£1/10/6) during the year enhance the prospects.

NZEA Standing Committee

met on 31st August, and the committee's decisions included the following:—(1) that the appointment of Messrs. W. L. Edmanson, F.B.E.A., Bertram Potts, F.B.E.A., and L. E. Dust, D.B.E.A., as tutors for the NZEA Correspondence Course be confirmed; (2) that the secretary obtain the biographies of well-known Dominion Esperantists; (3) that a special circular to further the NZEA's membership be issued; (4) that commencing in January, 1934, an advertisement announcing particulars of the NZEA be published in "La Suda Krucio"; and (5) that the principles of the "Interkonsento de Geneva, 1933" be supported by the NZEA, and the UEA be requested to state the mini-

mum amount for which the NZEA will be accepted as an affiliated society.

It should be stated that, in connection with (2), communications are being forwarded personally to pioneers and active Esperantists, but the biographies of persons other than those addressed will also be received with thanks; and (5) that the 5th N.Z. Congress will decide whether or not the NZEA is to officiate with the recently re-organised international body in accordance with the conditions laid down by the UEA and which are expected to arrive in time for congress.

5th N.Z. Congress.

At writing, the preliminary arrangements are being made for the holding of the above-mentioned congress at Wellington on 26th, 27th, and 28th December. At a combined meeting of the NZEA Standing Committee and representatives of the Wellington Club held on the 10th October, a Local Congress Committee was appointed and the following skeleton programme decided upon:—**26th December (Boxing Day).**—2 p.m.: Formal opening; welcome to delegates, etc.; official photograph. 8 p.m.: NZEA annual general meeting. **27th December.**—10.30 a.m.: UEA annual general meeting (N.Z. section). 2 p.m.: Lecturette session (both in Esperanto). 8 p.m.: Concert and social evening. **28th December.**—Excursion. 8 p.m.: Supper and formal closing. (N.B.—Congress correspondence should be addressed to the NZEA secretary, whose address is shown below.)

International Co-operation.

It is always the desire of the NZEA to co-operate in this field wherever possible. From time to time the NZEA has responded to official requests appearing in "Esperanto," such as for material for exhibitions, etc., in the belief that by co-operating the movement abroad is strengthened by the tangible proof provided of the widespread establishment of Esperanto. The last request of this nature received came from Goteborg, Sweden, and was complied with. In addition, a congratulatory letter was forwarded to s-ro O. Degučī, Ajabe, Japan, leader of the Oomoto movement, on

the occasion of the 10th anniversary of the introduction of Esperanto into Oomoto; and agency work was done on behalf of "La Suda Krucio"—small but useful tasks.

Encouraging Signs; General Functions.

During the quarter enquiries for information were received from interested persons in camps at Kaiangaroa, near Rotorua, and at Dargaville, North Auckland; information was also supplied to the prospective founder of a class at the Y.M.C.A., Mt. Albert, Auckland. Particulars regarding textbooks were given to several individual enquiries; and the names of several qualified Esperantists were recommended to Mr. W. J. Collins, of Christchurch, who was anxious to obtain the co-operation of an experienced Esperantist to act as a reviewer of his translated work on the Maori people. The NZEA correspondence course is being advertised in the newspapers in the four chief towns of the Dominion and numerous enquiries have been received. An outstanding feature in connection with the course is the number of communications received from editors of newspapers outside of those being utilised, requesting that advertisements be placed in their respective journals. A letter appeared in the correspondence columns of "The Dominion," Wellington, congratulating the NZEA on its initiative in introducing the Course. All hopeful and encouraging signs.

Propaganda.

Ever an important portion of the NZEA's activities, propaganda of a varied nature has been conducted. Oversea visitors have (in accordance with a practice operating during the past 18 months) been brought into direct contact with Esperanto by means of NZEA circulars. Besides visitors from Australia, Africa, England, and America, Dante, the world-famous Danish magician, was supplied with informative literature, as was the Japanese training ship "Shintoku Maru," which spent 10 days at Auckland during September.

The official recognition and use of Esperanto by post and telegraph ad-

"Kiel ili ĝojas pro la kaptigado! Rigardu kiel ili ĉiuj svingas la vostojn."

Intensa junulino al aviadisto—"Diru al mi, kiel sonas la kanto de alaŭdo, kiam vi ankaŭ estas inter la nuboj?"

Tiu ĉi estas la leĝo de bona ago inter du: tiu, kiu faras, forgesu, ke ĝi iam estis farita; la alia neniam forgesu, ke ĝi estis ricevita.—Seneca.

Pensoj de J. Ruskin.

Cia aĝeto, eĉ la skribo de linio aŭ la eldiro de silabo, estas kapabla de aparta digneco en sia farmaniero.

Vera pentristo faras eĉ la kolorneeston bela, samkiel la iom post ioma formortado de perfekta voĉo faras la silenton sankta.

Ĉiuj veraj opinioj estas vivaj kaj montras sian vivon per nutriĝpovo kaj tial per ŝanĝeblo. Sed ilia sangigado estas tiu de arbo, ne de nubo.

La naturleĝo estas, ke difnita kvanto da laboro estas necesa por produkti difnitan kvanton da kia ajn bono: tial, se vi deziras scion vi devas laboregi por akiri ĝin.

Ĉiu bona ago kaj pura penso signas sian belecon sur la vizaĝo kaj korpo—Ĉiu malbona ago kaj malvirta penso sian sigelon distordigan.

La trezorejoj de veraj reĝoj estas la stratoj de siaj urboj.

Faru severaj viajn edukleĝojn, kaj tiam viaj kriminalaj leĝoj povas esti indulgaj. Sed se vi permesos troan liberecon al la junularo, tiam vi devos konstrui malliberejojn por la maljunularo.

Neniam instru al infano ion, pri kio vi mem ne estas certa.

Je via propra volo vi povas vidi en la defluilo de la strato, aŭ la rubon de la strato, aŭ la bildon de la ĉielo.

La promesoj faritaj en tempo de aflikto bezonas pli bonajn memorojn ol la homoj kutime posedas.

Vij faros la plej grandan servon al la regno se vi konstruos, ne la tegmentojn de la domoj, sed la animojn de la civitanoj; ĉar estas pli bone, ke grandaj animoj loĝu en malgrandaj domoj, ol malnoblaj sklavo en domego.—Epictetus.

MI MEMORAS!

Mi tre ĝojis kiam mi legis pri la Brisbana Esperanto-Societo, ĉar ĝi vekis en mi memoraĵon pri la tempo pasinta.

Mia frato, J. G. Pyke, ĉiam amis gastigi siajn esperantajn geamikojn. Unu vesperon estis ĉe nia hejmo juna fraŭlo, kiu parolis esperante tre lerte. Li loĝis en la kamparo, kie ne estis aliaj esperantistoj. Mi diris al li, "Kiel vi parolas tiel bone?" Li respondis, "Ho, mi parolas al mi mem."

Ofte mi pensis pri tiu respondo, kaj konsideris kiel efika estis tiu parolado "al mi mem," kaj vidis image tiun junan fraŭlon sub la blua ĉielo, kun la verda herbo malsupra, dum li laboris kaj parolis esperante, nur la bestoj kaj la birdoj kiel aŭskultantoj.

Tiu junulo estis s-ro N. G. Mills. Mi vidis per la sendaĵo el Brisbano ke ankoraŭ li laboras por Esperanto, kaj lia juna filo ĝuigis la piknikan grupon de geesperantistoj, kiam li deklamis "Fajrobriĝadano, savu mian infanon."

Mi esperas ke la juna filo povas paroli tiel lerte kiel lia patro, kiu perfektigis kiam li parolis "al si mem," en la bela kamparo.—EMMA PYKE.

POR LA VIRINOJ.

Nur antaŭ du tagoj virino en unu el la montaj vilaĝoj senkolere trapikis sian edzon per grandega tranĉilo. Ŝi ofendiĝis ke li batis ŝin. Nu, neapolitaj virinoj fieras pri tiu ĉi servado de siaj edzoj pripensante ĝin kiel pruvado de amo—kiam mi urĝis ĉi tiun vidpunkton al la saĝuloj de la vilaĝo, ili senkulpigis ŝi pro la fakto, ke ŝi ne estas neapolitano, kaj ne pli bone sciis.—Norman Douglas en la "Woman's Mirror."

'La virinoj de mia epoko povis fari ion. Mi antaŭe vidis sinjorinon vestita de kapo al piedo en ŝiaj propraj fabrikoj; sed nuntempe restas ne eĉ unu afero de ilia propra fabrikado al ili—krom iliaj vizaĝoj.' Tiel skribas Oliver Goldsmith (1728-1774) en 'The Good-humoured Man.' Legante tiun oni miras, ĉu la sama bastono ĉiam taŭgos por bati la virinojn tra la estonteco.

NEWS CLIPPINGS FROM ESPERANTO GAZETTES.

The novel "Hura," written in Esperanto by J. Baghy, a Hungarian, has appeared in a German translation by Albert Mair, Innsbruck. Translations

in other languages are in preparation. ("Hungara Heroldo.")

"Mr. Tot aĉetas mil okulojn," the Esperanto novel by the Pole Jan Fetke (Jean Forge), has been put into German and Polish. The lastnamed appeared recently and was well received, while the German translation reached several editions. ("Literatura Mondo.")

"INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO"

has appeared regularly now for ten years. It reports faithfully the work of international scientific pedagogy, the congresses and labors of international teaching assocs. and the progress of Esperanto among the schools and the teaching profession. It also acts as the medium for correspondence between teachers and pupils throughout the world, being the organ of the Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE). Sub. for 6 copies, inc. membership of TAGE, 2.50 Dutch guilders. Send sub. and articles to P. Korte, Schoolstraat 13, Veendam, Holland.

LA AŬSTRALIA LANDIDO.

Kredeble, kiel kredas multaj, la indiĝenoj de Aŭstralio havas tre malaltan vivnivelon, sed malgraŭ tio, ilia riĉeco prave ŝajnas al ili esti granda. Loĝante plejparte apud marĉoj kaj havante la loĝejetojn proksime de arboj, ili havas manĝaĵojn el kaj marĉoj kaj arbaroj samtempe — el la marĉoj karikon (kolektitan de la inoj), anglilojn (lancpikitajn de la viroj), anasojn (aŭ ŝtonmortigitajn aŭ kaptitajn per gluaĵo ŝmirita sur la ĉirkaŭajn arbojn), kaj alispecajn akvobirdojn; el la arbaroj ili havigas al si makropojn, serpentojn, larvojn, didelfojn k.t.p. La arbaroj liveras ankaŭ belajn peltojn (kiel makropajn), kiuj vintre uziĝas kiel molaj flekseblaj kovriloj. La peltojn, kiujn ili moligas per multa frotado, la virinoj kunkudras per bestaj tendenoj kiel fadenoj, kaj per osteto el posta kruro de makropo, kiel kudrilo. Se ili ne deziras alkuŝigi frue, ili ne uzas tuj la peltkovrilojn, sed ekbruliginte du malgrandajn fajrojn, ili sidas inter tiuj, por ke ankaŭ la dorso fariĝu varma.

Kiel valizon la enlandano uzas lignan trogeton porte sur la kapo aŭ pende trans la kokson. En tiujn ili enmetas jen manĝaĵojn, jen eĉ la infaneton. Alia speco de portilo estas la sako teksita per juncoj. Ĉi lasta tenas, inter aliaj objektoj ankaŭ la penatojn (1) t.e., diversaj aĵoj por maltrafi malbonajn spiritojn.

Niaj "infanoj de la naturo" ne povas ion boligi, ĉar ili ne konas la arton potfaradan; sed iliajn rostitajn fiŝojn, viandon kaj radikojn multaj ja ne malestimus. Por rosti ili enterigas en la daŭro de nokto la kuirotaĵon en elfosaĵo treege varmegita. Iom strangan guston helpas doni la junkoj, per kiuj ili ĉirkaŭas la kuirpecon.

Multe multe estas la ruzoj de la lalidoj, por fari la vivon agrabla; sed eble Esperantistoj preferus legi ion pri iliaj lingvoj. Ĉi tiuj estas ja multaj kaj lerneblaj nur per praktiko. Ĉi tiu elĉerpo el la Patro-nia en la dialekto de la Arandaj indiĝenoj eble interesos:

"Kara nunakara alkiela, Retna unkwanga atknaltarerekana.

"Tmaratjua unkwanga pitjiekana, Antjabma unkwangana alberkuekana alkiela ngera, lakina alala tuta . . ."

Sed pro kio mi daŭrigu ĝin?

—C. C. COWLING.

(1) Boirac. Ĝusta-uzo, la vorto signifas "hejmajn diojn de l' antikvaj Romianoj).

KRONIKO.

Wellington, Nov-Zelando.—De post rekomenciĝo, je la mezo de februaro, la loka klubo kunvenis seninterrompe ĉiumardvespere, kaj la klubanaro, nombrante inter 20 kaj 30 ĝuis bonegajn programojn ĉiusemajne. Pro la sukceso de la kunvenoj la agemaj kluboficistoj meritas laŭdon, ĉar per ilia sindonema laboro dum longa tempo Esperanto tre fortiĝis en la Nov-Zelanda ĉefurbo.

La ĉiusemajnaj programoj klubaj estas senescepte edukaj, amuzaj kaj distraj. En la klubo, varmigita per elektro, la arango estas provizi laŭbezone diversgradajn lecionojn dum unu horo (post konfirmo de la protokolo antaŭsemajna), ankaŭ parolpraktikado samtempe por diversgrade spertaj samideanoj. Post tio sekvas variaj programoj en Esperanto: komedioj, deklamoj, paroladoj, kaj en la pasintaj tri monatoj, kunkantado kaj muzikaj eroj. Kutime, unu el la kluboficistoj anoncas pri grava progreso aŭ fakto rilate al aŭ Esperanto aŭ la movado, kaj la detaloj estas raportitaj en la klubraportoj, kiuj nepre aperas en la tagjurnaloj post la kunvenoj.

La klubo jarfine agos kiel gastiganto de la 5a N.Z. kongreso; tiam ni esperas bonvenigi multajn novajn kaj malnov-

ajn amikojn, kaj ankaŭ pogrande distastigi Esperanton.

KORGRATULON

al f-ino L. Corkill, Christchurch, Nov-Zelanda sukcesinto je la B.E.A. supera ekzameno. Jen pruvo de altgrada scio de Esperanto. Tre agema por la movado, tiu nov-Diplomito estas N.Z.E.A.-ano de post starigo de la asocio en 1929.

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF.

(N-ro 9)

"La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukita, t.e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro

. . . Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili intertedis min ĉiam pli teorie ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzerciĝadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj, sed ne per la buŝo, tial mi libere parolas nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane), la lingvon francan mi legas libere sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie . . . Ĉar la pli granda parto de nia popolo ne uzas la lokajn lingvojn, sed parolas per aparta 'jargono' hebrea-germana (la tiel nomata 'yiddisch'), kiu ĝis nun ankoraŭ posedas nenian gramatikon, tial mi antaŭ longatempoj dedidis ĉirkaŭ du jarojn al la fundamenta esplorado de tiu jargono, mi esploris ĉiujn ĝiajn leĝojn kaj mi ellaboris ĝian gramatikon (kiun mi tamen neniam publikigis)". El privata letero al s-ro Michaux, 21 Februaro, 1905. Citita en Lit. Mondo (Sept, 1933) de prof. Waringhien, kiu promesis presigi la tutan skribon pro ĝia escepta graveco.

Coburg Esperanto Club: Jarkunveno Nov. 2., ĉe kiu s-ro E. Hearne elektigis prez-o; s-ro A. Spencer sek-io (denove); s-ro J. Aldretch helpsek.; s-ro S. Ling gazetkoresp. Anoj arde deziras plisolidigi la klubon kaj tiucele decidis fondi konversacian rondon, kiu kunvenos ĉiudimanche p.t. ĉe la Koburga Lago por parolekzerco. Komitato ankaŭ fondiĝis, por aranĝi amuzfestojn post lecionĉeso je la 9.30 vesp. Debatoj, E. anarkantado, dancoj, ludoj, trovos lokon sur baldaŭaj programoj.

RECENZOJ.

Mi en Li.—Ladislav Vladyka. El la ĉeĥa tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc. 194 pĝ. Prezo 4ŝ. 6p.

Ĉi libro plaĉos al legantoj de la fantaziaj romanoj de H. G. Wells, plus lerte enteksitaj veftoj da erotikismo. Ĝi komencas per misteraj okazoj en mortintejo kaj finiĝas per sensacia sceno en kriminaljuĝejo. Sed inter la unua paĝo kaj la lasta ni trovas maron da komplikeco, aludoj, vualitaj movoj kaj konjektigoj, kio povas tro fidi la paciencon de legantoj, el kiuj la plimulto devos sidi en konstanta nebulo, cerbumante la direktiĝadon de la aŭtoro vag-iro. Ne ĉiu E-isto povas diveni aliulajn pensojn, aŭ emas ordrilatigi interplektitajn bagatelaĵojn tute nenecesajn por la rakonto. Tio validas ekzemple por la paĝoj pri kabaredo Colorado, vortsaŭma pri skribo per kiu Vladyka, cetero kun ia rajtobazo, denuncas la falsecon kaj malbelecon de l' grandurbaj plezurorgioj, nuddancoj, negra blekmuziko k.s.

Ni vidis jam multajn filmojn, vaste reklamitajn sed tre malpli pensenhavajn kaj interesajn ol tiu ĉi verko. En la manoj de kompetenta scenariofaristo, kiu kribrus, plineĝigus la dialogon, kaj plivigligus la agadojn entute, "Mi en Li" povus bontrafi sur la kina kampo. Jean Forge eble notos? Sed la libron ni ne rekomendas al homoj kun (denaskè) lacaj cerboj.

Malgraŭ fakto, ke londonanoj, berlinano kaj ĉeĥo kontrolis la tradukaĵon de la Pionira kolektivo, ni devis halti ĉe kelkaj lokoj en la teksto, kiujn ni ne povas trakti pro spacmanko. Ni demandas nur: Kio signifas "viktimo de periferio"?

La Mono de Sinjoro Arne.—Selma Lagerlof. El la sveda tradukita de Stellan Engholm. Eldonis Forlagsforeningen Esperanto u.p.a. Prezo 1.50 kr. Pĝ. 110.

Verketo de la fama svedino, Nobel-premiito. Puŝate de monavido dung-soldatoj murdas pastron kaj lian familion, krom unu knabino. De tiam temas pri la Dia juĝo, kiu venas sur la krimintojn pere de la fantomo de juna murditino. Naiva rakonteto, eble verkita por la simplaj svedaj fiŝistoj, kies tipo, Torarin, ludas ian rolon en ĝiaj paĝoj. Ni rememoras, ke Tolstoj faris similan por la rusaj kamparanoj.

Povas esti, ke ĉi dua verko de Lagerlof estas pli "tipa" por ŝia plumo ol "La Junulino el Stormyr," sed ĝi ne estas tiel interesa. Ke la rakonto estas scenigita en la 16a jarcento ne meritas mención; tiu tempomedio aldonas nenion da signifo aŭ pitoresko. Tute egale la agado povis okazi en ajna historia periodo.

Eble ja vere, ke iaj pli-malpli sciindaj psikologiaj instruoj subkuŝas la supraĵon de ĉi tiu facile legata libreto, sed la meza E-isto, ne estante stude-

mulo, ne penas elfosi por si tiajn malevidentarojn. Dum ke ni ne havas en E-o verkojn de Lagerlof pli gravajn, do konformajn al ŝia eksterduba grandtalento, ne multe efikas paradŝian nomon en la librolistoj.

Traduko bona: sed "bordmagazeno"? (magazeno—ĉionvendejo); 12, "ĉu mi ne aŭdas kiel (oni, aŭ iuj) fajlas"; 18, "li havis vundon sur la kapo kaj li estis plena de sango" (kovrita de s.); 20, "li (tiel) vipis la ĉevalon, ke ĝi stampis"; 68, "doni lokon al pento" (Kp.: Romanojn 12/19, "cedu lokon al kolero": ni dubas pri ĝusteco de la Engholm'a tradukero).

Konsilioj.—Sugestoj de Malnova Esperantisto.—Andres Pinos. Str. Colon 24, Valencia, Hisp. 56 pĝ., prezo ne montrita.

Komparante le postmilitan generacion de E-istoj kun la viglaj influoj de la frua tempo, la aŭtoro viporte kritikis la unuan kategorion. "Ĉio nun estas malordo; entuziasmo jam perdiĝis; kie estas la malvaraj kaj nespektindaj E-istoj de la praavaj [!] tempoj?" Li metas liston de decidoj aŭ iniciatoj favoraj al E-o, en diversaj jaroj prenitaj de gravaj institucioj, kaj demandas, kiom efektive ili valoris? Laŭte trumpetitaj kiel grandaj triumfoj en sia tempo, ili nun staras malviva litero aŭ prezentas teron pene tenatan nur per laborado de fervoraj izoluloj. Ja tro vere: sed ni ion pensu pri lia unua punkto.

Jus leginte "Analizan Historion de la Esperanto Movado" (Drezen), en kiu (pĝ. 16-26) la ruso pritraktas, kion li kredas esti interluktadoj de ambicijuloj avidaj tronsidi en la Esperantujo de la fruaj jaroj de l' nuna jarcento, ni sentas deziron renkontigi s-rojn Pinos kaj Drezen, por ke ili harmonigu siajn malsamajn kredojn koncerne la motivojn, kiuj pelis la tiamajn ĉefrolulojn.

Akuzante pri nuntempa neardeco Pinos nur parte pravas. Ni vivas en epoko skuanta. Krizo, revolucio. Sub batoj ĉiutagaj la kapoj svene kirliĝas. Sed spite tion E. eldonejoj (Koln, Budapeŝto) kun apostola fido elpuŝas gazetojn, librojn, sen multa kuraĝigo. Historio nepre nomos, inter aliaj, Bleir kaj Jung heredintoj de tiu antaŭen-ema spirito, kiu movis Bourlet kaj Cart.

S-ro Pinos sciu, ke okazis ankaŭ ŝtormaj disputoj inter la Parizaj gigantoj; la nunaj centroeŭropanoj ne tion monopolis. Sed inter homoj forte fervoraj facile flamiĝas malkonsentoj pri ĝusteco de tiu aŭ tiu gvidlinio.

La aŭtoro ankaŭ pozitive kritikis. Li donas atentindajn sugestojn; laŭ kiuj la ĉefaj E. organoj raciigite limigu sin je siaj respektivaj ĉefceloj: Literatura Mondo (literaturo), La Praktiko (instruo), Heroldo (novaĵo, ĝenerala forŝo), kaj Esperanto (pure oficiala organo de la centra direktivo).

Stimula broŝuro, kun strangaj preskaj plumeraroj.

NOVAJ GAZETOJ.

La Kritika Observanto; Revuo politika kaj Kultura. Kvaronjare. 6 Sentier de la Sablonniere, Malakoff, Seine, Francujo.

Laboristtendenca. Studinda artikolo pri la faktoroj, kiuj venigis la ŝtatpotencon al Hitler. La aŭtoro analizas faŝismon kiel energiegan provon de la konvulsianta kapitalismo konservi ĝian sistemon. Prezo por 4 n-roj, 1 sil.

Esperanto dla Wszystkich: Nova pola gaz., ĵurnalfirma. Pleje pollingva. Ŝajnas efika propaganda ilo.

(ROBO)

DUM AŬSTRALIO ESPLORADO.

En 1923 Michael Terry, juna anglo, transiris Nord-Aŭstralion per aŭtomobilo. Tiu ĉi parto de la lando konsistas el vastaj, malplenaj regionoj, kies amplekso estas pli ol kvar fojoj tiu de Granda Britujo, kaj kie la ĉefaj loĝantoj estas indiĝenoj.

Ekzistas tie malmultaj izolitaj loĝejoj aŭ brutarbiendoj de grandega amplekso, kie la blankuloj loĝas duope kaj triope. Ekzistas nek bariloj, nek vojoj, nek telegrafo. Estas eble veturi dum multaj semajnoj kaj ne vidi homan loĝejon aŭ renkonti personon. La pioniro povus morti pro soifo aŭ lacego en tiu senlima sovaĝejo, kaj lia korpo neniam estus trovita.

Sekvas okazaĵo dum tiu aventurema vojaĝo de Michael Terry kaj lia kunulo, de Winton, en Kvinslando, ĝis Broome, en Okcidenta Aŭstralio, inter la 6a februaro kaj la 4a oktobro 1923.

"Ĉe Wave Hill, Terry povis havigi pli da petrolo, tiel evitante la prokraston se li sendus al la marbordo (200 mejlojn) por ĝi. Estis la tuta kvanto, kiun posedis la petrolostacio, sed, aŭdinte ke la ekspedicio penas veturi trans Aŭstralio, la kontrolisto donis ĝin malavare por ke ili ne estu prokrastigitaj. La aŭto estis kontrolita antaŭ ol foriri, kaj ili trovis, ke ĉio estas en bona ordo.

La distanco al la proksima brutbieno estis centtridek mejloj, kaj pro tio ke ili ricevis bonajn gvidinstrukciojn de la viroj ĉe Victoria River, ĝi devus esti sufiĉe facila veturo. Sed baldaŭ post la ekiro Terry vidis la por si unuan fajregon inter la seka herbo, kaj sciis, ke li estas vizaĝon kontraŭ vizaĝo kun la plej grava danĝero el ĉiuj. La fajro estis for, kelke da distanco, sed herb-fajregoj kuras rapide kaj ŝanĝos sian direkton kun ĉiu nova vento. Tial ili ĝuis tre mallongan dormon tiunokte.

Je la komenco de la proksimtaga vojaĝo densaj nigraj fumnuboj kolektiĝis ĵus antaŭe. Dum la veturantoj alproksimiĝis ili povis vidi la flamojn, kiuj altiĝis ĝis kvin metroj de la tero. Kaj la fajro etendiĝis de unu flanko de la horizonto ĝis la alia, kien ajn oni rigardis.

Ne estis eble evitpasi ĝin. Oni povus nur reveni tiel eble plej rapide aŭ traveturi ĝin.

Iri returnen ĝis ili atingos nudan teron aŭ akvon malŝparus valoran petrolon. Kaj ili ne havis petrolon por malŝpari. Tial ili decidis elekti la riskegan planon peni trakuri ĝin.

Kun malsekaj tukoj super siaj buŝoj, ili ekveturis al la fajrego kiel eble plej rapide. La tero estis malebena kaj ili povus nur penegi sin teni en la aŭto, dum la petrolo kiu elŝprucis el la karburilo pliiĝis la riskon, ke la aŭto ekbrulus.

Bonsance, ili trovis breĉon sur la ŝtona tero inter la herbo, kaj transiun ĉi breĉon rapidegis la aŭto. La bruliga spiro de la fajro lekis iliajn vizaĝojn, la fumo dolorigis iliajn okulojn. Estis angora momento. Dum ŝajne horoj ili involviĝis en flampena fumo. Efektive nur estis momento aŭ du antaŭ ol ili atingis teron jam forbruligitan . . . kaj tial sendanĝeran.

Estis granda risko. Tre bonsance ili eskapis kun nenio pli ĝena ol iomete da difekto al siaj provizaĵoj—la sukero intermiksiĝis kun la teo, kaj la faruno surŝpruciĝis sur ĉion dum tiu ekkuro por la vivo. Tiun posttagmezon la aventuristoj atingis Invernay Bienon sendanĝere."

RESULT OF PYKE

MEMORIAL EXAMINATION.

Winner of the Special Prize: Dr. Isabella Phillips.

Runner-up: Miss Gertie Morris.

Competitors for Certificates only:

Mr. H. M. Lanyon and Mr. S. Ling passed with honors.

Mr. F. S. Chamberlain, Mr. F. Clifton, Mr. A. Gleeson, and Miss M. McKay passed.

Holger Danske.

In Denmark there stands an old castle, which is called Kronburg: it stands by the sea, where the large vessels pass daily by hundreds, English as well as Russian and Prussian, and they salute the old castle with cannon that say 'Boom!' and the old castle answers with cannon: 'Boom!' for that is the way the cannon say 'Good day!' 'Many thanks!' In winter no vessels sail past there, for it is all ice, right across to the Swedish coast; but it is like a regular road, where the Danish and Swedish flags are displayed, and the Danish and Swedish people say to each other: 'Good day!' 'Many thanks!' not with cannon, however, but with a friendly shake of the hand; and they buy cakes and biscuits from each other, fancying they taste better than their own. But the most remarkable of all is old Kronburg, and beneath it, in a deep, dark cellar, which no one ever enters, sits Holger Danske. He is clad in iron and steel, and rests his head on his strong hands, whilst his long beard hangs down upon the marble table, into which it has grown fast. He sleeps and dreams, but in his dreams he sees all that goes on in Denmark. Every Christmas Eve an angel comes down from Heaven and tells him that all he has been dreaming is perfectly correct, so that he may go to sleep again in peace, as Denmark is in no actual danger. But should it be in danger, then old Holger Danske will arise, breaking the table as he draws out his beard, and he will lay about him with his sword so that it shall be heard in all parts of the world.

Dano Holger.

En Danujo staras antikva kastelo, kiu nomiĝas Kronburg: ĝi staras apud la maro, kie tage pasas pocente la grandaj ŝipoj, anglaj kiel ankaŭ rusaj kaj prusaj, kaj ili salutas la antikvan kastelon per kanonoj, kiuj diras 'Bum!' kaj la antikva kastelo respondas per kanonaj bu-umoj, ĉar tiamaniere la kanonoj diras, 'Bonan tagon!' 'Multajn dankojn!' En la vintro neniam ŝipoj preterpasis tie, ĉar estas ĉiom glacia tute transe ĝis la sveda marbordo. Sed ĝi similas surpaŝitan vojjon, kie elmontriĝas la danaj kaj svedaj standardoj, kaj la danoj kaj svedoj diras unu la alian, 'Bonan tagon!' 'Multajn dankojn!'; ne per kanonoj tamen, sed per amika mana interpreto: kaj ili aĉetas kukojn kaj biskvitojn de unu la alia, imagante, ke ili plifongustos ol siaj propraj. Sed la plej rimarkinda el ĉiuj estas antikva Kronburg, kaj, sub ĝi, en profunda malluma kelo, kiun neniu ajn eniras, sidas Dano Holger. Li vestiĝas per fero kaj ŝtalo, kaj ripozigas sian kapon sur la fortaj manoj, dum lia longa barbo surpendas sur la marmoran tablon en kiun ĝi firme kreskas. Li dormas kaj sonĝas, sed en siaj sonĝoj li vidas ĉion, kio okazas en Danujo. Ĉiu antaŭkristnaska vespero, anĝelo malsupreniras el la ĉielo kaj diras al li, ke ĉio, kion li prizonĝas estas realbaza. Tial li povas demove pace dormi, ĉar Danujon ne tuŝas vera danĝero. Sed se iam ajn alproksimiĝos danĝero, tiam maljuna Dano Holger leviĝos, rompante la tablon kiam li eltiras sian barbon, kaj li ĉirkaŭfrapos per sia glavo, tiel ke ĝi aŭdiĝos en ĉiuj partoj de la mondo.

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

Masterton (N.Z.) Esperanto Club.—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Workshop-rd., Masterton. Visitors welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram

Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunveno: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18^h.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro V. Rutland; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2an kaj 4an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-st.: proksime de konstruo "State Insurance." Prez. kaj sek. provizora: s-ro Leon. Parry. Vicprez-oj: s-roj O. Behncken (del. UEA) kaj M. Hyde; Bibliotekisto: f-ino E. B. Carrick, Office Supt. Teleg., Brisbane, Queensland.

Coburg Esperanto-Grupo—Kunvenas ĉiujauĉe je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ

Grand Teatro). Prezidanto, s-ro Hearn; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

Adelaide Esperanto Club: Sud-Aŭstralio. Kunvenas ĉiujauĉe je 7.45 horo vespere ĉe Paringa Bldgs., Hindley-str., Adelaide. Prez-o: S-ro W. L. Waterman, Roebuck-str., Mile End; Sek-io: S-ro F. L. Droop, 13 Chatsworth Grove, Toorak Gardens.

For Your Bookshelf.

"Interrompita Kanto." Orzeszko 1/3.

A large selection of literature, text books, dictionaries, stationery, badges.

Melbourne Esperanto Society,
Box 731F, P.O., Melbourne.